

# LINGVO \* LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt IX. Mester-utca 53. V. 5. Hungarujo. Aparte aĉetebla. Unu numero kostas 0.20 sv. fr. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspedataj kostas nur 0.30 svisaj frankoj aŭ proksimuman egalvaloron.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvaronjare Nro • 1. 1935

## Antaŭparolo de la Plena Gramatiko de Esperanto<sup>\*)</sup>

La unua sento, kiu verŝajne atakos la leganton ĉe la ekrigardo al tiu ĉi libro, estos la timo, kaj lia unua penso — amara bedaŭro pri la liliputa 16-regula gramatiketo de 1888. Li konsoligu pensante, ke ankaŭ li mem ne povus survesti sian unuajaran pantaloneton, kaj ke tiu ampleksiĝo de la gramatiko nenion alian signifas krom evoluo kaj kresko de la lingvo. Kaj pri tiu punkto, ni esperas, oni povas nur ĝoji.

Dua senkulpigo: lingvo estas tre vasta kaj kompleksa mekanismo. Estus facile sistemigi ĝin per kelkaj tre ĝeneralaj trajtoj, aperigi ĝiajn ĉefliniojn. Sed se oni vere volas studi ĝin detale, prezenti respondon al ĉiuj etaj demandoj, kiujn je ĉiu fraz-angulo metas la milforma, ĉiamvaria homa penso, estas necese verki iom pli kompaktan libron.

Trie, oni devas memori, ke nian internacian lingvon uzas ne animkonsistaj anĝeloj, sed enkorpigitaj homoj: ili ĉiuj havas en sia spirito, profunde gravuritajn, la kutimojn, apartaĵojn, idiotismojn de sia patrina lingvo. Ne estas facile al ili »formeti la malnovan homon kun liaj agoj«, fremdigi al sia penso tiel ofte iritajn vojojn kaj vojstrekojn. Oni devas kalkuli kun tiuj naciismoj, kribri ilin, akcepti tiujn, kiuj estas ĝenerale uzataj kaj ne tro pikas la logikon, forpuŝi la aliajn — kaj tiun disjuĝon oni ne povas fari sen granda detalado. Tiel oni povas argumenti, ke en nia gramatiko la malfaciloj venas ne de Esperanto mem, sed de la naciaj lingvoj.

La ĉi-supraj konsideroj povus esti rigardataj, kiel motivoj de sindeteno antaŭ tiel malsimpla tasko. Ni tamen aŭdacis entrepreni ĝin pro la jena kialo: La decida fakto en la historio de Esperanto estis, ke ĝi transvivis sian kreinton. La morto de Z., anstataŭ malfortigi la movadon, ŝajnis streĉigi ĉies energion, kaj laŭ la kuraĝa ekzemplo de la Majstro mem, kiu ĝis sia lasta horo tradukadis Andersen kaj la Biblion, ĉiuflanke multigis penadoj por riĉigi nian literaturon per tradukoj kaj originaloj. La amaso de tiuj ĉiuj verkoj estas nun sufiĉe granda, por ke oni sentu la bezonon de ĝenerala trarigardo kaj kontrolo de la lingvouzo, cele al kribrado kaj fiksado. Tia laboro estis jam farita por la leksikologio per la Plena Vortaro, en kies ellaborado partoprenis unu el la aŭtoroj de la jena libro. Ni provas nun similan laboron super la gramatiko. Ne estos superflue mallonge indiki nian metodon.

\*) Verkita de K. Kalocsay, kaj G. Waringhien, kaj aperonta en aprilo kiel la unua verko de la lingvo-serio de AELA 1935.

Ni, antaŭ ĉio, studis kaj reduktis al reguloj la uzadon de Zamenhof, kaj de la bonaj klasikaj verkistoj. Sed en tiu materialo, kiel ajn vasta ĝi estas, kelkaj punktoj restis, aŭ dubaj, aŭ eĉ tute ignorataj: ni provis ŝtopi ankaŭ tiujn breĉojn. Por tio, ni helpis al ni kaj per la hodiaŭ montrigantaj tendencoj de la lingvo, kaj per la ĝeneralaj kutimoj de la eŭropaj lingvoj, kaj fine per la abstrakta logiko. Ni klasas tiujn kriteriojn laŭ malkreska ordo de valoro. Efektive, tra nia tuta studado, ni ofte rekonis, ke la pura logiko ne estas la ĉefa potenco en lingvo, ke ofte venkas ĝin formaj aŭ pensaj analogioj, kaj estus rigidigi kaj iel kadukigi la lingvon, se oni submetus ĝin al la ŝtalaj reguloj de la logiko. Tium instruon ni ricevis de Z. mem; dum sia tuta vivo li obstine kontraŭstaris la raciistajn decidemulojn, kiuj postuladis matematikan regulecon en ĉiuj detaloj de la lingvo kaj apriorian konstruadon de »plena gramatiko«: lia rifuzo elverki tian gramatikon venas nur de tio, ke li preferis lasi al la vivo la solvon de multaj problemoj, kiujn la racio per si mem estus eble povinta tranĉi, sed ne malnodi. Se, dank' al la admirinda peno de tiom da verkistoj, ni povis nun entrepreni la taskon, kiun li en 1908 juĝis tro frua, ni tamen intencis ne malobei lian konsilon, kaj kiel eble plej respektis la rajtojn de la vivo, eĉ se devus iom suferi tiuj de la geometria logiko. Tamen, ĉiufoje, kiam en la svarmo da detaloj oni povis distingi la direkton de granda lingva tendenco, ni penis lumigi ĝin, kaj tiel difini la vojon de la evoluo (oni vidu ekzemple la ĉapitrojn pri la pasivo aŭ la refleksivo).

Ni parolis supre pri breĉoj ŝtopitaj. Tiaj lokoj, vere, ne estas multaj en la libro: plejparte ni tenis nin al la principo »konstati, ne proponi«. Kie ni malobeis tiun principon, tie ni markis tion, dirante aparte, ke temas pri propono (por tio sin proponas, oni povus uzi, estus oportune uzi ktp.), krome tiaj lokoj estas lokitaj en piednotoj aŭ presitaj per petitaj literoj. Per tia averto ni volis garantii, ke la libro, kvankam en ĝi ne mankas ankaŭ nemalhaveblaj proponoj, estu tamen fideinde »oficiala«.

Estas kompreneble, ke nia gramatiko sin apogis unuavice al la zamenhofa lingvo-uzo. Tamen, ne en ĉiuj detaloj la nuna lingvo sekvis la zamenhofan kaj aliparte ankaŭ mem la zamenhofa lingvouzo ne estas tute unueca; ekzistas provoj, kiujn Z. poste forlasis. Do, se io estas ne uzata plu kaj diversas de la pli ofta kaj logika formo, tion ni ellasis aŭ markis per malaproba noto, eĉ se ĝi estas zamenhofa.

# LIBRO

Artikolo el la „Enciklopedio de Esperanto“ Ila volumo

E diferencas de la naciaj lingvoj ankaŭ per tio, ke dum la lastaj estas unuavice parollingvoj kaj el tiuj naskiĝis la skrib- kaj literaturaj formoj. E jam naskiĝis kiel skriblingvo, ĝiaj vivo kaj unueco estas ligitaj al la skribo kaj nur duavice al la parolo. La unua E-libro naskiĝis pli frue, ol la unua interparolo, se ni ne kalkulas al tio la konversacion en la kadro de la familio Z, kie la lingvo ankaŭ parole estis elprovata.

Kompreneble la unuaj libroj en E estis gramatikoj kaj vortaroj. Sed jam la 14-a libro estis literaturaĵo kaj de tiam ambaŭ specoj de libroj aperis proksimume samkvante. La unuajn librojn eldonis la aŭtoroj, aŭ tradukintoj mem. Tamen gramatikoj kaj vortaroj estis jam eldonataj de profesiaj eldonejoj antaŭ ol literaturaj verkoj. La serioza eldono de E literaturaj komenciĝis per la fama kontrakto inter de Beaufront kaj Z, post kio de B. kun helpo de Bourlet kontraktis kun la firmo Hachette et Cie, Paris pri starigo de E-fako. Ĝis 1904 la firmo ne havis konkuranton, tiam Lengyel fondis en Paris la Centran E-Presejon (v.) kaj poste kun Cart kaj aliaj la Presan E-Societon por egalpezi la »novismajn« klopodojn de Bourlet. Tamen, Hachette restis ĝis la milito la plej signifa eldonejo, regule aperigante kelkajn gazetojn, multajn librojn. Tre multe laboris ankaŭ PES, ekde 1910 la librofako de Brita Esperantista Asocio kaj de la firmo Ellersiek (v.).

La plejparto de la antaŭmilitaj libroj estis malgrandaj kajeroj, ne superantaj kvindek paĝojn. Ili celis plejparte esti daŭrigaj perfektigiloj post ellerno de kurso kaj lego de unua legolibro. Ofte oni ankaŭ presis partojn el klasikaj verkoj por kvazaŭ mistifiki la neesperantistan publikon pri la ekzisto de tiuj verkoj en E. Nur tre malmultaj libroj el la antaŭmilitaj eldonitaj

povas esti komparataj kun la literaturo nacia. Al ili apartenas: »La Faraono« de Prus, »Fabiola« de Wiseman, originalaj romanoj de Vallienne kaj Luyken, ktp.

La milito forblovis preskaŭ ĉiujn eldonistojn. Post ĝia paso restis sur tereno nur la firmoj BEA kaj Ellersiek. Tamen ne ili estas, kiuj daŭrigis la aperigadon de bonaj libroj, sed la E-fako de fama germana librejo Ferdinand Hirt und Sohn (v.). La libroj de ĉi tiu librejo tute diferencis de la antaŭmilitaj eldonaĵoj. Ili estis ne nur seriozaj, kelkcentpaĝaj verkoj, sed estis diferenco ankaŭ en la ekstera aspekto de la libroj. La antaŭmilitaj ĉefe francaj eldonaĵoj estas ĉiuj presitaj sur malbona ligna, la kovrilo sur simpla ruĝa aŭ alikolora papero, dum la eldonaĵoj de Hirt aspektas kiel zorge dorlotitaj infanoj. Ĉi tiu diferenco lasis grandan impreson ankaŭ ĉe la poste eklaborantaj eldonejoj. La gvidrolo en la libroeldonado post la milito transiris el francaj manoj en germanajn, aldonante el la E-libroeldonado la unuarangan teknikon de la germana preskaj eldonarto. En 1925 ankaŭ Heroldo de Esperanto fondis sian libroeldonan fakon kaj de tiam la E-libro daŭrigas sian evoluon. Unu post la alia aperas gravaj kaj seriozaj libroj, kies ekstero kaj enhavo alligas al la E-movado multe da libroŝatantoj. La E-libro fariĝis unu el la plej bonaj propagandiloj por la lingvo mem. Sed ĝi ankoraŭ ne okupis sian indan lokon.

La meza eldonnombro de iu E-libro estas 2000. Tamen, la plejparto de la eldonejoj presas ne pli ol 1000 ekzemplerojn kaj unu el niaj plej grandaj postmilitaj eldonejoj en la lasta tempo de sia aktiveco presis el iuj libroj nur po 600 ekzempleroj. La plej granda vendita kvanto el iu E-libro literatura estas laŭ nia scio 5000 dum kelkaj jaroj kaj 1500 en la unuaj du jaroj. Tial okazas, ke la E-libroeldonado ne prenas en la manon grandaj alilingvaj eldonejoj, kreante por

Terminologio kompleta estas nepre necesa por tia verko. En E-o la morfologio havis sufiĉe ellaboritan terminologion, sed la sintakso estis tute neglekta. Ni devis do ŝtopi breĉojn ankaŭ ĉi-rilate. Ni petas la leganton, ke li ne timu nekonatan terminon, se li okaze trovas tian; li elserĉu ĝin el la indekso kaj tiam li vidos, ke tia termino nova alportis por li ankaŭ ideon novan, aŭ de nova flanko prilumitan. En kelkaj okazoj ni faris terminon por akiri koncizon: *prepozitivo*, ekzemple, estas *substantivo antaŭata de prepozicio*.

Entute, ni zorgis pri kiel eble plej senpartia internacieco en la difino kaj fiksado de nia gramatika doktrino. La fakto, ke niaj gepatraj lingvoj ne apartenas al la sama lingvistika grupo (unu estas hungara, la alia franca) estis por ni grava helpo kaj donos certan garantian al la uzanto. Estas ja vere, ke ni dividis inter ni la laboron (Kalocsay faris la *Fonetikon*, la *Vortfaradon*, kaj el la Sintakso la *Kompleksan Frazon*; Waringhien la *Morfologion kaj Sinetion* kaj el la Sintakso la *Vortsintakson* kaj *Propozicisintakson*), sed la du aŭtoroj estas tiel ligitaj per komuneco de penso kaj de metodo, ke tra la tuta libro plektiĝas la konceptoj de ambaŭ, kaj nur malmultaj pecoj apartenas sole al unu el ili.

Ni ne estus povintaj fari tiun verkon sen la jam tre vasta laborado de niaj antaŭantoj. Ni deklaras tie ĉi nian grandegan ŝuldon al la esp-istaj vortaristoj kaj gramatikistoj speciale al

L. L. Zamenhof (Lingvaj Respondoj)

Louis de Beaufront (Commentaire sur la Grammaire Esperanto)

Paul Fructier: (Esperanta Vortfarado kaj Esperanta Sintakso)

Camille Aymonier (Grammaire Complète)

Walter Lippmann (dr. Zamenhofs Sprachliche Gutachten; Raportoj pri la Sekcio de Gramatiko antaŭ diversaj kongresoj).

Velten (Ausführliche Grammatik des E.)

E. Wüster (Encyklopedia Vortaro; Internationale Sprachormung; das Verhältniswort in E.)

Varankin (Teorio de Esperanto)

Göhl (Ausführliche Sprachlehre des E.)

de Saussure (La logika bazo de la Vortfarado en E-o)

Török Péter (Normala sintakso de E.)

kaj al ĉiuj, kies studoj estis por ni profita helpo; interalie al sroj Bastien, P. Carreiro-Neto, Meguru Takahashi, Teo Jung. Aparte ni volas mencii srojn Grosjean-Maupin kaj Butler, kiuj, la unua en la »Versions« respondaj al la Gramatiko de Aymonier, kaj en la Plena Vortaro; la dua en la »Lingvaj Notoj« pri la Malnova Testamento liveris al ni riĉegan rikolton da zamenhofaj ekzemploj. Sron Butler ni dankas ankaŭ pro la afabla revizio de la presprovoj. Kaj ĉu inde forgesi Literaturan Mondon, kiu ebligis la eldonon de tiu ĉi verko? K. Kalocsay G. Waringhien.

tio E-fakojn. Se tamen tio okazas iufoje, tiuokaze tiu E-fako vivas plejparte per la profito, kiun donas la eldonataj prilingvaj verkoj kaj per kiu eble oni kovras la perdojn ĉe la literatura fako. Tion plej multe karakterizas la sorto de la E-fakoj ĉe la Verlag Steyermühl en Wien kaj Rudolf Mosse en Berlin. La unua komencis per eldono de malgrandaj E-gramatikoj, vortaroj, ekzercaroj. La verkoj eldonitaj simple, sed tre malkare sukcesis kaj post tio la eldonejo intencis transiri al eldono de literaturaj verkoj. Post la dua verko la eldonejo devis formeti sian intencon »al pli bonaj tempoj« kaj decidis ne plu eldoni provizore iun novan volumon de sia biblioteko. La firmo Mosse en 1926 fondis E-fakon, decidante eldoni serion de malgrandaj, plaĉaspektaj libroj, vendante dek numerojn por 4 markoj afrankite. Laŭ la planoj estis necesa la eldonnombro de 10.000 ekzempleroj por ne havi deficiton. Malgraŭ la ĝis tiam ne okazinta grandstila reklamo, la firmo ne havis la necesan kvanton da abonantoj. La dua serio estis kalkulata ĉirkaŭ je 5.000 abonantoj, sed ankaŭ tiu kvanto ne estis vendata kaj tial la firmo ĉe la 24-a numero ĉesigis la eldonadon de tiuj vere bonstilaj kaj interesaj verkoj.

La verŝajna kaŭzo, ke la E-libro ne vendiĝas grandkvante, estas unupartite la ĉiama granda kvanto de eternaj komencantoj, aliparte la ega grandeco de la merkato (la tuta mondo — dum por aliaj eldonejoj nur po unu aŭ du landoj), kio ege malfaciligas la konatigon, reklamadon kaj eĉ aĉetadon de la E-libro, sed neniu kaŭze la manko de malkaraj bonaj libroj. Tiun aserton pravas la sorto de la Mosse-eldonejo kaj tio, ke AELA malgraŭ plej malkaraj libroj, plej granda reklamo, apenaŭ atingis en la unua jaro la minimume necesan nombron de 1000 membroj. Tion pravas ankaŭ la lastatempa sorto de Populara E-Biblioteko, kies eldonantoj kalkulis pri la eldonkvanto de 3000 ekzempleroj kaj kiu eldonkvanto, akompanate de nesufiĉe eltenema kapitalo, bankrotigis la entreprenon.

La nuna krizo de la mondekonomio kompreneble grave influis ankaŭ la konsumkapablon de la E-istaro. Tiu malbono estos forigebla nur, se la gvidantoj sukcesos konvinki la E-istaron, ke la evoluo kaj grandeco de la E-literaturo dependas ne de la laboremo de kelkaj entreprenoj, sed de tio, ke E-istoj legu la interesajn verkojn aperintajn, en E mem kaj ne en la nacia lingvo, kaj ke ke la plej taŭga donaco estas E-libro. Al ĉi tiuj du konvinkoj devas aliĝi ankaŭ la plifaciligado de la ebleco de proprigo de E-libroj. Tio povas okazi trimaniere: per bone organizita reto de revendiŝto, per kvazaŭa kooperativo por eldoni kaj aĉeti E-literaturon kaj per la maniero, kiun UEA faris en la postmilitaj jaroj.

La apliko pligrandskala de la unua maniero estas ebla nur en landoj, kie la E-movado estas relative forta (Japanujo, Nederlando, Svedujo). En aliaj landoj la organizo de tia reto kostus pli da mono kaj peno, ol la tuta atingebla rezulto valorus. En ĉiuj aliaj landoj do estus ebla nur la dua maniero, kies sanan evoluon tamen malhelpas la motivita malfido de la E-istaro kaj la ofta principa kontraŭstaro de la ekzistantaj libroj, kiuj timas pri sia vivo pro la disvastigo de organizaĵo, kiu finfine elpuŝus ilin mem. La libropremiado de UEA estas ideo, kiu multe estis kontraŭbatalata. La argumentoj de tiuj kontraŭbatalantoj estis, ke tiu maniero kutimigas la homojn ricevi librojn senpage kaj ne aĉeti ilin kaj ke la eldonejoj ricevas nur tre malaltan prezon por siaj libroj. Ricevante senpage librojn, plejparto de ricevantoj eble opinias, ke ili ne plu aĉetu libron, ĉar ili ja »faris sian devon«.

La porparolantoj vicigis tiun grandan nombron da novaj E-istoj kiuj ricevas nur per tiu premio-libro unufoje kvazaŭ impulson por aĉeto de novaj libroj kaj ke la transpreno de granda, ofte nevendebla kvanto multe helpas la koncernen eldoniston.

Tiuokaze la eldono de E-libroj en la nuna tempo estas ankoraŭ plie afero de entuziasmo, ol tiu de negocio. La karakterizaj ecoj de la libroeldonado komprenebligas, ke eĉ la eldonejoj, laborantaj kun profito, havas sian profiton en la ĉiam pligrandiganta libro-stoko, anstataŭ en necesaj monsumoj kaj tial la kapitalo, investita en E-libroeldonejojn nur plej malfacile kaj tre malofte povas pagi rentumon, ĉar ĝi ne alportas pli da profito, ol kiom estas la administraj kostoj mem.

Laŭ la statistiko de la ECO en 1889 estis 29 E-libroj, en 1894 88, en 1899 123, en 1904 211, en 1909 entute 1330 libroj. Laŭ BIL ĝis 1928 eldoniĝis ĉ. 3200 libroj en E (krom la gazetoj). Nombro de la en E aperintaj libroj laŭ la Bibliografia Servo de UEA: 1931—138, 1932—145, 1933—97 libroj.

Gravaj antaŭmilitaj eldonejoj: Hachette et Cie, Paris; Presa Esperantista Societo, Paris; Ellersiek und Borel, Berlin; Internacia Socia Revuo, Haga; Ondo de Esperanto, Moskva; Brita Esperantista Asocio, London.

Aktive laborantaj eldonejoj inter 1921—30; (eldonintaj pli ol unu volumon dum unu jaro); Esperanto Publishing Co. Ltd. London; Eldona Societo Esperanto, Stockholm; Friedrich Ellersiek, Berlin; Ekrelo, Moskva; Eldona Kooperativo de SAT, Leipzig—Paris; Esperantista Centra Librejo, Paris; Heroldo de Esperanto, Köln; Ferdinand Hirt und Sohn; Leipzig; Hungara Esperanto-Instituto, Budapeŝto; Japana Esperanto Instituto, Tokio; Rudolf Mosse, Berlin; A Paolet St. Vito al Tagliamento, Steyermühl Verlag Wien; Thieme et Cie, Zutphen.

En la lastaj du jaroj plej aktivaj eldonejoj, eldonintaj almenaŭ po du libroj dum jaro kaj laŭ la vico de ilia aktiveco: Literatura Mondo, Budapeŝto; Ekrelo, Moskva; Populara Esperanto Biblioteko, Amsterdam (bankrotinta en 1934, fondita en 1933); Eldona Societo Esperanto, Stockholm; Esperanto Publishing Co. Ltd., London; Japana Esperanto Instituto, Tokio; Eldona Kooperativo de SAT, Paris (ne kalkulante la duan eldonon de la Plena Vortaro); Thieme et Cie Zutphen; Heroldo de Esperanto, Köln.

v. la artikolojn pri Bibliotekoj; Literaturo; eldonejojn sub iliaj nomoj.

### Listo de personoj pagintaj aŭ resendintaj la libron „HUNGARA ANTOLOGIO“

Ni deziras esprimi nian plej sinceran dankon al la sube menciitaj personoj kaj ankaŭ al la samideanoj, kiuj afable atentigis siajn amikojn por resendo de la libro.

#### FRANCLANDO:

S-ino Juliette Bischel	Paris 9
S-ro Charles Dannemüller	Anancy
S-ro J. Dupont	Trouville (Calvados)
S-ro Maurice Girard	La Rochelle
S-ro Philippe	Arras
S-ro Joseph Pion	Sallanches (Hte. Savoie)

#### NEDERLANDO:

S-ro E. Boltjes, S-ro Schuphoven, Winschoten  
S-ro H. de Jonge Bergen op Zoom

#### GERMANUJO:

S-ino Margot Kerman-Rudolf, S-ro Otto Eberler, S-ro Heidenfeld, S-ro Schiff, Berlin

#### SVEDLANDO:

S-ro Harry Andersson, Nol  
F-ino Margareta Lindhal, Goöre

# Listo de la nunaj Esperantaj gazetoj

1. AGANTO. — lit. mon. reg. — H. Niŝikaŭa — 2 Kudan 3-ème Kojimaĉi-ku, Tokio, Japan. — 23.5×16.5, 8 p. svfr. 2.—
2. \*AMERIKA ESPERANTISTO. — prop. — mon. — H. Shatford — 1340 New York Ave. N. W. Washington D. C. — 28×21, 6 p. — dol. 1.—
3. AMIKOJ DE ESPERANTO. — inf. — Japana E-Asocio, Tokio, 2 Kudan 3-ème, Kojimaĉi-ku — 22×15, 12 p. — svfr. 0.60.
4. \*ANTAŬEN. — prop. — mon. reg. — Vernay — Ave. du Méridien, Malo-les-Bains, Franclando. — 30×21, 10 p. frfr. 5.—
5. ARGENTINA ESPERANTISTO. — prop. — mon. — Buenos Aires, Carlos Pellegrini 238. — 26×18, 10 p. — Pes. 2.—
6. AURORO. — Braille. — dumon. — Vuk Echtner. — Praha Nusle II-741. — 28×25, 20 p. — svfr. 1.25.
7. AUSTRIA ESPERANTISTO. — prop. — mon. reg. — H. Steiner — Neue Burg Wien I. — 31×23, 8 p. — ŝil. 4.60.
8. BELGA ESPERANTISTO. — prop. — mon. reg. — M. Jaumotte, Antwerpen 44, De Bruyn-Wilrijk-laan. — 21×31, 8 p. — Frbg. 30.—
9. BRAZILA ESPERANTISTO. — prop. — dumon. — Ave. Marechal Floriano 212 Rio de Janeiro — 27.5×18, 12 p. — Milr. 10.—
10. BONA AMIKO. — rekl. — mon. reg. — Tokio-do, Jimbo-ĉo, Kanda Tokio. — 22×15, 4 p.
11. BRITISH ESPERANTIST. — prop. — mon. reg. — British Esperanto Assoc. 142 High Holborn, London WCI. — 24×17, 20 p. 2/6.
12. BULGARA ESPERANTISTO. — prop. — dumon. reg. — Poŝta kesto 233, Sofia. — 24.5×17.5, 16 p. — Lev. 20.—
13. BULTENO de C. A. E. — prop. — dumon. — Ĉeĥoslovaka Esperanto Asocio, Uralské nam. 447, Praha XIX. — 28×19, 8 p.
14. BULTENO DE INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA. — trimon. reg. — M. Dupuis, Paris 9, 56, rue de la Rochefoucauld. — 24×16, 12 p. — frfr. 15.—
15. BULTENO DE LA AEROLOGIA OBSERVATORIO — dusem. ne reg. — W. Oishi, Tateno, Japanlando. — 27×20, 4 p.
16. BULTENO DE LA INTERNACIA LABOROFICEJO — Tarelli, Genève, Svislando. Bureau Int. du Travail. — 30×23, 4 p. — (Aldono al »E« UEA.)
17. BULTENO DE LA TONKINA ESPERANTISTA GRUPO. — prop. — trimon. — Poŝtkesto 71, Hanoi, Tonkino — 25×16, 12 p.
18. DANSK ESPERANTO BLAD. — prop. mon. reg. — P. Frey, Clausenvej 26, Haderslev. — 23×17, 16 p. — Kr. 2.—
19. DEUTSCHE ESPERANTIST, DER (GERMANA ESPERANTISTO). — prop. — mon. reg. — G. Habelok, Planufer 28 Berlin SW 61. — 23.5×15.5, 16 p. — Mk. 3.20.
20. DIA REGNO. — rel. — mon. — P. Hübner, Adolf Hitlerw. 94 Quedlinburg, Germanujo. — 22×14, 4 p. — Rmk. 1.50.  
ESPERANTISTO, La, Tokio v. Kosmo.
21. ESPERANTISTUL. — prop. dumon. nereg. — Ionescu-Capatana, Bucuresti Str. Dr. Istrate 10. — 24×16, 8 p. — Lei 40.—
22. ESPERANTO. — mon. reg. — UEA, Genève 1, Tour de l'Île. — 32×21, 20 p. — svfr. 10.—
23. ESPERANTO, L'. — prop. — mon. — Corso Palestro, 6, Torino. — 52×37, 4 p. — Lir. 10.—
24. \*ESPERANTO. — prop. — dumon. — Kokusaigo-Kenkjuŝo, Tokio Daita II-784, Setagaja. — 28×20, 16 p. — 5 respkup.
25. ESPERANTO BLÅDET. — prop. mon. — A. Christensen, Boks 388 Oslo. — 30×20, 12 p. — Kr. 3.—
26. ESPERANTO EN JAPANUJO. — prop. — mon. reg. — 4-543, Umahaŝi, Sugunami Tokio. — 22×15, 12 p.
27. ESPERANTO LERNANTO. — inst. — mon. — Japana Esperanto Instituto Hongoo Motomaĉi 1, Tokio. — 22×15, 40 p. — svfr. 7.—
28. ESPERANTO LITERATURO. — lit. — dumon. reg. — Fronto-ŝa, 1148 Macunoki Suginamiku, Tokio. — 26×20, 16 p.
29. ESPERANTO RÉALISATIONS. — prop. — trimon. — 23, rue N. D. des Victoires Paris 2e. — 27×20.5, 8 p.
30. ESPERANTA LIGILO. — Braille. — mon. — H. Thilander, Stocksund, Sved. W. Merrick, Shepperton, Angl. — 27×18, 60 p. — svfr. 3.—
31. ESPERANTO KIBOŜA. — prop. — mon. — Kiboŝa, 458 Niŝiookubo Tokio. — 24×15, 24 p. — jen 1.20.
32. ESPERANTO POR CIUJ. — prop. — mon. — Nowolipki 36, Warszawa. — 31×24, 8 p. — svfr. 2.—
33. ESPERO KATOLIKA. — rel. — mon. nereg. — Font Giralt, Collel, Gerona, Hispanujo. — 27×18, 20-24 p. — frfr. 30.—
34. EUROPEAN HERALD. — parte — mon. reg. — F. Wadham — 110 Fleet Str. London E C 4. — 38×27, 20 p. — 10/—
35. FILATELESPERO. — parte. — mon. — M. Bouchez, Valenciennes 117, Avenue de Liège. — 24×16, 12 p. — frfr. 15.—
36. \*FLUGANTA SKRIBILO. — sten. — dumon. — P. Flageul, Issy les Moulineaux 9, Bd. Voltaire. — 22×16, 4 p. — frfr. 3.—
37. FLANDRA ESPERANTISTO. — prop. — mon. — J. Karnas — Kortrijk, Magdalenastr. 29. — 27×18, 16 p. — frbg. 15.—
38. FRANCA ESPERANTISTO. — prop. — mon. — P. Petit, 59, rue de Neuilly Rosny sous Bois (Seine). — 32×24, 16 p. — frfr. 15.—
39. FRATECO. — socia. — mon. — A. Nikolov, Sevlievo, Bulgarujo. — 46×31, 4 p. — svfr. 1.—
40. GERMANA ESPERANTISTO v. DER DEUTSCHE ESPERANTIST.
41. HEROLDO DE ESPERANTO. — sem. reg. — Jung & Berger — Köln, Brüsseler Str. 94. — 48×32, 8 p. — svfr. 15.—
42. HINDA ESPERANTISTO. — prop. — dumon. — Karangturie 66, Semarang Java. — 14×22, 16 p. svfr. 2.—
43. HISPANA ESPERANTISTO. — prop. — mon. reg. — Apartado de Correos 1089, Madrid. — 19×13, 16 p.
44. HORIZONTO. — prop. — dusem. — D. Nicorescu, Roseti-Ialomita, Rumanujo. — 48×32, 4 p. — svfr. 5.50.

45. HUNGARA HEROLDO. — prop. — trimon. — L. Kókény, Pongrác ut 17, Budapest X. — 24×15, 32 p. — svfr. 4.—.
46. INFORMILO DE GERMANA ESPERANTO LIGO en C. S. R. — prop. — dumon. — J. Pontz & B. Gahler, Marktg. Gablonz a. N. C. S. R. — 30×21, 8 p.
47. INFORMILO DE LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ en C. S. R. — rel. — trimon. — F. Bubr, Bělohorská 189, Praha XVIII. — 28×19.
48. INFORMOJ de Esperanto Asocio de Estonio. — prop. — mon. — Postkast 6, Tallinn. — 28×20, 8 p. — Kr. 2.—.
49. \*INFORMILO DE ZAMENHOF-INSTITUTO. — prop. — mon. reg. — Sitjas 3 pral., Barcelona. — 21×15.5, 8 p.
50. INTERLIGILO DE L' P. T. T. — faka — mon. reg. — P. Filliatre, 324, rue Lecourbe. — 19×27, 16 p.
51. INTERNACIA MEDICINA REVUO. — faka — dumon. — 19 Avenue Montjoie Uccle 3, Belgujo. — 24×16, 20 p.
52. INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO. — faka — dumon. reg. — E. Boltjes, Engelschelaan 30 Wimschoten, Nederlando. 23×16, 16 p. — svfr. 5.— (kun aneco).
53. INTERNACIA POLICA BULTENO. — faka — mon. — A. Schwartz, 10 rue Engelhardt Strasbourg-Meinau (Francujo). — 31×24, 12 p. frfr. 18.—.
54. ISK socialista — trimon. — Göttingen kaj Genève: Ith, 79 Servette. — 23×15, 16 p.
55. JUNA BATALANTO, LA. — rel. — dumon. — W. Solzbacher, 77 Montée de Pilate, Luxembourg-Eich. — 24×16, 16-24 p. — Rmk. 2.—.
56. JUNA VIVO, LA. — jun. — dusem. — West-Grafdijk (N. H.) Nederlando. 24×15.5, 12 p. — svfr. 2.—.
57. KATALUNA ESPFRANTISTO. — prop. — dumon. reg. — Valencia 245 pral. Barcelona. — 22×16, 16 p. — Pes. 3.—.
58. KOMERCO, LA. — faka — laüb. — Friedrich-Auguststr. 4. Dresden-Radebeul, Germ. — 32×24, 8 p. — po nro 0.25 MK.
59. \*KOMIZA GAZETO. — faka — E. Fredin, Fako 34 Gunnarstorp, Svedujo. — 28×22, 6 p. — svfr. 0.30 po num.
60. KOSMO, LA; antaŭe LA ESPERANTISTO. — prop. — dusem. reg. — Japana Esperanto Asocio, Tokio 2 Kudan 3-ĉ. Kojimaĉi. — 39×27, 2 p. — svfr. 4.—.
61. KRISTANA GAZETO. — rel. — mon. reg. — H. C. van Leeuwen, Wijhe Nederlando. — 28×22, 8 p. — guld. 3.—.
62. LABORISTA ESPERANTISTO. — lab. — mon. reg. — Middenweg 226, Amsterdam o. — 31×25, 10 p. — guld. 0.75.
63. LERNANTO, LA; aldono al »Sennaciulo«. — inst. — mon. reg. — Sennacieca Asocio Tutmonda 67 Avenue Gambetta, Paris XX. — 16×11.5, 4 p.
64. LIGILO. — prop. — mon. reg. — F. Heikenwälder, Vrcklického 18 Prostějov, C. S. R. — 25×18, svfr. 3.50.
65. LINGVO INTERNACIA. — prop. — mon. reg. — A. Stamatiadis, Rodou 21 Ateno, Greklando. 24×17, 16 p. — Dr. 30.—.
66. LINGVO-LIBRO. — lit. — trimon. reg. — V. Bleier, Mester-u. 53, Budapest. — 30×23, 16 p. — svfr. 0.80.
67. LITERATURA MONDO. — lit. — mon. reg. — V. Bleier, Mester-u. 53, Budapest. — 30×23, 16-20 p. — svfr. 9.—.
68. MEJDUNARODNIJ JAZIK (Internacia Lingvo). — faka — mon. — Spiridonovka 15, Moskvo. — 26×18, 32 p. — Rubl. 4.50.
69. MILITREZISTANTO, LA. — faka — ne reg. — 11, Abbey Rd. Enfield, Anglujo. — 20.5×14, 8 p. — 1/6.
70. MONDO, LA. — prop. — mon. reg. — P. O. Box 232, Shangai, Cinujo. — 37×27, 8 p. — svfr. 1.50.
71. NEDERLANDA ESPERANTISTO. — prop. — dusem. reg. — Verstolkstr. 7, Leeuwarden, Nederlando, 24.5×15.5, 16 p. — guld. 2.75.
72. NIA BULTENO. — lab. — mon. reg. — 117 N. Bunker Hill Ave. Los Angeles, Calif. Usono. — 22×18, 8 p.
73. NIA GAZETO. — inf. — mon. reg. — G. Avril & S. Grenkamp. — Nice 29 Ave. de la Victoire. — 44×32, 8 p. — svfr. 2.40.
74. NIA VIVO. — prop. — mon. reg. — R. de Salas, Str. Roda 14-16, Zaragoza. — 32×22, 4 p.
75. \*NOVA STELO. — prop. — trimon. — 5-68 Kasuage-ĉo, Kita-ku Osaka, Japanlando. — 24×16, 12 p.
76. ONDO DE DAUGAVA. — prop. — mon. reg. — Pasta kaste 844, Riga, Latvio. — 24×18, 8 p. — Lat. 3.50.
77. OOMOTO INTERNACIA. — socia — mon. reg. — Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanlando. — 27×19, 40 p. — svfr. 5.—.
78. ORA EPOKO, LA — socia — ne reg. — A. Egg, Postfach 275 Baden, Svislando. — 30×21, 16 p. — svfr. 5.—.
79. PACO, LA — lit. — kvarmon. — Ootani Esperanto Grupo ĉe Ootani Universitato, Kioto. — 22.5×15, 12 p.
80. PARIS ESPERANTO. — prop. — mon. — R. Dubois, rue Amelot 130 Paris 11. — 24×16, 8 p. — frfr. 15.—.
81. PHARE DE L' ESPERANTO, LE; antaŭe l' ESPERANTISTE SISTERONNAIS. — prop. — mon. — Villa Zamenhof, Sisteron B. A. Franclando. — 33×25, 16 p. — frfr. 10.—.
82. PIRATO, LA. — hum. — mon. reg. — R. Schwartz, J. Solsona 9, rue Hallé, Paris 14. — 22×16, 16 p. frfr. 10.—, aŭ 15.—.
83. SVEDA LABORISTA ESPERANTISTO (SVENSKA ARBETAR ESPERANTISTEN). — lab. — mon. reg. — J. Johansson, Upplandsgatan 1, Stockholm. — 29×22, 12 p. — Kr. 3.—.
84. SVENSKA ESPERANTO TIDNINGEN (LA ESPERO). — prop. — mon. reg. — Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Fako 698. — 21×29, 16 p. — Kr. 3.—.
85. SVISA ESPERO, LA. — prop. — trimon. — H. Körtsteiner, Florastr. 5 St. Gallen. — 30×14, 4 p. — nur por SES-anoj.
86. TEMPO, LA. — inf. — mon. — Librejo Kaniya, Teramati Ebisugawa, Kioto, Japan. — 27×19, 8 p. jen. 1.20.
87. \*TORÇO DE L' EDUKISTOJ, LA. — faka — mon. — M. Boubou, rue de Vaucouleurs 83, Orléans, Francujo. — 30×21, 14 p. — frfr. 6.—.
88. TRAVAILLEUR ESPERANTISTE, LE. — lab. — dumon. — 115, Bd. Aristide Briand Montreuil (Seine) Francujo. — 32×24, 4 p.

SVEDA ANTOLOGIO. (Eld. Societs Esperanta, Stockholm. 432 p.)

La plej nova antologio estas vere originala verko. Originala unuavice pro sia speciala nordeco. La norda animo ne estas tiom drame impulsema kiel la suda, la efektoj iom mallaŭtigas, la epiko vualas sin per la subtila silko de la liriko. Ĉi-rilate eble nur Strindberg estas escepto, sed ankaŭ li plurfoje malkaŝas la nordan devenon de sia animo. Ververe, la noveloj eĉ ne estas noveloj; la drameco mankas el ili eĉ tiam, kiam la temo mem proponas sin por dram-efekto. Anstataŭe, min kaptas plejparte la »desegno-maniero«, la preskaŭ japana desegnado. Do, ni plejparte ricevas alian artospecon ol en la proza parto de aliaj antologioj, sed ni ne estas malpli ravitaj, eble eĉ pli. En la skandinavia literaturo oni sentas ian izoligon, la ŝaton de la soleco, miksigantan, strangkontraste, kun la hom-amo. Tiu sent-miksaĵo estas klare el-analizebla ne nur el la verkistoj vivantaj vere ankaŭ nun sur la arbaraj bordoj de la grandaj lagoj aŭ de l' maro, sed ankaŭ el la grandurbanoj, kiuj klare respegulas la trajtojn de la avoj persiste batalintaj kontraŭ la tero, aŭ maro, vivintaj en mistere diafan-aera lando, kiu konas nek cedon, nek kompromisojn. Sennoktaj tagoj

somere, mallumaj tagoj vintre. En tiu lando ĉiu homo estas heroo, — kaj ĉiutage heroo. Sed tiu ĉi heroeco ne laŭtigas, ne fanfaronigas la voĉojn: la tono estas preskaŭ pardonpete modesta; konstanta kontrasto, kiun mi povas sensigi nur per la bildo de la junuloj, tiom oftaj en Sredujo: blondaj gigantoj kun rozkolora vizaĝo kaj hontema rideeto. Infanoj! — vi diras malkontente, sed kredis al mi, ke la solvo ne estas tiel simpla kaj legu tiun ĉi Antologion, kiu certe vin meditigos iom.

1880—1920. Jen la antologia periodo, kiu vive vivas en ni, kaj tamen ne malhavas la necesan historian perspektivon. Bone elektita periodo. Sed, se mi jam komencis la laŭdojn, mi tuj volas diri, kial *due* la Antologio estas originala. La unua vidpunkto estis ĝenerala, la dua estas speciale esperantista. La Antologio nome estas la plej fidela spegulo de tiu brava kaj energia esp.-movado, kiu estas absolute inda al la kultur-nivelo de Svedlando. Ni trovas multe da nomoj en la listo de la tradukintaro, sed la plej belaj ekzemploj de la mallaŭta, modesta, tipe sveda laboro estas la kolektivaj subskriboj: »tradukis Gevle-anoj, Jstadanoj.« La recenzisto eĉ ne provas mencii nomojn el la aro de la prozaj tradukintoj, ĉar la nivelo estas tiom ĝenerale alta, la intenco tiom bona, ke ni povas nur ame pensi pri la kuno de tiu

89. TRIBUNE ESPERANTISTE, LA. — prop. — trimon. — H. Férez, 12 rue Pougny, Montigny-les-Metz. — 60×45, 4 p. — frfr. 10.—
90. TURISMI TEATAJA. — parte — mon. reg. — Tallinn, Rütli 2. — 30×22.5, 8 p. — Kr. 1.50.
91. USE-EHO. — socia — trimon. — J. Zauner, Str. Lonovici 1 Timisara, Rumanio. — 47.5×32, 4 p. svfr. 1.50.
92. VEGETARANO. — socia — dumon. — Ionescu-Capatana, Str. Dr. Istrate 10, Bucuresti. — 25×16, 16 p. — svfr. 3.—
93. VERDA MONDO. — prop. — mon. reg. — S. Inoue — E. P. A. Kameoka, Kioto-hu, Japanujo. — 22×15, 40 p. — svfr. 3.—
94. VERDA LUMO. — prop. — mon. — P. O. Box 1332, Shanghai. — 22×15, 8 p. — svfr. 3.—
95. POLA ESPERANTISTO. — prop. — mon. reg. — O. Bujwid — T. Hodakowski, Lubicz 34, Kraków. — 24×16, 12 p. — zlot. 8.—
96. PROGRESO, LA. — prop. — mon. reg. — Socharská 333, Praha VII. — 28×19, 8 p. — Kč. 25.—
97. PRAKTIKO, LA. — inst. — mon. reg. — A. Cseh, 172, Riouwstraat, Den Haag. — 31×24, 16 p. — svfr. 5.—
98. RENOBASION parte E-a. — soc. — mon. — D. F. Primes, sábado 1./13476, Mejico. — 30×20, 8 p.
99. REVUO ORIENTA, LA. — prop. — mon. reg. — Japana E-Instituto, Tokio, Hongoo-ku Motomaci, 1. — 22×15, 32 p. — svfr. 5.—
100. SCIENCA GAZETO. — faka — dumon. reg. — Amerika E-Instituto, USA. 556 State Str. Madison (Wis). — 23×15, 20 p. — svfr. 3.—
101. \*SEMANTO, LA. — lab. — mon. reg. — M. Vuille, 2 rue Leschot, Genève Svislando. — 21×33, 6 p.
102. SENNACIECA REVUO. — lab. — mon. reg. — Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Av. Gambetta, Paris XX. — 32×23, 16 p.
103. SENNACIULO. — lab. — mon. reg. — Sennacieca Asocio Tutmonda 67 Av. Gambetta, Paris XX. — 32×23, 8 p.
104. SOCIALISTO, LA. — lab. — mon. reg. F. Chammarre, Le Gabut, La Rochelle, Franclando. — 38×28, 8 p. — frfr. 12.—
105. LE SOCIALISTE ESPERANTISTE. — lab. — dumon. franclingva. — Esperanto, 12 rue Feydeau, Paris 2e. — 32×44, 4 p. — frfr. 3.—
106. SUDA STELO, LA. — prop. — mon. reg. — F. Homar — 44 Poštako, Slav. Brod, Jugoslavio. — 28×20, 14 p. — din. 48.—
107. VERDA REVUO, LA. — prop. — mon. — Her-manngasse 31/26, Wien II., Aŭstrio. — 32×23, 8 p. — svfr. 3.—
108. VERDEMULO, LA. — kult. trimon. — L. Sujen, Sun Yat-Sen Universitato, Kantono. — 22×15, 52 p. — svfr. 1.—
109. ZAMENHOFA ESPERANTO. — inst. — mon. — P. Corret — 197, Bd. Brune, Paris 14. — 14×21, 4 p. — frfr. 5.—
110. SUR POSTENO — lab. — mon. ne reg. — Ekrelo, Amsterdam Z, Postbus Z 5 — 31×22, 8 p.

RIMARKOJ. 1. Tiu tabelo enhavas sur la gazetojn, kiujn ni ricevis aŭ pri kiuj ni povis akiri informojn.

2. Laŭeble ni indikis la nomon de la redaktoro kaj la adreson de la redakcio; oni do atentu, ke la menciitaj adresoj ne rilatas la redaktoron mem.

3. \* signas la gazetojn multobligitajn per hektografo aŭ simila procedo; ĉiuj aliaj estas presitaj.

4. mallongigoj:

dumon. = dumonata	hum. = humora
dusem. = dusemajna	inf. = informa
kvarmon. = kvarmonata	prop. = propaganda
lab. = laborista	reg. = regula
lit. = literatura	rekl. = reklama
ne reg. = ne regula	rel. = religia
trimon. = trimonata	

5. ĉar ni ne povis pro teknikaj kaŭzoj presi tiun ĉi liston en tabela formo, ni devas mencii, ke la diversaj indicoj, kiuj sekvas la titolon montras respektive: la celon, aĉeron, redaktoron, redakcian adreson, formaton, paĝonombrojn kaj jaran abonon.

entuziasma aro kaj honore menciŭ la estron de la laboro, rektoron Sam Jansson; lia filozofe saĝa maniero konservis kaj tamen glatigis la diversajn individualaĵojn, li ja konservis la freŝon de la verkoj, sed bridis la tro disajn ekskursojn.

La Antologio bonŝance iradas en la glata mezo de tiu vojo, kies dekstra flanko estas tro malmola pro la tro nordaj naciaĵoj kaj kies alia flanko, kiel en ĉiu literaturo, estas tro internacie mola. Nur kelkaj, tre maloftaj cedoĵoj al la nacia gusto troviĝas, sed oni ja ne povas tute sendependigi sin de sia memo.

La pritraktado de la proza parto ni devas komenci ĉe la enkonduka traktato. Ties esperantista verkinto, Baeckmann, tiel vivoplene, tute sen polvodora sekeco, prezentas al ni la koncernen periodon de la sveda literaturo, ke ni ellegis ĝin kun la sama intereso, kun kiu oni legas romanojn. Tiu enkonduko vere bonege kompletigas tie, kie konciza antologio ne povas doni plenan impreson.

Malmultaj fragmentoj troviĝas en la verko, sed ankaŭ ili estas relative pli tutaj, ol kutime la fragmentoj. Ankaŭ la unua akto de la grandioza dramo de Strindberg impresas tuta; la ĉefheroon, kiu eĉ ne rolas en tiu ĉi akto, ni tamen plene sentas, dank' al la genia sensiga arto de Strindberg. La konkludo farebla laŭ la *Strindberg*-aj verkoj estas, ke ne pravas tiuj, kiuj jam registris la nomon de tiu norda giganto en la tombejon de la literaturhistorio. Eĉ, ni kuraĝas antaŭdiri, ke lia nomo baldaŭ remodigos. Se ni legas ekz. la ĉapitron el la »Homsöanoj« aŭ la belegan historian novelon »Por pli alta celo«, nin frapas la pulsanta vivo de la verkoj kaj la eterna vivo de la kreinto, kiu povis verki laŭ sia plaĉo, egale, »pleneran« bildon (Hemsö) aŭ scenon, kies lum- kaj ombroefektoj nepre rememorigas al ni la pentraĵojn kaj forton de Rembrandt. (Por pli alta celo. — Gustav Vasa.)

Neeble pritrakti ĉiujn verkistojn, sed eble eĉ superflue. Kelkaj el ili estas tiom konataj, ke la leganto pardonos nin, se ni ne parolos nun pri la bonega elekto, el la verkoj de Selma Lagerlöf, Geierstam aŭ Heidenstam. Kaj mi denove devas akcenti, ke la enkonduka traktato estas perfekta verko. Se mi parolus pri la unuopaj verkistoj, malfacile mi povus eviti la danĝeron, pli kaj pli abunde ripeti la vortojn de Beckman, kio ege plilarĝigus, — ĝis la neeblo — la kadrojn de tiu ĉi recenzo. Prefere mi elektas nur kelkajn nomojn, aŭ verkojn, precipe ne, aŭ ne tre konatajn en eksterlando. Jen ĉarma ekzemplo: »La kokino de Panjo Malena« de *Ernst Ahlgren*. La novelo prezentas vilaĝan azilon de malriĉuloj; tamen tiu fono ne estas tragedie malluma, sed konturita de serena, kompata kunsento. Aŭskultu nur la unuajn vortojn: »Kvankam panjo Malena loĝis en malriĉulejo, ŝi tamen havigis al si kokinon, kaj tio estis eksterordinare superflua lukso, tio ja estis arogi al si la plej bonan de l' vivo je la kosto de aliaj, tio ja estas altigi sin super tiuj, kiuj havis pli malbonan sorton. — La kokino estis konstanta kverel-ŝemo...« Do, la kokino estas la sola vivkunulo de panjo Malena, almenaŭ ŝi kredas tion. La aliaj, la kunvivantaj homoj estas malamikoj, tiuj mokas lin kaj instigas tiun knabaĉon, kiu tiel aĉe, — perfekte — povas imiti la kokinon. Nun la kokino malaperas, la najbaro, kies korto ne estas libera teritorio al fremdaj kokinoj, trafas la trezoron de panjo Malena kaj ĝi malaperas kun sia morta vundo. Malena perdis sian solan havaĵon kaj la ĉifonularo perdis sian teatron. Funebra silento premas la homojn. Sed fine, la kokino, post mirakla saviĝo, reaparas, kaj la goĵo en la azilo estas ĉiela. Panjo Malena aranĝas kafofeston por ĉiuj kaj imagu, nun ŝi mem stimulas la junan friponon, ke li montru, kiel klukas, iras, skrapas la kokino. Tiel finiĝas tiu eta majstraĵo, tiu ĉi ĉarma perlo de la mond-literaturo. — La june mortinta *Pelle Molin* estas apenaŭ konata en eksterlando, sed post la mirinde bela »Rondodanco« kaj »La patrino de Gunnel« (aperinta en Literatura Mondo) mi volonte legus en Esperanto, ĉiujn liajn verkojn. En, ŝajne, objektivaj vortoj aperas antaŭ ni la bataloj de la nordo, la homo heroigas, sed tamen estas tiel kompatinde malgranda. — Ni povus daŭrigi la listigon, tamen ni ne

faras tion, sed prefere ni deziras diri kelke da vortoj pri la poezia parto.

Se la proza parto montras specialajn trajtojn de lirikemo, la poeziaĵoj ja rekte pruvas, ke la svedoj estas lirika nacio. Tiu liriko estas, ĝenerale, subtila, mallarĉa, eĉ en la serenaj tonoj, sen grandaj, ĉielatakaj ondoj. Sed oni ne povas pridubi la belecon de tiuj poemoj, kies majstraj tradukoj estas dankeblaj al *Magda Carlsson*, *Stellan Engholm*, *Gustav Johansson*, kaj *Varma Thillander*. La unuaj du nomoj estas favore konataj de nia legantaro, sed ankaŭ la du lastaj pruvas sian talenton per la solvo de tre malfacilaj problemoj. — La sola poeto, kies rezignemo estas iom amara, iom disharmonia, kies melodiaro estas boheme varia, kies plej tipa poemo »La mondo« aperigas la uraganan maron, (kaj ne la postvibrojn de la uragano), estas *Fröding*. Homo dronas en la maro. Ĉu jes, diras la kapitano. Kaj fine jen pasie arda malvarmo:

Griza ondarulo ruliĝis sen ĉes'.

Li dronas, — nun estas li for, kapitan'!

Ĉu jes?

Maron movis uragan'.

La traduko de Engholm estas perfekta. Ni sentas, ke eĉ la tro proza vorto »movis« estas tute motivita kaj aplikita al la strange individua sonaro de *Fröding*.

*Karlfeldt* estas la eterna knabo de la sveda literaturo. Interese pruvas tion la poemo »Plenrajta kolero« (trad. G. Johansson), en kiu eĉ la sopiro al la viriĝo aperas naive-bele.

»Jen viro estas norda vento,

gvidanto sub batala ŝild' ktp.

Liaj ĉarme naivaj, serenigaj dalekarliaj bibliaj bildoj montras la feliĉan renkonton de poeto kaj poeta tradukisto. (M. Carlsson.) *Magda Carlsson* estas preskaŭ monopoŝa transplantanto de Bo Bergman, el kies subtile melankolia poezio, kiel karakterizan ekzemplon ni citas la jenan poemeton:

#### Nia sorto

Ni flagras cente —	traflugas meve
sekfoliaro	la maronokton,
pelite vente	kun vent' batalas.
al nia celo,	Levitaj vente
al tombobaro.	ni ree falas
En ruĝfabelo	kaj eksilente
ni vivas reve;	eniras nokton.
moviĝas deve	

Mi mem iom bedaŭras, ke la poezia parto, en kiu, krom la menciitaj nomoj troviĝas belegaj poemoj de *Levertin*, *Heidenstam*, *Ekelund* kaj *Österling*, ne estas iom pli vasta, sed plezuro estas konstati, ke la kvalito plene kompensas tion.

Lingvaj rimarkoj: nur malofte evitis io la atenton de la redaktintoj. Tiam ekzemplon ni trovis sur la 231-a paĝo:

»Ĉu vi ankaŭ trapaŝis belegajn terajn landojn, kiel per goĵplenaj flugiloj? (anstataŭ: *knazaŭ*). Sed, tiaj forĝitoj estas tre maloftaj en la vasta kaj vere gratulinda verko.

F. Szilágyi.

#### PETRO. KURSA LERNOLIBRO POR LABORISTOJ.

(Eld. SAT. 112 p. Prezo: 6.— frfr.)

La nova eldono de la elprovite praktika lernolibro utiligas la antaŭajn spertojn kaj la pedagogia solvo preskaŭ ĉiam estas plej bona. Mi ne kredas, ke efektive, oni povus uzi la libron, kun la helpo de ĉefeĉ-ŝlosilo, en seninstruista lernado, (kiel povus, ekzemple, trovi la meminstruanto, sen antaŭa scio, la vorton »memstara«, eĉ »memstara« en la vortaro?), do pri tio mi eĉ ne okupiĝas kaj ĉiujn rimarkojn, kiuj rilatas la metodon en la meminstruado, mi trankvile povas preterlasi kaj konstati, ke sialoke la libro servas bone. Ankaŭ la ilustraĵoj ĝenerale taŭgas bone, sed ĉi tie ni devas menci, ke ili kelkloke estas preskaŭ senutilaj. Speciale en la unua prepara leciono. La figuro de la vivanta knabo estus nur tiam komprenebla, se ni vidus ankaŭ mortinton, do la

bildo ne faras sian funkcion, ne klarigas. La diferenco inter *granda* kaj *malgranda* estas nur milimetroj sur la bildo, certe oni ne povas tion tuj percepti.

Volonte mi laŭdas la pedagogie lertan konstruon de la vivo de Petro; ĝi certe estas interesa kaj alilingve bone elprovita ideo: la vortotrezoro estas same bone elektita. Komprenible, troviĝas kelkaj ne tre necesaj vortoj, ekz. en la komencaj *lecionoj* »vipo«, sed tio vere ne gravas.

Miaj pedagogiaj riproĉoj rilatas preskaŭ nur la ilustraĵojn. Amase figuri la prepoziciojn estas preskaŭ neeble kaj la rezulto estas nur senfrukta paperplenigo. Mi ne kredas, ke ekzistas komencanto, eĉ genia, kiu sen lingvoscio komprenus, kiamaniere solvi la jenan problemon; tri tre etaj figuroj; unu el ili estas patrino, la infano estas surbrake, la tria persono estas maljunulo, kies mano estas super la infano. Subskribo: *per.* La bildoj sur tiu paĝo estas preskaŭ senescepte nekompreneblaj, sed la rekordon atingas tiu maljunulo, kiu rigardas glason. Subskribo: *pri.* Ankaŭ la afiksoj ne estas ĉiam klare prezentataj (ekz. — *ec* —), sed tamen tiuj bildoj ĝenerale estas pli klaraj. (Laŭ mia opinio, prefere en la libro kaj ne kiel resuman aldonon, oni uzu unuopajn, sed bonajn, klarajn bildojn.)

Sed finfine mi denove asertas, ke la teksta parto, el instrua vidpunkto, estas laŭdinda, klara, konciza. La tendenco de la verketo estas tiu de SAT. *F. Szilágyi.*

SELMA LAGERLÖF: GÖSTA BERLING El la sveda tradukis: Stellan Engholm, Eldonis: Eldona Soc. Esperanto Stockholm, Fack 698, 552 paĝoj, Formato 14×20 cm. Ilustrita. Prezo broŝ. 6.— kr. bind. 7.50 kr. + sendkosto (ĉ. 20%).

Legendo pri la vivo de dekdu kavaliroj en Vermlando, kiun traleksis la belsopiro de poetino, inspirita de infanaĝaj fabeloj. La dekdu kavaliroj — escepte unu el ili — estas maljunigintaj bohemitipoj el la unua kvarono de la 19-a jarcento. Veteranoj de la Vivo, alkiunigintaj la mondajn plezurojn, mallaboremaj; lacaj migrintoj, al kiuj komfortan viveblecon donacas noblanima, energia bienposedantino. La escepto, la heroo estas Gösta Berling, tiu donjuan-tipa eksigita pastro, en kies karaktero egalproportie troviĝas profunda sentemeco kaj facilanimeco. Liaj amaferoj kaj la vivmaniero de la kavaliroj formas la kernon de la fabelo, en kiu abundas superŝtira romantiko kaj senbrida fantazio.

De ĉapitro al ĉapitro en mi plifortiĝis la impresoj, ke sonĝfiguroj dancas fantome en nebulo de Nordo. Iliaj movoj, gestoj, agoj, vortoj ŝajnis esti senkonturaj. Kvazaŭ siluobildoj de mortinta epoko estus preterŝvebintaj kaj post ili peza lavandodoro restus ĉirkaŭ mi. La superŝtira romantiko de Nordo ekkonis sur mian sudan sentemecon kaj ofte mi devis halti sen kompreno, serĉi la kaŭzon, forpeli la ĝenan nebulon, kiu kaŝis for de mi la logikan kaj psihan kunligojn. Stranga fabelo, fora verko, mi konstatis. Jes, ĝi estas fora, malproksima de la hodiaŭa facila romantiko, fora de la hieraŭa naturalismo, fora de la beletristiko »l'art pour l'art« kaj rememorante pri vortoj de la tradukinto, ĝi estas fora eĉ de la kompreno propralanda... kaj ĝuste tiu ĉi foreco, ĝuste tiu ĉi somnambula vagado en la norda nebulo estas la katena forto, kiu ĉenas al si la mediteman leganton. Per mil kaj mil delikataj fadenoj ĝi tiras lin al si kaj spiras al li sopiron vagadi tie, kie ĉio ĉi ŝajnas tute proksima kaj akceptebla vidi tiun naturon, kies observado vekas jen ebrion de la konscio, jen religian enprofundiĝon, aŭ mistikan memorturon, tian pentofaron, kiu jam tuŝas la limon de la malespero. Kiam tiu ĉi sopiro vekigis en la leganto, subite forflugas la nebulo, klariĝas la horizonto kaj mirakle disvolviĝas antaŭ li ĉio, kies konturojn li ne vidis ĝis nun, nur konjektis; antaŭ li aperas la profundo de la sveda popolanimo en lumo de brila pompa poezio, kaj la verko tuj trovas komprenon kaj altan valoron ĉe li. Ĝia epopea senco reliefigas, la revteksa pureco de la sveda animo kaj ĝia vojsereca radiado atingas la leganton, kiu komencas miri pri sia antaŭa blindeco kaj ne plu konsentas kun la

tradukinto, kiu skribis kvazaŭ pledan antaŭparolon por la verko. Kial? Tiu ĉi verko ja parolas elokvente por si mem.

Gösta Berling estis la unua verko de Selma Lagerlöf. Ĝi estis la unua paŝo sur la vojo, kiu kondukis ŝin al la mondfamo. La unua, tamen en ĝi oni povas retrovi ĉion, kio karakterizas ĉiun infanon de ŝia poeta animo: kompreneman indulgon por la homaj eraroj, ekbrilon de tiu realeco, kies akrecon mildigas ŝia firma idealismo kaj tiun mondpercepton, kiu vidas ĉiam inter eraroj, malvirtoj tiun eternan Bonon, kiun oni povas planti kaj ekĝermigi en la animo de ĉiu homo. Gösta Berling estas tiu verko, al kies kompreno kaj laŭvalora taksado alvenos nur tiu leganto, kiu ŝatas la artajn profundojn kaj en la romantiko de la lavandodoraj epokoj povas vidi kaj rekonii la ĉiame homan kaj por feliĉo, por celoj batale baraktantan homon mem.

Se mi diras pri la traduko, ke ĝi estas bona, bela, flua, eleganta, mi diras tre malmulton. La traduko de Engholm estas arta kaj majstra, ĉar ĝi impresas vivanta kaj estas stampita de tia originala, kiu forgesigas la vorton »traduko«. Nur sinceran gratulon meritas lia granda laboro kaj ankaŭ dankon pro la sukcesa transplantado de pompa floro el la sveda literaturo en la ĝardenon de nia internacia. Pri bagatelaj eraroj (tre verŝajne sub influo de la patra lingvo) en kelkaj frazoj, pri uzo de du-tri tiaj novaj vortoj, pri kiuj mi persone ne konsentas, paroli estus malice. Mi ne deziras rompi mian festoĝojon, kiun mi havas ĉe la apero de grava kaj altvalora libro, kies atentan legadon mi rekomendas al la literaturamantoj. —by—

CEZARO: Jelusić. Trad. Ivo Rotkvić. Eldonis Literatura Mondo, Budapest, Mester-u. 53, 536-paĝa, 20×13.5 cm. Kun bela kovrilpaĝo. Prezo: broŝ. svfr. 9.—, bind. svfr. 11.— plus 10% por sendkosto. La tria libro de AELA 1934.

La tasko de recenzanto de tia libro ne estas facila ĉar li devas juĝi la verkon je du vidpunktoj, unue de la germana literaturo, kies pecon ĝi prezentas, due de la esperanta literaturo, al kiu ĝi alportas konsiderindan riĉigon. Kaj por bone juĝi laŭ tiuj tiel diversaj, vidpunktoj, mi bezonus eruditecon kaj lertecon, kiujn mi tute ne havas. La sama kaŭzo, cetere, igas malfacila la entreprenon verki historion de la esperanta literaturo: oni ĉiam hezitas inter la du flankoj de la demando, t. e. inter la valoro de la originala verko kaj tiu de la esperanta traduko. La romano Marta, ekz-e, estas en si mem io kelke banala, suferanta por nesufiĉo de arto kaj troo da sentimentaleco: sed la traduko de Zamenhof estas unu el la plej bonaj, kiujn li faris. La samon oni povas diri pri la Rabistoj, ĉe kiuj la kompleta manko de psikologio kaj la ridinda bombasto ne malhelpas la esperantan verkon brili per sia stilo kaj vortriĉo. Sed ni revenu al niaj ŝafoj, kiel diras la francoj.

La romano de Jelusić, kiun oni prezentas al ni iom strange, kiel tradukitan »el la kroata kaj germana« (?), estis efektive verkita en la germana lingvo: la kroateco de la aŭtoro ne rajtigas la tradukinton aljuĝi la verkon al la kroata literaturo. La grandaj verkoj klasigas laŭ sia originala lingvo, ne laŭ la nacieco de siaj verkintoj: la leteroj de la prusa Frederiko IIa apartenas al la franca literaturo, kiel la romanoj de Panait Istrati; la novelo de la franca A. de Chamisso apartenas al la germana literaturo, kiel tiuj de J. Conrad al la angla.

La verko »Cezaro« estas romaneca biografio: la aŭtoro lerte uzis la ĉapitrojn de Suetono kaj Plutarko, dediĉitajn al lia heroo, kaj li prezentas al ni sufiĉe historian figuron de tiu granda homo. La fondinto de la romia imperio estas pentrita per vivaj koloroj kaj energiaj peniktuŝoj; anstataŭ kontinua rakonto, ni troviĝas antaŭ fragmentaj scenoj, ĝenerale tre dramecaj, kiuj sinsekvas kiel filmbildoj. Tiuj scenoj estas konstruitaj el la sekaj detaloj, ĉerpitaj el antikvaj historioj, sed tiuj estas beligitaj, vivigitaj per tre drasta imago: la vivo de la soldatoj en la tendaroj, la ekspedicioj en Gallujo kaj



Anglujo, la intrigoj aŭ bataloj sur la forumo ktp. Kelkaj scenoj estas pure elpensitaj, sed ĉiam versaĵnaja: oni dezirus eĉ, por la honoro de la homo, ke estu vera tiu imagita renkonto inter Cezaro kaj Vercingetoriko, la antaŭtago de la triumfo, kiam Cezaro proponos el sia malnova malamiko la regadon super la romiaj provincoj de Gallujo. Nur pri unu punkto ni devas fari rezervojn: Jeluŝiĉ atribuas al sia heroo ian romantikan koncepton pri la amo, milmeje malproksiman de la vera Cezaro; li rakontas al ni, kiel Cezaro fraŭle kuŝigas la nokton de sia reedziĝo, pro respekto al la juna edzino, kiu ŝajnas ne ami lin; li klarigas lian murdon, kiel la rezulton, de kompleto organizita de maljuna jaluza virino ktp. Sufiĉas memori al si la kvar edziĝojn de la granda Julio, lian duflankan diboĉemon, tiel faman en Romo, ke liaj soldatoj ŝercis pri tio ĉe lia triumfo, kaj unu el liaj kontraŭuloj povis nomi lin en senato »la edzo de ĉiuj virinoj kaj la edzino de ĉiuj viroj«; lian ĝis lia morto daŭrintan intrigon kun Kleopatra, kiun li venigis de Egipto Romon ktp. por kompreni, kiel malmulte idealisme li traktis la am-aferojn. Estas iom bedaŭrinde, ke Jeluŝiĉ volis, je kelkaj lokoj, malgrandigi tiun epopeon ĝis la dimensioj de kudristina literaturo.

Laŭ la esperanta vidpunkto, la verko estas tre alloga:



preskaŭ nenio riproĉebla (*ŝanceliĝis dorsposten* — 15 — estas neutile peza anstataŭ *dorsen*; *kontinuigante penson* — 209 — same anst. *daŭrigante*; *sen ĉiaj sciigoj* — 357 — nelogika anst. *iaj*; *kiu alia ja ŝtopus la truojn* — 90 — neklara: necesus aŭ *iu alia*, se la frazo estas jesanta, aŭ demandopunkto, se demandanta; *transversi maron* — 289 — ne bonstila anst. *trapasi*; *sur Rodo* = *en Rodo*; *alkurinto* — 11 — neklara, anst. *parvenuo*; *mortangulo* — 55 — neklara en espo, kie ĝi signifas: angulo de morto, dum ĝi volas signifi la malon; mi uzus *ŝirm-angulo*). Multaj esprimoj estas lertaj kaj uzindaj: *la germana estremo* (239), *vide al* (256), *ŝajnaĵo* (53), la militaj dirmanieroj: *alkaŭne* (komando, fr.: *rassemblement!*), *manbatalo* (fr. *le corps-à-corps*), *en karoovico* (fr. *en quinconce*) ktp. Kiel ĉiuj tradukistoj, Sro Rotkviĉ havas siajn amatajn ĉevaletojn: sed, strange, ili ne estas la samaj en la komenco kiel en la fino: en la unua parto amasiĝas la prefiksa uzado de la vorto sat por esprimi la perfektivan aspekton (satripozi, satĝui, satdemandi, satmiri, satparoli ktp), dum en la dua parto oni trovas multon da AL, prefikse uzataj por transitivigi verbon (alfuriozi iun, alardi) aŭ sen aparta nuanco (alataki, alstertori, alokuli, alrigardi ktp.). Por la transskribo de la propraj nomoj Sro Rotkviĉ alprenis tre racian sistemon: viraj nomoj en -o, virinaj en -a, uzo de nur esperantaj literoj, kaj eventuala konservo de duoblaj konsonantoj. Kvankam tiu lasta trajto estas fremda al la fonetiko de nia lingvo, oni povas ĝin akcepti en la propraj nomoj, kaj en la popolnomoj: Kotto, Krasso, gallo ktp. (sed kial Hiparko, pg. 302, anst. Hiparko?). Je la fino oni trovas liston da romaj apartaĵoj, resume klarigitaj; sed mankas kelkaj bezonataj klarigoj, ekz-e pri *bagro* (? pg. 292); krome estus utila la aldono de la moderna nomo respondanta al la antikvaj urbonomoj; ekz-e pri Massilio (= Marseille), Vesuntio (= Be-

saŭcon), Genabo (= Orléans) aŭ pri riveroj, Ligero (= Loire).

Tiu libro, bele prezentata, estas vere alloga legaĵo; eĉ se ĝi ne havas la saman gravecon, kiel la Kabea Faraono, ties ideon ĝi tamen elvokas — kaj tio estas je la honoro de la aŭtoro kaj de la tradukinto. Ĝi meritas apartan laŭdon por la boneco kaj firmeco de la stilo.

G. Waringhien.

LA JUDA STATO: Theodor Herzl. Trad. B. Selzer. Eldonis Literatura Mondo, Budapest, IX. Mester-u. 53. 144-paĝa. 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. 2.50, bind. svfr. 4.20 plus 10% por senkosto. Por AELA-anoj respektive svfr. 1.40 kaj 2.30.

Pri tiu ĉi »verko modesta laŭ la amplekso, sed ne elĉerpebla en sia enhavriĉeco«, kiel diras en la antaŭparolo d-ro Emil Pfeffer, oni povas paroli kiel pri la biblio aŭ ja profeta vizio, t. e. kun religia ekstazo aŭ kun senlima malamo. Kaj ĉar en la unua tempo bibliaj vizioj jam ne imponas, estas do klare, ke la libreto havas pli da malamikoj ol ekstazitaj adeptoj. La diferenco estas nur en tio, ke dum la adeptoj grupiĝas en certa parto de l' juda popolo, al la tendaro de l' malamikoj apartenas ĉiuj, ĉiuj ceteraj: judoj, kristanoj, mahometanoj, ĉiuj rasoj kaj gentoj, ĉiuj filozofiaj sistemoj, ĉiuj politikaj tendencoj, unuvorte — la tuta arkeo de Noaĥ!

»La juda ŝtato« de Herzl, kiu estas la »netuŝebla fundamento« de la cionista movado, estis ja nur modesta provo de Herzl solvi la judan problemon. Ĝian aperon oni akceptis kun moko kaj rido. Politikistoj tute ignoris ĝin: juda ŝtato! tio estis ne nur utopia penso — ĝi estis aroganta! La ekonomiistoj, la konataj profesoroj, la eminentaj kompetentuloj kaj la kompetentaj eminentuloj skuigis de rido: juda ŝtato! Konstrui judan ŝtaton! — kaj ili eĉ ne bonvolis uzi la minimuman penon por paroli kelkajn vortojn pri la libro, pri la enhavata en ĝi ideo.

»Kion li volas? Transporti la judan popolon« en Palestinon, kune kun la havaĵo, infanoj kaj kadukaj geavoj? Ha, ha, ha! — tiel ridis juda bankiero en Berlino, kiu verdire mem ne sciis, kion komunan li havas kun la »juda popolo«?

Sed troviĝas tamen certa grupo de judoj, kiuj serioze komencis trakti la utopion de Herzl — kaj naskiĝis la politika cionismo. Kiu konas ĝian historion, tiu scias, kiom da superhoma heroeo postulis tiu Afero, kiu dank' al nekutima sinoferemo de pioniroj — el mokata ironio ŝangiĝis en admirindan realaĵon.

\*

Tiu ĉi artikolo ne volas ja esti apologio de l' cionismo. Por movado, kiu faras pozitivan laboron, por homoj, kiuj konstruas, ne necesas pledi. Kion ajn oni opinias pri la cionismo (en kiu multaj vidas nacionalisman novan kaj malutilan, kvankam ĝi estas — laŭ Zamenhof — pli komprenebla ol la nacismo de persekutantaj popoloj), fakto estas, ke la meza judo ŝuldas al ĝi novajn vivovalorojn, kiuj igas lian individuan vivon pli tolerebla. Mi ne scias, ĉu la ideo de Herzl definitive venkos — tio dependas ja ne nur de la sizifa laborego de la judoj. La judoj ĉiukaze faras ja sian laboron — ankaŭ Moseo ne havis la feliĉon mem enkonduki sian popolon en la Landon Promesitan, sed la grandeco de lia faro estis en tio, ke li liberigis la popolon, elkondukis ĝin el la egipta sklaveco. Theodor Herzl, la Moseo de nia tempo, unu fojon por ĉiam eltiris sian popolon el sklaveco multe pli terura ol tiu en Egiptujo, ĉar el spirita sklaveco, danĝere maskita per ĉiuj eblaj vualoj de t. n. humaneco, homeco, idealismo kaj aliaj cinikaj mensogoj, Herzl redonis al la judo lian individuan memestimon, lian homan dignon, kaj se li ne enkondukis lin jam, aŭ ankoraŭ, en la Landon Promesitan, li ĉiukaze elkondukis lin el la geto, kien la judo espereble neniam plu volos reveni.

La libera judo ne volas plu porti la krucon de l' mondo. Li ne volas plu esti popolo de profetoj kaj martiroj. Tedaŝ jam lin tiu mistera kaj peza fato, kiun oni

atribuas al li, la fato de ia mondskala misio, en kies nomo oni lin senkreditigas. En la nuna tempo, sur la sojlo de nova periodo, terura pro sia mistereco, periodo en kiu ĉiuj valoroj trapasas skuan metamorfozon, kiam la enradikigitaj ideoj de etiko, moraleco kaj politiko bankrotas kaj disfalas, en tiu ĉi tempo estas eble sence konstrui aŭ akceli novan ŝtaton, kiu sur la geografia karto aperos la lasta por eble malaperi la unua — sed tio eble estas la plej tragika. La judo jam sufiĉe havas tiun sencesan ĉasadon de novaj valoroj, tiun ĉiaman unuaecon en ĉiuj aferoj de homa serĉado. (Estas ja tute klare, ke la persekutato ĉiam troviĝas antaŭ la persekutanto.)

\*

La ideo, kiun la moderna profeto de Izraelo, Theodor Herzl, elŝpinis en la revoj de sia ĉielfluga fantazio, malgraŭ ĉio prezentas per si ion grandiozan kaj imponan. La bildo de l' reveno de la Eterna Migranto post dumiljara ĉasateco en lian dezertigitan hejmlandon, en kiu ŝtono sur ŝtono ne restis plu, havas dramatan streĉon kaj neeldireblan sopiron. Denove en la juda animo vekigas malnovaj sentoj kaj rememoroj el la fora pasinteco. Revivigas dolora sopiro al libereco kaj sendependeco — ideoj abstrakaj kaj ŝajne neatingeblaj por judo. Paroloj de l' gloraj profetoj, jen mildaj, jen severaj, reakiras



sian freŝecon. Kaj renaskiĝas la forgesita lingvo, la bela, la poezia, la sankta lingvo, kiun la korifeoj de l' scienco jam delonge kondamnis je morto. Ho ironio! Kiom valoras la aŭtoritataj juĝoj de l' seneraraj scienculoj kompare al la obstina volo de popolo?

Do la juda popolo volas nun krei novan ŝtaton. Kaj — ĉu ĝi volas per ĝi realigi eble unu plian ŝovinismion. Jes kaj ne. Jes, ĉar en la nuna epoko de floranta naciismo ne estas eble solvi la judan problemon per rimedo alia ol la naciismo. Kaj ne, ĉar la juda ŝtato — laŭ la koncepto de Herzl — tamen ne volas esti »regno de purasuloj« (koncerne la »purrasecon«: tiu ĉi ideo mem ankaŭ estas juda elpensajo...). La juda ŝtato de Herzl volas esti feliĉa lando de laboro, azilo por ĉiuj persekutatoj sen diferenco pri raso kaj religio, kvankam unuavice tiu ĉi helpo estas antaŭvidata por la judoj.

Kaj tiel en mirinda »tampo« konstruiĝas la malnovan lando. Rapidis al ĝi homoj el ĉiuj partoj de l' mondo por tie efektiviĝi siajn aglajn revojn aŭ entombigi siajn longtempe karesitajn esperojn. Venas tien junaj homoj, kiuj en siaj naskiĝlandoj ne povis konstrui sian vivon, homoj, por kiuj oni sentis blindan malamon, ignoron kaj malestimon. Venas tien homoj, kiuj perdis la tutan fidon al la mondo kaj ĝia moraleco. Kaj tiu ĉi grandioza armeo, disŝiranta ĉiujn nodojn, ligintajn ĝin kun la cetera mondo, kun freneza energio, per kiu ĝi kvazaŭ volus obtuzigi en si ĉiujn trompitaĵojn de l' pasinteco, ĝi konstruas, sekigas malariajn marĉojn, pavimas modelajn vojojn, starigas en febra tempo novajn belajn domojn, plantas imponajn fruktĝardenojn, kaj laboras, kaj laboregas, kvazaŭ ĝi volus sukcesi fari ĉion, kion oni ĝis nun krulete rabis de ĝi.

Juda ŝtato! Ĝia efektiviĝo ja tute ne dependas de la judoj. Ili, la judoj, faris kaj faras ĉion por ĝi. La decidan

parolon en tiu afero havas la grandpotencoj de Eŭropo. Kaj se la helpo devas veni de ili, mi timas, ke vane oni atendas.

Sed la granda Theodoro Herzl, la Moseo de nia jarcento, faris grandiozan aferon: li elkondukis sian popolon el la geto, kaj mem tio igas lin la senmorta profeto de lia eterna popolo.

\*

Ne multon mi diros pri tiu ĉi libro, kiu staras ekster mia kompetenteco. Ĝi prezentas la tradukon de la fundamenta verko de Herzl, en kiu tiu fondinto de la cionismo skizas la unuajn trajtojn de la — tiam himera, nun efektivigita — juda regno. Nur pri unu punkto mi povas juĝi liajn antaŭvidojn: lingvistike, li tute eraris. Li skribas, ke »ni ne povas ja paroli unu kun la alia hebree. Kiu el ni sufiĉe scipovas la hebrean lingvon, por postuli en tiu ĉi lingvo bileton fervojan?«. Nu, plej interesa (por mi, filologo) rezultato de la starigo de l' juda regno estas la renaskiĝo de la hebreaj lingvo, kaj ĝia adapto al ĉiuj modernaj necesoj. Sed oni ne devas miri pri tiu eraro de Herzl: ĉiuj famaj filologoj de lia epoko estis konvinkitaj, ke lingvon oni ne povas krei.

Pri la internacia valoro de la penso kaj verko de Herzl, mi memorigos nur tion, ke Zamenhof, kvankam plurfoje propetita, ĉiam rifuzis aliĝi al la cionisma movado: li opiniis, ke, dum Eŭropo terure suferas pro naciisma krizo, eble ne estas tre racie nek bonfare krei unu novan naciismion. Kaj la amasbuĉoj de Jerusalem en 1933 ne ŝajnas malpravigi lin.

La traduko estas bona; nur en la parto tradukita el la franca (artikolo de Albert Londres), mi notis francismon: *tiu lin renversis* (pĝ 9) = miregigis; krome la »Dreyfuss-afero« skribiĝas kun unu nura so.

G. Waringhien.

RAINER MARIA RILKE: LETEROJ AL JUNA POETO. Tradukis: A. Münz. La tradukon reviziis: K. Kalocsay. 47 paĝoj. Formato 20×13.5 cm. Eldonis: Literatura Mondo, Mester u. 53 Budapeŝt, 1934. Prezo: nur bindita 1.35 svfr. plus 10% por sendkostoj. Por Aĉela-anoj 0.80 svfr.

Rilke apartenas al la *granda generacio* de l' impresionismo, sed laŭ sia naturo li inklinas ne al la naturalista, sed al la romantika skolo de tiu ĉi stilo. El lia naturo sekvas la laŭmotiva ligiteco de lia mondo, la pasiva, preskaŭ virina karaktero de lia lirika sinteno kaj reagmaniero, la validiĝo de la melodio de l' unu-humoro, la kulto de l' formo: nuraj trajtoj, kiujn parte moligas, parte devojigas la duonlumo de l' katolika fono, la popolkanto, la influo de la lasta granda poeto de l' norda romantiko, Jacobsen, kaj tiu de la slava animo. En la poezio de Rilke la abstrakta, senkoloriginta vorto rricevas sian originan funkcion: ne alegorio ĝi estas, sed (kio ĝi estis origine) levita en alian sferon, memstara, tamen sensebla imago, simbolo de la realo. La vortoj, kaj per ili la poeto venas en novan magie-mistikan proksimon al la realo. La mistika unio de Rilke sin direktas unuavice al la senvivaj objektoj, duavice al la homoj, al la humiligitoj, al la malriĉuloj, al la viktimoj de l' grandurba civilizo, kaj entute ĝi estas de intelekta naturo, sed ĝi havas momentojn ekstazajn, entuziasmajn, sentimentajn, febrajn: precipe kiam ĝi proksimiĝas al la fina celo de ĉia mistiko, al Dio.

Ĉiuj ĉi karakterizaĵoj estas retroveblaj en tiuj ĉi leteroj, kiujn enhavas la unua esp-igita Rilke-libro. La kerna temo estas la soleco: la »nigra zorgo«, kiu fidele akompanas ĉiun rajdanton, kiu la okulojn turnas ne nur eksteren, sed ankaŭ internen; la soleco, kiun kun tiel *Pir-haj* venkoj superis la granduloj kaj kiun kun tiaj malesperaj baraktadoj volus fuĝi la malgranduloj! Patre bonecraj, profete saĝaj estas la konsiloj de Rilke: sed ĉu mi vere eraras, se sub la serena surfaco de ĉi tiu post-ŝtorma trankvilo mi ankoraŭ konjektas en la profundo la nigre-ruĝan radiadon de vundo neniam kuracebla? Aŭ mi estas ankoraŭ tro juna, ol ke mia fantazio povus kompreni, ke ekzistas ja ankaŭ alia rezigno krom tiu, kiu aleksterne forkaŝas mensoge la internan falintecon? Se la kon-

# Oni atakas la Akademion

Jes, la Akademio estas ataka. Nu, mi estas nek Akademiiano, nek ĉe Lingva-Komitataneto, do mi povus juĝi en tiu ĉi afero tute senpartie

1. se mi kuragis min enmiksi en la kverelon de tiel altaj sinjoroj;

2. se mi almenaŭ iom komprenus la aferon, pri kiu temas.

La kaŭzon de la punkto 2. oni povas serĉi en du eblajoj:

a. ke mi estas stulta;

b. ke tie ekzistas iaj postkulisaj aferoj, pri kiuj mankas al mi konoj.

Post ĉio ĉi, certaĵo estas nur, ke mi, malgraŭ mia nepra senpartieco, ne estas kompetenta juĝi en tiu ĉi afero. Kion fari do?

Post longa cerbumado mi decidis, ke mi intervjuos pri tiu ĉi granda proceso du sinjorojn. Por esti tute senpartia, mi elektis unu revolucian, sron Presto, kaj unu konservativan, sron Letarg.

Sron Presto mi trovis ĉe lia skribotablo. Li laboris. Mi, timema laŭ naturo, ne kuragis lin demandi, kion li faras, ĉar eble li faris ian danĝeran proponon pri novismo min konsternunta (ho, pardonon, mi jam infektiĝis). Do mi nur rigardis timiĝite la amason da vortaroj kaj gramatikoj, kiuj kuŝis ĉe lia mano kaj fine, repreninte miajn fortojn, mi demandis rekte, sen ĉirkaŭparolo:

— Kion vi opinias pri la atakoj kontraŭ la Akademio.

— Pri la Akademio mi ne okupiĝas — li diris seke. — Mi ne scias, ĉu kaj kial ĝi estas atakata, sed se oni atakas ĝin, pro ia ajn kaŭzo, tio min ĝojigas sincere.

— Sed — mi interdiris timeme — se vi ne scias la kaŭzon de la atako, kiel vi povas tiun aprobi. La atako ja povas esti maljusta.

— Ne — li kriis pri vikle — *maljuste* oni ne povas ataki la Akademion. Se la aktuala kaŭzo estas maljusta, ekzistas amaso da aliaj kaŭzoj justaj. Do la *motivo* de la atako povas esti erara, sed la *atako* mem estas nepre ĵuste adresita.

— Kara sro Presto — mi demandis — kial vi tiom koleras al nia kompatinda Akademio?

— Kial? Dek sufiksojn, ses konjunkciojn, sep novajn gramatikajn formojn mi ellaboris pene, por savi per ili nian karan lingvon. Kaj ĉu la Akademio okupiĝis pri tiuj nepraj postulaĵoj? Vi divenis: ne! Miaj karaj pens-infanoj estas senkore neglektitaj. Se almenaŭ tiuj sinjoroj elektus min en la Akademion — tiam mi eble povus ĉe rezigni pri ili. Jes, tiam eble mi farus tiun grandan kaj doloran oferon por la nobla celo, ke en la Akademio troviĝu almenaŭ unu kompetenta viro. Sed ĝis tiam — la Akademio ne ekzistas por mi.

siloj de Rilke ne konvinkis min, tiom pli impete denove kaj denove min gajnis liaj profundsonoraj frazoj. Eble mi citos el la »kristnaska letero«: »Sed eble ili estas ĝuste tiuj horoj, kiam la soleco kreskas; ĉar ĝia kreskado estas dolora kiel la kreskado de la knaboj kaj malgaja kiel la komenco de la printempoj.« Esti soleca, kiel soleca oni estis kiel infano, kiam la plenkreskuloj ĉirkaŭradis, implikitaj en aferojn, kiuj ŝajnis esti gravaj kaj grandaj, ĉar la granduloj aspektis tiel agemaj kaj ĉar de ilia faro nenion oni perceptis. Kaj se oni iutage ekkonas, ke iliaj okupoj estas sen enhavaj, iliaj profesioj estas rigidigitaj kaj ne plu ligitaj kun la vivo, kial do ne rigardi plu ilin infane kiel ion fremdan, el la profundo de l' propra mondo, el la vasteco de l' propra soleco, kiu mem estas laboro kaj rango kaj profesio?« »La kasto, en kiu vi nun devas vivi, ne estas pli peze ŝargita per konvencioj, antaŭjuĝoj kaj eraroj ol ĉiuj aliaj kastoj, kaj se ekzistas iaj, kiuj montras ekstere pli grandan liberecon, tamen ekzistas nenia, kiu estas vasta kaj ampleksa en si mem kaj havas rilatojn kun la grandaj aĵoj, el kiuj konsistas la vera vivo. Nur la unuopulo, kiu estas soleca, estas, kiel aĵo, metita sub la profundajn leĝojn, kaj se iu eliras en la matenon, kiu ekkrepuskas, aŭ rigardas eksteren en la vesperon, kiu estas plena de eventoj, kaj se li sentas, kio tie okazas, la tuta kasto defalas de li, kiel de mortinto, kvankam li staras meze de plena vivo.«

Krom tiu ĉefa temo Rilke tuŝas ankaŭ al alidirektaj konsiloj: profesio, verkado, amo, sekso, legajoj. Koncerne ĉi lastajn li energie malrekomendas la leĝon de estetikaĵoj kaj kritikaj verkoj. Certe ne estas nun mia tasko polemiki kun tiu ĉi vidpunkto, tamen mi ne povas min reteni de cito de frazo, kiun mi trovas tiom maljusta kaj erara, kiom bela: »Artoverkoj estas de senlima soleco kaj per nenio ili estas tiel neatingeblaj kiel per kritiko. Mi rekonas: plej bona kritiko pri poemo estas ia deklamspeca vivovoĉa prezento, sen ajna komentario. Sed la kritikisto ne povas iri al la legantoj por fari tion, krome tiu kritikisto proksimiĝas la poemon nur al tiuj, kiuj jam disponas pri la necesa aprec-kapablo por poezio. (Guste la plilarĝigo de tiu kapablo estas la tasko de l' kritikulo) Kontraŭe: ĉu ni ne spertis jam, ke malfeliĉa

psend-patosa deklamado kapablas mortbati ĉe belegan verson?

La tradukado de ĉi tiu libreto estis ekstreme malfacila. Oni ne rajtis dissolvi la komplikitan, longfrazan, esence germanan stilon de Rilke, ĉar tio estus rabinta de la libro ties karakteron, kaj estus ĝin platiginta mizere. Aliflanke, tiu stilo estas tre malproksima de la E-a stilkonstruo. Nu, la traduko faris etan miraklon: restis la originala stilo, kaj tamen ĝi estas tiel feliĉe ekvilibrita, ke ĝi estas kristale klara kaj diafane facila. Kaj la lingvo, en tiuj malpezigitaj katenoj, povas ĉe muziki! Tio laŭdas la grandan flekseblecon de E-o, sed ne malpli la lertecon kaj lingvan certecon kaj spertecon de la tradukinto kaj reviziinto.

L. Braun.

Temas pri 10 leteroj, adresitaj de Rilke al juna vienano, kiu opiniis sin poeto, kaj (ĉu tial?) entreprenis la karieron de militisto. Ili konsistas ĉefe el kuragiĝoj kaj konsiloj, per kiuj Rilke volas helpi al sia juna amiko, ke li trovi sin mem kaj esploru sian propran vojon. En tiu korespondado, Rilke, kiu estas kun Stefan George la plej granda poeto moderna en la germana lingvo, montriĝas tuta, kun sia humana kaj konscia sentemeco, kiu senĉese profundigas la rilatojn, kiujn ĝi ekdivenas inter la estuloj kaj la aĵoj. Interesa precipe estas lia koncepto pri la arto kaj la poezio: li vidigas tre pian respekton antaŭ la subkonsciaj fortoj de la animo, naŭvan kredon al la pleja valoro de la neesprimito, de la nefinito ktp, kiuj estas specife germanaj. Nenio estas pli malproksima de la spiritostato de la latinkultura pensanto: por tiu, ĉio, kio ne estas esprimita, ne ekzistas vere, havas nur ontcan valoron; validas nur la penso vestita per sentebla formo. Laŭ la famaj versoj de Boileau:

Konceptu ion bone: vi klare ĝin esprimos,  
Kaj vortoj, por ĝin diri, neniam malproksimos.

Kontraŭe por germano, la vortoj estas malviva formo de degradita penso; en letero al W. de Humboldt (1. Febr. 1796), Schiller skribas la jenajn versojn, kiujn li poste forstrekis el sia Don Carlos; kaj kiujn tuj memoriĝis al mi la teorioj de Rilke:

Kion fari? Kompreneble, mi plene aprobis ĉiujn vortojn de sro Presto, manpremis kun li, kaj adiaŭis por lin transdoni ree al lia valorega laborado en la intereso de nia kara lingvo.

— Fraŭlino — mi aŭdis lin postkrii — mi eĉ ne montris al vi miajn novajn suf...

Sed mi jam estis sur la ŝtuparo kaj kuris for. Ne, ĉar mi ne estis tre scivola, sed, ĉar mi havis alian urĝan laboron.

Mi iris de tie rekte al sro Letarg. Li estas iom aĝa, pactempa sinjoro, kun bela blanka barbeto. Li akceptis min apud sia librobreto, kies ĉefaj ornamoj estas, en led-bindo, la Fundamento kaj »La Fabelo Pri La Granda Turo Kaj La Malgranda Doktoreto« de Henriko Fischer, Galatz, L. K.

Jam tute sperte kaj lerte, mi demandis tuj:

— Kion vi opinias pri la atakoj kontraŭ la Akademio?

— Mi aprobas ilin!!!

Feliĉe, ke mi jam sidis sur seĝo, ĉar mi estus eksidinta sur la tero pro tiuj vortoj.

— Sesesesed kikiki...

— Ne balbutu, tio ne konvenas al tia ĉarma fraŭlino — li diris komplimentante maljunulece. — Kial vi miras? La Akademio estas juste atakata. Jen, unu akuzpunkto estas, ke ĝi eldonis cirkulerojn kun gramatikaj eraroj! Nu, mi ne riproĉas la gramatikan eraron, sed

ja mi riproĉas — kaj tie ĉi li levis sian voĉon — ke la Akademio eldonas cirkulerojn.

— Eeeldoon...

— Ne balbutu, mi ripetas — li diris pli severe, forgesante eĉ komplimenti. — Kion signifas tio, ke ĝi eldonas cirkulerojn? Tion, ke ĝi laboras! Kaj mi diras al vi, fraŭlino, en E-o ĉia laboro estas danĝera. Ni havas la dek ses regulojn kaj la Universalan Vortaron. Ĉio kroma estas ne de Dio. Kaj ĉia »laboro« signifas aldonon, komplikigon, malfaciligon. La tasko de la Akademio estas konservi la facilecon de la lingvo. Do ĝia nepra devo estas ne labori! Kaj rilate al la akademiaj elektoj, mi diras al vi, ekzistas sola bona ebleco: oni devas elekti en la Akademion nur mortintajn homojn!

— Sed la sintakso? Ĉu oni ne devus ĝin fiksi, registri?

— La sintakso — diris sro Letarg — estas resumebila en sola punkto: ĉiu parolu, kiel la beko al li kreskis.

— Sed la oficialigo de novaj vort...

Mi ne finis la frazon. Sro Letarg alrigardis min tiel minace, ke mi forkuris sen adiaŭo. Mi petas lin, ke li bonvolu sendi al mi mian man-saketon, kiun mi lasis sur lia tablo. Mi ne kuraĝas iri mem por ĝi.

Longe mi meditis pri la supraj du intervjuoj, sed ĝis nun mi ne sukcesis konkludi, ĉu la atakoj kontraŭ la Akademio estas justaj aŭ maljustaj. Sed mi diris, ke eble mi estas stulta. Mi petas do la legantojn, ke ili provu mem formi al si opinion. Kaj mi estus tre danka, se pri tiu opinio ili min afable sciigus. M. Alice Pil.

Domage, ke la penso

En la mortintajn lingvajn elementojn

Devas disfali, ke l' animo devas

Velki skeleten, por aperi al l' animo!

Fidelan donu do, amik', spegulon

Kiu ricevu tutan mian koron,

Kaj ĝin resendu tuto...

La traduko de Sro Münz estis reviziita de Kalocsay: la antaŭparolo, kiun verŝajne li ne tuŝis, prezentas tipan modelon de tro kunplektita vortordo, (eĉ por ne kalkuli an »malgraŭ« anstataŭ »malgraŭ ke«). Pri la resto, la traduko estas bonega: nur kelkajn preferojn oni povus montri (ĝis prefero al *gis kiam*; *kulminaj* al *kulminaciaj*) Kaj la merito estas tre granda, ĉar la stilo de Rilke estas tre personeca, kaj plena de subtilaj nuancoj.

AMELIA KAJ MARINA, Amatora Poezio: J. Mangada Rosenörn. Eldonis Hispana Esperanto Asocio, Madrid, Apartado 1089. 168 paĝoj. Formato 23×16 cm. Prezo svfr. 3.—. Ilustrita.

Funde de tiu ĉi liriko troviĝas grandega doloro: perdo de du amataj filinoj. Tiu granda perdo, esprimita per kortuŝa plendo, certe malarmas la kritikanton. Des pli, ke la aŭtoro estas tre simpatia entuziasmulo de ĉio bona kaj bela: de paco, de amo, de progreso, de esperantismo, de naturo, de arto. Kaj krome oni povas diri, ke li estas bona versfaranto; liaj rimoj estas sonoraj kaj nebanalaj, lia ritmo estas vigla kaj enlulanta.

Kio, tamen, lin instigis, ke li nomu siajn poemojn »amatora poezio«? Kaj ĉu la recenzanto kontraŭdiru tiun memkritikon aŭ ĝin konsentu?

Nu, la recenzanto konsentas: tiu ĉi liriko vere portas sur si evidentajn markojn de amatoreco. Tri tiajn markojn mi kuraĝas citi:

1. La aŭtoro estas tro parol-malavara. Kelkfoje ties kaŭzo estas evidente la verso: la aŭtoro devas plenigi la formon, kiun li elektis pli vasta ol la enhavo. Sed ofte tiu vort-abundo estas memcela; kelkfoje ĝi ne efektas malbone, ekz-e en liaj »laŭdaj« poemoj pri urboj kaj pejzaĝoj, kie al tia amasigo de ĉiam novaj vortoj kaj

epitetoj ne mankas ia sugestia forto; sed ofte ĝi lacigas. Do la unua »anti-amatora« konsilo — se la aŭtoro permesas al mi tian — estas: Pli da koncizo!

2. La aŭtoro estas tro lirika. Per tio mi komprenas, ke li prezentas al ni siajn sentojn tro *private*: li ne povas al ili doni la karakteron de sentempa kaj universala valideco. Li vekas en ni kompaton, sed ne nian propran emocijon; li igas nin konsenti, sed li ne povas nin korskui. Laŭ mia opinio, ties kaŭzo estas, ke la sentoj regas lin kaj ne li regas siajn sentojn.

3. La aŭtoro devus pli timi la banalecon. Ekzistas grandaj veroj kaj tre noblaj sentoj, kiujn oni plu ne povas simple eldiri, tiel ofte ili jam estis diritaj. La rajton eldiri ilin oni povas akiri nur per tute nova esprimmaniero, kiu kvazaŭ rejunigas tiujn maljunajn eternvalorajojn. Nu, al la aŭtoro tre ofte mankas tia rejuniga kapablo.

Tamen, malgraŭ la supraj 3 punktoj, mi ne diras, ke la bela kaj ame ilustrita versvolumo estas seninteresa. Mi ekkonis per ĝi tre simpatian homon, mi sentis koran bedaŭron pri la katastrofoj lin trafintaj, plaĉe mi legis liajn entuziasmajn laŭdojn pri lia lando kaj naskotero. Kaj plezure estis aŭdi la tintadon de la esperantaj rimoj en la ludemaj mallongversaj formoj. Kaj dolore mi meditis super la belaj portretoj de la freŝe junaj du knabinoj kaj pri la bildo, kiu montras ilian tombon. Post tiu meditado duoble mi trasantis la doloron, kiu pulsas en la versoj de la kruele batita patro. —y.

HENDRIK ADAMSON: AULI. Originala novelo. Eldonis Literatura Mondo, Budapest, Mester u. 53. 1934. 88 paĝoj. 20×13.5 cm. Prezo: broŝurita 1.60 svfr., bindita 3.— svfr. plus 10% por sendkosto. La sesa libro de Aela 1934.

Adamson estas estona poeto kaj novelisto. La legantoj de Literatura Mondo jam iom konatigis kun li pere de liaj poemoj en tiu revuo. Kvankam sufiĉe nova kaj krome tute izolita esperantisto, li mirinde bone alproprigis al si ne nur la eksterajn partojn de nia lingvo, sed ankaŭ ĝian animon, kaj jam tiuj poemoj donis atentindan kontribuon al nia liriko. Ili estas plenaj de muziko kaj animo, kaj la sentesprimo estas delikate vivofreŝa, eĉ

kiam regata de profunda melankolio. Ne nur laŭlitere li troviĝas inter la unuaj poetoj, kiun Literatura Mondo prezentas al ni en la bonega antologio »Dekdu Poetoj«.

Auli estas lia unua libro en Esperanto. Ĝi estas novelo pri knabeto en la estona kamparo. Laŭkvante tiu 88-paĝa libreto estas nur ereto en nia rapide kreskanta literaturo, sed laŭkvalite ĝi signifas konsiderindan altigon de la nivelo de nia rakontarto. Mi senhezite nomas ĝin novela majstroverko, ne nur el esperantliteratura vidpunkto, sed ankaŭ laŭ la mezuro de gravaj naciaj literaturoj.

En tiu novelo vi renkontos medion, materian kaj spiritan, kiu certe ŝajnos al vi tute unika, se vi ne estas estono. Nordlandanoj, precipe el la kamparo, parte rekonos ĝin, sed samtempe ili multloke trovos nuancojn kaj animan atmosferon, kiuj verŝajne nenie troviĝas krom en Estonio. Por legantoj el spirite kaj geografie pli malproksimaj landoj la konatiĝo kun tiu medio devas esti vera travivaĵo.

Sed ĉu ĉiuj povos kompreni tian medion? Mi kredas, ke jes. Mi estas konvinkita, ke ĝi estas plenviva kaj plene komprenebla eĉ al grandurbano, kiu neniam vidis pecon da vera kamparo. Nome tiu rakonto estas unuflanke la plej lokeca, kiun oni povas imagi, sed samtempe tiu lokeco enhavas kaj esprimas ion absolute universalan, kio troviĝas en ĉiaj homaj animoj en ĉiuj partoj de la mondo.

Auli estas tre malgranda knabo. Krom li figuras en la rakonto lia fratino kaj la ceteraj domanoj de la bieneto, najbaraj friponecaj knabo kaj knabino kaj diversaj aliaj personoj. Krome troviĝas tie bovinoj, arboj kaj arbustoj, la hejmaĵoj, la puto, la paŝtejo kaj multaj, multaj aliaj aferoj, kiuj, viditaj per la okuloj de Auli, estas preskaŭ same plenvivaj kaj gravaj kiel la homoj estaĵoj. Auli travivas teruran fulmotondron, helpas sian fratinton paŝti la bovinon, fariĝas viktimo de la friponecaj najbarinfanoj, implikiĝas en komikan »geedzigan« historion, kiu tamen por li estas preskaŭ frenezige serioza kaj turmenta, kaj kiu eĉ faras ŝteliston el li. Li malsaniĝas, oni transportas lin al la malsanulejo en la urbo, kie li konatiĝas kun multaj novaj kaj cerbumigaj aferoj de la vivo. En la dua parto de la novelo li devas forlasi la hejmon kaj vivas en fremda sed agrabla domo kun bonkoraj homoj. Tie ni travivas kun li kelkan tempon, kiu ne estas same okazoriĉa, sed same enhavoplena.

Auli estas filozofo, kiel ĉiuj infanoj pli malpli estas. Li multe demandas kaj cerbumas pri aferoj, kiujn li ne komprenas. La aŭtoro neniel faras troigon, kiam temas pri liaj pensoj, demandoj kaj eldiroj. Ili estas tute ordinaraj kaj naturaj por knabeto de tiu aĝo kaj en tiu medio. Sed li bone elektas kaj bone uzas la materialon, kaj tial la malgranda Auli povas vibrigi nian animon per problemoj, pensoj kaj revoj, kiuj estas infane naivaj, sed tamen implicas demandojn kaj ideojn, kiujn la saĝuloj nomas eternaj. Auli estas la homo, eta estaĵo en vivo kaj universo, kiujn li vane klopodas kompreni. Lia loka horizonto estas malvasta, spirite ĝi tamen enkadras la tutan mondon.

Adamson estas nova esperantisto, tamen lia Esperanta stilo jam havas fortajn punktojn. La figuraj esprimoj kaj multaj novaj kunmetaĵoj atestas pri lingvokrea verkisto kun granda kapablo. Cetere eĉ la kelkaj malglatecoj de lia lingvo havas certan ĉarmon, kiu iel konvenas por tiu unika rakonto. *Stellan Engholm.*

EL LA NOTLIBRO DE PRAKTIKA ESPERANTISTO: K. R. C. STURMER. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝto, Mester u. 53. 1934. 128 paĝoj. Formato 20×13.5 cm. Prezo bindita: 4.—, broŝurita 2.50 svfr. Por Aela-anoj respektive 2.10 kaj 1.20 svfr. Bela klišita kovrilpaĝo.

Tio estas tre kurioza kaj originala libro, kvankam apenaŭ oni povas nomi ĝin libro: ĝi konsistas nur el aro da rimarkoj, meditetoj aŭ konfeso, kiujn la aŭtoro, helpe de kelkaj amikoj, aranĝis en libro-formo; io, kio povus klasiĝi inter la eseoj, se la ideoj estus pli disvolvigitaj kaj la prezentado malpli fragmenta. Tia, kia ĝi estas, ĝi pro-

ponas al ni valorajn temojn por pripensado kaj diskutado — kaj aliflanke malkaŝas sciigojn pri la personeco de la aŭtoro: kaj ĉar li estas unu el la plej talentaj verkistoj en nia movado, ne estis superflue kolekti ilin. Do, ĉiel tre interesa dokumento pri la esperantaj aferoj, kaj nova grava peco de nia originala literaturo.

La rimarkojn, tiel prezentitajn al ni, oni povas klasi en kvar ĉapitrojn: la seksaferoj, la literaturo, la valoro de esperanto kaj la ĝenerala filozofio de la vivo. Tiuj de la unua kategorio kompreneble vekis plej multe da scivolo aŭ da indigno, laŭ la temperamentoj: ili estas cetere tute prudentaj (se ne prudaj), kaj eĉ decaj. Du ĉefajn punktojn la aŭtoro akcentas: la problemojn pri la samseksamo kaj la kontraston inter la angla kaj franca (aŭ latina) spiritostato kontraŭ la seksaferoj. Pri la unua punkto estus multo direbla por kaj kontraŭ la aŭtoro: mi opinias, ke la samseksamo estas esence la rezulto de fizika aŭ spirita nenormalaĵo, kaj devas esti kuracata, se kuracebla, de medicino kaj ne de leĝo (ni notu tamen, ke ĝi ne estas fremda en la naturo, ĉe kelkaj bestospecoj); sed certe estas, ke ĝi povas ricevi grandan amplekson, ĉu pro estetikaj (Helenujo) aŭ snobismaj motivoj (Berlina, Parisa beletra mondumo), ĉu pro sociaj trudoj (kunvivado en internulejoj, kazernoj, sur ŝipoj ktp.). Oni povas nur aprobi Sturmer, kiam li aplaudas la pli kaj pli larĝan komprenon kaj grandan diskuteblojn pri tiaj problemoj en la postmilitaj anglaj generacioj, aŭ kiam li rimarkas, ke »li trovis pli da mensa malsaneco inter pruduloj ol inter obscenuloj« (trafan aplikon de tiu penso montras unu el liaj recenzistoj). Pri la dua punkto, mi opinias, ke la kontrasto inter la latina kaj angla am-konceptoj estas iel surfaca: efektive, la aminstinkto, la seksemo estas, almenaŭ ĉe la blanka raso kaj eble ĉe aliaj, tre potenca kaj danĝera forto, kies efiko ĉiunmomente minacas disfali la sociajn regulojn kaj barojn, se oni lasus al ĝi liberan vojon; ĝi estas en la socia vivo, kvazaŭ pulvobarelo sur ŝipo. Nu, kontraŭ la danĝero de pulvobarelo oni povas uzi du metodojn: aŭ starigi gardistojn ĉirkaŭ ĝi, kun malpermeso al iu ajn proksimiĝi al ĝi — aŭ oni povas malekigi la pulvon per sufiĉe da akvo kaj tiel senpotenciĝi ĝin. Rilate al la seksinstinkto la angloj ĝenerale uzis la unuan metodon, malpermesante ĉian publikan aludon al tiu temo ktp. . . kaj la francoj la duan, traktante tiun temon nur ŝerce, moke kaj ironie. La angla metodo havas tiun malutilon, ke ĝi kreas »repeladon«, kiu povas iĝi kelkfoje danĝera por la spiritosano, kaj al kiu mi atribuas la floradon de tiom multaj strangaj aŭ eĉ absurdaj sektoj, kiun miras la aŭtoro sur paĝo 64. Kompreneble, la plej bona metodo estus rilati al tiaj problemoj kun la sama animtrankvilo, kiel oni rilatas al tiuj pri la vestado aŭ manĝado: tion faras ekzemple J. Romain en la »Bonintencaj Homoj«, aŭ H. de Régner en siaj poemoj. Sed mi ne scias, ĉu tia sinteno povos ĝeneraligi: homo estas tiel malmulte racia animalo!

Pri la graveco de la literaturo entute, ĝia socia rolo ktp., oni povus daŭre diskuti: mi diros nur, ke mi ne konsentas kun Sturmer kaj Baghy, ke »la celo de koscia verkisto estas, ke li eduku kaj ne sole amuzu« (pĝ. 37). Mi ne kontestas, ke artverko povas havi moralan valoron, sed mi opinias, ke, se la aŭtoro kiam li verkas ĝin, havas antaŭ la okuloj la moralan celon kaj ne la puran esprimadon de sia personeco, lia verko povos eble famigi, laŭ la maniero de la Kabano de Onklo Tom aŭ de Fabelo; sed ĝi neniam estos io arta, io bela. Kiel mi diris aliloke, granda aŭtoro devas esti moristo, ne moralisto. Mi scias, ke mi kontraŭas interalie tutan skolon da sovetaj verkistoj: sed ĝuste la rezulto de iliaj penoj tre sufiĉe juĝas la valoron de iliaj principoj.

Pli malvasta problemo estas tiu de la esperanta lingvo kaj literaturo. La demando, ĉu Esperanto iutage anstataŭos plene la naciajn lingvojn, estas aludita en tiuj ĉi notoj, kun referenco al Lanti, kiu unue elmetis ĝin. Laŭ mia opinio, mi ne kredas tion ebla — nek precipe dezirinda: la ekzemplo de la latina lingvo disdialektiĝinta en la romana imperio, kaj tiu de la angla lingvo, kiu

# Informoj al la membroj de AELA

Kelkajn semajnojn post kiam ĉi tiu numero de Lingvo-Libro eliras en Literatura Mondo, ĉiuj rajtaj membroj ricevos fine duan volumon de la Enciklopedio kaj la Ĉeĥoslovakan Antologion. Ni petas pardonon pro la vere tre longa prokrasto de tiuj verkoj, sed iuj kunlaborantoj estis kulpaj. Ni tamen kun fiero transdonos al vi ambaŭ verkojn, ĉar ni scias, ke vi estos pri ili tre kontentaj.

Rilate ilian dissendon, tiuj membroj, kiuj ne realigis je ĉi tiu jaro kaj havas ŝuldojn je ekstervicaj libroj, ne ricevos ĉi tiujn librojn antaŭ ol tiuj ŝuldoj ne estos tute egaligitaj. Ĉi tiun sciigon ni jam dufoje sendis al ĉiu ŝuldanto, tria sciigoj pri tio aparte eliros.

## Libroj de 1935.

La komposto de la Ĉeĥoslovaka Antologio estas finita la 15-an de marto. Tiam ni komencis komposti sinsekve la

### Plenan gramatikon de Esperanto

kiu aperos grandformata, en tre densa komposto, en la unuaj tagoj de majo.

Ĝin sekvos same en majo la

Arthistorio II de Hekler kaj

Tri viroj en boato

Ankoraŭ antaŭ la kongreso verŝajne aperos du libroj el la beletristika serio kaj la verko de Privat.

La posta sinsekve de la verkoj estas verŝajne jena:

Romano de San Michele

Rigardu la Teron

Verko de Wüster

Nova Krestomatio

kaj fine la beletristika serio, respektive ĝiaj lastaj volumoj.

komencas alpreni en Usono aspekton pli kaj pli distingan disde tiu, kiun ĝi konservas en Anglujo, pravas, ke lingvo ĉiutage uzata en la vulgara vivo ne povas evolui paralele sur iom vasta teritorio. La plej bona estonta rolo, kiun oni povas deziri al Esperanto estas tiu de precipe skribata lingvo, kiaj estas nun la araba aŭ franca literaturaj lingvoj. Tio plej bone garantius ĝian unuecon.

Tro longa estas jam tiu ĉi recenzo: mi volus tamen, antaŭ ol fini, diskuti tiun aserton (pg. 16), ke la »loka nuanco« (france: couleur locale — mi preferus diri: loka karaktero, aŭ *caro*), kiu mankas ĝis nun al Esperanto, ne tre gravas en literaturo. Sajnas, ke la aŭtoro faris konfuzon: efektive, la manko de loka karaktero en la lingvo mem t. e. la neebleco redoni en Esperanto la familieran slangan, la pli malpli trivialan dialekton, ne malhelpas la verkadon de alttona romano: tion pravas la ekzemplo, en la franca literaturo, de A. Francè, A. Gide G. Duhamel, kiuj uzas artan lingvon tre malproksiman de la parolata; kondiĉe tamen, ke ekzistu, por la eventuala bezono, stoko da trivialaj vortoj, kies nura cito sufiĉas al lerta romanisto por situigi la etoson de sia rakonto. Tiu kondiĉo estas plenumata en Esperanto, de post la apero de la Sekretaj Sonetoj kaj de la vortareto fina de Parnasa Gvidlibro. Sed se temas pri la loka karaktero de la detaloj, per kiuj pentriĝas heroo de romano aŭ teatraĵo, tio estas tute malvera. Iu persono povas esti realisme reprezentata nur per aludoj al mil detaloj de lia vivo, mil apartaĵoj de lia urbo, socio, nacio ktp. Se tiuj aludoj estas nekompreneblaj por alilanduloj, la verko perdas sian tutan forton ekster la limoj de sia originala lingvo. Tio estis la okazo por romano de A. Huxley, »La Brava Nova Mondo«, francen tradukita sub titolo »Le Meilleur des Mondes«, kaj tion tre bone konsciis kaj konfesis la verkinto mem, en antaŭparolo al la franca traduko. Tamen ĝenerale la plejparto el tiuj detaloj estas,

## Luksa eldono

Por kontentigi la bezonon kaj postulon de multaj niaj membroj, ni presas el ĉiu libro kelkcentojn sur luksa papero, en ledimita bindo. Pri la malgranda superpago ni informas aparte ĉiujn membrojn tuj post ricevo de ilia kotizo.

## Nova limtempo

Ĝis la 1-a de julio la kotizo estas

serio A 8.50 svfr.

serio B aŭ C 11.— svfr.

serioj B plus C 20.— svfr.

serioj A B C kune 27.50 svfr.

Bindo por ĉiu volumo po 0.90 svfr.

## Novaj favoroj al niaj membroj

Krom la jam anoncitajn librojn ni liveras kun granda rabato al ĉiu nia membro la eldonaĵojn de du gravaj eldonejoj. Ni metas aparte en ĉiun pakadon liston de tiuj libroj kaj esperas, ke niaj membroj estos kontentaj pri la oferto en ĝi.

## Aliaj eldonaĵoj en 1935

Kompreneble diversaj kaŭzoj devigas kaj ebligas nin eldoni librojn ankaŭ krom la serioj. Tiuj tamen ne estos sendataj aparte al la membroj, nur laŭ peto. La librojn ni anoncos ĉiam ĝustatempe sur la kolumnoj de Lingvo-Libro. Tiuj membroj, kiuj mendas kaj pagas iun tian libron antaŭ apero, ricevas rabaton de 50% el la prezo, aliaj membroj, transprenantaj ĝin post apero, ricevas 40%. Ĉijare tre verŝajne aperos Itala Antologio kaj la milpaĝa Decamerone de Boccaccio.

kvankam iom malĝuste, percepteblaj por leganto de alia lingvo, sed de sama civilizo: tial la romanoj de unu eŭropa lingvo, konservas ĝenerale sian forton, kiam ili estas tradukitaj en la aliajn. La malavantaĝo de Esperanto estas, ke ĝi estas nur traduklingvo, kaj ne posedas tiujn originalajn apartaĵojn: kaj se oni volas esprimi per ĝi la apartaĵojn de iu nacia medio, socio ktp, oni trovas duoblan malfacilon: unue la esprimoj por redoni ilin ne ekzistas, kaj oni devas, pli malpli sukcese, provi krei ilin; due, oni tute ne scias, ĉu la alilingvanoj rekonos, sub tiuj parolkreaĵoj, la apartaĵojn, kiujn ili povus pli malpli ĝuste identigi al la siaj. Ekzemple, se mi scipovas la anglan lingvon, kaj legas en Hamleto »Not a mouse stirring« (I, 1), mi komprenas, ke tio estas metafora esprimo por signi, ke ĉeestis nepre neniu; se mi devas traduki tion francan, mi elektos respondan proverbaĵon »Pas un chat!« (ĉe ne unu kato). Sed se mi ne scias la anglan, kaj legas en esperanta traduko »Eĉ mus' ne preterkuris«, mi neniam pensas, ke tio estas metafora esprimo, kiun mi ne devas laŭvorte traduki, kaj mi faras senceraron. La ekzemplo estus pli drasta, se la esperanta Hamleto estus originalaĵo: ĉar tiam nenio povus averti nin pri nia miskompreno. La peno de la Esperantaj verkistoj kaj tradukistoj devus esti nun vulgarigi aŭ krei definitivajn esprimojn-kliŝaĵojn por la ĉefaj apartaĵoj de la antikva aŭ moderna civilizoj: ĉiu tradukisto aŭ verkisto ekzemple, devus nepre trudi al si la uzadon de la Zamenhofaj aŭ Mandersaj dirmanieroj, ĉiufoje, kiam ili havos por esprimi apartaĵojn el la Biblio aŭ el la Odiseado: nur per tia unuecigo, kaj daŭrigo de simila peno por la nuntempaj apartaĵoj oni povus atingi, ke la romanoj en Esperanto ne plu havu tiun aspekton de nepreciza traduko, kiun ili nun tro ofte havas.

Mi jam tro habilis, kaj ne restas loko por paroli pri la stilo de la aŭtoro: ĝi estas tre bona, kaj montras

# Tra la novaj libroj de 1934.

La ĵus finiĝinta jaro plenigis novan breton en nia esperanta libro-ŝranko kaj riĉigis nian junan literaturon per ducento da novaj libroj. El la dudeko da vere valoraj verkoj elstaras unuavice la grandioza *Enciklopedio*, kies dua volumo, febre atendita, aperos en la venonta monato. La entuziasma saluto de nia tuta gazetaro al tiu unika verko atestas pri ĝia neordinara signifo. Ĝi sendube restos unu el la plej gravaj eventoj en la historio de nia movado. Ĉu do mirinde, ke dum ĝia pretigo, kiu elsorbis al si tiom da energioj kaj tagoj, aperis pli malmulte da libroj, ol en la lastaj tri jaroj? Cetere, eĉ aludante la krizon nuntempan, ni neniel parolu pri regreso. Tute male!

Sur la kampo de la originala literaturo du sciencaj verkoj meritas nian atenton: la *Filozofia Vortaro* de Dr. Kamaryt, sukcesplena provo de faka terminaro, kaj *Fine mi komprenas la Radion* (de Aisberg), kies nacilingvaj tradukoj jam atingis la nombron dektri. Per sia multesprima socia romano *Turstrato 4*, la sola dum la jaro, Weinhengst disvolvas evidentan kapablon en speco, kiu spite de la valoraj kontribuoj de Baghy kaj Engholm, ankoraŭ ne tute elvindiĝis. Pluaj paŝoj tiudirekten estus vere subtenindaj. Pli prosperaj ŝajnas la skizoj kaj noveloj: la ĉarme romantika *Teatra Korbo* (Baghy), la mozaïke kaj cizele kunmetita *Notlibro de Praktika Esperantisto* (Sturmer), la du rimarkindaj studoj pri infana psikologio *Infanoj en Toronto* (Engholm) kaj *Auli, rakonto pri knabeto* (Adamson).

El la tri poemlibroj apartan valoron havas la riĉenhava kaj altnivela antologio *Deludu Poetoj*, en bonega redakto de Dr. Kalocsay. Inter jam famaj nomoj kaj rekonitaj talentoj aperas novaj steloj: la baltoj Adamson kaj Kurzens, la hispanoj Maura kaj Nunez Dubus, la anglo Price-Heywood, la aŭstro Schauhuber kaj la usonano Stillman. La du aliaj: *Amo kaj Sapiro* (Mihalski), *Amelia kaj Marina* (Mangada-Rosenörn), kvankam ne senvaloraj ne atingas tiun poemkolekton laŭ signifo.

Ni notu ankaŭ la zorge kompilitan *Vortoj de Macue Sasaki*, la sole gravan eldonon ĉi-jaran el Japanlando.

efektivan progreson de post »Por Recenzo«. Mi signos nur la uzadon de infinitiva predikativo post scii (pĝ. 7, 120), de infinitiva suplemento post kompetanta (pĝ. 80), de absoluta participio (*Koncize dirite* pĝ. 14), kiuj estas nekutimaj. La propono de *skolasto* kun signifo de angla *scholar*, franca *clerc* (kp. »La Trahison des Clercs) estas bona. Krome en *knabina amiko* (pĝ. 20), *knabina konatulo* (pĝ. 22), *ĉapelino*, *ĉemizino* (pĝ. 8) oni trovas strangan uzon de la sufikso *ino*, kiu eble spegulas la strangecon de la rilatoj, kiun la aŭtoro havas kun la respondaj realaĵoj.

G. Waringhien

**VORTOJ DE MACUE SAZAKI.** Kompilis Klara Rondo. Eldonis Japana Esperanto Instituto, Tokio, Hongoo Motōmaĉi 1. 1934. 126 paĝoj. Formato 13×19 cm. Kun portreto. Prezo broŝurita svfr. 2.40.

La fervora Klara-rondo kompilis la artikolojn kaj tradukojn de Macue Sasaki, brava kaj kuraĝa pionirino de la virina movado en Japanujo. Mem la aŭtorino antaŭ nelonge mortis, sed la memoro de ŝia agema kaj kuraĝa individuo, la rezultoj de ŝia agado, ŝiaj vortoj kaj instigoj verŝajne longe eĥados en la japana movado. La libreto, kies ĉ. duono enhavas originalajn artikolojn, interese montras la grafikonon de vivo, kiu komenciĝas ĉe la Zamenhofa homaranismo kaj alvenas al la klaskonscia kredo.

Pri Japanujo ni havas stereotipajn bildojn; ride-tantaj diplomatoj, ĉerizarboj kaj la majesta tonzur-hava Fujijama, ebon-haraj virinetoj, madame Butterfly! — sed tiuj trankvilaj bildoj nuntempe iom konfuziĝas per faktoj kaj rezultoj, kiujn la bonedukitaj eŭropanoj rigardas kiel ofendojn kontraŭ la iluzio, kiun oni havas pri tiu malproksima lando. Jen, aperas varoj, aŭtomobiloj, lam-

Interesan kaj utilan kompendion trovas en la *Esperanta Literaturo* (de Waard) la kandidatoj al la ekzameno de kapableco.

Alia grava evento, aklame salutinda, estas la dua kompletigita kaj rimarkinde pliriĉigita eldono de la *Plena Vortaro*, kiu, spite al ĝia »neoficialeco«, jam fariĝis la plej fidinta konsilanto de ĉiu serioza verkisto. Ĝi enhavas la plej ampleksan E-vortprovizon, ĝis nun libroforme presitan kaj precize klarigitan, kaj estos la plej solida bazo por estontaj enciklopediaj vortaroj. Tiu dua eldono montriĝas vere ĝojiga simptomo: ĝi atestas pri la deziro de la publiko al ĉiama perfektigo. Tion pravas ankaŭ la *reeldonoj* de *Petro* (SAT), de la Gaja Lernolibro (Walter), de la *Helpanta Temaro* (Mangada-Rosenörn), ĉiuj tri valoraj instruiloj, kaj fine, tiu de la populara novelo de Engholm: *Al Toronto*, tre taŭga por progresaj kursoj.

La lernolibroj estas krome reprezentataj per la *Cur-sus Completus Esperanti* (Bianchini) utiligebla nur de latine scianta publiko, *Freude durch Esperanto* (Steiner) por germanlingvanoj kaj *Kompleta Gramatiko* (Kitzler), multtrilate interesa.

El la 4000 paĝoj da traduka literaturo kontribuis po kvinonon la lingvoj angla kaj sveda. El la lasta ni salutu du belegajn verkojn, lukse eldonitajn de Förlagsfö-reningen Esperanto: la mondfaman *Gösta Berling* de Lagerlöf (trad. Engholm) kaj la valoran *Sveda Antologio* tre kompetente redaktitan. La kroata estas inde reprezentita per *Cezaro*, historia romano de Jeluŝiĉ, en atentveka traduko de Rotkviĉ, dum la franca restas jam de kelkaj jaroj neproporcie sub la meznombr-o. El ĝi ni notu tamen du etikajn verkojn: *Bonhumoro* (Nyssens), *Skizoj pri Filozofio de la Homa Digno* de Gilles (trad. Lanti), kaj ankaŭ plaĉan rakonton de Musset, *Mimi Pinson* (trad. Rethel).

La socie kleriga asocio SAT kune kun ADLEL aperigis du similtendencajn romanojn kontraŭmilitajn: parton de la famekonata satiro de Hašek *La travivaĵoj de la brava soldato Svejk* (trad. el la ĉeĥa Stadler) kaj la tragikan rakonton de Upton Sinclair *Jimmie Higgins* (trad.

poj ktp. ktp. kaj oni ne komprenas, kiel oni povas vendi la japanajn varojn por tiaj prezoj.

La vortoj de Macue Sasaki enhavas interesajn detalojn kaj — ankaŭ respondojn pri tiuj silentaj kaj konsternitaj demandoj. — La unuaj artikoloj pledas por Esperanto al la japana virinaro kaj el tiuj artikoloj elvolviĝas jam la portreto de eksterordinara virino, kiu en eksterordinare malfacila medio pacience, ferenergie kaj kuraĝe laboras. Poste ni povas legi leteron al s-ro Butler pri la landfinaĵo »io«, pri kiu estas skribitaj la jenaj karakterizaj vortoj: »... ni restu bonaj samideanoj kaj sinceraj amikoj kaj post 10 jaroj ni ree turnu nin al la problemoj kaj vidu la naturan evoluon de la finiĝo de la landnomo; tiam se la malo de mia opinio venkos, mi obeos ĝin...«

Kaj poste sekvas artikoloj, kiuj multe klarigas al ni pri tiu »kiamaniere?«, per kiu demando industriaj kaj komercaj ĉefuloj rigardas al Japanujo.

Ni citu kelkajn frazojn: »En Japanio la nombro de universitatoj estas 37; 30288 studentoj, dum *studentinoj* nombras nur 9.« (En 1927.) — La universitatoj estas principe fermitaj antaŭ la virinoj en 1927, kaj estus interese scii, kiel la afero stas nun. El 1928, mi trovis artikolon kun la jenaj indikoj: »C. 24—25 milionoj da virinoj ekzistas en Japanio, el kiuj la duono estas maljunulinoj, infanoj kaj iliaj zorgantinoj, kiuj sin ne okupas pri ia difinita metio. La aliaj 12 milionoj dividiĝas laŭ difinitaj okupoj: 8 milionoj terkultivistinoj, 900.000 fabriklaboristinoj... 70.000 instruistinoj, 60.000 kuracistinoj kaj akuŝistinoj.« (Ĉu vere, kuracistinoj sen universitato?) Kaj poste pri la virina laboro: »... La labor-tago ĝenerale estas pli-malpli 12 hora. Krome du horoj da ekstra laboro laŭ speciala leĝpermeso povas esti aldo-

el la angla Fröding). Sed ambaŭ tradukoj enhavas bedaŭrindajn mankojn, kiuj iom forprenas de ilia originala efiko. Pli zorga redaktado nepre necesus ĉe tiaj ellaboroj. Ekrelo, kutime tre aktiva, produktis kompare malmulte per la propagandcela *Kun pafilo kaj libro* (Isbah) bone tradukita de Zamjatnin, sed ĝuste kontraŭtendenca al la du supre nomitaj.

Al la Esperanto Publishing Company ni dankas *Romano pri Afrika Bieno* (Schreiner) konsciencie elangligita de Andrew, kaj la belaspektan *Vivo de Nia Sinjoro* (Dickens), eldonitan tuj post la surpriza apero de la originalo, por la granda plezuro de ĉiuj bibliofiloj. Du aliaj belaj eldonaĵoj laŭ teknika vidpunkto estas la polaj *Marŝalo Pilsudski* de Sieroszewski (trad. Strelczyk) kaj *Cu ĝi estas fabelo?* de Wolski (trad. Dabrowski).

Unuan lokon okupas inter la eldonejoj Literatura Mondo kune kun la kooperativa AELA. Krom ok el la jam menciitaj verkoj tiu ĝemela entrepreno liveris al la legantoj ankaŭ la jenajn librojn: el la hungara *Vojaĝo en Faramidon* de Karinthy (trad. Totsche), *Arthistorio I* de Hekler (trad. Kalocsay) tre riĉe ilustritan; el la japana: *Amo de Toojuuroo*, teatraĵon de Kikuĉi (trad. Simomura); el la pola: la sensacian *Mia Vojaĝo en Sovetio* de Słomski (trad. Grenkamp-Kornfeld); el la germana: la pripensigan verkon de Herzl *La Juda Stato* (trad. Selzer) kaj *Leteroj al Juna Poeto* de Rilke (trad. Münz); el la itala: *Vivo de Arnaldo* de Benito Mussolini (trad. Kalocsay). Komunaj trajtoj ligas ĉiujn tiujn plej diversetajn eldonaĵojn: lingva korekto, enhava valoro kaj plaĉa ekstero.

Ni ne forgesu el la baltaj lingvoj: *Norda Literatura*, novelkolekton redaktitan de T. Indra; el la nederlanda: pordistran romanon *Blua Sango* de Wood (trad. van Zoest), kaj el la norvega: *Gaja Knabo* de Björnsson (trad. Sandberg kaj Johansen).

Kaj jen fine restas en nia mano fasketo da eldonaĵoj diverskiale interesaj, sed kies nura mencio farus ĉi tiun skizon seke listaspekta. Multaj belaj prospektoj kaj traĝindaj broŝuroj.

Entute abunda rikolto, kies veran signifon estas malfacile taksi nuntempe, ĝuste pro ĝia aktualeco. Kaj

same malfacile ŝajnas difini la ĝeneralan orientigon de nia literaturo kaj eltiri tro fruajn konkludojn. Ni tamen rajtas paroli pri grada formiĝo de *Esperanta kulturo* aŭ, pli ĝuste, pri kunfandiĝo de la internaciaj elementoj latentaj en ĉiu nacia kulturo, pere de Esperanto. Kaj eble la ĝisnunajn konkerojn ni devas rigardi malpli kiel rikoltojn ol kiel semojn jetitajn en la grundon de l' Estonto.

Por paroli el ekonomia vidpunkto, nia literaturo evoluas progresse al la formo de kooperativa eldono, kiu ne nur evidentigas plej sukcesa rimedo por transpasi la malfavoran epokon, sed prezentas ĉiujn avantaĝojn de la sistemo: produkton ĉiurilate pli grandskalan, sekve pli etprezan, kontentigon de la plimulto de la konsumantoj, la eblon propagandi kaj larĝe disvastigi kulturalan movadon. Tion plej konvinke pruvas AELA, la prototipo de la kooperativa eldonejo, kies eldonprogramo malfermas larĝajn perspektivojn kaj antaŭvidas 15 gravajn verkojn por ĉi tiu jaro.

Kaj ni ne forgesu aludi pri la grava rolo de la kritiko. Ne parolante pri la du aŭ tri fakaj organoj, ni plezure konstatas la amplekson kaj nivelon de la recenza rubriko en pluraj gazetoj, inter kiuj ni menciuj speciale *Heroldo de Esperanto*, *British Esperantist*, *Nia Gazeto*, *Kristana Gazeto*, *Nederlanda Esperantisto*, *La Revuo Orienta* (japane!), *Sennacieca Revuo*, la iama *Suda Kruco*, *Svenska Arbetar Esperantisten*, *Svenska Esperanto Tidningen* kaj ĝis lastatempe *Esperanto* de UEA. Ankaŭ aliaj gazetoj dediĉas kelkfoje apartan atenton al la bibliografio, sed ne sufiĉe sisteme. Interesa fakto estas, ke grava nederlanda tag-jurnalo, la *Nieuwe Rotterdamse Courant*, akceptis publikigi detalan kritikon pri verkoj originalaj en Esperanto, kaj tion ĝi jam faris pri kvar libroj. Bedaŭrinde, kelkaj el niaj redakcioj ankoraŭ neglektas en plej ĉagrena maniero sian elementan devon. Recenzi bonan libron laŭ ĝia valoro kaj signifo, sendepende de aliaj konsideroj, farus grandan servon al la tuta legantaro kaj sekve profiton por ĉiu rekte interesita en la fako. Ni devas tiurilate saluti la provon de la kvaronjara revuo *Lingvo Libro*, kiu per siaj valoraj recenzoj alportis elementon esence necesan al la sana evoluo de nia literaturo.

Al la klopodoj de kuragaĵ aktivuloj ni plue montru fidon kaj subtenon. H. V.

nataj... El la 105.000 minejlaboristinoj preskaŭ 80.000 laboras dum la tuta nokto interne de la minejoj... La salajro de la virinoj estas ĉ. la duono de tiu de la viroj por samvalora laboro. ... La morta procento de virinoj 25—50-jaraj estas duoble pli alta, ol tiu de viroj samagaĵ, en 1920 viroj 19 el 100; virinoj 42 el 100. ktp.

Per la originalaj artikoloj kaj tradukoj ni konatiĝas kun Macue Sazaki kaj kun Japanujo, kiu volas venki en la febra konkuro de la postmilita milito. — La konkludoj de Macue Sazaki ne favoras al tiuj metodoj. F. Szilágyi.

CU VI AUDIS TION. S. Grenkamp-Kornfeld. Eldono de la Esperanto Instituto, Venlo Fako 81, Nederlando. 46 paĝoj. Formato 20×15.5 cm. Prezo: broŝurita ned. guld. 0.60. Kun titolpaĝa desegnaĵo.

Oni devas esti ĉiam dankema, se iu provas pliserenigi nian vivon kaj — niajn esperantistajn kunvenojn. La libro de Salo Grenkamp estas do bonega komplemento por la jam ekzistantaj similaj kolektoj de ŝercoj kaj anekdotoj. Ĝi bone taŭgas por perfektigaj kursoj kaj estas eble eĉ tro lukse eldonita rilate sian enhavon. Eble kelkaj ne tre efikaj ŝercoj povus manki. Sed certe necesus iom pli da korekto ĉe verko, kiu rajte estu uzata por perfektigo de komencantoj. Ne multaj estas la ne korektaĵoj, tamen mi notas kelkajn, kiujn en la ŝajne facila tasko: kolekti kaj presi diversajn anekdotojn, la aŭtoro ne evitis. Tre ofte mankas la artikolo, kiam oni parolas pri definitiva persono aŭ objekto. Ekzemple »vokas ektinigitu edzo«. »Cu gesinjoroj estas hejme?« Eĉ ĉe ripeto de la aganto (subjekto) mankas la artikolo. En Esperanto ne ekzistas »oh«, sed »ho«, kiel elkria vorteto. Pli bona

estus »Perforto« ol »Superforto«. — En frazo mi legas »Batanta en pupitro«. Certe li ne batas en la pupitro (tie enstante?), sed »en la pupitron! La vortordo, ŝajne laŭvorte tradukita, kelkfoje ĝenas: »la de vi farita tagmanĝo« (la tagmanĝo farita vi). »Sinjoro, helpante falintan de ĉevalo homon« (helpante homon falintan de ĉevalo). Aliaj rimarketoj: »li sentos sin pli bona« (bone!) »Knabeto perdis patron« (sian (aŭ la patron)). »Cu vi scias, li frenezigiĝis« (ke li frenezigiĝis). Presararojn nur du mi trovis. Mi tute ne volis severe kritiki. Mi citis preskaŭ ĉiujn mankojn ĝuste tial, ke en la dua eldono la libreto estu perfekta suplemento por kursoj. Ĝi meritas nepre tion! Legu ĝin jam nun kaj amuzigu bone!

P. B.

SÁCH HOC THE-GIÓ' I-NGU' (Anama lernolibro de Esperanto): BUI-NGUYEN-DYNH. Eldonis An-Son Thu-Xa Librejo A. S., 70 rue du Coton, Hanoi. 235—XIX paĝoj. Formato 21×14 cm. Prezo broŝurita 0.50 usona dolaro. Kun franclingva antaŭparolo de André Guérineau. Rapida trafolumo vekas eĉ ni samtempe ĝojon pro la laŭdinda intenco pluen konduki nian lingvon, kaj ĉagrenon pro ĝia fuŝa efektivigo. Detaloj kaj trafe adaptitaj ekzemploj, sed konsterna abundo de presararoj, kies korekto plenis ses paĝojn ĉe la fino de la libro. Pli ol ducent! Sed, ho ve al la lernanto, tio estas nur parto el ili! Ni tamen esperu, ke por la dua eldono la presejo havigos al si supersignitajn litertipojn, la eldonejo kapablan redaktanton kaj la aŭtoro mem bonan esperantan vortaron.

H. V.

BASIC ENGLISH: podle C. K. Ogdena. Pro ĉe-ĉosol. zpracoval Dr. Vočadlo. Nákladem Pokorný a spol.



Brno. 48 paĝoj. Formato 14:5×20.5 cm. Prezo: Kč. 3.90. 1934.

La sola praktika avantaĝo de tiu cetera plaĉa libreto estas eble la tre akurata notado pri la prononcmalmaniero de la angla lingvo por ĉeĥoj. Same kiel la fervoraj latinistoj neniam akceptos la kriplan »latino sine flexione«, la anglalingvanoj sentas instinktan malsaton al tiu stum-pigo de sia riĉa esprimilo. La interesaj provoj de Prof. Ogden restas pure abstraktaj, dum Esperanto enpaŝas ĉiutage pli firme en la realon. H. V.

OFICIALA DOKUMENTARO ESPERANTISTA: DU-DEKVKVINA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. Eldonis Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado, 11, rue du Mont-Blanc, Genève. 1933. 108 paĝoj. Formato 22×15 cm. Prezo ne signita.

Detala raporto pri la Jubilea Kongreso en Köln. Enhavas krom interesaj protokoloj kaj statistikoj reproduktion de la fama Interkonsento de Kolonjo. Aparte legindaj estas la notoj pri la stato de nia movado en ekstereŭropaj landoj kaj la laboro tie farita, kaj ankaŭ la mallongaj informoj pri la plej diversaj sferoj de la propaganda agado. Tiu ĉi dokumento, la lasta kiun eldonis ICK, atestas pliafoje pri la laboremo kaj organizkapablo de s-ro Robert Kreuz, nuna direktoro de UEA. H. V.

OKAMOTO-RIKICI: EVANGELIOJ DE BELISMO. Naŭ broŝuroj. Eldono de Belisma-Koopera-Kulturejo. Yokohama. Japanujo.

Infaneto de malriĉuloj ne estas ĉiam granda ĝojo por la gepatroj. La aŭtoro de ĉi tiuj broŝuroj, laŭ sia propra rakonto estis forlasita en sia frua infaneco. Lia patrino lin nutris nur duonjaron, poste oni transdonis lin al malriĉega tombejgardisto, kiu nutris la kompatindan infanon per birdnutraĵoj. Kiam lia avino vizitis la tombejon, ŝi trovis lin skelete malgrasiginta. Li eĉ ne povis plori pri la mizero. La konscienco vekigis, kaj la infaneto estis rekondukita hejmen. La senkora patrino estis forpelita. Sed tiu mizero lasis siajn postsignojn dum lia tuta infanago. Li ne havis eĉ unu tagon sen doloroj, jen kapo doloris, jen ventro, kaj preskaŭ ĉiutage li havis elnazan sangofluon.

Ne mirinde, ke la mizera, suferanta knabo ofte sidadis solece. Lia sola intimulo estis la Naturo, en kies lernejo li progresis multe pli, ol en la lernejo vilaĝa, kie li trovis superemon, rivalecon, gloramon. Ĉiujn ĉi li juĝis malpuraĵoj. Elkreskinte li fuĝis de ili en Tokion. Tie en neeldirebla mizero li vivis kaj studis. Komence li sopiris je riĉo, sed baldaŭ li konvinkigis, ke riĉo estas nur amasigo de rabaĵoj. Nun do li aspiris je scio. Per fera diligento li eklernis kaj akiris la unuan lokon en la klaso. Sed la mizero subfosis lian sanstaton. Tamen, pene, li plu luktas. Li vizitas vesperan kurson de universitato privata. La profesoroj lin tedas. Li rekomencas lerni mem, per legado. Dum sep-ok jaroj lia vivo konsistas el legado de libroj sciencaj kaj ideologiaj. Sed nenio povas doni al li kontentigan respondon. Li rekonis nur, ke la ekonomia mondo estas plena de malpuraĵoj. Dum la eŭropa milito ekfloras en li la ideo: purigi la mondon. Li nun vivas en Oosaka, centro de industrio, ĉirkaŭata de laboristoj. Ekkoninte la ideojn de Marks, Proudhon kaj Kropotkin, li decidis partopreni fronte en la sociorekonstrua movado de urba laboristaro. Fine li organizas la unuan japanan laboristan konsum-kooperativon kaj ligan de kooperativoj. Post la katastrofo en la Kantoo-regiono (kiam ankaŭ li mem preskaŭ pereis), li iris al la kamparo por aĉeti mangajon. La pror-okula vido de teruraj tragedioj maturigis en lia animo iom post iom la koncepton de pura belo, pura vero kaj amo. Post sia reveno al Tokio, li estis arestita, kaj en la soleco de malliberejo li elformis sian sistemon, kiun li nomis Belismo.

Li akre ekvidis, ke la orientanoj malrespektas individualan vivon, aŭ komprenas la homan vivon nur materialisme. Li, kampulido, turnigis nun al la suferanta kamparana klaso. Ekde 1926 li ĉirkaŭiradis en la kamparo, kuragigis lacigitajn instruis junulojn kaj per or-

ganizo de koopera kulturejo kreis la novan sociopurigan movadon, la Belismon. Li sentis sin pioniro kaj apostolo de tiu ideo, li sentis novan alvokon: »Mi havas respond-econ ekkonigi la Belismon al la tuta homaro.«

Kio do estas la Belismo?

Post la atenta trastudo de la naŭ kajeroj ni devas konstati, ke ĝi estas nova religio, volas suprenlevi la homon el la nuna materialismo, plibonigi la socian ordon, kaj per ia koopera vivo estigi paradizon teran, kiu helpas la homon atingi vivon eternan.

La fundamento de la belisma doktrino estas la konstato, ke politiko, scienco, arto, etiko, filozofio, ĉiuj ĉi estas plenaj de materialismo, do ne povas kontentigi homon pli alt-aspiran. Nur la religioj esploras la spiritan vivon, sed ili plenas de arbitraj dogmoj en la naturklarigo, do ne estas akcepteblaj. La vera spirita vivo estas perfektigo. La animo estas estaĵo, do korpo, sed nemateria. »Kiam ni observas diversajn fiziologiajn fenomenojn kaj komparas ilin kun psikologiaj faktoj de spiritaĵoj, ni estas devigataj meti la hipotezon de l' spirita korpo. La ekzisto de l' spirita korpo do ne estas imagaĵo, sed ĝusta hipotezo, atendo kaj samtempe firma kredo. (I. 27.)«

La spiritan korpon formas multegaj spiritaĵoj molekuloj, la molekulojn spiritaĵoj atomoj. Strukture ili tre similas al la materiaj. Ili, kiam ili estas izolaj, estas altiritaj de la materiaj eretoj, eĉ forpuŝas unu la alian, kiel la gasmolekuloj. Sed ju pli proksimaj ili estas reciproke, des pli ili altiris unu la alian kaj tiel, per densigo, estiĝas fluida, duonfluida kaj solida stato. Se la spirita korpo, per la densigo de la spiritaĵoj, evoluas tiel fortike, ke la molekuloj iĝos fikse kunigitaj, ĝi atingas la eternan vivon. »La spirita korpo atinginta la gradon de kompleteco estas liberigata de la cerba substanco de la materia korpo kaj fariĝas perfekte libera kaj memstara ekzistaĵo (II. 19.)«

Kiel fariĝas tiu kompletigo kaj perfektigo? Laŭ Belismo, per la intuicio de pura belo, pura vero kaj amo. Kio estas pura belo? Ni scias, ke ĉio en la naturo estas vibrado. Sono estas vibrado de la aero, lumo vibrado de la etero. La spirita korpo havas la econ rezonadi, kunvibradi kun la vibrado de la naturo. Nia kunvibrado kun la vibra ondaro de la naturo estas la pura, supera belo. »Kiam la mio akceptas la ondaron ne partece, sed tutece en ĝia varia stato, ni nomas la akceptadon ne sento, sed belintuicio.« (III. 6.) Simile al la kunvibrado de la naturo, oni povas ekkoni la ekzistadon de la monda, tiu ekkono estas la pura vero. Enprofundiĝi en la puran veron, kiel en la puran belon estas la tasko de la homa vivo. El tio naskiĝis la pura amo, kiu ne konas malamon aŭ malamikon. La homo evoluinta ĝis sensanceliĝo atingas fine la konscion, ke li devas vivi ne kiel besto, vivon materian, sed tute spirite en la belintuicio de pura belo, pura vero, kaj pura amo. Tial la sinkulturado kondukas nin al sinhardado kontraŭ la malsuperaj, malnoblaj sentoj.

Ne nur la individua vivo de l' homo devas sin kompletigi, sed ankaŭ la socia vivo. La familia vivo devas esti konservata en la intereso de la infanoj. Sed inter la diversaj familioj, kiel ankaŭ inter diversaj homgrupoj, oni devas enkonduki komunan vivon de kooperado. La homoj devas vivi ne en urboj, sed en kamparo, kaj 80% de la homoj devas labori kampare. El tiu komuna vivo de kamparanoj formiĝas nova centro de labororganizo, kiuj ne estas urboj en la nuna senco de la vorto, sed nur centrejoj, kie oni amasigas la superfluon de varoj kaj valorajoj. Tie oni faros centrajn kulturerojn por la laboristoj. La industrio devas malgrandiĝi tiagrade, ke nur 10% de la homoj okupiĝu pri la industrilaboro. La lastaj 10% estu oficistoj de organizo laborista. La tutan organizon direktu delegitaro, kiu helpas la homojn en la sinkulturado. La kooperajn komunumojn unuigos la landa organizo, kaj la landajn la homara komunumo. Tiel realiĝus tio, la tuta homaro povus ĝui la belintuicion de pura belo, pura vero kaj amo. La pura amo ligus ĉiujn landojn, ĉiujn homojn en unu granda homaro, kie ne regus malamo, kaj batalo.

Belismo estas do nova movado, nova teorio, nova religio de la homaro. Kiel novaĵo, nature ĝi batalas kontraŭ la malnova idearo de religioj, kontraŭ la malnovaj movadoj sociaj, kaj kontraŭ la nuna socia organizo.

Belismo estas ne nur atakanta kaj malamika al ĉiuj religioj, sed ĝi volas forigi simple ĉiun ajn religion. Li ne volas budhismon, judismon, mahometanismon, kristanismon. La budhismo estas por li troege naiva, kiun la scienco moderna detruas. La mahometanismo estas troege materialisma, kiun la nova belintuicio de spirita korpo forigos. La judismo estas netenebla, ĉar li havas Dion, Jehovon vengeman, kiu kontraŭstaras al la pura amo. Eĉ la kristanismo, la »plej progresinta religio« devas ĉesi ĉar la scienco detruas ĉiun religion, kaj ĉiun kredon (I. 27—28). »La malnova kredo estis superstiĉo, kiu kontraŭdiras al la scienco kaj scio«. Ĉiu religia organizo devas forigi.

El ĉiuj religioj ankoraŭ la kristana plaĉas pleje al Okamoto Rikiĉi. Li konfesas senkaŝe, ke »la kristanismo estas la plej supera religio inter ĉiuj religioj de dikredantoj« IV. 3. Ĝi havas sian kialon: ĉar nur Kristo sola instruis pri la amo. Tamen la granda malhelpo, kion Okamoto Rikiĉi trovas kontraŭ la kristanismo, estas la kredo je Dio. »La kristanismo estus la plej supera religio, kiom(!) oni kredus dion« Sed la belismo simple neas la ĉkziston de Dio. Li mencias ke Sakao malkonfesis Dion. »Ankaŭ ni devas kurage nei la kreinton de kristanismo... Malkonfesi la dion ja estas evangelio por la homaro.« (III. 22—23.) Li neas do ne nur Dion, sed ankaŭ la kreadon de Dio. Ne per kreado, sed per evoluo de materiaj atomoj farigis la mondo. Sen Dio ni ne havas etikajn leĝojn, do nek pekojn. »Unu el la plej grandaj erarpensoj estas konsideri la homon denaska pekulo (III. 21.) Kontraŭ la kristanismo la plej grava kontraŭdiro estas la dogmo de peka naturo de l' homo. Sen pekoj, falas ankaŭ la kredo pri la infero. Belismo ne havas inferon, nur paradizon, kiu konsistas el la belintuicio de pura belo, pura vero, kaj pura amo. Belismo ne permesas preĝi al Dio, aŭ al kiu ajn supera estaĵo. Abstineco, diservo, pieco estas nur sensencaj forĵetindaj eraroj. Unu sola religio estas pravigita: la Belismo, kiu okupas la lokon de forpelita direligio, kaj filozofio.

Estas strange, ke la aŭtoro malkonfesas ne nur religion sed ankaŭ la socian vivon kaj organizon. La norma socio de Belismo estas ia speco de komunismo. Tamen estas interesa, ke li ne agnoskas la rusan sovetian komunismon. Plurfoje li protestas, kontraŭdiras la teorion de Marks. Li batalas kontraŭ la socialismo de industrilaboruloj. Li kritikis tiel akre Stalin, kiel Mussolini, li malagnoskas la komunismon de industrilaboristoj tiel decide, kiel la kapitalismon. Sed plej strange estas, ke li tute malamikas al la modernaj grandaj urboj. La hodiaŭa urbo estas en la okuloj de Okamoto Rikiĉi organiza ekspluatadsistemo, en la manoj de kapitalistoj kaj laboristoj. Laŭ lia opinio la ekspluatata urbo konsistas el regantoj, kaj ilia sekvantaro, el posedantoj kaj iliaj subuloj, el entreprenistoj kaj iliaj helpantoj, el laboruloj kaj iliaj klasoj, el ĉifonuloj kaj senlaboraj laboristoj. Ĉiuj tiuj intencas nur akiri monon, kaj en tio ili kunagas kun la kapitalismo en la ekspluatado de kamparanoj. La laste, ekspluatata klaso estas sole la kamparano (IX. 37.) La belismo volas novan socian reformon, en kiu la plej gravan rolon havu la kamparana laboristo. La Belismo estu lia religio kaj filozofio, lia sociorganizo.

Post la legado de la naŭ broŝuroj ni devas konfesi ke la Evangelioj de Belismo ne estas facila legaĵo. Ne nur tial, ke multaj ĝenantaj preseraroj ŝokas la glatan, klaran stilon, sed precipe tial, ke la pririgardo de la aŭtoro estas treege abstrakta, filozofia. Tamen tio ne estas nepre malhelpo de kompreno.

Se ni pripensas la vivon de l' aŭtoro, lian novan vidpunkton rigardi la mondon, la homon kaj socion, se ni pripensas lian malamikan partiecon kontraŭ ĉiu religio, filozofio, kontraŭ ĉiu ekzistanta socia organizo, ni trovas ĝin treege stranga. Ne nur el okcidenta, eŭropa, sed ankaŭ el orienta vidpunkto.

Li ne volas religion, tamen li donas sian novan religion.

Li ne volas Dion, nek ian ajn fondinton de religio, tamen li volas esti fondinto kaj granda pioniro de Belismo kiel religio por la tuta homaro.

Li ne volas filozofion, tamen lia Evangelio de Belismo estas filozofia traktato.

Li malagnoskas ĉiun filozofian sistemon, tamen lia tuta penado estas nenio alia ol filozofia sintezo de mond-koncepto pri homo, mondo, socio kaj vivo.

La Belismo volas vundi morta la religion, la hodiaŭan socian organizon, ĉu burĝan, ĉu komunisman, ĉu politikan, ĉu kapitalistan, sed ĝi mem havas tre vundeblajn punktojn: la miskomprenon de la homa naturo, de la racio kaj kriterio de la homa penso, la miskomprenon de la religia aŭtoritato. Neniu povas eviti tiujn du eblajojn: oni sin apogas aŭ al la racio homa, aŭ al supera aŭtoritato. Se al la unua, oni devas pruvi ĉiun aserton helpe de la racio, kiajn pruvojn ni ne trovas en la Belismo, Aŭ se oni elektas la duan, oni devas montri la fideindecon de la aŭtoritato, kion same neglektas la aŭtoro.

Laudinda estas la tasko de Belismo: levi la hodiaŭan homon el la materialismo, el la malalta socia-etika marĉo, tamen la aŭtoritato de unu homo ne sufiĉas por ĉiuj tiaj strangaj instruadoj, kiuj havas por si mem nek racion, nek revelacion superan.

Tamen oni bone komprenas la homon, la multe suferintan, luktantan homon, kiu per multaj mizeroj kaj travivaĵoj ne subpremiĝis, sed per sia nobla koro aspiris je ideala koncepto de la vivo. Kaj tio klarigas sufiĉe lian doktrinion! En ĉi tiu materialista mondo nian tutan simpatian havas la idealismo de aŭtodidakto, eĉ se li ne sukcesis akiri nian aprobon por sia teorio.

*Prof. Dro F. Erdely*

**E. MALMGREN. LA ESPERANTO-KLUBO.** Kial fondi ĝin? Kiel organizi ĝin ktp. Eld. Societo Esperanta, Stockholm. 64 p. Prezo: 1 sveda krono, al la aĵoj de SEF Kr. 0.50.

La libreto donas utilajn konsilojn, modelajn tekstojn, instrukciojn el la plumo de lerta kaj sperta movadisto. La instrukcioj estas retilaj ne nur en la sveda movado, sed ili havas generalan valoron. *F. Szilágyi.*

**FORPELATAJ HOMOJ:** Can Hjokéu. Tradukis el la japana: H. Takagi. Ilustris: B. Hatano. Eldonis Fronto-ŝa, Suginami-ku, Macunoki-maĉi, Tokio. 1933. 40 paĝoj. Formato 19×13 cm. Prezo: svfr. 0.60. Kun skizo pri la nuna stato de la korea literaturo. Cu novelo? Pli bone sinsekvo de bildoj, kiujn ligas komuna trajto: la mizera vivo de koreaj terkulturistoj sub japana ekspluatado. La stila koncizo kvazaŭ pliakrigas la impreson de profunda senespero, kiu regas ĉiun scenon, ĉu rezignan, ĉu ribelan. La aŭtoro kapablas en ĉiu frazo sentigi multe pli, ol li efektive diras, kaj liaj vortoj lasas longan postsonoron en la animo. Sed tion ni ja dankas ankaŭ al la talento de la tradukinto. Eble tiu modesta verko konkeros por si pli da kapoj, ol longaj traktatoj pri samtendenca temo. *H. V.*

**UNUA SLOVAKA KRISTANA PRINCO:** laŭ d-ro Hodál kompilis kaj tradukis d-ro Kamaryt. Eldonis Komitato de Pribina-festoj en Nitra. Senpage ricevebla de Slovaka Porfremdula Asocio, Hotel Savoy, Bratislava. 14 paĝoj. Formato 15×12 cm. Kun bilda kovrilo kaj landkarto. Historia skizo pri la slovakaj urbo Nitra, kie estis konstruita antaŭ milcent jaroj la unua kristana preĝejo de la landa teritorio. Tia broŝuro meritas laŭ ni specialan atenton, ĉar ĝi instigas al kompilado de pli ampleksaj verkoj pri la sama temo, nome, nome la diskonigo de malgrandnaciaj kulturoj. La ĉi miniaturo ŝajnas tre rekomendinda en sia speco. *H. V.*

**L' EUROPANISMO:** Jozef Zauner. Eldonis USE-ŬHO, Timisoara, Rumanio. 32 paĝoj. Formato 15×11.5 cm. Ilustrita. Prezo ne signita. La sindonema apostolo de la USE instruas al ni en katekisma formo kaj helpe

de spritaj kaj interesaj bildoj la Evangelion de l' Eŭropanismo. Por ĉiu aktuala demando, li trovas ne malpli aktualan respondon. Li akcentas interalie, ke por nia kontinento »la faŝismo signifas korpan, mensan kaj moralan renesancon«. Tion verŝajne jam konjektis kelkaj energiaj ŝtatgvidantoj, kiuj prenis sur sin la ĝisfundan renovigon de sia nacio. H. V.

**ABSOLUTISMO.** Parolado de E. Lanti Komuna eldono de Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, Paris XX, kaj Federacio de Laboristaj Esperantistoj, Postbus 0.50, Amsterdam o. 1934. 16-paĝa. Formato 23.5×15.5 cm. Prezo svfr. 0.20.

Sur tiuj kelkaj paĝoj ni trovas kvazaŭ resumita la tutan filozofion de senlaca kaj prudenta aktivulo al kiu la laborista Esperantismo jam ŝuldas tiom da pensigaj kaj altnivelaj verkoj. Tie ĉi kiel aliloke Lanti kontraŭmetas objektivan mondrigardon al la programa fanatikeco kaj restas fidela al sia principo: eduki la spiritojn por pli memstara sinteno. H. V.

**HEREZAJO:** Letero de Lanti al la malkontentaj legintoj de »Absolutismo«. Mendebila ĉe la aŭtoro: 141, Avenue de Corbéra, Paris XII. 8-paĝa hektografita kajero. Formato 27×21 cm. Prezo: svfr. 0.10 por sendkosto. 1934.

Ricevinte plurajn protest-leterojn pri la ideoj esprimataj en »Absolutismo«, la aŭtoro respondas per prezento de kelkaj konkretaj faktoj por prilumi sian argumentadon. Aparte edifaj estas la paragrafoj de la sovetaj dekretoj pri perfido al la patrio. La junaj fervoraj proletoj, kiuj ne perdis la emon aktive pensadi, certe legos ambaŭ traktatojn kun granda profito. H. V.

**C. WALTER: GAJA LERNOLIBRO DE ESPERANTO.** Kun 120 bildoj de Peter Thienhaus; kelkajn bildojn desegnis Wilhelm Drachholz. 112 p. Dua eldono. Aldono: Demandaro. 16 p. Eld. 1934. C. Walter, Berlin W. 35. Graf Spree-Str. 24. Germanujo. Prezo RM 1.25 aŭ svfr. 1.50, aŭ 5 resp. kup. de la poŝto.

Ni jam publikigis pri tiu ĉi interesa lernolibro, vere bonhumora kaj sprita, detalan recenzon en No. 1. de *Bibliografia Gazeto*, p. 10. La ĝeneralaj rimarkoj valoras ankaŭ por la dua plibonigita eldono. La plibonigo estas efektiva, precipe pro la aldono de klarigaj bildoj pri la uzo de la akuzativo, »igi«, »igi«, »lia«, — »sia« kaj por la aldono de senpaga parolekzercilo, servanta por ekzercadi la parolojn dum la kurso per konvena demandaro. Bedaŭrinde ankaŭ nun ne estas bone trarigardebla la enhavo; iom mankas, ke la aŭtoro lasas plenan liberecon al la instruanto kaj lernanto, ne grupigante la materialon en lecionojn. Tia grupigo estus taŭga ankaŭ por instigi la lernanton ĉiam fini certan lecionon. Por la malgrandaj nacioj devus esti pluaj antaŭparoloj, sed minimume por la grandaj: la hispana, itala kaj portugala. Mi pensas, ke oni tamen ne povos lerni la lingvon el la libro sen instruisto kaj sen vortaro, ĉar ekzemple nek la koloroj, nek la vorto »oni« estas klarigita tiel, ke oni komprenu la ĝustan uzadon. (En la hungara lingvo ne ekzistas »oni«!) Bedaŭrinde post la paĝo 82 estas jam tre maloftaj la klarigaj desegnaĵoj, kaj ĝuste tie estas tiaj gramatikaj, kies bilda klarigo estus interesa kaj la manko iom sekigas tiun ĉi parton. Cetere la desegnaĵoj estas tre trafaj, amuzaj kaj vere helpantaj al la kompreno. Nur la »skolto« sur p. 102 ne estos rekonata — se ĉi ne konas la signifon de la vorto — ĉar ja mankas karakteriza signo pri tio, ke la turisto — kun simpla bastono, ĝenerale ne uzata de skoltoj — estas skolto. Ĉe la bonaj konsiloj al la lernanto oni devus pli forte konsili, ke la lernanto vizitu por ekzercado la societojn kaj grupojn kaj aĉetu librojn, abonu gazetojn en propra intereso. Estas stranga la konsilo, ke tial oni aĉetu librojn, ĉar la esperantis verkistoj tre deziras tion. Se la instruisto sendas unu respondkuponon de poŝto al la aŭtoro, li ricevas aldonan kajeron pri »postkursaj demandoj« por uzi la libron en perfektiga kurso. Kaj vere por tio ĝi pli taŭgas

ol multaj ĝisnunaj tiaj libroj. Aperis ankaŭ propagandaj poŝtkartoj kun desegnaĵoj.

Generale mi povas diri, ke la libro — precipe por la junularo kaj por ĉiuj, kiuj ŝatas amuze studadi lingvon — estas bonega helpilo. Mi ne havis tempon kaj okazon studi la utilon de la libro dum kursoj kaj ne scias, ĉu ĉi lernis sole el tiu ĉi libro Esperanton, sed la ebleco estas donita. Precipe taŭgas la libro de Walter — kun bona papero, moderna, taŭga kovrilo, klara preso —, kiel altvalora kaj instiga donolibro, al amikoj, kiujn oni volas instigi al la lernado de Esperanto. Ni ĝojus legi raportojn de tiuj, kiuj lernis el la libro, pri kies apero kaj disvastiĝo ni nur povas sincere ĝoji, ĉar ĝi estas malgraŭ la supre menciitaj kelkaj mankoj — preskaŭ unika en nia instrua materialo. Sekvu baldaŭ pluaj eldonoj! P. B.

**LA BIBLIOTEKO »NOVA KULTURO.«** *Petr Dánov:* 1. La Alta Idealo. 2. La Granda Leĝo. 3. La Nova Homaro. 4. La Fortoj en la Viva Naturo. 5. La Nova Vivo. 6. La Kolektiva Konscio. 7. La tri fundamentoj de la vivo. 8. Jen la Homo! 9. *St. Vátralski:* La Blankaj Fratoj. (Eldonitaj en Burgas, Bulgarujo. Prezoj: 1., 2., 6., 9. sv. fr. 0.40, 3.—5. sv. fr. 0.80, 7. sv. fr. 1.—, 8. sv. fr. 4.—)

Petr Dánov estas fondinto de la »socio« Blanka Fratara, disvastigita precipe en Bulgarujo. Laŭ la rakonto de L. Lulev li studis en Usono teologion kaj medicinon, li estas psikologo kaj dudek jarojn li uzis por la studado de la homoj. Nun li estas 60 jara. La amplekso de la prelegoj estas tre granda, eĉ konigi ilin preskaŭ neeble, kritiki absolute ne, nur kredi, aŭ ne kredi. La doktrinoj tre interese miksas la modernajn kaj la arĥaikajn elementojn kaj tiu miksiĝo estas tre originala. La celo de Dánov estas helpi la homon trovi la veran vojon, signitan de la naturo. La nuntempa vivo estas ankoraŭ primitiva, kaj ne sufiĉa. La homo ne lernis ankoraŭ vidi; ni estas blindigitaj de la tradicioj. La normala homo estas altruista, optimista, pie Di-ama, sinofereca. La Diaj Amo, Saĝo kaj Vero estas realaj fortoj de la vivo; la naturo gardas la variecon ĝis la plej etaj detaloj. La saĝulo rompas la memfaritajn katenojn; por la saĝulo ekzistas nur unu leĝo — la Dia, nur unu ŝtato — la Dia ŝtato, t. e. la homaro. — Tiu »nur« kaŭzas, ke malgraŭ la pacema spirito la Blanka Fratara suferas multe da kontraŭagoj.

Mi povas citi multe el tiuj libroj, kiuj enhavas la prelegojn, sed mi citas nur unu karakterizan parton: »Iuj diras: — Mi ne sukcesas en la mondo, mi estas malfeliĉulo. — Ĉar la amo ne vizitis vin, tial vi estas malfeliĉa. — Sed kial ĝi ne venas? — Ĉar vi ne estas tolerema. — Sed mi penis esti tolerema. — Bone, vi jam komencis. — Sed mi denove ne sukcesas. — Ĉar vi ne estas bonfarema.« Poste ni vidas la difinon de la *tolero*. »Tolero rilate la ofendojn, ankoraŭ ne estas tolero; la sekreto de la tolero konsistas al tio, ke vi trovu en la ofendo ion bonan kaj ĝin utiligu. La ofendo estas tre

**FILATELISTOJ ATENTU!** La hungara poŝto eldonas okaze de jubileo de la morto de Rákóczy serion de markoj; kvin pecojn en tuta valoro, de 1.10 svfr. La kvanto eldonota estas limigita kaj havebla plej malfrue ĝis 10-a de aprilo 1935. Literatura Mondo volonte helpas siajn amikojn por havigo de tiuj markoj je nominala valoro plus kelkaj centimoj por la administrato. Interŝigantoj skribu kaj petu pagilon kiel eble plej baldaŭ.

malmola nukso... vi devas ĝin frakasi, elpreni la kernon de la interno kaj formangi... Estas malfacile elŝiri detalojn, ĉar tiuj etajoj estas tre organikaj partoj de la prelegoj, sed la leganto jam en tiu ekzemplo povas vidi la karakterizadon pri la tuta tendenco.

Praktika sekvo de tiu ĉi instruado estas la kunigo »Blanka Fratara«; senpera, demokratia organizo. La homoj febre palpas ĉu en Bulgarujo, ĉu en Germanujo, ĉu en kiu

ajn parto de la mondo. Alvenis denove epoko de la ekstazo kaj en tiu ekstaza atmosfero la bulgara tendenco distingas sin per sia malatakemo, kaj harmoniemo. Kaj tiu konstato enhavas nian laŭdon pri la afero en tiu rilato. Higienaj reguloj, freŝa aero, gimnastikaj ekzercoj, vegetarismo, demokratio, komunaj bienoj kun komuna kulturo, kantado, kredo, kaj aŭskultado de la Majstro: ŝajne pasiva malzorgo pri la diferenca ĝenerala vivo, kies forto estas ĝuste la pasiveco.

El lingva vidpunkto la tradukantoj devas ankoraŭ sin perfektigi.  
*F. Szilágyi.*

**KANTFOLIO.** Eldonis Presejo Esperantista de Seattle, 312 University Building, Seattle (Usono). 1934. 4 paĝoj. Formato 21×13 cm. Prezo 5 usonaj cendoj. Enhavas krom la »Espero« dekon el la plej popularaj anglaj kaj usonaj kantoj. Vere bedaŭrinda estas la manko de muziknotoj.

**EINAR DAHL: HURU LEDER MAN FORSTÄTTNINGSKURSER I ESPERANTO.** (Eld. Societo Esperanta, Stockholm. 64 p. Prezo: 1 sveda krono, al la anoj de SEF kr 0.50).

Bonaj konsiloj troviĝas en la libreto pri tio, kiel gvidi daŭrigajn kursojn. La problemoj estas tiel ĝenerala, ke volonte ni salutis similan verkon en Esperanto.

*F. Szilágyi.*

**LYONA FOIRO.** Ilustrita faldprospekto eldonita de la Esperanto-fako de la Internacia Foiro de Lyon por 1935. Formato 14×22 cm. Laŭ teknika vidpunkto ĝi montras progreson kompare kun la antaŭjaraj.

**TRI »IGI-IGI« BILDKARTOJ.** Eldonis C. Walter, Berlin, Graf Spee Str. 24. 1934. Prezo: 1 respondkupono por la serio afrankite. Ilustritaj poŝtkartoj taŭgaj por

**ESPERANTO LYKILL** (Islanda ŝlosilo). Eldonis Sambandi islenskra esperantista. 1933. 32-paĝa. 7.5×11 cm. Prezo: 1 respondkupono. Tre plaĉa eldono laŭ la normo de ICK.

**KARL NEBENZAHL: LA INFLUO DE VEGETARISMO AL LA MORALA KAJ SOCIA PROGRESADO.** Kun antaŭparolo de Jonescu-Capatzana. Eldonis »Vegetarano«, Bucuresti V, Str. Dr. Istrate, 10. 1934. 34-paĝa. 10.5×13.5 cm. Prezo: Fr. fr. 2.—

La vegetarismo rigardata ne nur de simpla socia, sed eĉ de »klasbatala« vidpunkto formas la ĉefan temon de la broŝureto. La eraraj opinioj de la popolo, la profitemo la viand-produktantoj, la ebleco transformi paŝtejojn en kulturkampojn kaj aliaj valoraj argumentoj estas trafite uzataj de la aŭtoro. Korekta stilo.  
*H. V.*

**MONINGAID MOTTEID EESTI RAHVAVIIS' ST JA SELLE UURIMISMEETODIST:** H. Tampere, Tallinn. 12 paĝoj. Formato 19×13 cm. 1934. Estonlingva primuzika broŝureto kun esperanta resumo. Kelkaj pensoj pri la estonaj popolmelodioj kaj pri la metodo por ilin esplori. Sekvinda ekzemplo ĉe aliaj pli gravaj sciencaj verkoj.

**BILDKARTO »STEMIRAKLO«.** De: egnis Peter Tienhaus. Eldonis C. Walter Graf Spee Strasse 24, Berlin. 1934. Prezo: 10 ekzempleroj kosta 2 internaciajn respondkuponojn. Poŝtkarto kun sprita kaj propagandecela desegnaĵo.

**CURSO COMPLETO DE ESPERANTO** — Eldonis: Portugala Instituto de Esperanto, Lisboa, Rua Jardim do Regedor, 5—4 — Du kajeroj 23.5×16 — 1933/34. — Kajero I, 30 paĝoj — Kajero II, 16 paĝoj — Prezo: Escud. 2.50 po unu kajero. Du unuaj kajeroj de kompleta kurso; ĉiu kajero havanta po du lecionoj.

**ZAMENHOFF** — Lignogravuraĵo — E. Jekel — Eldonis: la aŭtoro. Havebla ĉe Libro-Servo F. L. E., Amsterdam, Postbus (O) 50. 30×24. — Prezo: N. g. — 75. Esprimplena portreto de la Majstro, permance transkopiita kaj kun subskribo de la aŭtoro.

**DEBRECEN-FÜRDŐ** — Banejo. 16. paĝa faldprospekto ilustrita pri urbo kaj banejo Debrecen kaj stepo Hortobágy. Eldonis la Fremdultrafikoficejo kaj Urba Presejo de Debrecen. — Pro la Landa Hungara Esperanto Kongreso (3. junio 1934) aktuala, interesa, bonstila prospekto pri tiu hungara provinca urbo. — Kial mankas en ĝi la esperantistaj adresoj? Ĉu Szeged ne protestos, ke Debrecen estas »la plej hungara urbo«? Petu la prospekton ĉe adreso: Debrecen, Ferenc József str. 28. *P.*

Restis ankoraŭ tre malmultaj *Recenzotaj Libroj*, kies liston ni nun ne publikigas.

## Deklaro

**En la konflikto inter sr-o dr Jozefo Takács kaj sr-o Vilhelmo Bleier**

Pri la pluevoluado de la lingvo, formigo de novaj vortoj kaj ilia popularigo okazis bedaŭrindaj miskomprenoj inter la du nomitaj sinjoroj. Ĉar ili konstatis reciproke, ke la miskomprenoj baziĝis parte sur falsaj informoj, aliparte sur la malĝustaj konsekvencoj, tiritaj el tiuj ĉi falsaj informoj, ili deklaras sian intencon — pro la intereso de la movado — pace aranĝi la aferon. Tial:

Sr-o Dr. Jozefo Takács deklaras, ke en la 1934-a oktobra numero de Oomoto Internacia en la artikolo pri la »Unueca uzo de vortprovizo« li faris tiajn asertojn kaj konstatojn, kiujn sinjoro Bleier kaj Literatura Mondo povis trovi ofenda kaj por la entrepreno materiale malutiliga. Ĉar tiuj asertoj baziĝis parte sur falsaj informoj, aliparte transpaŝis la kadrojn konvenajn en lingva diskuto, kaj ĉar li volis nek ofendi, nek materiale malutili, li retiras tiujn asertojn kaj esprimas sian bedaŭron.

Sr-o Vilhelmo Bleier deklaras siaparte, ke post la lego de la nomita artikolo, en sia momenta indigniĝo skribis leteron al sr-o dro Takács, en kiu li uzis esprimojn, kiujn la adresito trovis ne nur ofendaj, sed iujn eĉ ne korespondantajn kun la faktoj. Sr-o Bleier retiras tiujn asertojn kaj esprimas sian bedaŭron.

Budapest, 8-an de marto 1935.

Antaŭ ni, kiel alestantoj:

*Julio Baghy*  
*Kolomano Kalocsay*

*Dr. Takács József p. m.*  
*Bleier Vilmos p. m.*

\*

Pro recenzo samtempe aperinta en O. I. Literatura Mondo devis decidi bojkoton kontraŭ ĝi. Je tiu bojkotdecido O. I. kvar monatojn poste, en la numero februaro 1935, respondas — laŭ stilo de Major — longe kaj per strangaj argumentadoj pri ni. Nu, la konsciencoon kaj atentemon de sr-o Major al la vero pruvas plej elokvente la supra aranĝo de alia artikolo, samloke aperinta. Sed ĉar sr-o Major en la sama numero raportas pri sia ek-sigo el la redaktora funkcio pro certaj kaŭzoj, ĉi tie ne preparolendaj, ni ne plu duarigas polemikon kaj esperas, ke O. I. mem ĝojis liberigi de sia redaktoro.

# LINGVO \* LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapest IX. Mester-utca 53. V. 5. Hungarujo. Aparte aĉetebla. Unu numero kostas 0.20 sv. fr. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspedataj kostas nur 0.30 svisaj frankoj aŭ proksimuman egalvaloron.

Aperas kvaronjare • Nro 2. 1935

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

## Intervjuo kun artpentristo kaj grafikisto s-ro Ruda Kubíček

— Dolfa Bartošík —



*S-ano Bartošík kun edzino kaj s-ano R. Kubíček.*

Uh. Hradiště, metropolo de Moravské Slovácké en sudorienta parto de Silezio-Moravio estas de longaj jaroj tre konata loko ĉie, kie oni parolas pri belartoj. Nome, en tiu ĉi urbo temp-al-tempo loĝis multaj tre famaj artpentristoj, kiuj pro belegaj ĉirkaŭregionoj kaj folkloro riĉeco vojaĝis ĉi tien por ekspluati ion por siaj skizkajeroj aŭ toloj. Sed ne nur artpentristoj sentis kaj sentas sin ĉi tie hejmece. Ankaŭ multaj verkistoj, ĵurnalistoj kaj kompostistoj ofte vizitadas la urbon kaj rehejmiĝas pliriĉigitaj je novaj, neoftaj impresoj. Estas kompreneble, ke tia urbo fieras ankaŭ per siaj propraj artistoj, kiuj vivas tie aŭ denaske aŭ kiuj, enamiĝinte al la eksterordinara ĉarmeco de ĝia belvestita popolo, transloĝiĝis ĉi tien por daŭre ĉerpi el la nesekiĝanta puto de lokaj bel-ajoj. Tia denaska artisto estas ankaŭ s-ro Ruda Kubíček, pentristo, grafikisto kaj *samideano*.

Mi substrekas tiun lastan vorton, ĉar li estas vere konvinkita esperantisto, kvankam de ne tro longe li staras en niaj vicoj.

Tuj en unua fondkunveno de Slovaka Esperanto-Klubo li estis ĉiuvoĉe elektita kiel ĝia unua prezidanto. Sed, laŭ Ĉe-metodo, la esp. prezidantoj ne estas egalaj: Estas, kiuj

akceptinte tiun honoran postenon, ne prezidas en la kunvenoj aŭ tre malofte, kaj estas, kiuj prezidas kaj laboras. S-ro Ruda Kubíček apartenas al la prezidantoj de tiu dua grupo. Nun vi povas al vi imagi la klubon, kies prezidanto, fama artpentristo kaj direktoro de la unusola ĉeĥoslovaka libro-bindlernejo, ĉiusemajne venas inter esperantistojn kaj instigas, konversacias, kunludas kaj kunridas.

Cu tiu ĉeesto ne kuraĝigas ankaŭ la aliajn por aktive partopreni en la movado? Ho jes, kedu al mi, ke nia tutmonda movado tuj plifortiĝus, se ĉiuj ĝis nun »tro okupataj« direktoroj, profesoroj, verkistoj ktp., kiuj jam estas esperantistoj, eklaborus, ekprezidus en la kunsidoj, publike ekparoladus pri nia movado, publikigus gravajn artikolojn en la nacilingvaj ĵurnaloj, komunikante per tio, ke ankaŭ ili, kvankam intelektuloj, partoprenas aktive en pacmovado, kies komuna lingvo estas Esperanto.

Mi estas konvinkita, ke tiam en niajn vicojn venus novaj kaj novaj adeptoj, ĉar ĝis nun la plimulto el la tiel nomataj kleruloj restas flanke nur pro tio, ke ili timas de la izoleco en la koncernaj kluboj, asocioj ktp., kie ili ne vidas siajn »gekolegojn«, kvankam ili rekonas niajn ideojn kaj la movadon.

Antaŭ mia forveturo eksterlanden, mi vizitis s-ron Kubíček en lia loĝejo ne nur por adiaŭi kun li kaj bondeziri pro lia resaniĝo, sed ankaŭ por intervjui lin.

La unuetaĝa domo en kiu li kaj lia familio vivas, apartenas en Uh. Hradiště al la plej belaj domoj. Ne pro sia simpla malmoderna konstrustilo, sed pro siaj valoregaj eksteraj grafikaĵoj, kiujn ellaboris la diligentaj manoj de s-ro Ruda Kubíček.

Anoncinte min mi eniris ĉambron plenan de libroj kaj bildoj. Granda trezorejo de ĉiuspecaj artaĵoj, vera sanktejo de pensema kaj laborema homo.

Varma manpremo. La serenaj okuloj de s-ro Kubíček eĉ pli sereniĝis, kiam mi sciigis la kaŭzon de mia vizito. Sanstato pli bona ol mi pensis.

— Do, intervjuon por Literatura Mondo!? Tre volonte! Bonvolu demandi, laŭpove mi respondos. Kaj ekbruligante cigaredon, li atendas mian unuan demandon.

— Kiam vi montris, sinjoro prezidanto, la unuan intereson por Esperanto? Cu estis ĉe via esperantistiĝo ankoraŭ aliaj kialoj ol nur la prilingvaj?

— Mi devas al vi sincere konfesi, ke unuavice ekregis min granda scivolemo. Tiu interesa kaj fabela »Sezam malfermiĝu« altiradis kaj logadis min ellerni tiun ĉi ensorĉan formulon, kiu neatendite malfermas ĉiujn pordojn de la mondo, de ĉiuj popoloj kaj elproviĝin. Ĝis nun estis nur la belarto, kiu parolis al ĉiuj

popoloj en la mondo per komprenebla lingvo sen ia atento al lingvodiverseco kaj landlimoj. Ĉu ne komprenas ekzemple la bildojn de Rembrandt la nederlandano same kiel la ĉeĥoslovakoj, franco, ruso aŭ hungaro? Esperanto similas al la belartoj, ĉar ankaŭ ĝi estas internacia. Pro tio mi lernis Esperanton, kaj mi ĝojas, ke baldaŭ mi povos paroli pri belartoj kun alinaciaj artistoj.

— Ĉu vi pensas, ke Esperanto kiel helpa lingvo povos utili al komuna kulturo? En kio vi vidas, kiel artpentristo, ĝian ĉefan rolon?

— Esperanto certe fariĝos iam tre grava faktoro rilate la ĝeneralan kulturon. Devas tiel okazi. Ĉar ĝi kapablas senpere informi pri ĉiuj sciencaj demandoj kaj problemoj rekte kaj rapide, sen longedaŭra internacia interpretado. Mi rigardas Esperanton unu el la plej modernaj interkompreniloj, tute plenumanta la hodiaŭajn pretendojn rilate rapidecon kaj senperecon. Tio koncernas certe ankaŭ la demandojn kaj problemojn belartajn.

— Siatempe vin tre interesis AELA. Vi vidis eĉ kelkajn ĝiajn librojn, precipe la Hungaran Antologion. Kiel grafikisto kaj bibliofilo vi povus ion diri pri tio. Kiel efikas al vi tiuj libroj per siaj tipografa arango kaj aspekto?

— Jes, vi memorigas al mi tiun dikitan, grandformatan libron, konsiderinde malmultekostan rilate paĝnombro. Sed mi ne komprenas, kiel povas altkultura nacio prezenti al internacia publiko la plej belan elflorigon de sia spirito per arango tiel malzorga? Mi ne scias, kial tiu libro ne aperis laŭ tipografa arango en same bela kaj inda formo, kiu respondus al kultur nivelo kaj karaktero de nacia belgusto. Aspekto de la libro estas ja mezurilo de l' nacia kulturo. Tiudirekte ankaŭ AELA krom la tuta vico de alinaciaj esperanto-eldonaĵoj malkontentigis min.

— Diru afable, kion vi proponus por plibonigi tiun staton!

— Mi tute ne pensas monŝarĝi la ekzistantan malkaran libron per multekosta bibliofila arango. Mi nur volas diri, ke belaspekta tipografa arango kaj bona presista laboro ne plikarigos libron kaj donos al ĝi daŭran estetikan valoron. Ĉe iom da zorgo AELA povus plibonigi ankaŭ ĉi tiun mankon.

— Ĉu vi pensas, sinjoro prezidanto, ke oni povus fondi ian internacian librokolekton, en kiu aperadus esperantaj presajoj en bibliofilaj arangoj?

— Via demando ne estas malbona kaj la propono meritis provi tion. Mi estas konvinkita, ke la bibliofiloj de ĉiuj nacioj danke akceptus la eblecon akiri sen apartaj malfacilaĵoj belegan presadon de alia nacio. Internacia lingvo ebligus al ili ne nur facilan aĉeton, sed ankaŭ legadon de tiuj libroj. La Esperanta movado gajnis tute certe multe da novaj adeptoj el la vicoj de eminentaj kleruloj kaj kolektaj bibliofiloj. Mi kuraĝas diri el propraj spertoj, ke tia kolekto havus eksterordinaran sukceson. Ĝis nun io simila ne ekzistas. Vidu: ekzemple la nederlandanoj presus al mi ian ne tre ampleksan literaturadon sur papero Van Gelder kun lignogravuraĵoj kaj kun tipografa arango, ekzemple, de van Rozendaal. Presus ĝin holanda presejo. Ni ĉeĥoslovakoj eldonas libron, pri kiu laborus eminenta nacia bibliografikisto kaj elstara presejo. Anglujo, Germanujo ktp., ĉiam per siaj presejoj kaj kun enlandaj grafikistoj. Presejoj konkuris same per siaj laboroj. Ni ekkonus tiamaniere la plej bonan grafikiston de unuopaj landoj, kiuj alie estas por ni nekonataj.

Realigi tion certe povus ekzemple la jam ekzistanta kaj tre simpatia AELA, kies eldonantoj montris kaj pruvis jam siajn grandajn bonvolon, komprenon kaj spertecon. Ankaŭ iliaj Literatura Mondo kaj Lingvo-Libro pravas, kiel mi tion povis vidi, ke ili laboras tre serioze.

## Plend' pri end

Kara leganto, se vi abonas sole nian revuon, vi eĉ ne scias, kiel feliĉa vi estas. Vi vivas pace en trankvilo, eĉ ne konjektante, ke en la ĝangaloj de nia lingvo furiozas eksterma batalo. La rustan glavon oni akriĝis haste kaj oni svingadas ĝin sovaĝe, iom hazarde; eble-eble tamen ĝi trafos tien, kien oni intencas ĝin svingi, kaj tiam — ĝi senkapigos senkompatate la malfeliĉan sufikson END.

Mi estas senkompetentulino: modesta fraŭlino, kiu ne verkiĝis nun eĉ unu poemeton, kaj pri la gramatiko mi estas kompleta ansero. Tamen, mi kuraĝas miri pri io. Mi traĝis la senfinan artikolegon, aperintan, en daŭrigoj, sur la kolonoj de diversaj gazetoj kaj cirkuleroj (mi jam apenaŭ kuraĝas malfermi gazeton kaj koverton, timante ke de tie al mi rikanos tiu ĉieasta artikolo de artikoloj pri END), do, mi traĝis tiun marserpent-dimensian artikolon, sed, je mia honoro ĝi ne konvinkis min. Eĉ, mi ne povas kredi, ke tiu artikolo konvinkas sian propran aŭtoron, se li ne estas tro patrine antaŭjuĝa favore a siaj kvazaŭargumentoj.

Kiel oni povas tion klarigi? La aŭtoro ja estas klara kapo kaj delonga eminentulo.

Nu, eble jene: Li apriorie decidis ekstermi la sufikson END, pro ia denaska kontraŭnovisma instinkto. Nu, tion li povis fari nur per artikolo. Por artikolo li bezonis argumentojn. Sed tiaj estis nur tre malmultaj, kaj la artikolo devis esti longega (mallonga artikolo ne efikas). Sekve, li prenis tiajn argumentubojn, kiajn li sukcesis subite kunrasti.

Kaj la rezulto?

Ĉiu esp-isto, kiu ĝis nun ne sciis pri END, bone ĝin lernis el la ĉie kriptantaj paĝoj de la artikol-mastodono — kaj uzos ĝin, ĉar oni volonte uzas tion, kion oni scias.

... homo vojas — diras la dua duono de proverbo. La unuan duonon mi ne citas pro mia granda respekto al la eminenta endmalamikoj.

M. Alice Pit.

Kaj mi esperas, ke la tempo kaj entute la plibonigo de la nunaj vivcirconstancoj ŝanĝos ĉion, eĉ tion, kion mi riproĉis al AELA rilate tipografan aspekton.

S-ro Kubíček — bibliofilo — preskaŭ brulas de entuziasmo. Ĉion li rakontas tiel vivece, kvazaŭ tio, pri kio li ĵus parolis, jam delonge ekzistus. Mi preskaŭ timas plu demandi lin. Sed mi kuraĝiĝas.

— Diru al mi, sinjoro prezidanto, per kio entute povus Esperanto helpi al la belartoj?

— Nu vidu, jam tiu bibliofila kolekto estus, por komenco, tre bela kaj merita tasko. Sed da tiaj eblaĵoj estus vere tre multe, ja nur tro malmultaj scias, kio okazas en belartoj ekster la landlimoj. Ĝis nun ne ekzistas ĵurnalo aŭ revuo pri belartoj, kiu informadus internacie pri samtempa arto kaj artistoj. Ankaŭ ĉi tiun taskon, se ĝi devas plenumi sian gravan mision, povas provi kaj efektiviĝi sole Esperanto.

— Kion vi volus mem diri, sinjoro prezidanto, al la legantoj de Literatura Mondo kaj AELA-anoj?

— Kion mi volus diri? Nu, antaŭe tion, ke ili restu fidelaj abonantoj kaj dankaj AELA-membroj. Ni ĉiuj devas ĝoji pro tio, ke nia movado povas jam fieri per tiom da bonegaj verkoj, kiuj certe ne estus aperintaj, se ne ekzistus AELA. Sed tio ankoraŭ ne sufiĉas. Ni devas iri plue, kaj plene eluzi ĉiujn grandajn avantaĝojn de nia lingvo. Neniu alia lingvo havas tiajn eblecojn por disvastigi spiritjuvelojn en plej vastaj randoj, kiel Esperanto. Pro tio ni ĉiuj helpu elkonstrui vere grandiozan kultur-entreprenon, kiu servus sendiference al ĉiuj homaranoj. AELA estu tiu fonto, el kiu trinku en estonteco milionoj

# REVUO DE REVUOJ

— Iom senorda babilado prefekste de gazetrevuado —

— G. Karczag —

Simpatia japana revuo, La Paco, iras vere ĝisekstre en rekono de l' subluma neceso de l' kritiko: en la »Redaktora Angulo« ĝi aplikas severan memkritikon, kiu sekvu ĉi sube:

»Al nia granda ĝojo fine aperis la 12-a numero de nia organo, sub grandioza titolo »speciala numero por japana literaturo« kun malriĉa enhavo, kiu estas en bona kontrasto kun la titolo.

Jen lakona kritiko al kelkaj artikoloj:

Trans la Baron: Al aŭtoro mi demandas: kiamaniere ni iru trans la Baron? Se ni nur krius el vortico, eble la aliaj venos por savi min? (La revuanto.)

Maro: granda amaro por mi diri, jen unika ekzemplo de tiel nomata rimajo.

Historio de Otei: tre bone kompilita. Pro miro mi ne povas haltigi mian forglitantan plumon.

Mankas al mi la malicemo denombri kelkajn eŭropajn gazetojn, kiuj bezonus almenaŭ same akran senton memkritikan. Prefere mi citu el la artikolo de f-ino Huguette Royer (Franca Esperantisto, februaro 1935, »Tra la e-istaj gazetoj«):

»El Nia Gazeto«, januaro, Tra la gazetaro. — Respondo al s-ro D. Sur Posteno. »Pri valoro de Nia Gazeto, via kompetento estas nula. Car tiurilate pli valoras tiu de E. D., kiu estis unu el la unuaj, kiuj varme gratulis al »Nia Gazeto«. Lia opinio estas do multe pli kompetenta ol de homo, kiu serĉas favorojn.«

Pri la cetero de la diskuto mi ne volas okupigi, sed la supraj linioj mirigis min. Jam s-ro Jaumotte kaj aliaj samideanoj respondis al same neĝentilaj kaj incitemaj frazoj, kiujn ni ĉiumonate trovas apud bonegaj artikoloj. Baldaŭ, por eviti akrajn respondojn, neniu plu kritikos tiun gazeton, sed memkompreneble ankaŭ forgesos laŭdi ĝin.

Ligilo (5-a numero, 1934), diras pri »Nia Gazeto:« »la sola e-gazeto redaktata de fakuloj-jurnalistoj«. — Mi sentas la devon eldiri dankon nome de l' ceteraj E-gazetoj.

Recenzisto de »The British Esperantist« (decembro 1934) opinias la dialogon inter kapitano Kolumbo kaj Sinesius en la novelo »Du ŝipoj«; (Karinthy-Totsche) »grandaparte neklara«. Li kredeble legis la libron kun nesufiĉa atento, ĉu ne?

La meritplena »Eŭropa Heroldo«, kiu honoris nian movadon, aldonante E-on al siaj aliaj kvin lingvoj, leteras en la 1935 februara numero pri la francaj akademiaj elektoj (verkis: s-ro M. Thiéry). Mi traduku:

»En la literaturaj medioj de Parizo ni nun multe okupigas pri la du kandidatoj al la fotelo vakanta pro la morto tragika de Louis Barthou de l' Académie Française. Unu el la du estas s-ro Paul Claudel, diplomato, poeto kaj dramaturgo. Ciu scias ke s-ro Claudel, eksambasadoro en Tokio kaj Washington, nun reprez-

entas Francion en Bruxelles. Ciu aŭdis pri l' »Angela Anonco« (L' Annonce faite à Marie), pri »L' Otago«. Claudel estas granda verkisto kaj granda poeto katolika. Li volonte enprofundiĝas en spekuladojn metafizikajn kaj en la obskurojn de l' simbolismo, kiuj ne ĉiam kompreneblas por la »vulgum pecus«. Tiu manko de klaro tute ne malutilas al la sukceso de s-ro Claudel en l' Académie. Si preferas ornami fruntojn nebulajn per siaj laŭroj, tiu ĉi maljuna sinjorino en la Quai Conti.

L' alia kandidato estas s-ro Claude Farrère, maristo kaj romanverkisto, same kiel Pierre Loti. Farrère estas verkinto de »L' opi-fumantoj«, »La Batalo«, »La civilizitoj«, »La homo kiu murdis« kaj aliaj sennombraj romanoj de alta literatura nivelo. Li estas verkisto de l' raso; li konas tion, kion li priskribas kaj kion li priskribas bone.

Kiu el la du sieĝos la lokon sub la subluma kupolo, kie — kiel tion tute malgentile diris Piron — sidas kvardek, havantaj la spriton de kvar. La ŝancoj samas.

Por ke la elektantoj ne sentu sin tute sen direktilo, jen mi voĉdonas (se ili ankoraŭ ne faris tion): Se oni devas elekti el inter tiuj du, mi nepre favoras s-ron Claudel. Sed ne pro tio mi tradukitis la supran artikoleon. Kial do la e-istoj — plej konservativa aro — plendas pro konservatismo de sia Akademio, se eĉ la francoj permesas al si la lukson de Akademio konservativega? Kaj ankaŭ en Francujo ne mankas senhontuloj, kiuj prenas al si la kuragon primoki la subluman vartejon de l' estinto. Vid-eble, samaj cirkonstancoj elvokas saman reakcion.

En *Internacia Pedagogia Revuo*, bonege redaktita (No 2, 1934) mi trovis eĉ du interesajn menciindaĵojn. Unu: tre notindaj datoj pri la tre notinda progreso de l' Grenlanda instruado, kie la danoj, kiel ĉiam, pro la kulturo efiĉe kontraŭbatalas eĉ la malhelpojn de la naturo. La alia artikolo temas pri »Evito de herede malsana posteularo« kaj la aŭtoro: Dr. Francke, advokato en München. Tiu ĉi leĝo estas pripensinda. Unua kondiĉo, memkompreneble: ĝia justa plenumado. Sed — ĉu tio estas garantiata?

Koncerne de la lingvo.

En *La Revuo Orienta* (No 7, 1934), mi trovis la strangan aserton ke la formo »Budh« estas kontraŭ la e-a ortografio. Ĉu oni povus klarigi al mi: kial?

En *Internacia Pedagogia Revuo* (No 4, 1934), artikolo parolas pri kelkaj aferoj ĉirkaŭ la ortografio de l' nederlanda lingvo. Kvankam oni ne povas tute konsenti la rezonadojn de l' aŭtoro, lia prezentmaniero estas vere simpatia. Parto de l' artikolo:

La nederlanda instruistaro intencas plisimpligi nian ortografion. Sed ho ve, kiom da gazetartikoloj oni verkis, kies konciza enhavo estis:

La ministro fuŝos nian lingvon, la karan heredaĵon de niaj prapatroj. (Ili skribas »lingvon«, sed

da inteligentaj esperantistoj. Laŭ mia opinio tio estas ebla kaj efektivebla. Saluton de mi al ĉiuj gelegantoj!

— S-ro Kubiček rapide stariĝas. Vokas lin telefono. Intertempe mi rigardas la ĉirkaŭmurajn libroŝrankojn. Ili estas plenplenaj. S-ro Kubiček estas granda bibliofilo. Liaj libroj estas ĉiuj bele vestitaj. Duono el ili havas tuteledajn originalajn bindaĵojn. Kelkaj estis eĉ en Parizo ekspoziciitaj kaj premiitaj.

— Tiel mi estis fiksinta miajn okulojn al la belaj

volumoj, ke mi eĉ ne rimarkis la malantaŭ mi starantan artiston.

— Do, ne forgesu saluti kaj pardonu min, ke mi devas foriri. Por via eksterlanda laboro multe da feliĉo kaj sukcesoj. Gis la revido!

Estis fino de nia tre interesa intervjuo. Adiaŭante mi elpetis de l' artisto ankoraŭ klišojn de liaj majstraj librobindaĵoj, kiujn laŭ liaj propraj projektoj pretigis la lernantoj en la librobindernejo de li direktata.

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO II-a volumo. Redaktis L. Kókény kaj V. Bleier. Eldonis Literatura Mondo, Budapest, Mester-u. 53, V. 5. 1935. 327 tekstokaj 184 bildopaĝoj. Formato 23,5×15,5 cm. Prezo de ambaŭ volumoj: broŝ. 30.— svfr., bind. 34.— svfr. plus 10% por sendkosto. La sesa libro de AELA 1933. Aelanoj dum 1935 ricevas la duvoluman verkon por svfr. 19,80 resp. 20,70 afrankite.

Fine aperas la dua volumo de »nia« Enciklopedio, tiu tiel longe sopirata finiĝo. Ĝin malfruigis, ŝajnas, la maldiligenteco de kelkaj kunlaborantoj, interalie de la rusa: la eldonisto eĉ estas devigata elpreni la artikolon pri Rusujo ekster ĝia alfabeto ordo, loki ĝin eĉ la fino, kaj eĉ kun tiaj komplezoj li ne povis sukcesi ricevi la promesitan verkon kaj devis prunti ĝin de alia rusa kompetentulo. Jam io simila okazis eĉ la japana artikolo, sed ne tiel grave: la eldonisto ricevis la artikolon sufiĉe frue por enmeti ĝin sub la nomo Nipono, kio estas lerta elturniĝo. Krom tiuj du esceptoj, la dua volumo estas aranĝita, kiel la unua, laŭ alfabeto ordo kaj kun simila enhavo. Oni relegu mian recenzon pri la unua volumo, se oni volas trovi precizajn sciigojn pri la konsisto de la verko. Mi nun volas paroli nur pri tio, kio estas nova en ĉi tiu dua volumo.

Komence, mi diros, ke la ĝenerala dispozicio ŝajnas al mi pli perfekta ol eĉ la unua volumo: la ilustraĵoj estas pli multaj kaj pli sugestaj, la artikoloj pli ekvilibritaj,\* kaj tio estas komprenebla. Oni neniam scias, je la komenco de granda verko, kia estas la plej bona agmaniero; laŭlonge de la prilaborado, oni akiras la

\*) Escepte pri la artikolo pri Nipono, kiu estas misproporcie longa. Sed la temo estas tiel malmulte konata en Eŭropo, ke tio estas tre akceptebla.

intencas »ortografion«, kaj tute ne komprenas, ke la ortografio estas io ekstera.)

Speciale la eksurbestro de Rotterdam, S-ro Zimmerman, kiu dum kelkaj jaroj estis financa kontrolisto de Aŭstrujo, kaj post tiu tempo ŝajnas esti kompetenta pri ĉiuj temoj, plendas: »la nederlandanoj spirite degeneros, se la ortografio fariĝos tro facila.«

Tiu grava argumento konvinkis min. Mi amas miajn samlandanojn. Pro tio mi tuj sendis petskribon al lia moŝto, la instru-ministro:

»Ordonu, ke de nun la nederlandaj infanoj skribu per egiptaj hieroglifoj aŭ per hinaĵ literaj signoj, ili kalkulu per romaj anstataŭ per la multe tro facilaj arabaj ciferoj.

Tiamaniere vi devigos la infanojn streĉi ĉiujn fortojn, kiel plenkreskuloj ili estos spirite harditaj.

Malpermesu Esperanton; ĝi estas dangere facila.«

Kiam mi jam estis verkinta ĉi tiun artikolon, la gazetoj sciigis, ke la instru-ministro iom kontentigos siajn konservativajn kontraŭulojn, li gardos la akuzativon (kiu ne ekzistas). La patrujo estas savita.

En *L' Esperanto* (No 6—7, 1934) Laiko verkis tre meritplenan artikolon kun titolo »Ancora sul complemento oggetto«. Lia timo esprimita en la fina parto de tiu ĉi artikolo; ke oni ŝultrotiros, legante pri liaj reguletoj, estas tute senbaza. Tiuj ĉi reguletoj tre bone taŭgos por helpi la italiajn (kaj, post adapto de la metodo, la francajn) samideanojn eviti la plej gravajn (kaj plej oftajn) erarojn: tiujn de l' akuzativo. La esenco estas: substantivon oni anstataŭas per persona pronomo, ĉar eĉ ĉi lasta, la akuzativo diferencas de la nominativo ankaŭ en la itala (kaj franca) lingvoj; sekve, tiu ĉi procedo igas

sperton kaj oni estras sian materialon nur je la duono de la verko. Tiel la dua parto de vortaroj aŭ similaj gravaj verkoj estas ĝenerale pli bona ol la unua.

Estus tro longe indiki detale ĉiujn legindaĵojn en tiu ĉi libro: oni povas aperti ĝin je iu ajn paĝo, oni certe malkovros ion interesan, kiun oni nekonis. Mi markos do nur la ĉefajojn; kaj pri la historia parto mi ne insistos. Oni sufiĉe scias, kiom da informoj nenie troveblaj kuŝas en la artikoloj, kiuj priskribas la movadon laŭ la landoj; ili konsistigas la ĉefkolumnojn de la Enciklopedio, kaj prezentas larĝan vidon de la kreskado de Esperanto inter la nacioj. Multfoje en la propagando, oni bezonas tiaspecajn sciigojn, kaj tie oni trovas ilin abunde. Tamen, se ties legado vekas en ni ĝojon kaj fieron, oni ne povas ne senti, iafoje, melankolion, konstatante, kiom da penoj restis senfruktaj, kiom da klopodoj senrezultaj, kiom da fortoj perditaj en vana ripetado de samaj misprojecktitaĵoj elpaŝoj. Oni tro ofte ignoradis aŭ nekonadis la antaŭajn provojn, kaj oni rekomencadis ilin, sen plia ŝanco: tion kaŭzis grandparte neekzisto de taŭga dokumentaro pri la pasintaĵo de Esperanto, kaj unu el la ĉefaj utiloj de la nuna verko devas esti tia, ke ĝi liveru al la propagandistoj rimedon por almiti la estontecon laŭ la instruoj de la pasinteco.

Al la historia parto apartenas multaj flankajoj, la bio- kaj bibliografioj ktp. Inter la biografioj, mi altiras la atenton pri tiu de Zamenhof, verkita de li mem: ĝin konsistigas longa, ankoraŭ ne presita letero al S-ro Michaux kiun mi plezuris publike danki ĉi tie pro la afableco, per kiu li permesis al mi kopii kaj publikigi tiun neignoreblan dokumenton. Ĝi rakontas al ni pri multaj, ĝis nun nekonataj detaloj de la juneco de nia majstro, pri lia amo al la rusa kaj jida lingvoj, al la poezio ktp. Ĉiuj, tre certe, dezirus legi tiun belan paĝon.

rekonebla la koncernan (aplikendan) kazon, respektive formon.

*Nova Turan*, e-a interligilo de la turan-devenaj popoloj, aperis sur 10 paĝoj. La duan numeron oni promesis por la 1-a de aprilo; ĝin mi ankoraŭ ne vidis.

La programo de la gazeto manifestiĝas el la subtolo. Ĝia celo: enkonduki E-on en la tutturanan movadon, estas grava kaj laŭdinda, ĝi paralelas ankaŭ kun la interna ideo de E. Sed atingi tiun celon: najbaras la maleblon. Apud la sennombraj malhelpoj konataj de ĉiu movadisto, specialaj baroj sin prezentas ĉi-terene. Mi kuragaŝ aserti: ne indiferenton, sed rekte malamikecon spertos la kunlaborantoj de la inda gazeteto, al kiu mi deziras bonŝancon kaj precipe eltenemon kaj materiajn eblojn por povi daŭre servi la celon metitan.

Kaj nun: la nova *Hungara Heroldo*. Jen, post sia morto fenikse ĝi reviviĝis en la manoj de sia antaŭa redaktoro, s-ro Kókény, kiu, laŭ mia profunda konvinko, sola kapablas plenumi tiun specialan kaj delikategan taskon, kiun starigas redaktado de E-a revuo en Hungario.

Li aperis vere kvazaŭ savangelo aŭ *deus ex — homine*, kaj krom siaj ege konsiderindaj movadistaj ŝarĝoj kaj laboroj, li resurprenis la redaktadon kaj tiamaniere li antaŭdestinas gloran kaj, espereble, daŭran revivon de l' multe suferinta revuo.

S-ano Kókény, tiu ĉi eŭropano en la plej bona senco de l' vorto, majstre kaptis la solvon de l' tasko kaj pridonacis la e-istaron per valoro revuo, sur kies paĝoj rebrilas la redaktora kaj ĵurnalista talentoj de nia amiko. Estus ja nenecese (kaj manke de loko ankaŭ neeble) denombri la legindaĵojn de la ĝis nun aperintaj du numeroj, anstataŭe mi serioze kaj forte rekomendas abonon kaj zorge studi la revuon.



Ankaŭ al Sro Michaux mi ŝuldas pro la eblo publikigi, je la unua fojo, la faman »misteran kontrakton«, subskribitan de Zamenhof kaj De Beaufront. Oni multe aludis pri ĝi, sed neniu ĝin konis, kaj mi estas certa, ke pluraj, kiuj disponis ties tekston, faris ĉion eblan por ĝin detruiri. Nun ĝi fine reaperas: neĝo kaŝas nur ĝis printempo . . .

Tiu kontrakto alkondukas min al la bibliografia parto. Oni ne povas aliri tiun temon, sen mencii la tre interesan artikolon »Libro«, jam reproduktitan en ĉi tiu gazeto: ĝi klare kaj precize montras la situacion de la esperanta libroindustrio. Al tiu oni devas aldoni la artikolon »Literaturo«, kiu scioplene resumas la historion de nia literaturo: en 12 densaj kolonoj Alec Venture (kies nomo cetere ne troviĝas en la Enciklopedio, tiel, ke ni nenion scias pri li; cetere ĝi estas eble pseŭdonomo) montras la gvidliniojn de ties evoluo, kun ĝenerale tre ĝusta taksado de la verkoj. Tiuj du artikoloj formas bonegan enkondukon al ĉiu studo pri esperanta bibliografio.

Oni memoras, ke, en mia recenzo pri la unua volumo de la Enciklopedio, mi iom kritikis la gramatikan parton, kiu ŝajnis al mi aŭ superflua, aŭ nesufiĉa. Mi ne rezignas mian opinionon ĉe la dua volumo, sed mi devas konfesi, ke mi trovas en tiu parto tre valorajn instruojn. Plejparte Kalocsay tiris ilin el nia baldaŭ aperonta gramatiko, resumante kaj simpligante. Oni legos kun granda intereso la notojn pri la »Pasivaj participoj«, pri la »Sintaksaj elementoj« (en kiu kuŝas grava preseraro: sub 4. legu *Adjekto*, kaj ne *Adjektivo!*), pri la Vortordo, la Vortkunmeto ktp. Alia grandvalora lingvaĵo estas la artikolo de Emba (pseŭda nomo de Baranyai) kaj Stancliff pri la statistiko pri ofteco de lingvelementoj en Esperanto; la tri tabeloj (afiksoj, korelativoj kaj prepozicioj) prezentas tute novan metodon por studi la konsiston kaj evoluon de la lingvo, kaj ili alportas tre interesajn instruojn. Se la Akademio estus farinta saman laboron pri la sufikso END, ĝi ne atingus tiun rezulton, ke unu akademiano opinias ĝin »jam multe uzata«, kaj alia »tre malmulte uzata!« La statistikoj de Sro Stancliff postulus certe kompletigon: la malpliiganta ofteco de TIAL devus esti klarigita kaj kontrolita per esploro pri CAR; same pri UNU, rilate al IU ktp. Sed la metodo estas jam ĉi tie difinita per trafaj ekzemploj, kaj mi ne dubas, ke la tiel feliĉe komencita vojo estos ekirata de pluraj stilistoj.

Je la fino de mia recenzo mi volas ankoraŭfoje rediri la netakseblan valoron de tiu monumento, kia la duvoluma Enciklopedio. Je ĉiuj vidpunktoj, ĝi estas konstruaĵo sen precedenco en nia lingvo kaj de nediskutebla utilo. Multaj el la informoj liveritaj de ĝi estis kolektitaj nur post longa penado, kaj post kelkaj jaroj, oni eĉ ne estus plu povinta ilin kolekti, pro morto de tro multaj pioniroj. Nur al la klopodado de ĉiuj kunlaborintoj, nur al la sindonemo de L. M. kaj de ties eldonisto, ni ŝuldas la konservon de multaj pecoj el nia prahistorio, de multaj el niaj glortitoloj — kaj ilin oni ne povas tro danki kaj laŭdi pro tio. G. Waringhien.

ROMANO PRI AFRIKA BIENO. De Olive Schreiner. Trad. el la angla Stephan A. Andrew. Eld. The Esperanto Publishing Company Ltd., London. Paĝoj 270 kaj X. Formato 13×19 cm. Prezo: bindita 6 ŝil. broŝurita 4/6 ŝil. plus 6 pencoj por sendkostoj.

Malofte oni trovas en nia — malgraŭ ĉio, juna — literaturo verkon tiel pensoriĉan, kiel tiu ĉi libro, kies aŭtorino distingigis per la tri plej gravaj trajtoj verkistaj: profundaj konoj psikologiaj, granda talento, kaj simpla stilo de l' rakonto. Ĝi estas romano ne speciale »pri Afrika bieno«, ĉar ĝian agadon oni povus facile transplanti ankaŭ en ĉian ajn alian medion — ĝi estas majstra studo pri homaj animo kaj karaktero, kiuj en sia nuda formo elmontriĝas preskaŭ la samaj tiel en la tiam ankoraŭ primitiva Sudafriko, kiel en la t. n. »civilizita« Eŭropo. Kontraŭe, la juna paŝtisto Valdo reprezentas

tian simpatian homtipon, kian ni vane serĉos — tiom pli nuntempe! — en la t. n. kulturmedioj de la eŭropa junularo.

Esence, la libro konsistas el kelko da epizodoj, kvankam maldiketa fadeno de komuneco ŝpinigas laŭlonge de l' tuta rakonto. Prave la aŭtorino diras: »Strange venas kaj foriras la pŝedoj. Homoj aperas, agas, influas unu la alian, kaj forpasas.« Jes, tio estas la neŝangebla ordo de l' sorto, dividanta ĉiun homan vivon en epizodojn.

La seriozaj kaj tre interesaj pensoj pri la grandaj problemoj de l' homaro: religio, edzeco, vivo kaj morto, virina movado, etiko, moraleco ktp. — tiuj ĉi pensoj kaj konkludoj ankoraŭ nun restas aktualaj por la pliparto de l' socioj. En granda abundo la aŭtorino disipas ilin tra la verko, prezentante la altan nivelon de sia kulturo kaj humanan altklasan vivkoncepton. Plurajn ĉapitrojn de tiu ĉi verko oni devus gratulinde enmeti en la krestomatinojn de ĉiuj lernejoj.

La lingvo de la traduko estas flua kaj korekta. Nur kelkloke mi trovis la eraran formon »io, kiu« (anst. »io, kio«). La personigo de objektoj kaj, sekve, la uzado de l' pronomoj »li« aŭ »ŝi«, anstataŭ »ĝi«, estas ne nur interesa de lingva vidpunkto, sed ankaŭ pravas la delikatan lingvosenton de l' tradukinto, kiu kelkloke montriĝas ankaŭ kuraĝa en la vortformado, ekz. kiam li substantivigas la kondicionalon de »povi«, formante la vorton »povuso« por determini aferon kiu povus esti aŭ okazi. Same interesa estas la jena frazero: »Mallongaj bojoj indikis la kieron de Nito (t. e. la lokon, kie Nito troviĝas)«.

El la 9 neologismoj, kiujn uzis la tradukinto, li klarigas sole la sencon de unu: kralo (= bruta enfermejo) La signifon de la ceteraj la leganto devas konjekti el la teksto. Nu, en sia propra intereso la E-eldonistoj devus tiam postuli, ke la aŭtoroj resp. tradukintoj aldonu klarigon de l' neologismoj netroveblaj en la Plena Vortaro. Kion ekzemple precize signifas la vorto »hanti« (la pensojn)? Kaj ĉu nepre necesa estas la vorto »stifa« (patro, filo ktp.) anst. duon-(patro, filo ktp.)?

Sed oni apenaŭ rimarkas tiujn malgravaĵajn misajetojn, legante unuspire la tre valoran kaj interesan »Romanon«, pro kies esperantigo kaj aperigo la tradukinto kaj eldoninto akceptu nian varman dankon. I. Lejzerowicz.

DEKDU POETOJ. Poemantologio originala. Redaktis K. Kalocsay. 128 pĝ. 15.5×11.5 cm. Eldonis Literatura Mondo, sepa libro de AELA 1934. Prezo: bind. 4.—, broŝ. 2.20; luksa bind. 5.—, broŝ. 2.50 sv. fr.

Ekzistas malnova historio: en gastejo, sur la bordo de Luaro, renkontis sin, iun vesperon, du nobelaj junuloj, kiuj antaŭ bona kruĉo da anjua vino, flame diskutis pri poezio. Unu havis la nomon Ronsard, la alia Du Bellay — kaj sekve de ilia renkonto naskiĝis poste la Plejado, kies sep membroj estis la plej efikaj agantoj de la franca Renesanco . . .

Mi ne pensas, ke la memoro de tiu malnova paĝo el la historio de la poezio inspiris la ideon grupigi en unu aron tiujn novajn poetojn: ĉi-foje ili estas dekdu. Kaj oni sciigas nin, ke nur tiujn, kiuj ankoraŭ ne publikigis memstaran poemlibron, oni tien akceptis; kaj efektive tie mankas la jam plej famaj: Graŭ Casas, Hohlov, Schwartz, Mihalski. Iu kaj precipe la du iniciatoroj de nia moderna poezio, Baghy kaj Kalocsay. Oni ankaŭ avertas, ke tiuj poetoj estas »diversaj laŭ nacieco, medio, ago, tre diversaj laŭ tono, inspiro, temo«, kaj ke »la sola fadeno ilin kunliganta« estas, ke ili kontribuis al Literatura Mondo. Jes; kaj malgraŭ ĉiuj tiuj motivoj, tamen mi ne povas tute forigi la impreson, ke io pli forta ol simpla kunlaborado al iu revuo kunigas tiujn poetojn; ke, en ĉiuj iliaj voĉoj, kiel ajn diversaj estas iliaj kantoj, oni kvazaŭ rekonas ian apartan vibradon, ian distingan sonoron; ke tiu vibrado kaj tiu sonoro ne estas sen similo en la poemaroj de Baghy kaj Kalocsay; ke fine, sen la ekzisto de tiuj du grandaj horestroj, la jena horo ankaŭ ne ekzistus — kaj tiuj dekdu poetoj, ties spirita idaro,

estas la plej bela krono, kiun la esperantistoj povis oferi al tiuj du majstroj.

Tiu plimultigita Plejado konsistas el du anglaj (B. Price Heywood, L. N. Newell), du estonoj (Henrik Adamson, Hilda Dresen), du hispanoj (G. E. Maŭra, Amalia Nunez-Dubus), du hungaroj (F. Szilágyi, L. Totsche), unu aŭstro (A. Schaubhuber), unu aŭstriano — versajne kroato — (N. Hovorka), unu latvo (N. Kurzens), kaj unu usonano (E. C. Stillmann). Oni povas konstati, ke ĝi estas vere internacia, kaj eĉ ne limiĝas al Eŭropo: tamen estas kurioza afero, ke mankas reprezentantoj de Francujo, Germanujo, Italujo kaj Polujo: ĉu en tiuj landoj la movado estas tiel malforta, aŭ tiel supra, aŭ tiel materialisma, ke ĝi ne povis estigi poetan alvokigon? Cetere la fakto, ke la granda plimulto el tiuj poetoj apartenas al ne-latinidaj lingvoj (norda kaj orienta Eŭropo) ŝajnas havi kelkan lingvistikan signifon. Oni povas almeti tiun alian fakton, ke eĉ dum la tiel nomata »franca periodo«, neniu franco montris sin granda stilisto: al Bein, al Grabowski ne povas evidente konkurenci Boirac, Meyer aŭ Vallienne. Ĉu el la ĉi supraj faktoj oni povas dedukti, ke germanoj aŭ slavoj pli facile estras esperanton ol latinidoj; sekve, ke Esperanto en sia strukturo pli konformas al la spirito de la unuaj lingvoj ol de la duaj? Mi ne aŭdacas respondi, pro nesufiĉa pristudo; sed la demando estas interesa.

Mi scias ja, kun kia malkonfido oni ordinare konfidiĝas kun poemlibro: tre ofte eĉ la plej simpla espero al ia noveco, poezieco aŭ sprito estas kruele ruinigita ĉe la unua legado; tio estis ankoraŭ pli vera ĉe la Esperantaj poemaroj, antaŭ la milito. Mi memoras, interalie, unu almanakon de Lingvo Internacia, el kiu oni ne povus citi eĉ unu solan verson, kiu estus bona. Tiun ĉi fojon la afero tute malsamas, kaj mi ne timas aserti, ke neniu el la al ni prezentitaj poemoj estas preterlasinda. Ĉiu havas sian propran karakteron, pli malpli allogan certe, sed tamen ian karakteron, ian vivan personecon. Oni ne atendas de mi, ke mi klasu tiujn dekdu: poetskolo ne estas lernejo, kaj poezion oni ne juĝas per notoj. Mi eĉ ne volas provi karakterizi ĉiun aparte, ĉar, en sia enkonduko, Kalocsay tion faris kun sia eminenta sagaco. Ne, mi nur volas ripeti kelkajn versojn, kiuj kantas al mi en la memoro, kaj kiujn mi ne povas forgesi: eble mia gusto ne komplete malakordos kun tiu de miaj legantoj. Jen »Vesperkanto«, de H. Adamson, en kiu oni ŝatos la simplecon de la melankolio:

Forpasis kure la juneco,  
temp' tro revema sen prudent' —  
kaj estingiĝis purpurmeĉo  
en malproksima orient'.

Min tro lacigis voj' ŝtonoza,  
sur dorso sidas zorgo-ĝib'.  
mi iras, iras, senripoza,  
vagulo, sub sortbata vip'.

Min jam post lastaj lacaj paŝoj  
atendas tomo: frosta lit',  
kaj ĉirkaŭ kruco el kreskajoj  
de l' ter' volviĝos sole vit'.

Kiel delikata estas la sento de la naturo esprimita en ĉi tiuj ĉarmaj versoj de Hilda Dresen!

#### Paduso

Paduso, reĝino de l' nordo  
kun blanka floraro,  
Unua printempa heroldo,  
ornam' de l' kamparo.

En ĉiu ĝardeno vi floras,  
ĉe ĉiu dometo,  
Agrable kaj dolĉe odoras  
en nokta kvieto.

Kaj kvazaŭ »negeroj, hezite,  
petal' post petalo,  
Sutigas florar' via glite  
dum sia disfalo...

Kiel bedaŭrinde, ke la severa sciencisto Verax asertas en sia enciklopedio, ke paduso estas »ornama planto, havanta malagrablan odoron! Kiel ni preferus kredi al nia poetino! Amica Hilda, sed magis amica veritas...

Brian Price Heywood estas kapabla, ne nur por melankoliaj elegioj, sed ankaŭ por alttonaj profetaĵoj; aŭskultu nur:

Ho mondo iam bela, altstatura...  
vi nun fariĝis monstro muko-voma,  
vi kadukiĝis, perdis la vivolon...  
Ne savos vin plu preĝoj al la dioj,  
kiujn vi malobeis, nek ĝemkrioj:  
vi devos morti, orfe, malrapide,  
fruntadi viajn krimojn, vid-al-vide.  
La pra-fabelo pri l' diar-krepusko  
veriĝos...  
Nun venis via vic' por la pritondo,  
Eŭropo trimiljara, pekrompita!

Al tiu trista lamento respondas vigle la esperkanto de alia poeto, Nikolao Hovorka:

Sep gentojn mi sentas ja en mia sango.  
Al ĉiu mi ŝuldas sammulte da danko...

Kaj kiu donacis la plej bonan guton  
Ne scias mi: mi sentas la sep kiel tuton.

Ci sango multgenta pasie rondiras  
En mi kaj ĝi amas, inspiras, sopiras...

Ci sango multgenta per sankta magio  
Por unu nur batas, por unu patrio.

Plej kara patrujo sur nia terĝlobo:  
Ho sankta, fiera, eterna Eŭropo!

Tiel respondas al si la voĉoj de la du poetoj, kiel la kantoj »amojbjaj« de la antikvaj paŝtistoj...

Jen, laŭ alia tono poemeto de Kurzens, kiu potence esprimas la tutan malĝajecon de la pluvo:

Hieraŭ pluvis kaj hodiaŭ pluvas  
kaj morgaŭ same, lace glitos gutoj;  
kaj lace, same iros la minutoj  
de mia viv', sencela kaj enua...

Ne fendas plu ĉielon fulma glavo,  
ne tremas tondre plu la firmamento.  
Ĉe la anguloj ploras ftiza vento,  
kaj pluvas, pluvas, pluvas — tag' post tago.

Kaj ĉiu tag' forlavas rabe ion,  
kaj ĉiu nokto portas ion for;  
kaj de l' pasinto restas nur memor'  
kaj por l' estonto — havas mi nenion...

Oni miros, kiel per tre simplaj rimedoj, la poeto elvokas tiun resignacian spiritstaton naskitan de senfina pluva vetero. Se oni volas konstati la progresojn, kiujn faris la esperanta poezio, oni komparu tiun poemeton kun »La Pluva Tago«, tradukita de Grabowski el Longfellow (F. Krestomatia, pĝ. 364): oni vidas, kiel la moderna poeto estras la lingvon, ludas per sonoj kaj ritmo kaj bildoj kun supera majstreco. La poemoj de G. E. Maŭra estas plenaj je amo: varma memoro aŭ arda sopiro alternas, en tre rafinita formo, eĉ iom tro, foje, por mia gusto (vidu la poemon: Premvarme ŝvitas... en kiu, krom la ordinara rimoj, rimigas ankaŭ la dua silabo de ĉiu verso en la strofo). Tamen, li kapablas ankaŭ tre simplajn tonojn, kiel la jenaj:

Nur ekstremo  
de ŝia buŝ',  
nura ĝemo,  
fingrotus' —  
ĉio estas por l' anim'  
fea sorĉo,  
kies dolĉo  
brute sensaĝigas min.  
Kaj mi vagas  
nun, kaj agas  
simple kiel frenezul' . . .

Sprita kaj emocia samtempe estas la poezio de L. N. Newell; kiel ne ŝati ĉi tiun adiaŭon al »idista poeto«?

Kiel soldato kantas romana,  
Sola ĉe l' lasta landlim' forgesita,  
Kuraĝa ĉe sia posteno  
Dum detruas patrujon barbaroj;

Kiel sur morta tero mortkantas  
Siajn amatojn lasta homido,  
Sub neĝeroj silente ŝvebantaj,  
Atendante la blindan haoson:

Tiel idisto lasta vi kantas  
Morne al mondo, kiu forgesis  
La lingvon de vi amegatan.  
O poeto fidela, saluton!

De *Amalia Nunez-Dubus* mi citos al vi delikatan plendon, sub kiu oni sentas tre mediteman kaj mem-konscian penson:

Tra la malluma strateto  
gajuloj iris kaj bruis,  
mi inter ili paŝadis  
kaj miaj larmoj ekfluis.

Kaj rimarkinte la larmojn,  
kiuj survange ardadis,  
haltis la gaja grupeto,  
scivole min rigardadis.

Scivolo multe atingas,  
sed tamen havas ja limon:  
ili komprenis la larmojn,  
sed ne komprenis l' animon.

Kaj tiel inter la gajo  
kaj inter la scivoleco  
invadis mian animon  
nekonsolebla soleco . . .

Ne sen arta prilaboro, certe, estis atingita la simpleco kaj pura nudeco de tiu poemeto.

*Alfred Schaubhuber* estas duoble originala, kiel poeto: li kantas la vivgojon (kaj vi povis konstati, ĝis nun, kiel melankoliaj estas ĉiuj miaj poetoj!) kaj li prikantas la edzinon (kaj ni ĉiuj scias, ke kutime la poetoj ne estas tro famaj per sia fideleco al la edzino!) Jen kelkaj agrablaj versoj en antikva formo (sapfa strofo):

Dolĉa nokto argentas, oras vino.  
Levu glason, edzino! Ĝia vango  
rondan vangon de mia glaso tuŝu!  
Ambaŭ ekridu!

Vian nigran hararon luno pudras  
nun per polvo argenta. Sajnas garni  
maljunago jam vian ĉarman kapon,  
kara edzino.

Mensogulo, vi luno, mensogulo!  
Por ni oras ankoraŭ la juneco,  
floras, oras, odoras kiel vino  
en la pokaloj.

(Oni rimarku la germanecon de la poeto ĉe lia virseksigo

de la Luno, kiu estas virino por ĉiuj latinkulturaj popoloj).

Guste apud tiu poeto de la plej morala inspiro staras, kvazaŭ por spito, *E. C. Stillman*, kun sia ironia don-juanececo:

Venu kara	Tienĉi.	Kio estas	Nun al vi?
Ĉar alian	Kisis mi.	Cu vi ploras	Pro l' envi'?
Trankviliĝu	Pri la sci' :	Al virinoj	Plaĉas mi.
Estas ĉiam	Pli kaj pli	Da reĝinoj	Cirkaŭ mi.
Belulinoj	Tri cent tri.	Kiuj belas	Pli ol vi.
Tamen se vin	Prenus Di'	Mi malgajus	Eĉ pro vi.
Venu, kara	Tien ĉi.	Mi malgajus	Eĉ pro vi.

Post tia frivola ario (sed mi kredas, ke la poeto kapablas pri pli gravtonaj versoj, kiel atestas la »Momenton Eksilentu«), legu, por ŝanĝi kaj ĝui la mirindan variecon de ĉi tiu poetkrono, la jenan poemeton de *Szilágyi*, kiu sendube ŝajnos al vi neklara, — sed, se vi relegas ĝin, el tiu neklareco mem eliros por vi neesprimebla sento de perditeco, senhelpeco, kian ĝuste volis esprimi la poeto; tiu mistera aludo al oni ne scias kia Aherono, al kia Mortobarko estas pli emocia ol ĉia retoraĵo pri sindoniteco al alia homo:

Senmia Mi

Mi tenas min en mia mano,  
ekiras palpe, subservute,  
la sanktan ŝarĝon mi ĉe l' pramo  
nebula donas al vi mute.

Returne! Nokt' min kovras tute,  
de fore krias fat-imamo,  
mi paŝas sen mi, blinde mute  
— returne — kun palpanta mano.

Fine, ĉu estas eble ne ŝati tiun delikatan »Momento-foto« de *L. Totsche*?

En fru-printempa strato  
subita sent':  
la urb' alprenas geston  
de festa silent'.

Jus estis bru-tumulto,  
bulvarda svarm',  
vivritmo febra, kuro  
por pano kaj por karn'.

Nun por minuto ĉesas  
la strata bru',  
sin bremsas de l' trafiko  
zigzaga bunta flu'.

Diafanan muton ŝutas  
la suno-bril'.  
La homojn gapi igas  
la ora rid': April'.

Senmova ĉio: kvazaŭ  
haltis la temp':  
la mond' momente festas  
l' alvenon de l' Printemp'!

Ne eble kopii ĉion, kio min vive tuŝis — mi devus kopii preskaŭ la duonon de la libro: nur la kaprico de la memoro gvidis min. Sed pli ol apartaj citaĵoj gravas la ĝenerala tono de la libro. Mi jam diris, ke ĝi estas tre konstante alta: sed ĝia precipa merito estas ĝia moderneco; dum la poemoj de Zamenhof kaj de aliaj antaŭmilitaj verkistoj memorigas, kiam ili estas bonaj, la tonon de la klasika aŭ romantika poezio, tiu ĉi libro prezentas al ni la rekoneblajn trajtojn, kiujn ni povas vidi en la grandaj naciaj poetoj de hodiaŭ: mallongaj poemoj, koncentrita emocio, elektre vibraj dirmanieroj — alivorte poezio de paroksismo kaj koncizemo. Nenia elokvent-

eco, nenia gurditajo (krom, ĉe Schauhüber kelkaj lun-efektoj): la sento rekte parolas, sed per vortoj ŝarĝitaj je mistera potenco, plenaj je alisorĉiteco. Tiuj karakteroj evidentiĝas ĉe la prefero, kiun ili montras por tre mal-longaj poemformoj: du aparte estas rimarkindaj, kiujn mi ne notis en la Parnasa Gvidlibro, ĉar tiam ili apenaŭ ekzistis: la unua estas la japana »tanka«, originale konsistanta en 31 silaboj laŭ 5 versoj de 5, 7, 5, 7, 7 silaboj. Kalocsay adaptis ĝin al Esperanto, respektive uzante du-jambojn kaj trijambajn kaj aldonante rimon inter la dua kaj la kvina verso. Tiun rafinitan formon uzis Totsche kaj Stillmann: jen ekzemplo de tiu lasta, nedefineble bela en sia malprecizeco kaj elvokiveco:

Atendi ion  
(morgaŭon? majon? morton?)  
aŭtune, kiam  
la vento ekpelegas  
foliojn en la korton . . .

Por japanoj ĉe la »tanka« estas longa: ili mallongigis ĝin forigante la du lastajn versojn, kaj tiel atingis la »haiku«, el 17 silaboj (jen unu de Moritake, tr. de Kalocsay:

Cu florfolio  
post fal' revenis branĉen?  
Ne! — Papilio.)

Sed tiuj haikuoj ne ĝuis la saman favoron, kiel la tankaokaj: ekster la tradukoj, neniu uzis ilin en originala poemo. Tamen, iom similan, preskaŭ tiel mallongan formon (22 aŭ 23 silaboj) mi trovis ĉe G. E. Maŭra, kiu verŝajne inventis ĝin: aŭ ĉu ĝi havas modelon en la hispana lingvo? Lia triversoj (li mem nomas ilin »pingloj«, sed nur kiam la enhavo estas epigrama: eble tamen oni povus difini al ili tiun bildecan nomon) konsistas el du kvartrokeoj kaj unu trijambo, kies fino estas foje eliziita. Kaj mi devas konfesi, ke la abrupta ritmoŝanĝo je la lasta verso vigle jetas la saĝeton de la penso; la rim-arango ne ŝajnas fiksa, kelkfoje ĉe ĝi malestas, sed oni povas trovi pli malpli regulan vokalrespondon inter la du unuaj versoj. Jen du elvokivaj »pingloj«:

Sur la maro sun' krepuska.  
Sol' de l' alta muro muska.  
Kaj via rid' Amor'!

Tra l' fenestro rufa lumo:  
stralanterno sub la pluvo.  
Post ni, profunda lit' . . .

Estus iom sakrilegie, okaze de tiu poezi-libro, diskuti pedante pri neologismoj: ĉe ĉiuj partoprenintoj, ili estas sufiĉe multaj. Mi ne kuraĝas aserti, ke la Parnasa Gvidlibro tien gvidis ilin; sed almenaŭ ties aŭtoroj povas fiere konstati ke la direkto, kiun ili difinis al la Esperanta poezio, ne estis tiel erara, kiel kelkaj profetis: vere laŭ la de ili indikita vojo ŝajnas marŝi la jena poetobando. Al la konkero de tiu riĉa, potenca lingvo, kiun malhavi ne povas internacia poezio, tiuj junaj bardoj pluiras, lasante post ili la kritikistojn grumbli: hundo bojas, homo vojas.

Eble kelkaj trovos, ke mi donas tro da atento al simpla verslibro. Sed firme mi kredas, ke la graveco de tia verko, kiel la nuna, ne estas troigebla. Oni devas rimarki, ke ĝis nun, se Esperanto kreskis kaj vivas, tion ĝi ŝuldas ne al la kontentigo de materialaj bezonoj: ne la publikigo de teknikaj vortaroj, ne la apero de filateliaz gazetoj, ne la starigo de turismaj servoj konsistigas ĝian forton nek alportis al ĝi definitivan venkon: mi ne volas deklari tiajn penojn senutilaj, tute ne, sed mi volas akcenti, ke ekde ĝia naskigo kaj ĉe la tri gravaj krizoj, kiuj endangerigis ĝian vivon, en 1894, en 1908 kaj en 1919, Esperanto tiam ĉerpis sian forton el la alligiteco, kiun la adeptoj havis al ĝia literaturo, tradukaĵoj kaj gazetoj, t. e. el tute senprofitema, sed pure idealisma

sento. Jes ideaj, ne materialaj fortoj antaŭenpulis ĝis nun nian movadon — kaj tial mi rajtas diri, ke la apero de libro, kiu estas pruvo de vasta kaj fekunda agitado en la spiritoj, montras al nia afero bondiran kaj salutindan aŭguron.

G. Waringhien.

PAULO JIL (Gille): *Skizo pri filozofio de la homa digno*. El la franca: E. Lanti. Eldonis SAT. 148 pg. 19x13 cm. Prezo: fr. fr. 12.—

Plej karakterize mi povas konigi la gvidajn ideojn de la aŭtoro per la jenaj du citaĵoj:

»Jam en la primitiva hordo, ekzistas ia malpreciza kaj malklara sento pri rajto, nepre necesa bazo de l' kolektiva konsento. Sed estas precipe en pli humaná socio, ke aperas, kun elementa racio, la jura karaktero de l' komuna vivo. La nacia koncepto pri la homaj interrilatoj progresas . . . La jura elvolviĝo organisme, logike sekvas la filozofian elvolviĝon. Kaj laŭgrade kiel dum la daŭro de l' jarcentoj la racio altiĝas, perfektigas kaj fortigas, la nocio pri rajto, pri justo, daŭre elpurigas, senmakuligas, iom post iom senigante sin de l' maldelikata kaj bruteca materialismo, de l' fetiĉismo kaj de la arbitro, kiuj montras ĝian barbarecan staton, kiel heredaĵon el la prahoma periodo kaj el la animala psikologio . . . La homa konscio . . . alvenas . . . al la universalaj ideoj, al la justaj, naciaj kaj sciencaj ideoj, kiuj liberigas el la arbitro de la egoismo . . . Ĝi estas la fino de l' greka solidaro kaj de l' gregismo sub ĉiuj ĝiaj formoj. Sed ĝi estas la antaŭtagiĝo de l' homa solidaro, de l' konscia solidaro, racia kaj laŭvola de ĉiuj homoj, unuigintaj en la saman idealon el justo kaj amo.«

La sama optimismo, kiun same ne embarasas la aktualaj okazaĵoj, (kiel la murdantaj bandoj la filozofadon de Aristoteles), karakterizas la tutan libron kaj kun tio la jenan duan citaĵon:

» . . . Iom post iom la homa racio . . . forjetas ĉiun metafizikon, ĉiun aŭtoritatecan iluzion, ĉiun absoluton, por preni de nun sian kriterion nur en la ĝenerala, universala ideo pri humano . . . «

La tradukinto, Lanti, trovas la plej karakterizajn vortojn pri tiuj sentoj, kun kiuj la leganto, (almenaŭ mi) akceptas la libron: »Ĉe konstato de multaj, tre multaj faktoj malfacile mia intelekto povas akcepti la tezon, ke la homaro sin direktas nepre al stato, en kiu regos ĉiam pli da justo, da libero kaj amo.« Tamen mi iom mildigus la pesimismen de Lanti, sed neniukaze mi kredas tiun vojon al la homa digno, tiel facila kaj senombra, kiel la aŭtoro. »Sed vanaj estas la diskutoj inter pesimistoj kaj optimistoj« — daŭrigas prave Lanti, kaj la absorbiĝo en la filozofio de Gille donas forton kaj nobliĝon, ĝi do meritas nian komprenon kaj estimon.

La aŭtoro skermas al du direktoj: kontraŭ la materialismo de Marx kaj kontraŭ la metafizikismo en la sociologio. Kun eksterordinara energio li atakas speciale la »antiidealisman sofismen de Marx«, sed en tiu parto li estas pli pasia kaj iurilate pli subjektiva, ol en la aliaj ĉapitroj de la libro. La argumentoj estas prefere direktitaj al la sentoj, (vivantaj sub la konscio de ĉiu homo kontraŭ la troa materialismo), ol al la priprenoj, kaj la konkludo pri la aktiveco de la ideoj, kiun ni cetere volonte akceptus, ŝajne ne estas sufiĉe science fundamentita en tiu unua ĉapitro, kiu estas eble la malplej forta parto de la cetere bela kaj klasike edifa libro. La konkludoj sekvas tro rapide sur la unuaj paĝoj de la libro, kie pasiaj demandoj, plensenta indigno kaj troa vervo anstataŭas la filozofian trankvilon, kies harmonion ni tamen plene povis ĝui poste en la libro.

La traduko de la verko ne estis ĉiutaga tasko kaj estas vera triumfo de la lingvo kaj la tradukinto tiu sukceso, pri kiu mi plezure raportas nun. Eble mi povus elpinci kelkajn vortojn, aŭ formojn, kiuj ne tro plaĉas sed en la aktuala okazo tia fero estus tre maljusta. Oni malofte renkontas simile altnivelan interpreton.

Tamen iurilate mi ne konsentas kun Lanti kaj mi diras kuraĝe tion, malgraŭ tio ke laŭ li pro mia mala opinio, mi devus esti nur »duon-esperantisto kaj senkon-

scia malamiko de la mondlingva afero.

Temas pri la ortografio de propraj nomoj, kiujn mi tute ne rigardas »fetiĉoj«; sed ĉiokaze estas dezirinde, ke oni almenaŭ *rekonu* la nomojn. En la uzado de Lanti la nomoj aspektas jene: Fuje (Fouillée), Reclu, (Reclus), Miler (Müller), Gijo (Guyau), Haksli (Huxley) ktp. — Tiu batalo ŝajnas al mi, kvazaŭ skermado kontraŭ ventmueliloj, sed krome eĉ ne justa kaj konsekvenca batalo, ĉar ekz. la *lantia* ortografio de la nomo »Reclu« absolute kaŝas la veran nomon, eĉ la ĝustan elparolon de la nomo; se ni rigardas Esperanton, kiel *parolan* kaj *praktikan* lingvon, *guste pro la Lanti-metodo* ni baldaŭ devus havi vortaron pri la fonetiko de la nomoj; klarigojn pri tio, ke Reclu egalas Röklü (Reclus), Miler egalas Müller ktp. Mi vere ne scias, kial Lanti ne uzas la formon Muler, aŭ se ne, kial ne eĉ la alia nomo Recli, aŭ eĉ, kial li ne estas tute »mondlingva« kaj kial li ne simple tradukis la nomojn en Esperanton, jene *Muelisto* (Müller), *Malfrua* (Tarde), *Ermito* (Reclus), *Grafo* (Comte) ktp. Certo tiu estas la lasta paŝo sur la vojo, kiun li komencis.

Sed krom tio: plena estimo pro la belega traduko.  
F. Szilgyi.

**BENITO MUSSOLINI: VIVO DE ARNALDO.** El la itala originalo trad. Dro K. Kalocsay. Eldonis »Literatura Mondo«, Budapeŝt, IX., Mester-u, 53. Pĝ. 108; 19,5×13. Prezo: bind. 3.30, broŝ. 1.80 sv. fr. Luksa eldono: bind. 4.—, broŝ. 2.20 sv. fr.

Koncerne tiun ĉi novan verkon antaŭ ne longe envicigita en la esperantista bibliografio, ne estas seninteresa la konstato, ke per ĝi la nomo de la mondfama ŝtatestro jam duafoje aperas en ĝi, kion ni dankas al la senripozo produktado de nia verda centro en Budapeŝt kaj samtempe al la senkondiĉe laŭdinda — kaj imitinda — subtenemo financa de samideano Gino Catarzi, por la aperigo de gravaj eldonaĵoj.

La interesa verko, kiel supozigas la nomo de la pritraktita Mortinto kaj tiu de ĝia aŭtoro, kondukas la leganton en tiun eksterordinaran politikan sferon, en kiu — ĉiu sjarole — ili moviĝis; sed kiom da vivanta humaneco vibras en ĝi ĉiupaŝe! Oni povas diri, ke baldaŭ post eklego, preskaŭ senkonscie, oni kvazaŭ forgesas la esceptan fizionomion de la medio, en kiu oni vivas dum la kelkaj leghoroj, kaj oni donas sin al plej ĝisfunda enprofundigo en la sentojn, kiuj vivas en la libro. Vere, la aŭtoro, verkante sub la impulso de frata koro kaj per homa plumo, kunmetis la floraron de siaj sentoj por la frato amata kaj por la fidela kunlaborinto kaj samtempe honorigis lin per starigo ĝustloken en la politika movado, kiun li estigis.

La tagon de Kristnasko 1931 — tri tagnokojn post la subita morto de Arnaldo — en Palaco Venezia, en Romo, kie ĉiutage Mussolini plenumas sian ŝtatestran laboron, la aŭtoro komencis ame esplori la paperojn de la ne plu vivanta frato; dum la manoj foliumis kaj la rigardo pasis de skriblino al alia, la tempo de la malproksima, komuna knabaĝo reviviĝis en lia spirito kaj tiun vesperon mem li ekverkis sian libron.

De la unuaj linioj la aŭtoro kvazaŭ kunprenas, akompane, la leganton, kiu sekvas senhalte liajn paŝojn dum la revivigo de ĉiu fazo de la vivo de la multamata frato kiel de organizanto, kiel de ĵurnalisto, kiel de politikisto, dum kiuj fazoj, kiel montras sufiĉe ampleksaj citaĵoj el la korespondaĵoj kun la eminenta frato, li estis ankaŭ ama konsilanto, tamen sin tenante skrupuleme aparte kaj evitante ĉian eĉ plej etan sintrudemon.

Trafe ne avaris la aŭtoro al sia legantaro eĉ pri la familia vivo de Arnaldo, kiu estis al li fonto de delikata ĝojo kaj de neesprimeblaj suferoj kaj vere oni atingas la finon de la libro sub la impreso esti mem travivinta la kelkajn jarkvinojn, pri kiuj temas en la trailegitaj paĝoj. Tiom kroĉiĝis al la animo de la leganto ilia enhavo dank'al la profunda sento de humaneco, kiun la aŭtoro enspiris en ilin!

Plian fojon ni devas danki al la eminenta tradukinto, kies poligloteko de longa tempo estas ne malpli

konata ol lia admirinda multlaboremo. Kaj . . . kion diri pri la nemalhaveblaj neologismoj? Ĉu vere estas bongusta la senfina ripeto de la ĉiama rekantaĵo, kontraŭ kiu plurfoje Dro. K. rebate argumentis? Mi preferas kapti la favoran okazon esprimi al li la esperon, kiun mi sentis en mi ĉiufoje, kiam mi legis bat-rebatojn pri la *vezata questio*: mi esperas, ke iam, ĝuste en tiu tempoperiodo, kiam ĉiu ne komuna homo dediĉas sin al revizio de sia vivoverko, el sia sindonemo al Esperanto, li decidus regali plian fojon la esperantistojn per modela ekzemplo de persona ofero kaj per sia . . . reviziita verkaro.

La libron riĉigas interesaj faksimiloj kaj beligas bildhava kovrilo.  
E. F.

**LA TEATRA KORBO.** Senpretenda babilado. Julio Baghy. Eldono de la geamikoj de l' aŭtoro, Leiden (Nederlandlando) 1934. Paĝoj 110. 11,5×17 cm. Prezo: sv. fr. 1.65.

En tiu ĉi sia »senpretenda babilado« Baghy prezentas al la Esp-ista legantaro kolekton da noveloj originalaj, kiuj nediskuteble malkaŝas la altan nivelon kaj la rakontan talenton de l' aŭtoro. Kelkajn el tiuj noveloj ni konas jam el diversaj Esp. gazetoj, en kiuj ili dise aperis.

Baghy estas perfekta novelisto. Li scias bonege rakonti impresojn kaj travivaĵojn, kiuj sub lia plumo spiras ĉiam ian apartan melankolian sentimentalecon. »La heredajo«, »La tragedio de korniko«, »Dodo kaj liaj kvar patroj«, »Pala romantiko« k. a. estas veraj perloj en nia cetera malriĉa novelliteraturo. Kaj ĉar la rakontoj estas ĉerpitaj el la vivo de l' aŭtoro mem, ili tial fariĝas ne nur pli interesaj, sed oni ofte sentas en ili ĝuste la pulsantan vivon. Komprenoble, tiu ĉi senpretenda babilado havas forte individuecan karakteron.

Sed en la momento, kiam Baghy ĉesas rakonti, kaj komencas mediti, li haste devojiĝas kaj riskas fali en abismon de senhelpeco, se ne pesimismo. Tial lia tre mallonga »Eterna pentrado« fariĝas vere eterna ne nur pro tio, ke estas ĝenerale neeble elrampi el la sorĉita cirklo de »cherchez la femme«, sed ankaŭ pro tio, ke liaj farboj ne volas fiksiĝi al la pentrotolo, kaj en tiaj kazoj efektive »estus plej bone trapiki la tolon kaj pendigi sur ĝin la paletron mem«.

La lingvaĵo de Baghy estas ja, kiel ĉiam, klasika. Mi eble preferus iom malpli da kunmetitaj vortoj, sed tio finfine estas ja nur afero de gusto.

I. Lejzerowicz

Tiu 110-paĝa libro enhavas dektri skizojn, el kiuj kelkaj estas novelmaniere verkitaĵoj, kelkaj en formo de meditaĵoj. Mi intence skribis »novelmaniere«, ĉar ŝajne ankaŭ la plej novecaj el ili estas rakontoj pri epizodoj el la vivo de la aŭtoro. Tiuj epizodoj kaj tiuj meditaĵoj, kvankam tute memstaraj, kune formas specon de anima membiografio aŭ almenaŭ memkarakterizo de la aŭtoro.

Baghy subtitolas la libron per la vortoj »Senpretenda babilado«. Tiu esprimo sufiĉe bone karakterizas la enhavon. La skizoj, laŭ mia persona opinio, ne havas grandan literaturan valoron, sed kiel ĉiam la vivplena rakontado de la aŭtoro plene kaptas la intereson de la leganto.

La titolnovela korbulo estis korbulo, en kiu liaj gepatroj dum siaj teatrotrupaj vojaĝoj kunportis siajn aktorajn necesajojn. Sed iun tagon la objektoj en la korbulo devis cedi sian lokon al novnaskita knabeto. Bele kaj kortuŝe la aŭtoro rakontas, pri sia frua infanaĝo en tiu medio, pri la unua dolorega sortobato en lia vivo, kiam lia fratinetulo mortis, pri la almozula sako, la reĝa trenajo, la arlekena ĉapo kaj aliaj objektoj, kiuj estis liaj ludiloj kaj formis lian koncepton pri la mondo. La knabo pligrandiĝis, kaj la teatra scenejo, kun ĝiaj komedioj kaj tragedioj, ĝiaj homsortoj, ĝiaj heroeco kaj fieco, ĝiaj abomenaĵoj kaj ĝiaj purbrilaj revoj pri bono kaj belo, disvastiĝis kaj fariĝis grandioze vasta: la mondo estas la scenejo, la dramo estas la vivo de la homoj kaj de la tuta homaro.

La sekvantaj skizoj ne aldonas ion esence novan al

tiu duonsimbola bildo, sed ili bone kompletigas ĝin. Fakte Baghy rigardas la mondon kaj la vivon kiel aktoro. Sed la nuraj rolado kaj drameco ne kontentigas lin. Li serĉas pli ol teatrovidpunktan sencan en la granda ludo, kaj tiun sencan li trovas en idealismo, kiu volas perfektigi la homon kaj altigi ĝin al tiu stato, kiun ni ĝis nun vidis preskaŭ nur en niaj revoj. Pri tiu lia koncepto mi ne bezonas speciale mencii, ni ĉiuj konas ĝin el liaj verkoj.

Kaj mi estas konvinkita, ke ni ĉiuj ankaŭ plene aprobas ĝin, eĉ tiuj kritikistoj, pri kiuj Baghy diras, ke ili riproĉas lin pri tro da realismo, tro da romantiko, tro da cinikismo kaj tro da idealismo. Esence ni ĉiuj aprobas. La diversaj kontraŭaj opinioj koncernas diversajn punktojn en lia verkmaniero, kiuj ne plaĉas al ĉiuj gustoj kaj temperamentoj. Ekzemple mi iom ribelas kontraŭ la sentimentaleco, kiun mi, kompreneble laŭ mia koncepto, kelkloke trovas en liaj libroj, kaj kontraŭ lia maniero esprimi filozofion, pri kiu mi tute konsentas, sed kiun mi volus esprimi en alia maniero. Tamen, pri tiaj punktoj ne havas sencan disputi aŭ riproĉi. Kiom da homoj, tiom da mensoj.

Mia intereso pri la verkoj de Baghy igas min fine fari sinceran rimarkigon, kiun la aŭtoro ne rigardu kiel aĉan kritikemon. Baghy havas figur- kaj situacikrean kapablon kaj kombinpovon, kiuj povus sufiĉi al du bonaj aŭtoroj, kaj li estas eminenta rakontisto. Tial mi bedaŭras, kiel interesita leganto kaj en intereso por nia literaturo, ke li ne ĉiam utiligas sian materialon tiom, kiom li certe povus. Ekzemple en »La teatra korbo« troviĝas skizeto »La tragedio de korniko«. Ĝi estas mezbona rakonteto, sed la ideo estas perlo por verkisto, kaj kun tre malmulte da prilaboro la skizo fariĝus rakonto samnivela kun la plej bonaj de Andersen. Same lia »Hura!« Kun siaj akreco de iu Swift kaj burleskeco de iu Rabelais ĝi kun iom da prilaboro estus povinta fariĝi elstara majstroverko de la tuta nuntempa literaturo. Kaj simile en diversaj aliaj okazoj. Verdire nesufiĉa prilaboro estas karakteriza por la literaturo de nia tempo. Tamen eĉ la plej multaj aŭtoroj la libroj ne multe ŝanĝigas per prilaboro, sed eĉ Baghy ili fariĝus majstroverkoj. En la dediĉita poemeto sur la unua paĝo de »La teatra korbo« troviĝas jenaj linioj: . . . en revoj volon hardi . . . Kaj poste malavare disjetu ĉion are.« Mi deziras al li la forton fari tute male, kiam temas pri literaturo: hardi la revojn en volo kaj esti avara pri siaj ofte mirinde bonaj verkideoj. Eble lia temperamento ne konsentas pri tio, sed se ĝi konsentus, tio alportus al nia literaturo grandegan valoron, kaj ne nur al la literaturo, sed ankaŭ al nia ideo mondo. Ĉar estas grandega diferenco inter la efiko de belvortaj revaĵoj kaj klare esprimataj ideoj. Pri tio atestas, almenaŭ por mi, la impresado de »Hura!« kaj tiu de »Nur homo«, novelo, kiun mi preskaŭ volas nomi perfekta.

La legantoj eble demandas, kial mi ne recenzis La teatran korbon. Mi tamen opinias, ke ĝuste pri ĝi mi skribis. Legu ĝin, kaj vi vidos. *Stellan Engholm.*

NOTO. Ni opinias necesa iom da aldono al la valora supra recenzo. En pluraj interparoloj kun Baghy ni konkludis el liaj vortoj, ke tiujn du »flankojn« de »HURA«, la groteskan kaj la idealan, li kunmetis en la sama libro ĝuste kun la intenco karikaturi ambaŭ specojn de homoj: la malsaĝajn momenthomojn kaj la naivajn idealistojn. Tiel la ŝajna kontrasto inter la du paralelaj okazaĵoj havas logikan celon. Estas bedaŭrinde ke oni tion apenaŭ rekonis ĝis nun, kvankam tia rekono starigas la tutan verkon en tute alian lumon. (RED.)

\*LA INSTRUO DE KARL MARKS. (El la rusa: Gavrillov, Incertov, Polakov, Svedova;) eld. Ekrelo. 53 p.

Bonstila, ardoĉa verketo, aperinta je la 50-a datreveno de la mortotago de Marx. La marksismo, la materialismo nuntempe iĝis centro por la malamika kuglopluvo; reakcie la defendo kaj apologio estas tre arda. La libreto resumas la agojn kaj doktrinojn de Marx kaj poste kompletigas tion per la pritraktado kaj propagando de ties soveta aplikado.

La tradukantoj faris preskaŭ perfektan laboron; ŝajne, nur la korekta uzo de la artikoloj kaŭzis al ili malfacilaĵojn; sed eĉ tio ne estas ĝena. — c

\*KOMENTOJ AL LA KOMUNISTA MANIFESTO. (El la angla: T. Veder. Eld. SAT. 56 p.)

La unua parto estas la komentario de Arnold Petersen al la manifesto. Tiu parto estas ekzamenado de la Usona laborista movado kaj Petersen revizias en kelkaj rilatoj detalojn de la manifesto, kiun li ne akceptas blinde. Lia konkludo: la kapitalisma socio estas destinita al morto. La dua parto estas la antaŭparolo de Engels, verkita en 1888., kiu en kelkaj detaloj rolas kvazaŭ instrukcio pri la apliko de la manifesto, kies atributo »komunista«, signifas teoriantan vidpunkton. Kapitro el verko de Petersen pri la proletara demokratio kompletigas la interese kaj instrue kunmetitan libron.

La tradukinto-kompilinto meritas laŭdon pro sia klara, korekta lingvaĵo. — c.

STELLAN ENGHOLM: AL TORENTO. Novelo. *Dua eldono.* Stockholm, 1934. 93 paĝoj. 20x13.5 cm. Prezo: 1 sv. fr. Eldona Societo Esperanto.

De vidpunkto pri verkista tekniko »Al Toronto« sendube apartenas al la plej bonaj pecoj en nia originala literaturo, kvankam oni povas riproĉi al la aŭtoro, ke li lasas sian heroon, malriĉan kaj penegre panakirantan, sed junan kaj inteligentan laboriston, tial ignoreme kaj — mi dirus — eĉ neinteligente konsideri la diversajn socialajn problemojn, kiuj ekturmentas lian junan cerbon. Sed tion oni fine pardonas al la juna heroo, kiun absorbas arda amo al senhelpa junulino, kaj oni ĝojas, kiam la sorto kunigas ambaŭ por ĉiam.

Engholm estas talento, kaj ni rajtas atendi de li ankoraŭ multon interesan. *I. Lejzerowicz*

JULIO BAGHY: SUR SANGA TERO. Mozaikromano. Daŭrigo de la romano »Viktimoj«. Eldono de Szalay, Budapest, 1935. 264 paĝoj. Mendebila eĉ la aŭtoro: Budapest, VII., Rottenbiller-u. 66 kaj eĉ »Literatura Mondo«.

Fine aperis la jam delonge atendita daŭrigo de la fama romano »Viktimoj«, la romano »Sur sanga tero«. La avida atendo kaj scivolemo de la esperantista legantaro estas bone komprenebla, se ni konsideras, ke la »Viktimoj« havis grandiozan, eksterordinaran sukceson en la originala esperanta literaturo, kaj nun prepariĝas jam ĝia kvara eldono!

Preskaŭ ĉiu nacio havas jam sian propran militeman romanon kaj ni povas fieri, ke nia malgranda esperanta literaturo estis inter la plej unuaj, kiu akiris tian per la »Viktimoj«. (Eble nur la fama Barbusse-romano, la »Fajro« antaŭis ĝin kronologie.)

La aŭtoro volonte donas subtitolojn al siaj verkoj, ekzemple »Hura!«-n li nomas: »ne romano, nur grimaco«, kaj ĉi tiun: »mozaikromano«.

Efektive tiu ĉi romano konsistas el pli-malpli grandaj epizodoj, el kunplektitaj mozaikbildoj. Ĉefheroon ĝi eĉ ne havas. Ĝia ĉefheroo estas mem la historio.

Baghy en ĉiu sia verko serĉas novajn esprimformojn. Certe tial li elektis nur la mozaik-specan prezentadon de la okazaĵoj, ĉar ĝi konvenis pleje al la historia temo.

Ja la temo estas historie vera, la tono ĝenerale malhela, drama: la sangaj okazintaĵoj revoluciaj inter 1918—20 en la malproksima, sangaturita Siberio. La blanka kontraŭrevolucio regas tiam en Siberio, kiun helpas la diversaj entente-taĉmentoj, precipe la japanoj kaj la fama ĉeha-legio, sed, ĉar ili ĉiuj havas diversajn interesojn kaj celojn, ili konstante ĵaluzas unu la alian. Okazas intrigoj, perfidoj, politikaj komplotoj, ĉie regas kaoso, sango, perforto kaj morto. Ili perdas iom post iom la simpatiojn de la civila loĝantaro, precipe pro la deviga rekrutigo. Ankaŭ la t. n. partizanoj, kiuj embuskas en la senfinaj praarbaroj, konstante embarasas ilin per surprizaj atakoj. Kaj dume la ruĝa fronto komencas ofenzivon, kaj ĉar la kontraŭstaro ne estas jam unueca kaj forta, ĝi venkas,

kaj ĉiutage ĝi pliproksimiĝas nehalteble el la direkto de la Ural-montaro.

En tia medio vivas la mizeraj militkaptitoj, kiujn volus akiri ĉiu partio, sed kiuj havas nur solan deziron: hejmeniri...

La homa animo baraktas, suferas aŭ bestigiĝas en tiaj tempoj. La revoluciaj ondoj inundas ĉion, la eventoj kalejdoskope pelas unu la alian, la ŝancoj konstante alternas, neniu estas konfidinda, ĉiu estas malamiko. Malsato, epidemioj ekstermas la homojn, kaj ili ne demandas, al kia politika partio vi apartenas. En tia terura, sanga uragano naniĝas la homo. Sed Baghy, kiu minas en la profundo de la animoj, sukcesas trovi ofte verajn trezorojn, eĉ en la plej mizeraj parioj. (Vidu Fiza-n!)

Sed malgraŭ la tragika temo, la romano ne estas sufokaera. Ofte heligas ĝin humoro, ofte ni renkontas bonajn, simpatiajn figurojn, eĉ malnovajn konatojn, ĉar Baghy havas kelkajn ŝatatajn figurojn, kiujn li volonte revivigas por nia ĝojo.

Certe la plej simpatia figuro estas Curin, la infan-  
anima giganto, li ensteliĝas en nian koron neforgeseble. Poste Striĉkov, la instinkte bonkora oficiro, la »senlangulo«, kiun ĉiu amas kaj estimas. Li estas vera karaktero. Fiza, la iama ĉiesulino estas kuraĝa heroino, disciplinkona, tamen pardonema, varmkora, tipa virino.

La plej romantikaj figuroj de la romano estas Bardy, la songohomo, kaj Poliena Aleksandrovna, la jam pli reale pensanta vidvino. Ilian malĝojan kaj kortuŝan amon, ilian idilian amikecon pentras plej delikate la aŭtoro.

Inter la multaj rolantoj precipe bone sukcesis la epizodfiguroj. (Nun mi rimarkas, ke mi uzas teatrajn esprimojn, sed ne mi kulpas pri tio, kial verkas Baghy tiajn dramefikajn epizodojn aŭ vervajn dialogojn, kiuj postulas surscenejigon?)

Jen la naŭva Mihok, jam klasika figuro de la Baghy-verkoj, kiu servas nun kiel oficirservisto ĉe la leonvoĉa Jaŭtenanto Petroff, kaj kiu konstante timas konfliktojn, akcidentojn. Jen Izor Steiner, la sagaca, kara Izorĉjo, kiu faras bigamion por savi la edzinon de Striĉkov. Kaj kiun ne amuzas kaporalo Petro Furgony, la »sovaĝa hungaro«, liaj spicaj diroj kaj lia amikeco kun la eterne malamika aŭstro, kun la maljuna Lobmajer. La aŭstro havas ĉarman, pintnazan filinon, Lisbet, kaj kaporalo Furgony fine ekamas ankaŭ ŝin de malproksime. Bonega estas Lio Fu Peng, la humila ĉino (kiel trafe povas Baghy karakterizi per kelkaj vortoj la parolmanieron de la diversaj naci-anoj!) kaj ankaŭ la filozofie rezignema kolbasfabrik-kolono Podenko.

Kaj ne nur la simpatiaj kaj epizodaj figuroj restos en nia memoro, sed ankaŭ la aliaj, precipe la figuro de Nikolaj Karesev, la kozakserĝento de la sangavida kozak-atamano Kalmukov. Li kondukas plej aĉe kontraŭ sia edzino, fariĝas spiono, li estas absolute disciplinskavo, sed tre kuraĝa soldato.

Estas kelkaj neforgeseblaj epizodoj: ekzemple la nuda baletto, kiun organizas Kalmukov, senvestigante la t. n. civilajn kaptitojn; la perfido de Karesev kontraŭ Curin; la emociplena kristnasknoktmeza preĝeja sceno kun Bardy kaj Poliena; la intima interparolo inter Striĉkov kaj Bardy pri la rusa animo kaj popolo; la morto de la ĉarpentisto Jegorov; la adiaŭo inter Bardy kaj Poliena sur la kajo de Vladivostok antaŭ la hejmenreveno, ktp.

Entute la verko estas sugestiva kaj ĝia stilo estas tre zorga, bonega. *László Halka.*

✓ LA ESPERANTA LITERATURO. Demandaro kaj resumo de originalaj verkoj. M. de Waard. Eldonis Internacia Cseh Instituto de Esperanto, Den Haag, 1934. 64 paĝoj. Formato 13,5×20 cm. Prezo: ned. guld. 0:75.

Kiel skribite en la antaŭparolo, tiu verketo ne prezentas la historion de nia literaturo, sed nur montras la vojon al pli larĝa interkonatiĝo. Ĝi celas pli speciale la kandidatojn al la ekzamenoj de kapableco en Nederlando, sed ĝi certe trovos varman akcepton ankaŭ ĉe pli vasta publiko.

La tre oportuna arango kaj dispartigo de la materialo

pruvas la multjaran sperton de la kompilinto. Oni trovas unue la postulojn de la diversaj ekzamenaj komitatoj kaj liston de la studentaj libroj kun mallonga sed trafa karakterizo pri ĉiu el ili. Sekvas simpla demandaro, kies nura tralego plene pravigas la aperon de la libro. Ĝis nun efektive mankis tiaspeca verko, kiu estas nek skeleta katalogo nek dika volumo, sed donas en konciza formo sufiĉe vastan superrigardon al la temo.

Sur kelkaj paĝoj, sed ne sen bedaŭrindaj mankoj, estas skizita kaj sisteme ordigita nia tuta literaturo, kun datoj, informoj kaj specialaj notoj pri la ĉefaj verkistoj, libroj kaj eldonejoj. Kompreneble la originala literaturo estas aparte traktata. Apartan mencion meritas la resumoj de originalaj verkoj, rakontitaj ne nur fidele kaj vigle, sed ankaŭ en plej agrabla maniero. Cetere en la tuta verko, la zorgo kaj ame uzata stilo, tre konvena al tiu speco, rimarkinde agrabligas la studadon. *H. V.*

✓ INTERNACIA GRAMATIKO DE ESPERANTO. Kurso kompleta, sistema, kritika. Leopold Kitzler. Eldonis Heroldo de Esperanto, Köln, Brüsseler Str. 94, 1934. 110 paĝoj. Formato 20×13,5 cm. Prezo: Mk. 2.30.

Pro la ĉiam evoluanta literaturo kaj la grada akomodigo de la lingvo al la ĉiutaga uzo, la verkanto de gramatika libro staras antaŭ malfacila tasko. Ĉi tie la ĉefa merito de la aŭtoro estas lia provo densigi sur 100 paĝojn materialon multe pli ampleksan, ol oni ĝenerale supozas. Kompreneble tio ne iras sen kelkaj malhelpoj kaj la klareco plurloke suferas pro la troa streĉiteco de la teksto.

Ekzemple la verkinto ne opiniis necesa la enkondukon de aparta ĉapitro pri la sintakso, kiu tamen meritas detalan pritrakton en kurso *kompleta, sistema* kaj *kritika*. Aliflanke la utilon de la unupaĝa ĉapitro pri la poezio mi ne bone komprenas, tiom pli, ke ĝi rilatas nur la apostrofon, cetere troveblan ankaŭ en prozo.

Krome, kial forestas la litero ŭ el la alfabeto? Al la terminoj *subjektivo* kaj *objektivo*, kiuj povas naski konfuzon, ĝuste ĉar tiuj radikoj jam havas alian klare difinitan signifon, ŝajnas preferindaj la ĝenerale uzataj *nominativo* kaj *akuzativo*. La esprimo *superordigitaj* propozicioj estas nenecesa komplikaĵo; same *neige, jesige, sufiĉeco* anstataŭ la logikaj *nee, jese, sufiĉo*: Kial grati la dekstran oreilon per la maldekstra mano?

Kelkajn asertojn plene kontraŭdiras la faktoj: ekzemple »ĉiu prepozicio havas nur unusolan, unufoje por ĉiam fiksitajn signifon...« Nu, la Plena Vortaro registras dekunu diversajn signifojn ĉe la prepozicio DE.

Sed tiuj kelkaj mankoj, kompreneblaj ĉe la unua eldono, ne forprenas la valoron de multaj tre bonaj partoj. Ekzemple la klarigoj pri la afiksoj kaj la kunmetitaj verboformoj estas originalaj kaj interesaj. La vorto *partiklo* ŝajnas uzinda kaj preferinda al *partikulo* trovebla en la Plena Vortaro.

Ankaŭ la tuta redaktado de la libro atestas pri granda zorgemo kaj deziro al plena sistemo. Oni povus eble riproĉi, ke kelkloke la stilo kaj prezento impresos iom malfacilaj al la kursestroj, por kiuj la libro estas destinita. Sed la rimarkinda abundo de bona materialo kaj same bonaj ideoj, kiun la verko entenas, rajtigas nin esperi pri baldaŭa reviziita eldono, kiu povas al si konkeri tre larĝan publikon. *H. V.*

JARLIBRO DE SAT 1935. Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris XX. Avenue Gambetta, 67. 24 paĝoj. Formato 22,5×15 cm. Suplemento al la n-ro 426 de Sennaciulo. Tiun broŝuron ricevas nur la membroj de SAT. Entenas krom la kompleta listo de la perantoj, la statuton de Sat, informojn kaj datojn pri la Esperantista Movado kaj liston de la Esperanta gazetaro.

✓ PARIS DUM PRINTEMPO. Eldonis Foire de Paris, 23 rue N. D. des Victoires, Paris 2e. 1935. 8 paĝoj. Formato 23×20 cm. Senpaga, ilustrita faldprospekto tre lukse eldonita.

**LLOYD-VOJAGOJ** 1935. Norddeutscher Lloyd, Bremen, 1935. 14 paĝoj. Formato 29×21 cm. Senpaga prospekto sur tre bona papero, kun detala plano de la diversaj kroz-vojaĝoj. Grava sukceso por nia lingvo.

**SCOTTISH ESPERANTO CONGRESS** Havebla ĉe Robert Stewart F. E. I. S., Rupert Street, Glasgow C. 4. Formato 15×25 cm. Ilustrita faldprospekto, kun tre bela landkarto. Eldonita okaze de la kongreso en Rothesay en majo 1935.

**GVIDFOLIO TRA DIKSMUIDE.** Eldonita de la Turisma Oficejo, Urbdomo, 4-paĝa. Formato 14×22 cm. Reklamas plurajn vidindaĵojn de funebra speco: domruinojn, militmonumentojn, soldattombejojn kaj Tranĉeon de la Morto. Feliĉe troviĝas en la urbo ankaŭ rimarkinda katedralo kaj interesa muzeo.

**HEREZAJO,** Dua sensanga eldono. Letero de Lanti. **Mendebla** ĉe la aŭtoro: 14, Av. de Corbéra, Paris 12. 8-paĝa. Formato 27×21 cm. Prezo: svfr. 0.10 por sendkosto. 1935. Sur la kovrilpaĝo staras la jena rimarko: »La legantoj estas tamen petataj atenti, ke la lastatempaj okazintaĵoj en Sovetio . . . pravigas pli ol necese la enhavon de ĉi tiu pamfleto«.

**UNIVERSALA KAJ INTERNACIABRUSELA EKSPOZICIO** 1935. 4-paĝa. Formato 14,5×20 cm. Ilustrita prospekto kun detala plano de la ekspozicio, okaze de la Centa Datreveno de la Belga Sendependeco. La granda eldonkvanto kaj vasta dissendado atestas pri la fervora klopodo de la koncerna propaganda komitato.

**INTERNACIA FOIRO EN BUDAPEST,** 3—13 majo 1935. 4-paĝa. Formato 8,5×19,5 cm. Eldonis la Foirolicejo, Alkotmány-strato 8, Budapeŝto V. Kun bela kovrilpaĝo. Enhavas diversajn, tre utilajn informojn pri vojaĝaj, restadaj kaj valutaj favoroj. Krome estas menciinda la eldono de kartona afiŝeto en formato 24×17 cm. kun tre sugestiva bildo, kaj ankaŭ de glumarko en du koloroj.

**SVISLANDO.** Alpa poŝtaro. Somero 1935. Eldonis la Generala Direkcio de la Svisaj Poŝto kaj Telegrafo, Bern. 6-paĝa. Formato 8×20 cm. Tre bele presita kaj ilustrita faldprospekto kun kompleta tabelo de la poŝtaj aŭtolinioj kaj utilaj informoj pri la vojaĝoj. Tiu presajo apartenas al la plej trafaj E-propagandiloj, kaj inde prezentas la bonegan organizon de la svisa poŝtdirekcio.

**VARNA,** La Reĝino de la Nigra Maro. Eldonis la Komununa Somerrestada Oficejo, Varna. 12-paĝa. Formato 10×20 cm. Faldprospekto bona laŭ teknika vidpunkto; la trafe aranĝitaj bildoj tre taŭgas por reklami Varna, unu el la plej malmultekostaj restadlokoj dum somero.

## RICEVITAJ LIBROJ

**ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO.** Redaktis O. Ginz kaj St. Kamaryt. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝto, Mester-u. 53. V. 5. 1935. 468 teksto- plus 32 bildopaĝoj. Formato 23,5×15,5 cm. Prezo: Broŝurita svfr. 12.—, bindita 13.50, plus 10% por sendkosto. La lasta libro de AELA 1934.

**ESPERANTAJ HISTORIETOJ:** Peter Frey. Eldonis la aŭtoro, Clausenvej 26, Haderslev (Danujo). 1935. 48 paĝoj. Formato 13,5×19,5 cm. Prezo: svfr. 0.70.

**PASKO:** A. Strindberg. Tradukis S. Engholm. Eldonis Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm, Fack 698. 1935. 88 paĝoj. Formato 14,5×21 cm. Prezo: Krs. 1.50.

**NOVA VORTARO JAPANA-ESPERANTO;** J. Okamoto. Eldonis Japana Esperanto Instituto, Tokio, Hongoo

**Motomaĉi** 1. 1935. 824 paĝoj. Formato 7,5×15 cm. Prezo: svfr. 7.50 lukse bindita.

**KURS I ESPERANTO.** Dr. F. Szilágyi. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Fack 698. 1935. 96 paĝoj. Formato 22,5×15 cm. Prezo: Krs. 2.— Ilustrita.

## Informoj al la membroj de AELA

Fine aperis la longe atendita dua volumo de la Enciklopedio kaj ĉiu orde paginta membro ĝin jam ricevis. Al tiuj membroj, kiuj nek anoncis sian eksigon nek pagis sian kotizon por 1934 aŭ ŝuldas ankoraŭ kelkajn sumetojn, ni sendis apartan sciigon kun la peto, ke ili pagu ĝis la fino de tiu ĉi monato.

La Ĉeĥoslovaka Antologio jam de du semajnoj staras ekspedita: ni havis pri ĝi doganan malhelpon kaj devis nin okupi pri longaj formalajoj. Feliĉe, ni ĵus ricevis la informon, ke ĉio kontentige solviĝis. La verkon ni do dissendos en la plej proksimaj tagoj.

Per la livero de tiuj du verkoj, ni estos plenumintan promeson por la jaroj 1933 kaj 1934, kaj ni rajtas esperi, ke spite la bedaŭrindan prokraston, ni tion faris je la plena kontento de niaj fidelaj abonantoj

### Libroj de 1935

Plene kompostita kaj jam enpagigita estas la *Plena Gramatiko de Esperanto*, de Kalocsay kaj Waringhien; ĝi aperos en la fino de tiu ĉi monato.

Aperos sinsekve dum la somero:

Jerome K. Jerome: Tri viroj en Boato, ne kalkulante la hundon,

Edmond Privat: Interpopola paco,

Hekler—Kalocsay: Arthistorio II.

Van Loon: Rigardu la Teron.

La ceteraj verkoj aperos ĝis la fino de la jaro.

Guste pro la kuna apero de la Enciklopedio II kaj Ĉeĥoslovaka Antologio, ni iom malfruigis en la programo de tiu ĉi jaro. Tamen ni povas certigi niajn membrojn, ke ni laboras plej aktive por regajni la perditan tempon kaj faras nian eblon por ilin kontentigi ĉiurilate.

## AVERTO

Ni konstatas, ke kelkaj samideanoj reprenis fragmentojn aŭ artikolojn el niaj eldonaĵoj kaj precipe el la »Enciklopedio de Esperanto«, ne petinte antaŭan permeson kaj ne indikante la fonton. Ni informas la esperantistaron, ke estonte ni lege persekutos ĉiun personon, kiu kaŭzis domaĝon al nia eldonejo per senrajta represo.

## LITERATURA MONDO.

### KOREKTOJ

En la »Listo de la nunaj Esperantaj Gazetoj«, aperinta en Lingvo-Libro N-ro I. 1935, niaj legantoj bonvolu korekti la jenon:

1. La revuo »ISK« ne plu aperas; ĝin anstataŭas LA KRITIKA OBSERVANTO, redaktita en London.

2. La ĝusta adreso de la »VERDA REVUO« estas WIEN VII, kaj ne II.

3. La »ESPERO KATOLIKA« aperas nun regule en Helmond (Nederlando).

En la ĉi-jara unua numero de »Lingvo Libro« La recenzon pri LA JUDA STATO verkis Lejzerowitz ĝis la lasta steleto, kaj nur la posta parto estas de Waringhien.

La duan recenzon pri la RILKE-traduko (post L. Braun) verkis G. Waringhien.



# LINGVO \* LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt IX, Mes-  
ter-utca 53. V. 5. Hungarujo.  
Aparte aĉetebla. Unu numero  
kostas 0.20 sv. fr. aŭ egalvaloron.  
Tri numeroj kune ekspedataj  
kostas nur 0.30 svisaj frankoj  
aŭ proksimuman egalvaloron.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvaronjare • Nro 3. 1935

## Plena Gramatiko de Esperanto\*

(Vorto kaj Frazo)

De K. Kalocsay kaj G. Waringhien

Literatura Mondo, Budapeŝt, 1935.

Ni Esperantistoj vere rajtas fieri, ĉar ni nun posedas la nepre necesajn ilojn de ĉiu altnivela lingvo, nome memlingvaj vortaron kaj gramatikon. La Plenan Vortaron de Grosjean Maupin, Esselin, Grenkamp-Kornfeld kaj Waringhien nun povas akompani nia Plena Gramatiko, pri kiu la lastnomita leksikisto, reprezentanta la tradicion de la okcidentaj hind-eŭropaj lingvoj, kunlaboras kun egale famkonata verkisto, reprezentanta tiun de la ugro-finnaj lingvoj — sufiĉa garantio por la senpartieco kaj internacieco de la verko. Se la Plena Vortaro estas nia »La Rousseau« aŭ »Spachbrockhaus«, certe la Plena Gramatiko povas kompariĝi eĉ kun »La Pensée et la Langue« de Brunot. Kompreneble ĝi ŝuldas multe al la laŭdinda revizio de la Esperanta verko de Fruictier, farita de Grenkamp-Kornfeld, pionira verko, kiun la nuna gramatiko grandskale etendas kaj kompletigas.

La plano estas bone elpensita kaj la faktoj klare prezentitaj. La materialo enordigas en kvar partojn: la fonetiko, la vortfarado, la morfologio kaj »sinetio«, la frazo. La »sinetio« el la greka *synethēia*, »uzado«, pritraktas la funkciojn de la diversaj formoj (»morfemoj«) troveblaj interne de vortklasoj ekde la substantivo ĝis la interjekcio; ĝi entenas ekzemple sciigojn pri propraj nomoj, komparacio, tempoj, voĉoj, (aktiva, pasiva, faktitiva) kaj aspektoj de la verbo inter multaj aliaj temoj. Tial ĝi proksimiĝas al tio, kion celis la germana sintaksisto John Ries per la termino *Wortlehre*. Aliflanke la kvara parto nomita La Frazo estas kvazaŭ *Wortgruppenlehre*, t. e. studo pri vortgrupoj, ĉar komenciĝante per vortsintakso de grupoj, en kiuj la kerno-vorto estas jen substantivo, jen adjektivo ktp., ĝi antaŭeniras al la detala esplorado de la »propozicioj« en iliaj diversaj specoj (indika, ordona, ktp.), strukturo kaj kombiniĝo en kompleksan

frazon, finiĝante per ĉapitro pri la interpunkcio.

La verkistoj konstataj kaj registras prefere ol ke ili starigas normojn, kaj oni vere miras pro la etendeco de ilia legado. Ili ne hezitas proponi rekomendojn ĉe konflikto de opinioj, kaj kompreneble ne ĉiu plene konsentos kun ilia vidpunkto, kvankam la decidoj estas ĉiam lerte motivitaj. Ili senhezite uzas novajn vortojn, ĉu fakterminojn, kiaj sinetio, subjunkcio »suborda konjunkcio«, paseo »estinta tempo«, aŭ neteknikajn esprimojn kiaj ento »estajo«, negi, opone al, aŭ neoficialajn sufiksojn kiaj -enda, -eska, -iva. Tion fari ili plene rajtas pro sia ĝisfunda zorga konado de nia lingvo. En la diskuto de la mal-vortoj, kie ili citas multajn neoficialajn vortojn (strikta, povra, febla ktp.) por uzo paralela kun la ekzistantaj mal-vortoj, ili nur sekvas la ekzemplon donitan de Zamenhof mem (strikta, amara, stulta, ktp.); la recenzanto kaj eble aliaj volus iri plue kaj subteni la enkondukon de tiaj internaciaj vortoj, kiaj \*prizono, malliberejo\*, \*preventi, \*impedi por la du signifoj de malhelpi — cetere, ankaŭ \*kutelo, \*kirko kaj \*skolo (jam en IPR) por la pli specifaj signifoj de tranĉilo, preĝejo kaj lernejo (kiel jam ŝpato por fosilo).

Estas tiel granda riĉaĵo da punktoj priparolindaj, ke oni povus skribi tutan libron por diskuti ilin.\*\* Ni kontentigu menciante nur malmultajn valoraĵojn: la problemo de la prononco de la vokaloj (vasteco malvasteco), la analizo de vortkunmetoj kaj derivaĵoj, la sekcioj pri la refleksivo kaj pri la modoj post kvazaŭ kaj se. Tre utilaj estos certe la listoj de verboj kun iliaj prepozicioj, la prepoziciaĵoj (dan k' al; flanke de) kaj la interesa klasigo de la interjekcioj. La verko finiĝas per bona indekso.

Kun dankemo ni Esperantistoj sincere gratulas niajn samideanojn pro verko, kiu dum longa tempo povas servi ne nur kiel trezorejo de niaj lingvaj formoj, sed ankaŭ kiel modelo eĉ por la verkado de gramatikoj nacilingvaj.

W. E. Collinson

\*\* Pri kelkaj punktoj mi ankoraŭ intencas reparoli sur tiuj ĉi paĝoj.

\* Formato 23.5×15.5 cm. 372 paĝa kun densa kompostito. Unua volumo de la lingvo-serio de AELA 1935 (kotizo 10.— frsv. inkl. afrankon). Prezo broŝ. 8.—; bind. 9.50 svfr. Ekzempleroj sur senligna papero en ledimita bindo: 10.50 svfr. Al ĉio 10% por sendkostoj.

# Kritika esploro pri „La Plena Vortaro“\*

— C. M. Butler —

La unua eldono de ĉi tiu vortaro aperis en 1930. Oni recenzis ĝin en *International Language* en Majo, 1931. La laŭdo tie donita al la verko estas aplikebla ankoraŭ pli forte al ĉi tiu dua eldono. Diversaj makuloj, kiujn oni kritikis en la unua eldono, estas nun forigitaj. Pro la uzo de iom malpli grandaj presliteroj oni sukcesis meti multe pli da materialo en la saman nombron da paĝoj; malgraŭ tio, plibona tipografia arango faras la libron eĉ pli facile legebla ol ĝia antaŭulo. Kvankam neniuj vortaro povas esti vere »plena«, tamen ĉi tiu verko montras grandan paŝon en la direkto al tiu *Plena Vortaro*, kiun D-ro Zamenhof sentis bezonata (Vidu *Lingvan Respondon* 33). Prof. Grosjean-Maupin, ho vel ne plu estas inter ni; sed feliĉe li vivis, ĝis li finis la revizion de la verko por la nuna eldono.

Oni devas atenti, ke ĉi tiu libro neniel estas verko oficiala. Tamen pli kaj pli, kaj prave, oni ĝenerale rigardas ĝin kiel aŭtoritaton, al kiu la serioza studento povas sin turni por konsilo; kaj (ekster la nefinita *Enciklopedia Vortaro de Wüster*) ĝi estas la plej plena vortaro tiuspeca. Jen kial mi kuragas, tre humile, kaj kun profunda admiro, skribi la jenajn notojn, mi esperas, ke ili utilos al la lernanto, kaj eble eĉ helpos al la plibonigo de la verko en tria eldono, espereble baldaŭ bezonata. Kvankam mi plejparte celas korekti kritikindaĵojn, oni ne supozu, ke mi ne alte taksas kaj plenvalore konsentas la tre grandan valoron de la verko.

**RIMARKOJ.** Al multaj vortoj oni aldonis utilajn konsilojn (RIM.) aŭ avertojn pri eraroj evitendaj (ekz., ĉe *atlaso* (ne = *maparo*); *certa* (ne = *iu*); *domaĝi* (ne = *difekti*); *lasi* (ne antaŭ pasivsenca infinitivo), *sugesti*. La plimulto el tiuj rimarkoj estas treege valora. Sed troviĝas esceptoj. Ekzemple: ĉiujn tri rimarkojn sub *iam*, kaj rimarkojn 3 kaj 4 sub *kies*, mi konsilas forstrekii, kiel senutilajn aŭ rekte erarajn.

**PUNKTADO** (interpunkcio) estas afero de gusto. Tamen, multloke mankas tute necesaj komoj, aŭ troviĝas komoj superflujaj. Ĉiokaze, en Zamenhofa citaĵo oni devus konservi la Zamenhofan punktadon. La mallongigoj *k ke ks ktp*, sen punkto, estas malbelaj; eble per la ellaso de la punkto oni celis ŝpari lokon.

**ELIZIO.** Post la jaro 1893 Zamenhof mem neniam uzis *l'* anstataŭ *la* en proza teksto. Kompreneble, la aŭtoroj rajtas aspergi apostrofojn sur la paĝojn laŭvole; sed ili ne rajtas enkonduki ilin en Zamenhofan tekston. Aliflanke, ili kompletigis vortojn, ĉe kiuj Zamenhof mem uzis apostrofon (ekz., *Ho, mia koro!*).

**MAJUSKLOJ.** La uzo aŭ neuzo de majuskloj estas alia demando pri gusto. Al la nuna skribanto plaĉas la uzado de Zamenhof en siaj lastaj verkoj (*La Biblio, Fabeloj*). Anglujo, Anglo, Angla. Certe, oni dube rajtas aliigi la uzadon de Zamenhof en citaĵoj el lia plumo. Same nedefendeble agis D-ro Dietterle, aliigante la skribkutimojn de Zamenhof en la alie bonega *Originala Verkaro*. Skribi *esp.* anstataŭ *Esperanto* estas ja rekta eraro, ĉar Esperanto estas propra nomo. Similajn rimarkojn oni povas fari pri *atenano, esperantisto, diservo, faraono, S-ro G, k. s.* Aliflanke, mi trovas kelkafoje majusklon, kiam ĝuste oni devas uzi minusklon (ekz., *S-ro* 248h, *Lingvo Internacia* 113h).\*\*

**PROPRAJ NOMOJ.** Oni rigardas la lanknomojn kiel problemon ankoraŭ nesolvitan; tamen kun plezuro mi rimarkas, ke oni ĝenerale uzas la ĝustan formon (*-ujo, ne -io*). La formoj *Jezero, Jeruzalem, Kolombo, Venecio, Egipto*, devus esti *Jesuso, Jerusalemo, Kolombo, Venecio, Egiptujo*; kaj en citaĵoj el *La Biblio* oni devus konservi

\* Traduko kaj pligrandigo de artikolo jam aperinta en *The British Esperantist*.

\*\* Por oportuneco de konsulto, dividi la maldekstran kolumnon de ĉiu paĝo en kvaronojn (a, b, c, d), kaj la dekstran kolumnon same (e, f, g, h).

la Zamenhofan formon (ekz. *David, Jehuda, Jeremia*) senŝange.

**RADIKOJ ELLASITAJ AU ALDONITAJ.** Oni ellasis 129 radikojn, kiuj havis lokon en la unua eldono; prave pensante ilin tro teknikaj por vortaro ĝenerala. Ekz. *dida-nima, diploporoj, ekstrofo, emarginulo, galeopitekojdoj*. Aliflanke, oni aldonis 236 radikojn. Notindaj inter ili estas aŭtenta, *damaĝi, damni, erupti, eskapi, evento, falto, fariseo, ĝentlemano, hipokaŝtano, imanenta, introspekto, kampanjo, kiosko, mapo* (angle, *a map: lankarto* ne tre taŭgas, ĉar ofte ĝi ne estas *landa*, kaj kutime ĝi ne estas *karto!* *Map-i, -isto, -ado, -aro; stelmapo.*), *masakri, nano, paraŝuto, plejdo, poligamio, rekviemo, skolto, sledo, snobo, stabila, stoko, stumbli, ŝminki, taŭtologio, telepatio, tonelo*.

Feliĉe, oni ne enmetis kelkajn lastmomentajn novaĵojn modajn sed espereble baldaŭ forgesotajn. Tamen, estas surprize ne trovi vortojn kiaj *idiosinkrazio, jubili, mesaĝo, spuro, suspiri, vagabondo*. Kaj certe estas bedaŭrinde, ke mankas Zamenhofaj vortoj el *La Biblio*: ekz., *ambono* (Neh. 8. 4.), *kolumno* (Jer. 36. 23); *kultivi* (Zeh. 13. 5); *upupo* (Lev. 11. 19). Tre pripensinda estas *tajpi* (proponita de Waringhien); *stenotajpistino* estas pli mallonga ol *stenodaktil(ograf)istino*; tamen eĉ ĉi tio estas preferinda ol *stenografist-maŝinskrivistino*; *Nito* (329g) devus esti *vinkto*: *vinkto* estas nun oficiala. Cetere, kial ŝanĝi vorton jam uzitan preskaŭ de la komenco de nia lingvo?

Kelkaj radikoj signitaj per *Z* estas dube Zamenhofaj: ekz., *litin, precipit, trubadur, substitu, ŝablon, variete*. Aliaj estas Zamenhofaj, kvankam mankas la signo *Z*. Ekz., *ful, kokerik, krokus, lili, monolit, monografi-nacionalism, neŭrasteni, orientalist, paralogism, potencial, regulator, sandr, telepati, teozofi, tranĉe, vici*.

**CITAĴOJ.** Valora trajto de la verko estas la multa uzo de citaĵoj. Kelkaj citaĵoj signitaj per *K* ne troviĝas en *Fundamenta Krestomatio* — eble kelkafoje oni akcidente uzis *K*, anstataŭ *B*, kun la signifo *Kabe*. Kelkaj citaĵoj signitaj per *K* vere estas *B*, kaj inverse. Kelkaj signitaj per *Z* ne estas troveblaj en la Zamenhofa verkaro: eble ili estas prenita el la ĝis nun ne eldonita Vol. IV. de *Fabeloj*. Sed la valoron de la Zamenhofaj citaĵoj grave malpliigas la fakto, ke granda nombro estas mis-citita. Mi posedas liston de 426 aliigoj de la originala teksto, aldone al 37 okazoj de ŝanĝita vortordo, 53 de aldone de ne-Zamenhofaj vortoj aŭ frazeroj, kaj 147 de ellaso (mi ne kalkulas aliigojn rilate Zamenhofan punktadon, literadon aŭ majuskladon.) Mi tute ne deziras supozigi, ke oni prezentas Zamenhofan tekston intence falsitan sed estas certe, ke multaj citaĵoj ne estas ekzaktaj laŭ la vidpunkto de laŭvorta ĝusteco, kaj pro tio, ne rajtas havi post si la literon *Z*.

La **ELLASOJ** ordinare fontas el la neceso por mallongigo, pro manko de spaco. Ekzemple: *al (ili) ĉiuj* 88d; *sed (nur) montetoj* 116a; *sur (plena) nesciado* 137c; *(vin) gardu* 179a; *(plej) profite* 186e; *(tutan) indon* 192b; *ŝi devis (iri) ĉerpi akvon* 200c; *(teruran) malamoni* 200d; *inter (la) tero kaj (la) suno* 215a; *(ek)deziris dikti* 227h; *(tiam) kiam* 228h; *(la) (Bulonja) Deklaracio* 280c; *(simpla) malvero* 280e; *en (la) ĉielon* 289d; *de (la) tero* 289e; *seĝo de (praktika) filozofa* 289f; *naŭze (ofte) ripetata* 326a; *lia (Z: mia) lango alĝluis al (mia) palato* 348h; *vi faris (vian popolon) Izrael* 375e; *(jam) neniam revenos* 401c.

**SANGO DE VORTORDO** Zamenhofa, kvankam afero relative negrava, estas apenaŭ defendebla ĉe citaĵo, kaj se la frazo estas konata, la ŝanĝo ĝenas la leganton. Ekz., *mi salutas vin (Z: mi vin salutas)* 290g; *la hispanan lingvon (Z: lingvon hispanan)* 463e. Zamenhof skribis *iam havis* 290g; *ekzistadon fizikan* 191h; *ŝuldojn kreskigas* 267g; *al la vortoj montraj la vorton «ĉi»* 318h; *konscienco trankvila* 479b; *detale paroli* 483c; Kial ŝanĝi la Zamenhofan vortordon: *kuris al li renkonte, tordi al iu la ha-*

# Pri la pseŭdonimoj

Dum la stockholma kongreso prof. Migliorini prelegis pri la nomoj, pri la origino de la nomoj kaj li konstatis, ke la primitivaj popoloj proprigis sorĉforton al la nomoj. *Isis* venkas *Rà-n* tiamaniere laŭ la egipta fablo, ke tiu perdas la sorĉforton de sia nomo. Laŭ sprita artikolo pri la sama temo (*Literatura* 15. aug. 1935.) ŝajne ankaŭ la verkistaj pseŭdonimoj, kiuj definitive kaj originale diferencas de la normalaj, burĝaj familiaj nomoj, havas similan sorĉforton. Ili sugestas siajn mastrojn, kelkfoje tre perforte, faras barojn al iliaj tendencoj, sed samtempe la pseŭdonimoj sugestas ankaŭ la publikon kaj krom la unua impresio, ili eĉ prizorgas la laboron de la enkonduko, informo pri la verkistoj. Ni pensu nur pri la unua pseŭdonimo de la Majstro: d-ro Esperanto.

Do, la pseŭdonimo, kies celo estas originale la kaŝo de la verkista individuo, ofte demaskas la internan esencon de la verkisto, eĉ tion, kio ne trarompas sin el la verko, dum la griza burĝa nomo povas certigi pli grandan anonimecon. La memelektita pseŭdonimo preskaŭ ĉiam estas perfidanto de sia mastro kaj ofte ĝi ekregas lin, ĉar la pseŭdonimo estas ankaŭ programo. En ĉiu literaturo estas retroveblaj tiuj konfessimilaj pseŭdonimoj kaj ili eĉ ne mankas el la Esperanta literaturo, tipa ekzemplo estas la pseŭdonimo: *Nurhom Vera* (P. Balkányi), sed ankaŭ la pseŭdonimo: *Fokulo* (Grosjean-Maupin) ne estas malpli senkondiĉa.

La tiel nomata didaktika pseŭdonimo same ne

mankas el nia literaturo. Ties celo estas, ke la verkisto *pli multe*, sub pluraj nomoj kaj pli sengene donu instruon, ol li povus fari tion sub sia propra nomo, aŭ sub la bone konata pseŭdonimo. Tia multobligo de la verkista personeco estas ofta en la krizaj tempoj kaj landoj, kie la opinioj ofte ne povas libere eligi, sed nur laŭ subteraj kanaloj. Nu, tiun ĉi fenomenon ni ofte renkontas en la esperanta literaturo, dank' al la diktaturema tendenco de Eŭropo.

Ofte fonto de la pseŭdonimoj estas la simpla romantikemo aŭ ludemo. Tamen tiu ĉi klaso preskaŭ ĉiam miksiĝas per aliaj ingrediencoj. Tipe romantika pseŭdonimo estas Fez (Felikso Zamenhof) ludema tiu de Grenkamp-Kornfeld, kiu nomo cetere ankaŭ *ekvivis* en la vera vivo de la verkisto; la familia nomo tute malaperis ĉe Leo Belmont, pri kiu nur la Enciklopedio scias, ke lia vera nomo estas Leopold Blumenthal.

Ofte malfaciligas la esploron de la Esp. pseŭdonimoj la fakto, ke la verkistoj eluzas la eblecojn de siaj naciaj lingvoj; versajne la »diabla ĉarmo« primokas sin en la Kalocsay-a pseŭdonimo »Kopar«, (k. k.: paro de K.) kies signifo estas en la hungara lingvo: Kalva. Rigardu la foton de nia eminentulo kaj vi konstatos, ke li vere ne devas multe elspezi por kombiloj. Samspeca delikata memironio aperis en la pseŭdonimo de nia karmemora prezidanto Th. Cart — la Blankbarbulo.

F. Szilágyi

rojn, tordorompi al birdo la kapon, venĝi al iu sian ofendon, direkti al iu sian voĉon?

Pri la ALDONOJ kaj SANGOJ ĉe Zamenhofa citaĵo oni povas diri la samon. Kelkaj estas negravaj, kvankam senutilaj: (*tuj*) *dirinta* 113a; *estas neniu* (Z: *ne ekzistas eĉ*) *guto* 163d; (*malutile*) *katenas* 225e; (*sama*) *religio* 248c; (*malfacila*) *afero* 249h; (*la*) *lingvoj* 249h; (*rapida*) *dancado* 251e; (*eĉ*) *propran voston* 262a; *kaŭzas ofte tro* (Z: *kaŭzas tro*) 268h; *batali por* (*la*) *libereco de la homaj rajtoj* 290g; *maljunul(in)oj* 328e; *pasero en* (*la*) *aero* 354b; *li* (*jam antaŭe*) *estis* 372b; (*serioze kaj*) *kun juĝo* 409h; *kiam* (*fine*) *via nomo* 418a; *silentas nun ĉiu disput' religia* (aŭ *politika*) 428c; *transiĝis* (*la Jordan*) 479h; *faris al li* (*grandan*) *plezuron* 506d.

Kelkaj ŝanĝetoj aŭ aldonoj evidente celas klarigi la kuntekston, kaj eble estus rajtigataj, se oni per krampoj montrus ilin ekstercitataj: *ekz.*, *provita*, *hardita*, (*nia bravega anaro*) 168g; *sur tiu* (*interna*) *ideo* 181f; *senhontaj virinoj* (Z: *tiuj virinoj*) 191d; *mi estas preta* (*akcepti vian proponon*) *ne fari tion* 196b; *formoj* (*en ia materialo de artefarita lingvo*) 238c; *al la demando pri internacia lingvo* (Z: *al tiu ĉi demando*) 244d; *la mango vegetarana* (Z: *mango nur tia*) 253a; *la truoj de la fluto* (Z: *ĉi tiuj truoj*) 303d; *en la strato komercaĉante* (Z: *kie komercaĉante*) 321a; *ili kreskas sen plugo kaj sem'* (Z: *malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem'*); *tiu regulo ne estas ia misteraĵo, kaj estas* (Z: *tio estas*); *la piulo trovas* (Z: *vi trovos*) 341h; *la pioniroj* (*de tiu ideo*) 355b; *li faras sian taskon iele trapele* (Z: *vivi iele trapele*) 357d; *protektus sian filinon* (Z: *protektus ŝin*) 391b.

Aliaj ŝanĝoj tamen ŝajnas senutilaj, kaj kelkfoje eĉ eraraj: *Ekz.*, *ĝi devas jam* (Z: *ja*) *iam* 83b; *en la ĉielo* (Z: *sur la maro*) 115g; *tia konduto forŝandis* (Z: *sia rigardo forŝandadis*) 122a; *la torento povis libere elfluegi* (Z: *la torento povos pli libere fluegi*) 137g; *multaj ĉagrenoj* (Z: *kiom da ĉagreno*) 138a; *ĉu vi frapis* (Z: *falis*) 143d; *dolorigas* (Z: *doloras*) 144b; la *Lingva Komitato* (Z: *la Bulonja Deklaracio*) 150h; *statuoj* (Z: *stonoj*) 151f; *juvelo* (Z: *objekto*) 151g; *Abraham generis*

*Jakobon* (*Isaakon!*) 153a; estas retrovebla: *gener-i* estas *dube* Z; *estas neniu guto* (Z: *ne ekzistas eĉ guto*) 163d; *ni batalos por* (Z: *ni batalados pro*) 166b; *helpebla, konsilebla* (Z: *helpeble, konsileble*) 171g; *promesojn belajn* (Z: *piajn*) 175c; *la tuta frazo ĉe ho 176b*; *se mi vin* (Z: *se vi min*) 180d; *esperis longe ricevi denove* (Z: *esperas ricevi*) 181a; *Ĉu ne ekzistas...?* (Z: *Ne ekzistas...*) 184h; *larmo virina* 185d; *bastoneto en* (*sur*) *kiu oni filkas* (*tenas*) *plumon por skribi* (*skribado*)... *tubeto en* (*kiu*) *oni tenas* (*metas*) *cigaron por ĝin fumi* (*kiam oni ĝin fumus*) 195d; *ne estas* (*per si mem estas ne*) 203f; *ĉi tie* (Z: *ĉe vi*) 206b; *mi alkalkulas min* 215d; *en la oreloj la malnova kanto, jam forgesita, nun al mi resonas* 217h; *tiu supre sur la monto* (*supre staras sur la monto*) 219c; *perloj* (Z: *floro*) 227a; *fakuloj* (Z: *reprezentantoj*) 237f; *efiko* (*potenco*) 240b; *la logantoj de tero* (Z: *la vivo*) 245d; *enkonduki intence malregulan konjugacion en nia lingvo* (Z: *enkonduki malregulan konjugadon en nian lingvon*) 250f; *La Esperantistoj devas esti atentemaj* (Z: *oni devas esti atentemaj*) 254e; *malfeliĉo baroj* (Z: *malfeliĉoj baro*) 257f; *grandajn entreprenojn* (Z: *kolosojn*) 264a; *kvazaŭ la ĉielbarelo krevis* (Z: *kvazaŭ ĉe la ĉielbarelo krevis ringego*) 265d; *asertoj* (Z: *vortoj*) 269g; *kiu estis tre bona kaj honesta, havis krome unu el la plej belaj vizaĝoj, kiujn oni povas trovi* (Z: *kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi*) 270f; *ne plu valoros la ekzisto* (Z: *mi ne valoros la teran ekzistadon*) 271a; *ne tro multe, ne tro krude...* (Z: *ne tro krude, ne tro multe...*) 272c; *kun* (Z: *laŭ*) *sia mezurilo* 275d; *kura* (Z: *kuranta*) 276d; *kiel polvo* (Z: *polvon*) 286a; *sin legitimi kiel policiston* (Z: *legitimigi kiel policisto*) 287e; *li* (Z: *ĝia humoro*) *farigadis* 292e; *mallarĝan* (Z: *manlarĝan*) 294b; *gardanton* (*la kerubon*) 295h; *mehaniko* (Z: *mehanismo*) 301g, 307d; *li ne mortis de* (Z: *mia onklo ne mortis per*) 320a; *neniam* (Z: *nenion*) 328b (*bis*); *bezonas* (Z: *uzas*) 347g; *dissigelis* (Z: *forkaptis*) 348f; *mia lango...* *mia palato* 348h; *ŝi volis iri* (Z: *rajdi*) 357c; *kioma* (Z: *kiom*) *estas la enhavo* 364f; *vomado* (Z: *vomaĵo*) 368h; *argumentoj...*

**PRI LA AKORDIGO DE POSTMETITA PARTICIP-ADJEKTIVO.** *Al s-ro E. E. Y.* Viaj pritraktoj pri la neakordigo de la postmetita participadjeکتivo baziĝas sur evidenta miskompreno. Neutile estus pruvi la erarecon de via opinio per zamenhofaj ekzemploj; tiajn ja abunde amasigis P. Corret en sia »Zamenhofa Esperanto«, tamen ne konvinkante vin, eĉ donante per ili sub vian plumon la moketan frazon: »Mia panjo diris, ke estas tiel; kaj se ŝi diras, ke estas tiel, ĝi certe estas tiel, eĉ se ĝi ne estas tiel.« Do mi ne hazos mian refuton sur aŭtoritato, nek sur la lingvo-kutimo, sed mi klopodos ĝin bazi sur teoria argumentado.

Vi intermiksas la funkciojn de vortoj en la ĉefpropozicio kaj rilata subpropozicio, kaj vi argumentas per la jena regulo (formulita de mi laŭ viaj pritraktoj):

Se oni kunfandas ĉefpropozicion kaj rilatan subpropozicion en unu solan propozicion (simplan frazon), ĉiu subpropozicia frazelemento devas havi en la kunfandita propozicio la saman funkcion, kiun ĝi havis en la subpropozicio.

Jes, certe, tion vi asertas. Tial, laŭ vi, kunfandinte la frazon

*Mi aĉetis libron, kiu estas eldonita de AELA*

en unu propozicion, la vorto *eldonita*, kiu en la subpropozicio estas predikata adjektivo, devas havi la saman funkcion ankaŭ en la kunfandita propozicio. Kaj, ĉar predikata adjektivo estas ĉiam nomnativa, la kunfandita frazo devas teksti:

*Mi aĉetis libron eldonita de AELA.*

Laŭ vi, *eldonita* ne rilatas al *libron*, sed al *kIU*.

Nu, via regulo simple ne ekzistas. Do via rezonado,

frazoj (Kp. F. K. 274/8 kaj 279/29) 369; *ŝprucigo* (Z: *lakto*) 375f; *de l' princido* (Z: *de la regid'*) 384g; *raso* (Z: *nacio*) 399b; *urboj estas malgranda* (Z: *arboj de lia arbaro estas malgrandnombra*) 403b; *en\** (Z: *al*) *la korto* 409b; *flata, sed* (Z: *flata, tamen samtempe ankaŭ*) 412a; 455b; *la samo* (Z: *tio sama*); *la samo* (Z: *tiel same*) 417b; *senriĉecon* (Z: *plenan malriĉecon*) 421f; *Silentu, ne movu la buŝon kaj ne ekpepu* (Z: *Silente! Ne movi la buŝon! Ne ekpepi!*) 428c; *postuloj* (Z: *postenoj*) 442c; *dika* (Z: *blanka*) 444a; *la vivo estas* (Z: *devus esti*) 445c; *vestoj* (Z: *pantalono*) 459a; *tiu vizago en la rememoro ankoraŭ ŝvebas* 461a; *tavolo... kontraŭstaris al ni* (Z: *tavolo... de la mondo estas rompita*) 464h; *tie ĉi ni havas* (Z: *ni ne havas*) 467c; *mallonge ĝisnude* (Z: *malgranda ĝisnude*) 475f; *en la* (Z: *en angulo de*) *arbaro* 483b; *la sekvantan klarigon* 483c; *kontraŭ la ekluŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali* 486d; *la sennuba idilio de ŝia unua juneco* 489a; *leonoj* (Z: *homoj*) 491b; *la elpensitaj* (Z: *tiuj fabeloj kaj historioj*) 491h; *ili povas malvarmigi* 494d. *tiu nomo* (Z: *la sono*) 510g. Troviĝas multaj similaj.

Interesa frazo troviĝas ĉe 342h. Ĉi tie Zamenhof skribis *forvelki*, sed la E. C. L.<sup>a</sup> mispresis *orvelki*, kaj ĉi tiun eraron oni klarigas per *or-velki* (Vidu Fab. 197/3 en la originala).

**SINÓNIMOJ.** Kelke da proponitaj sinonimoj estas dube necesaj aŭ utilaj: mi rekomendas ilin forstreki. Ekz., *bankedo* (= *festeno*); *diareo* (= *mallakso*); *galicismo* (= *francismo*); *gongo* (= *tamtamo*); *grapolo* (= *traŭbo*) 169a, 359a; *humuro* (*humoro*); *manufakturo* (= *uzino* = *fabrikejo*; *uzu sole la lastan*); *rakuli* (= *kolumbumi*, *kvéri*); *ŝlako* (= *ŝkorio*). Se oni uzas *jeleo* oni ne bezonas *gelato* kaj *gelatenajo*. Mi preferas *gracila*, *razeno*, *strando*, *ŝtormo*, *olŝvelta*, *gazono*, *plago*, *tempesto*. Oni distingas inter *lingo* (= *porĉoko*) kaj *ĉarniro*; tamen angle *ĉarniro* = *hinge*! Jam nun ni ŝanceliĝas inter *parolado* kaj la sinonimoj *lekcio*, *prelego*: ŝajnas

bazita sur ĝi estas funde erara.

Transformante rilatan subprop-on en ĉefprop-on frazelemento, oni tute ne konservas ties vortojn en ilia antaŭa funkcio. Jen, ekz-e:

1. *Mi ne konas tiun, kiu alportis la leteron* estas transformebla jene:

*Mi ne konas la alportinton de la letero.*

Do el la subjekto plus predikato (verbo) de la subprop-o fariĝas la rekta komplemento (*objekto*) de la kunfandita propozicio, kaj ties objekto iĝas en la nova propozicio la genitivo de la objekto.

Same, transformante la frazon:

2. *Ne venis tiu, kian oni sendis*

oni ricevas la propozicion:

*Ne venis la sendito*

do el la objekto plus predikato (verbo) de la subpropozicio fariĝis la *subjekto* de la nova propozicio.

La funkcio de vorto farita el la subjekto plus predikato de la subprop-o do fariĝas en la kunfandita propozicio la sama, kiun havas la *demonstrativo* de la ĉefprop-o. En la unua ekzemplo la *demonstrativo* (tiu) estis objekto, do la subprop-a predikato transformiĝas en objekton. En la dua ekzemplo la *demonstrativo* (tiu) estis subjekto, do la subprop-a predikato transformiĝas en subjekton. En ambaŭ okazoj estas tute indiferente, kian kazon kaj kian funkcion havis la relativo (kiu, kiun) en la subpropozicio. Tiu kazo kaj funkcio determinas nur la formon de la participo. Se la relativo estis subjekto, la participo iĝos aktiva (alportinto), se la relativo estis objekto, la participo iĝos pasiva (sendito).

La *demonstrativoj* (tiu, tiun) havas en la ĉefprop-o nur montran, anoncan signifon, sence ili estas nenecesaj. Do, ĉe la kunfando ili elfalas kaj la participo simple anstataŭas ilin.

do malbonege aldoni ankaŭ *diskurso* kaj *oracio* por pli-grandigi la konfuzon: ankoraŭ pli malbonaj estas la pluaj vortoj *referi* kaj *referato* — kiuj konfliktas inter si, kaj estas konfuzebaj kun la malsamsignifa angla *to refer*, (= *konsulte sin turni al* — parenca vorto: *referenco*).

**RADIK-FORMOJ.** Mi notas bedaŭrindan tendencon forlasi la literon *h*; ne nur ĉe la kombino *rh* = *rk* (tio estas oficiale permesita), sed ankaŭ ĉe aliaj vortoj (ekz., *horo*, *monaĥo*).

La vortaro erare donas ambaŭ formojn *analog* kaj *analogi* kiel oficialajn, kaj uzas ambaŭ. La distingo inter ili (se ĝi ekzistas) estas tre neklara. La oficiala radikato estas *analog*: oni do forstreku *analogi*, kaj faru diversajn korektojn laŭe.

Aliaj dubaj formoj estas *bizono* (pli bone *bisono*), *brokolo* (*brokolio*); *budĝeto* (*buĝeto*: la oficiala formo estas neprononcebla); *ĝangalo*, *ĝazbando* (*ĵangalo*, *ĵazbando*: kp. *piĵamo*). Nenecesaj ŝajnas la terura vorto *ekscpecio*; *ekskludi* (*oni ja ne havas inkludi!*) *kokri*, *konversi* (pli bone *konverti* (3), ĉar *konversi* certe uzigos anstataŭ *konversacii*); *koruso*, *sensaco*, *trabanto*. *Patin-i*, -o, jam uziĝis kun la signifo *ŝugliti*, *glitiŝuo*. *Prezenco* por angla okulo estas monstro: pli bona estas *presento*, se *nuntempo* ne sufiĉas. *Dumpingo* devus esti *dumpado* el la radikato *dump-i* (angle: *to dump*; *dumping* signifas nur *dump-ado*). Ni ĝoju, ke ne aperas la similaj absurdaj *mitingo* kaj *smokingo* (supozeble anglaj vortoj, sed por anglo nekompreneblaj). Demando tre diskutata kaj ĝis nun nedecidita estas la elekto inter -*ulo* (*olo*); *ito* (*elo*); *ino* (*eno*). Generale mi konfesas preferon por la formo dua, laŭ la ĝenerala kutimo de Zamenhof. Oni ne povas eviti ŝaradeblajn vortojn, sed oni ne kreu ilin nenecese. Kial ŝanĝi la bonajn formojn *antireno*, *mugelo*, *ovolo* (oni ja skribas ĝuste *ovolo* ĉe 147f, 174g). Demando vasta, kiun ĉi tie mi povas nur aludi.

Nun ni rigardu la frazon:

*Mi acetis libron, kiu estas eldonita de AELA.*

Por analogio, ni skribu tiun frazon per simpla verbo en la subprop-o:

3. *Mi acetis libron, kiun eldonis AELA.*

Tie ĉi la subprop-o rilatas ne al (ellasebla) demonstrativo, sed al sence necesa substantivo (libron). Ĝi diras ion pri tiu libro, karakterizas ĝin. Ĝi havas do apud tiu substantivo la funkcion de *epiteto*.

La subpropoziciojn oni povas nomi laŭ tio, kian funkcion ili havas rilate al la ĉefprop-a predikato (verbo) aŭ ĉefprop-a frazelemento. Do en la frazo unua (1) ni havas *objektan*, en la dua (2) *subjektan*, en la tria (3) *epitetan* subpropozicion.

Estas evidente, ke dum la transformado de la epitetaj subprop-oj devas validi la sama regulo, kiel ĉe la objektaj kaj subjektaj. Tiu regulo tekstas:

Fandinte rilatan subprop-on en ĉefprop-on en formo de frazelemento, oni devas doni al tiu frazelemento la saman funkcion, kiun havis la tuta subpropozicio.

Do el *epiteta* subprop-o iĝas partecipa *epiteto*. Epiteto akordigas kaze kaj nombre. Sekve la unupropozicia formo de la supra frazo estas:

*Mi acetis libron eldonitan de AELA.*

Vi diras, ke »eldonis« montras agon, dum »eldonitan« kiel epiteto montras kvaliton. Tio estas vera. En la subprop-o oni esprimas la agon de AELA (subjekto). Sed en la ĉefprop-o la subjekto estas MI kaj el MIA vidpunkto tiu eldona ago de AELA havas nur la signifon de kvalito rilate al la libro, ĝin distingante de tiuj libroj, kiujn eldonis aliaj eldonejoj. Do »eldonitan« tie ĉi estas ne predikato (verbo), sed karakterizilo, distingilo, epiteto.

Ni vidu analoge la ekzemplon 1. En la subprop-o

la komplekso »kiu alportis« signas la agon de KIU. Sed en la kunfandita prop-o la subjekto estas MI, kaj el MIA vidpunkto la komplekso »kiu alportis« signas personon, la objekton de mia ago »mi konas«.

La ŝanĝo de la funkcioj ĉe la kunfando do estas klare klarigebla per tio, ke oni rigardas la funkciajn vortojn el la vidpunkto de alia subjekto.

Kompreneble, epiteto povas rilati al ĉiu substantivo, do ankaŭ al tiu, kiu staras en genitivo. Same kiel oni povas diri

*bindaĵo bela de libro kaj bindaĵo de libro bela*  
oni povas diri ankaŭ:

*Mi desiras la bindaĵon de la libro malpurigitan de vi*  
(kaj mi bindigos nove la libron).

*Mi desiras la bindaĵon de la libro malpurigita de vi*  
(kaj mi uzos ĝin por nove acetota libro).

Nun ni rigardu ankoraŭ vian ekzemplon pri la piloto.

*La kapitano forportis la edzinon vunditan de la piloto.*

*La kapitano forportis la vunditan edzinon de la piloto.*

Vi diras, ke la du frazoj diras la samon. Nu, ne. DE post pasiva participo signas la aganton. Do, en la unua frazo *la piloto vundis la edzinon de la kapitano*; en la dua frazo temas pri *la edzino de la piloto*.

Cu estas do korekta la frazo:

*La kapitano forportis la edzinon vundita de la piloto.*

Jes. Ĝi estas korekta, sed ĝi havas alian sencan. Pri tiu senco oni devas paroli iom detale.

En la ĝisnunaj ekzemploj temis pri subprop-oj *rilataj*, enkondukitaj per relativo (KIU, KIO). Tiuj subprop-oj diras, rakontas, asertas ion pri io reprezentita

Anstataŭ *diletant-o*, *paŭperism-o*; pli bone estus skribi *dilet-anto*, *paŭper-ismo* (radikoj *dilet*, *paŭper*).

**FORMOJ MALLONGIGITAJ, PSEŬDOAFIKSOJ.** Ĉe interluktantaj alternativoj, se aliaj aferoj estas egalaj, verŝajne la plej mallonga formo venkos, pro la praktikaj bezonoj de la ĉiutaga parolo, kiu rifuzas formojn nenecese longajn. Mi ne aludas parolajn mallongigojn kiaj *aŭto*, *foli*, *kin(em)o*, sed ŝanceligojn inter *spont(an)(e)a*, *ekzor(c)i(i)*, *hiat(us)o*, *referend(um)o* (kp. *memorando*). Ĝenerale oni senpense enkondukas formon »internacian«, kiu en la praktiko montriĝas netolereble longa: poste ĝin forpuŝas formo pli mallonga, precipe se ĉi tiu estas pli oportuna por kreo de derivaĵoj laŭ regula maniero. Pri la demando pri pseŭdosufiksoj ekzistas du partioj: ambaŭ sin pravigas per la Regulo 15 kaj la Lingva Respondo 55! Unu partio diras, ke la radikoj *redakt-i*, *redakt-oro*, *redakci-o*, ekzemple, egale rajtas kunekzisti, ĉar ili estas internaciaj. La alia partio (al kiu apartenas ni) diras, ke multigi tiajn neregulaĵojn ŝarĝas la memoron, komplikigas la lingvon per radikoj nenecesaĵ kaj malprecizaj, kaj malfermas la pordon al ĉiaj konfuzigoj; kaj ke pli bone do estas formi ĉiujn derivaĵojn el unu simpla radikoj: *redakt-i*, *-o*, *-ejo*, *-isto*, *-istaro*. La vortojn sube cititajn mi donas nur por ekzempligi la demandon: malmultaj estas fundamentaj: kelkaj estas oficialaj; la plimulto ne estas oficiala. Mi konsilas (kompreneble!) konservi la formojn fundamentajn; sed alioke ĝenerale preferi la formojn malpli longajn; kun la espero, ke la L. K. iam nuligos la oficialecon de kelkaj »internaciaj« formoj, kiujn malgraŭ protestoj ĝi oficialigis en tempo, kiam la demando estis malpli klara ol nun. Antaŭ ol proponi radikojn »internacian«, oni studu ĝin el la vidpunkto de derivaĵoj poste bezonataj. Estas ja tempo, ka la L. K. esploru ĉi tiun demandon tre funde, kaj donu al ni klaran gvidan principon, ĉar neniu demando pli dividata la Esperantistaron aŭ estas pli studenda. Sen tia konsilo la vortaristoj ne povas nin helpi. Ekz., el la

anglaj vortaroj »Millidge« staras unuflanke, kaj »Edinburgh« aliflanke.

Komencante per la »internacia« formo *rezultat*, oni poste trovas, ke oni bezonas verbon. *Rezultat-i* evidente ne taŭgas, do oni akceptas duan radikojn *rezult-i*; el kio nature sekvas *rezult-o*; post penado trovi neekzistantan diferencan inter *rezulto* kaj *rezultato*, rezulto mortigas *rezultaton*. Simile *abstin-i*, *-ismo*, mortigas *abstinencan*; *amendi* mortigas *amendamenton*. Rimarkante la »internacian« finaĵon *-tion*, oni senpense transskribas ĝin per la malbelsona *-acio*. Tamen la finaĵo *-tion* ordinare signifas internacie *-o*, *-ado*, aŭ *-aĵo* (*-aĵo* ja sone pli ol *-acio* similas la internacian *-tion*). Anstataŭ diri *legitimacio*, *legitimacii*, estas do pli nature kaj pli klare diri laŭbezone: *legitim-i*, *-o*, *-ado*, *-aĵo*, *-ilo*, *-iĝo*. Iluminacio donas la netolereblan verbon *iluminacii* (*iluminacis*, *iluminacito*). Ne predo venkas la formo *ilumin-i*, *-o*, *-ado*, *-aĵo*. Efektive la formo *aci* ne taŭgas por verba uzado. Formoj kiaj *apelacis*, *federaci(ig)inta*, *revelacita*, klare estas malpli praktikaj (kaj ankaŭ malpli internaciaj) ol *apelis*, *federita*, *rivelita*. Oni jam ne diras *edukacio*, *organizacio*, *organizacii* k. s., sed *edifi*, *eduki*, *modifi*, *organizi*, *ratifi*, *rektifi*, *signifi*, *specifi*. Samo okazas ĉe la plimulto el la jenaj: *abneg(aci)*, *administr(aci)*, *apel(aci)*, *civiliz(aci)*, *deklar(aci)*, *dekor(adi)*, *demonstr(aci)*, *disert(aci)*, *enukle(aci)*, *feder(aci)*, *halucin(aci)*, *inaŭgur(aci)*, *interpel(aci)*, *kompar(aci)*, *konfeder(aci)*, *konfirm(aci)*, *konjug(aci)*, *kulmin(aci)*, *manifest(aci)*, *navig(aci)*, *ordin(aci)*, *reput(aci)*, *spekul(aci)*, *vari(aci)*, k. m. s.; ankaŭ ĉe *abol(ici)*, *erud(ici)*, *inhib(ici)*, *intu(ici)*, *rekviz(ici)*, *evoluci*, *prostituci*, k. s.

Kompreneble, oni devas konsideri ĉiun vorton aparte, ĉar ne ĉiu vorto per *-acio* estas same reduktebla. Ekz., *uberacio*, *formacio*, *operacio*. *Generacio* ne = *generado*; *rezignacio* ne = *rezignado*. Simile, la teruraĵo *anunciado* verŝajne fariĝos *anonco*: kaj same ĉe *direkcio* (*direktado*, *-istaro*); *interpunkcio* (*punkitado*); *kasacio* (*nuligo*);

per demonstrativo aŭ pri substantiva frazelemento de la ĉefprop-o.

Sed ekzistas ankaŭ subprop-oj *eksplikaj*, enkondukitaj per KE. Ili disvolvas, eksplikas la enhavon de demonstrativo (TIO) aŭ de substantiva frazelemento. Ekzemple:

*Mi vidis (tion), ke li venas.*

La enhavo de *tio* estas »li venas«. Ankaŭ tie ĉi validas la regulo, ke transformante tiun kompleksan frazon en simplan, oni devas meti la novan frazelementon en tian kazon, kiam havis la demonstrativo, do tie ĉi en akuzativon, farante el ĝi objekton (ĉar ja la tuta subordita prop-o estis objekta).

Nu, tian objekton oni povas fari el la *predikato* (verbo) de la subprop-o, en formo de verbo-substantivo: *Mi vidis lian venon*. Sed objekto povas fariĝi ankaŭ la *subjekto* de la subprop-o; tiaokaze la predikato restas predikato, sed ĝi alprenas formon particip-adjektivan, aŭ infinitivan: *Mi vidis lin veni*. *Mi vidis lin venanta*. Tion oni nomas objekta predikativo, ĉar ĝi montras en la ĉefprop-o la agon de la fraz-objekto.

Kio nun estas la diferenco inter la rilata kaj eksplika propozicioj, aŭ, kio estas la sama, inter epiteta kaj predikativa frazelementoj?

Nu, la unuaj montras kvaliton sendependan de la ĉefprop-a predikato, la duaj kvaliton dependan de la ĉefprop-a predikato. Ekz-e: *Mi vidas domojn blankajn* — signifas, ke mi vidas domojn, *kiuj estas blankaj*, sendepende de *tio*, ĉu mi vidas ilin aŭ ne; la blankeco estas ilia *absoluta* kvalito. Male: *Mi vidas la domojn blankaj* — signifas, ke mi vidas, ke la domoj estas blankaj, sed tiu blankeco estas dependa de mia vido: eble ili ne estas blankaj, nur mi vidas ilin tiaj. Pli klare demonstros la jena ekzemplo:

*kompozicio (komponaĵo); opozicii (oponi); proskripci (proskribi); erupcii, evikcii, transakcii, (erupti, eviki, transakti).*

Same tendencas malaperi *ik* ĉe *Adriatik*, *Antarktik* (*ik*), *arkaj* (*ik*), *astigmat* (*ik*), *Balt* (*ik*), *ekzot* (*ik*), *esoter* (*ik*), *gratifikaci*, *hermet* (*ik*), *kvalifik* (*ik*), *mistifik* (*ik*), *reumat* (*ik*), *skarifik* (*ik*). Oficiale oni diras *aŭtentik*: Zamenhof pli bone skribis *aŭtent*. Kial *iniciativ*, *iniciator*, anstataŭ *iniciat-i*, *-o*, *-into*? Ĉu *observatorio* estas pli bona, ol *observejo*, aŭ *inspektoro* ol *inspektisto*? Simile: *imperialismo*, *individu(al)ismo*, *konserv(at)(iv)ismo*, *milit(ar)ismo*, *pac(if)ismo*, *raci(onal)ismo*, *sens(ual)ismo*, *util(itarian)ismo*. Tamen atentu! eble la aferoj ne estas samaj: *spiritismo* ne egalas *spiritualismon*. Simile ankaŭ la malpreciza *-io* povas malaperi: *demokratio* povas esti *demokrat-eco*, *-ismo*, *-aro*; simile *filantrop-eco*, *fotograf-ado*, *stenograf-ado*.

Ni ne delogigu de »internaciaj« radikoj, kiuj forrabas de ni la netakseble valoran sistemon de vortfarado per afiksoj kaj la internan vivon de la lingvo. Kial diri *brokato*, *citato*, *diktato*, *garnituro*, *idiotismo*, *narkotika*, *vegetalo*, kiam pli klaraj kaj pli ĝustaj estas *brokaĵo*, *citaĵo*, *diktaĵo*, *garnaĵo*, *idiomaĵo*, *narkotaĵo*, *vegetaĵo*? Kial bojkoti la sufikson *ar* ĉe *admiralaro*, *balustraro*, *burokrataro*, *ĉambraro*, *delegitaro*, *deputitaro*, *insularo*, *maparo*, *ĉagonaro*, *vortaro*? Simile pri terminoj kiaj *akumul(ator)*, *altern(ator)*, *amplif(ikator)*, *detekt(or)* (Kial ne *detektikatoro*?), *ekscit(ator)*, *gener(ator)*, *indik(ator)*, *karbur(ator)*, *kompens(ator)*, *komut(ator)*, *oscil(ator)*... Ĉu ne pli simple kaj regule kaj bele diri *akumulilo*, *alternilo*, *amplifilo*, *detektilo*, *generilo*, *indikilo*, *karburilo*, *kompensilo*, *komutilo*, *oscilito*?

Nun, kiam la lingvo komencas stari sur la propraj piedoj, oni pli kaj pli forte sentas la neceson uzi formojn konformajn al la spirito de la lingvo, kaj forjeti la »internacia« balaston (kiu tiel kripligas Occidentalon kaj similajn projektojn, kiuj malatentas la logikon kaj la

*Tra ruĝa vitro oni vidas la objektojn blankajn ruĝaj*. Tiu frazon oni povas dissolvi jene: *Tra ruĝa vitro oni vidas, ke la objektoj, kiuj estas blankaj, estas ruĝaj*. Jen montriĝas klare, ke la *predikativo* de rilata subprop-o *iĝas epiteto* ĉe la kunfando, dum tiu de la eksplika prop-o restas *predikativo*.

La dependeco de la predikativo de eksplika subprop-o povas konsisti ankaŭ en *tio*, ke ĝi iĝas rekta rezulto de la ĉefprop-a ago: *Oni elektis lin prezidanto* (oni elektis, ke li estu prezidanto).

Nun ni rigardu el tiu ĉi vidpunkto la frazon:

*Mi aĉetis libron eldonitan de AELA* (kiun eldonis AELA). Signifo: la nepra, absoluta kvalito de la libro estas, sendepende de la ĉefprop-a ago, ke ĝi estas eldonita de AELA. Do la libron fakte eldonis AELA.

*Mi aĉetis la libron eldonita de AELA* (mi aĉetis (tiel), ke la libron eldonis AELA). Ĝi signifas, ke mi aĉetis la libron kiel eldonaĵon de AELA, sed eble ĝi ne estas tia.

*La kapitano forportis la edzinon vundita de la piloto* (tiel, ke ŝi estis vundita). Ĝi signifas, aŭ, ke ŝi ne estis vundita, nur la kapitano opiniis tiel; aŭ, ke ŝi estis vundita dum la forportado, do la vundiĝo estis kvazaŭ rekta rezulto de la forportado.

Ni formu la ekzemplon alie:

*Mi vidis la virinon vunditan de la piloto* (mi vidis la virinon, kiu estis vundita de la piloto).

*Mi vidis la virinon vundita de la piloto* (mi vidis, ke la virino estis vundita de la piloto, sed eble mia vido eraris, ŝi nur falis sveninta, sed restis senvunda).

El tiuj ekzemploj, mi kredas, vi rekonos vian eraron. Ĝi estis, ke vi konfuzis du specojn de subprop-oj, la rilatajn kaj eksplikajn, kaj la regulon validan pri la eksplikaj vi volis validigi ankaŭ pri la rilataj. —y.

vidpunkton de la neeŭropanoj. Estas ja tempo, ke ni pli atentu la facilecon por la lernanto kaj la uzanto de la lingvo, kaj malpli la »internaciecon«, kiu nur celas divenebligi la lingvon por la eksteruloj, kiuj neniam ĝin uzas aŭ atentus.

Sed pardonu: ni forvagas.

**UZADO DE RADIKOJ.** En la jenaj okazoj la vorto proponita interkrampe ŝajnas preferinda: *direkte* (*rekte*) 324a, 447c; *escepte sendankecon* (*kerom sendankeco*) 409g; *generale* (*ordinare*) ĉe 50 lokoj; *kiel* (*ekz.*) 26c, 32a, 165e, 197b, 217e, 343h, 433f; *kies* (*el kiuj*) 203b, 343h, (*de kiu*) 345g; *konsekvenco* (*sekvo*) 78d, 167d, 246d, 312a, 387b, 430e (bis), 474b (*dedukto, konkludo*) 262a; *sensekvaj* (*senkonsekvencaj*) 80c (*konsekvenco* ne signifas la anglan vorton *consequence* (= *sekvo*); *materio* (*materiale*) 365g, 399h, 405b; *numero* (*numeralo*) 332h, 333a; *rekon* (2), 22d, 245c, *prefere konfesi*; *skribita* (*verkita*) 47h; *skribisto* (*verkisto*) 354f. *Flosi* (134) estas sendube transitiva (angle: *tro raft*), kaj ne tradukas la anglan *to float* (intrans.), por kiu la radiko *flot-i* proponita jam antaŭ dudek jaroj kaj pli kaj pli uzata, estas preferinda (Kp. A. *to float*, *floating*; F. *flotter*, *flottant*; II. *flotar*, *flotante*; I. *flottabile*, *flottante*; Esp. *floti*, *flotanta* kaj ĉe G. *flott machen*). *Nagi sur la supraĵo* (*de la akvo*) estas apenaŭ kontentiga. Kun escepto de la unuaj kvar linioj, oni forstreku la tuton de ĉi tiu paragrafo sub *flos*, kaj reverku ĝin laŭ la Zamenhofa uzado. Oni forstreku ankaŭ la paragrafon *konsideri* (3), kaj en ĉi tiuj kaj en kvindek similaj frazoj oni anstataŭigu ĝin per *rigard*: en 259b, 511e, per *opini*. Vidu la opinion de Zamenhof pri ĉi tiu misuzo de *konsideri* en la libro »Travivaĵoj de Ro. Sor., p. 93 (eldono 1914). *Oferi* signifas la anglan *to sacrifice*: ĝi ĉiam havas ian nuancon de sindono, de abnegacio: oni forstreku *oferi* (3), kaj anstataŭigu ĝin per *proponi*. La tri Z-ekzemploj ĉi tie ne estas konvinkaj (vidu ilin en la kunteksto).

(Finota).

## PARDONON, NUR SECUBUN

Jes, *secubun*. Tio ne estas neologismo, nek *preseraro*, sed — mi estas maliculo kaj mi provas ionete streĉi la atenton de la leganto.

Tom mi meditis pri vortoj kaj ludis per ili. Edifa ludo, la vortoj kaŝas en si ofte tutajn ĉapitrojn de kulturhistorioj. Jen ekzemplo: la sveda lingvo ne konas la vorton *tombejo*; anstataŭe ekzistas la esprimo: *preĝejkorto* (*kyrkogård*) kaj vere eĉ nun oni ofte vidas svedajn tombejojn ĉirkaŭ preĝejoj. Kaj nun ni serĉu la koncernan paĝon de la sveda kulturhistorio...

(De mia parto mi nun ne serĉas, ĉar mi decidis mediti, sed jen mi transdonas la temon al vi, kara Leganto, serĉu kaj vi trovos. Kaj mi daŭrigas sen embaraso.)

Ho, la vortoj! Kelkfoje vorteto pli multe diras, ol longaj traktatoj. Oni ofte pensas ekz. en eksterlando, ke la hungara popolo estas militema, trokuraga tribo, kiun la benita paco de Eŭropo lacigas. Sed, se estus vere tiel, kiel vi povus klarigi, ke la vorto (soldat-)kamarado estas en la hungara lingvo: *bajtárs*. Kaj la ekzakta traduko de tiu ĉi vorto estas: kunulo en la malbono, kunulo en la mizero. Ĉu vi pensas, ke tiu ĉi popolo ne estas pacema? Kaj nun mi ricevis tutan kolekton de vortoj. Vasta volumo kuŝas antaŭ mi: la *Nova Vortaro Japano-Esperanta*.<sup>\*</sup> Bela, grandega libro; laŭ la eksterajo ĝi estas vera ornamo de nia biblioteko. Kaj interne? Same valora por mi, ĉar la japana parto estas plejparte ankaŭ latinlitere presita. Kaj nun ni daŭrigu la ludon. Jen, japanaj vortoj!

Mi devas konfesi, ke la solaj vortoj, kiujn mi ĝis nun posedis el la japana lingvo estas: banzaj, bonzo kaj mikado. Sed pri la *japanoj* mi jam scias pli multe. Kaj nun ni komencu foliumi la novan vortaron laŭ ia inversa grafologia sistemo kaj konkludi pri konataj karakterizaĵoj el la vortoj japanaj.

Konata kaj preskaŭ proverba estas la ĝentileco, la glata maniero de la japanoj, la altetako de aliaj personoj, la malo, — se japano parolas pri si. Pri tio, ke tiuj kvalitoj profunde radikiĝas en la japana naturo, atestas mia titolvorto: *secubun*, kies signifo laŭ la aserto de la nova vortaro estas 1) *fuŝa verketo*, *verkaĉo*, 2) *mia verketo*. Pardonu do al mi, Leganto, mian *secubun*. Laŭ mia opinio al tiu ĉi fako apartenas la vorto, kiu signifas: *large malfermi ĉiujn pordojn*, aŭ tiu alia, kiu signifas *lamenton pro sia nekupleco*, aŭ tiu trisilaba vorteto, kies esperanta respondanto estas: *senlima bonvolo*.

La suvereno estas granda potenco en la regno de l' leviganta suno. Sed pri la vera mezuro de tiu senlima polenco la nova vortaro konvinkis min, inter aliaj per la vorteto *ĉuren* t. e.: *la halto de la suverena veturilo*. Sed estas ankaŭ aliaj mallongaj vortoj signifantaj la tombon, morton, veturilon, revenon, standardon, mangaĵon, koron, koleron, eĉ kadavrejon de la suvereno. Sed tiu dusilaba vorto (*setto*) atingas la rekordan koncizon, kies signifo estas: *glavo, kiun la imperiestro donacas al la gvidanto de ekspedicio*.

Mi ĉiam sciis, ke la japanoj estas sentemaj, sed tion ne, ke japano kapablas *hunŝi* t. e. *morti pro la indigno*.

La kapablon de trinkema japano pravas la vorto, kies signifo estas: *trinki la tuton per unu gluto*, eble pri pasinta *»vendetto«* indikas la vorto, kies signifo estas: *esti mortigita post malsukcesa venĝo*. Pri okulfrapa distingemo de la japanoj atestas la vorto, *kanĵu* = *ĉefripono*.

Certe mi ne estus tre ĵusta, se mi konkludus pri la nuna japana virina modo el tiuj du vortoj, kies unua

<sup>\*</sup> *Nova Vortaro Japano-Esperanta*. La plej granda nacilingva Esperanta vortaro. Laŭ grandformata komposto per klišoj malgrandigita al 15×7.5 cm. Verkis J. Okamoto. Eldonis Japano Esperanto Instituto, Tokio, Hongoo-Motomaĉi I. 824 paĝa, sur bonega papero, en leda bindo. Prezo sv. fr. 7.50 frankite.

signifas *femurringon*, kaj kies dua *dentnigrigan tinkturon*. La vorto *ruĵu* certe estas pli moderna.

La japana skribado estas malfacila tasko kaj ĝi pretendas aŭ pretendis certe grandan sperton. Jen la pruvo la vorto *ĵatate*, t. e. *portebla inkujo kaj plumujo*. Sed troviĝas ankaŭ vorto, kies signifo estas *honorario por skribado*. Ĉu la esp. gazetaro ne lernus tiun vorton?

El la japana alfabeto tute mankas la litero: *l*, preskaŭ tute la *f* kaj *v* sonoj. (El 70.000 vortoj nur ĉ. 30—30 komenciĝas per la laste menciitaj literoj.) Tiu ĉi fakto klarigas tion, ke la internaciaj vortoj ofte preskaŭ ne estas rekoneblaj en la japana lingvo. Ekz. ĉu vi rekonas la vorton *profiruro* (profilo), *oranda* (Holando), *baibururo* (biblio) ktp.? — Sed la kiso estas nova rezulto de la japana amo kaj — la vorto preskaŭ sensange eniris la japanan vortaron...

Mi ofte admiris la subtilan komprenon de la japanoj al la naturo; ĉu vi rememoras tiujn noblajn liniojn, la arĝentan atmosferon kaj ĉarman trankvilon de la japanaj naturpentraĵoj? Ĉu vi ne vidas tian bildon, kiam vi aŭdas la vorton: *adzakura*, t. e. faliĝema ĉerizfloro, aŭ atentu pri tio: *ĉoran* = montopintoj altigitaj unu super la alia. Aŭ, ĉu vi sentas la mildan poezion de la ĵena bildo: malaperi en la iompostioma mallumo. La feliĉa japano povas la tutan bildon esprimi per la susure milda vorto: *joan*. Nur tiom, ne pli!

Sed nun eble mia *secubun* jam sufiĉas.

F. Szilágyi.

ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO. Redaktis O. Ginz kaj Stan. Kamaryt. Eldonis *»Literatura Mondo«*, 1935. Paĝoj 468 + 32 pĝ. de ilustraĵoj. Prezo: broŝ. sv. fr. 12.—, bind. 14.—. Lasta libro de AELA 1934.

Ĉu ni, esperantistoj, ne estas pravaĵ, kiam ni asertas, ke nia lingvo estas mirinde potenca faktoro en la diskonigado de malmulte konataj kulturoj kaj literaturoj, kiuj neniel estas malpli grandaj aŭ malpli valoraj ol tiuj de la grandaj nacioj, sed estas eble nur diferencaj, *aliaj* ol tiuj lastaj? Per tio ni tute ne volas pridubi la grandegan pozitivan influon, kiun elefikis la grandnaciaj literaturoj rilate la ceterajn popolojn sur la terĝlobo, sed ni sole deziras per tio ripeti la opinion, — kiu opinio cetere jam estas multfoje esprimita —, ke siajn malnovajn kulturojn (do ankaŭ literaturojn), kiujn la nunaj grandnacioj povis seninterrompe disvolvi kaj perfektigi dank' al sia multjarcenta politika libereco, ili pli poste povis ankaŭ trudi, en pluraj okazoj eĉ tute devige, al la popoloj, kiuj ĝuis nek politikan sendependecon, nek politikan forton.

En la limoj de la antaŭmilitaj rusa, aŭstro-hungara kaj germana imperioj, vivis pli ol deko da popoloj (almenaŭ nur eŭropaj), kiuj verdire perdis sian politikan sendependecon, sed des pli intense laboris super la disvolvado de siaj kulturoj naciaj, ju pli forta estis la subpremado de la cititaj imperioj kontraŭ ili. Ofte la labor-kondiĉoj de tiu kultura misio estis neimageble, ekstreme malfacilaj, kaj ĉiu akirita sukceso estis vera heroaĵo. La kulturado de la nacia lingvo, la riĉigado de ĝia literaturo kun superhoma, febra energio, ne estis celo en kaj por si mem, sed ĝi estis plej ofte batalilo, senmezure potenca batalilo en la manoj de tiuj, kiuj volis rompi la jugon de la potencaj imperioj, frakasintaj ilian liberecon.

Disvolvigante en tiaj cirkonstancoj, la literaturo de la subpremitaj popoloj ne povis do iri en la direkto, laŭ kiu evoluis la skribarto en la okcidenta Eŭropo. La misia luktado brulstampis sanktan stigmon en la karaktero de tiu literaturo. Pro tio ĝi tuŝas ĉiujn malfeliĉojn de la popolo kaj pro tio ĝi preskaŭ ĉiam havas popolan koloron kaj karakteron. Tio eble ankaŭ estas la kialo, pro kiu «la intereso de la fremdlando pri la ĉeĥoslovaka originala literaturo estas tiom malgranda» — la grandaj popoloj simple ne elsentas tiun celon kaj taskon, kiun implicas tia literaturo, kaj kiam okcidenta eŭropano legas ion el

# REVUO DE REVUOJ

## Rapida filmraporto pri nia gazetaro

Unua bildo. Endistoj kaj kontraŭendistoj.  
Kontraŭ end. Parolas P. Corret en la Franca Esp-isto:  
Vi pagu vian kotizajon.  
Vi estas pagunta vian kotizajon.  
Via kotizajo estas paguta de vi.

La sinjoro pagunta sian kotizajon estus tiu, »kiu devas pagi« ĝin; la paguta kotizajo estus tiu, »kiu devas esti pagata«. La paguta kotizajo (t. e. kotizajo, kion oni pagu) estas dek frankoj. Konsilantoj ne ĉiam estas paguntoj (t. e. tiuj, kiuj devas pagi).

Nur provu la Idistoj kaj Idemuloj esprimi tion lastan per sia lama »-end«, — a'ilingva estonta partecipo; pasivo sen aktivo!

Evidente, la Zamenhofa formo estis multe pli bona, ol la Ida. Ĝi ne sole apartenis al la sama sistemo, kiel la cetero de la konjugacio, sed ĝuste tial ĝi estis ankaŭ perfekte simetria kaj ebligis tiel bone esprimi: »Vi devas pagi vian kotizajon«, kiel: »Via kotizajo devas esti pagata«. Vortsparemaj matematikuloj, kiujn mi ĝis nun sendube malĝojigis, certe povas ĉi tie trovi ŝatindan materialon por plej delikata plezuro. Ili danku al Zamenhof!

\*

Por end. Parolas samloke M. C. Butler.

Efektive, al la serioj AS, at, ant, IS, it, int, OS, ot, ont oni sendube povas aldoni kvaran serion US, ut, unt. Tiuj formoj ja sin trudas al la lernanto, kaj dum tridek jaroj oni de tempe al tempo renkontas ilin uzatajn eksperimente aŭ ŝerce en nia literaturo. Mi mem uzis ilin ŝerce antaŭ dudek jaroj en »The British Esperantist«. Sed ilia signifo estas kondicionala, ne imperativa. (La acetuta domo: la domo, kiun oni acetus, se...; la parolunto, la homo, kiu parolus, se...). Eble tiuj formoj estas tiel malofte utilaj, ke ne estus saĝe ilin instrui, aŭ oficialigi; tamen ili kuŝas implicite en la lingvo.

Sed kiam D-ro C. diras, ke al AS, at, ant, IS, it, int, OS, ot ont, la serio U, ut unt (imperativa) estas »perfekte simetria«, li videble eraras. Estas do li, kaj ne la endemuloj, kiu per sia propono ĵetas konfuzon en nian regulan konjugadon.

Mi voĉdonas senhezite por la oficialigo de la sufikso -end, sen ia rezervo pri faka aŭ materiala uzo. Kaj ŝajnas al mi, ke se la L. K. rifuzus oficialigon al formo neniel malbona aŭ kontraŭfundamenta, kiu havas multe da

la klasika literaturo ĉeĥa, slovaka, pola, juda k. s., ĝi frapas lin, kiel io mistika, se ne ekzotika, sed ĉiam kiel ia folklorajo. Komprenoble, mi ne parolas pri la mondfama verko de Hašek »La brava soldato Ŝvejk«, kiu cetere ne estas karakteriza por la ĉeĥoslovaka literaturo kaj »ĝia interna etoso«.

Ĉar la meza esperantista leganto, kie ajn li vivas, estas agordita por sentado kaj komprenado internacia, almenaŭ pro tio mem, ke li apartenas al nia movado, kiu jam nun evidente disradias ion en speco de supernacia kulturo, tial, supozeble, li kapablas penetri kaj trafite pritaksi la apartaĵojn de tiu »alia« literaturo — kaj tiu-okaze la ideo eldoni en nia lingvo antologiojn de pluraj malmulte konataj literaturoj estas vere salutinda. Per tio estos ne sole ĝustigata la erara opinio, kiun multaj ofte havis pri la literaturo de la malgrandaj nacioj, sed estos ankaŭ plenumata unu el la ĉefaj celoj de Esperanto, nome la interproksimigado de popoloj per reciproka diskonigado de iliaj verkoj.

Oni povus diri, ke tamen antologio ne prezentas klaran bildon pri la vera aspekto kaj stato de la koncerna literaturo, ĉar la enhavataj en ĝi pecoj ne respegulas reliefe la karakteron de la prezentitaj aŭtoroj. Kiu, ekzemple, volas ekkoni la senmezuran talenton de Božena Němcová, la plej granda, mi kredas, ĉeĥa verkistino, devas nepre tralegi sian faman libron »La avino«, en kiu ŝia granda talento montriĝas en sia plena brilo. En anto-

logio, komprenoble, mankas loko por represado de ampleksaj romanoj, kaj la redaktintoj havis sufiĉe malfacilan taskon, kiun ili malgraŭ ĉio laŭdinde plenumis, ĉar kvankam la loko estis tre limigita, ili tamen sukcesis prezenti de ĉiu verkisto kaj poeto nur la plej karakterizan kaj nelongan verketon. Tiamaniere, dank' al la fervoro kaj sindonemo de negranda grupo de ĉeĥoslovakaj bonaj esperantistoj, kies rimarkinda talento restas ekster ĉia dubo, ekestis grava kaj ampleksa verko, vera monumento de la »ĉeĥoslovaka« literaturo.

\* \* \*  
Dua bildo: La ne pereigebla optimismo.

Parolas d-ro Olsvanger: LA AMO DEVAS VENKI INTER LA NACIOJ (Nia Gazeto): Neniu nacio povas vivi sola. Ĝi bezonas la simpatian kaj helpon de aliaj nacioj. Olsvanger kredas profunde, ke ĉiu nacio estas speciala manifestacio de la dia spirito, do egale sankta, egale estiminda, respektinda. Li ankaŭ multon valoran lernis dum sia restado inter la hungaroj kaj li esperas, ke malgraŭ la nuna regado de la malamo kaj militemo venos la tempo, kiam ĉiu nacio vivos sian propran vivon, kantas siajn proprajn kantojn, sed tiuj kantoj iu super la nacioj, en la alteco unuiĝos en mirinda unusona simfonio por sendi dankon kaj laŭdon al la Dio de la tuta homaro.

\*

Pri la sama temo. Gvidlumoj al Vero. Parolas Abd-Ŭaha. (La Nova Tago. Julio 1935.)

Ni meditu iom pri la teruraj okazintaĵoj en okcidenta Tripolio. Kiom da patroj kiuj perdis filojn; kiom da malgrandaj infanoj kies patroj estas for; kiom da kortuŝitaj patrinoj kiuj ploradas pro la morto de siaj filoj kaj kiom da edzinoj, kun larmo en okuloj, malĝojigas pro la mortakcidento de l'edzo. La homa sango estas verŝita pro teraj aferoj, dum la sovaĝaj bestoj ne militas pro aŭ pri la tero — ĉiu estas kontenta per sia propra ripozejo. Lupo kontentigas je sia ejo, tigro ne postulas kavernon krom la sia kaj leono loĝas en sia propra densejo. Neniu el ili eĉ pensas troŝargi la aliajn. Sed ve! se la homo ekposedus la tutajn hejmojn, li tamen serĉadus havigi al si alian. Dio kreis tiun ĉi estaĵon kiel homon, sed li fariĝis pli kruela ol sovaĝaj bestoj, ĉar tiuj ne disŝiras animalojn el sia sanspecaro.

logio, komprenoble, mankas loko por represado de ampleksaj romanoj, kaj la redaktintoj havis sufiĉe malfacilan taskon, kiun ili malgraŭ ĉio laŭdinde plenumis, ĉar kvankam la loko estis tre limigita, ili tamen sukcesis prezenti de ĉiu verkisto kaj poeto nur la plej karakterizan kaj nelongan verketon. Tiamaniere, dank' al la fervoro kaj sindonemo de negranda grupo de ĉeĥoslovakaj bonaj esperantistoj, kies rimarkinda talento restas ekster ĉia dubo, ekestis grava kaj ampleksa verko, vera monumento de la »ĉeĥoslovaka« literaturo.

Alude al tiu »ĉeĥoslovaka« literaturo: en la komenco de l' verko troviĝas tre interesa kaj elĉerpa eseo de Vaclav Vazný pri la »Ĉeĥoslovaka lingvo kaj ĝiaj dialektoj«. En ĝi la aŭtoro parolas pri la »lingvo ĉeĥoslovaka« kiel pri memstara lingvo. Eble mi eraras, sed ŝajnas al mi, ke »ĉeĥoslovaka« lingvo ne ekzistas. Mi scias tamen, ke ekzistas lingvoj ĉeĥa kaj slovaka, kiuj ambaŭ estas la oficialaj lingvoj de la ĉeĥoslovaka ŝtato. Ambaŭ estas sendube tre tre similaj, komundevenaj lingvoj, sed kio estas la »ĉeĥoslovaka« lingvo? Ĉu ia nova idiomo, kiel ekz. la hindustana en Hindujo? Sed eble la ŝtata politiko postulas tiun determinon por ambaŭ oficialaj lingvoj.

La prozon en la antologio reprezentas la plej talentaj kaj plej famaj plummajstroj de la »ĉeĥoslovaka« literaturo: la jam menciita granda prozistino Božena Němcová; Alois Vojtech Smilovský, kies novelo »Kudrilo« estas vere klasika; Matej Anastaz Šimáček; Dyk, Machar,



Lupo estante manĝegema, ne dissiras pli ol dek ŝafojn dum nokto, sed kompreneble unu homo kaŭzas morton de centmiloj da homoj nur en unu tago. Bonvole juĝu, ĉu tio estas justa? Se iu mortigas homon, oni nomas lin mortigisto, sed mortiginte centmilojn da homoj, li prenas la titolon de »Cefo de bravuloj«. Se iu ŝtelas nur dek gramojn de ies posedajo, li estas ŝtelisto, sed rarmortiginte landon li rajtas la nomon de »venkinto«. Se iu bruligas domon, oni estas konvinkita ke li estas krimulo, sed cindriginte provincon per kanonpafado li meritas la titolon de »mondvenkinto«. Tio devenas el sovaĝeco de l' homo kaj manko de religia sento. Se oni kredus al dia justeco, kompreneble neniam oni konsentus suferigi iun aŭ versi eĉ guton da sango, sed kontraŭe klopodadus tag-nokte ĝojigi ies koron.

Dank al Dio ke la vekigsignoj estas sentataj en homoj. Nun estas la matena krepusko de la granda paco, kaj ni esperas, ke la unueco de l' homa mondo disvastiĝos, malamikaĵoj kaj diferencoj inter la homaro malaperos kaj la plej Granda Paco okazos.

\* \* \*

*Tri bildo. El la vivo de la Esp.-organizoj.*

Parolas: La Informoj ... de Estonio (No 162—163):

Jam en la jarkunveno estis preparolita tio, ke UEA ne formas la centron de komuna fronto, ne donas labor-direktivojn al la landaj centroj, ne interesiĝas pri la unueco de ilia laboro (ekz. nenian atenton trovis la kunlaboro de Balt-Skandinaviaj landoj), sed jen okupas sin interalie pri tiaj detalaj demandoj, kiuj povas esti nur preferokupoj de la gvidantoj de la movado: en oficiala raporto al la Stockholma kongreso ni trovis tiajn detalajn ojn, ke ekzistas ekz. por biskvito kaj keksa Esperanta fabrikmarko »Esperanto«, ni eĉ scias la presejon, kie estas presitaj Braziliaj aŭ Hungaraj bildpoŝtkartoj. Sed apud tio ni tamen fakte nenion scias pri la stato de la movado en aliaj landoj, nek pri ilia laboro, nek pri la labormanieroj, nek pri iliaj spertoj. Kvankam la raportado pri la stato en Eŭropo okazas laŭ fakoj, tamen ne estas priskribata la fakta stato, sed nur tiuj hazardaj entreprenoj, kiujn iniciatis aŭ kiujn iel partoprenis UEA. Sajne UEA tute ne penis utiligi la naciajn centrojn kaj fakorganizantojn por kompilo de raporto, kiu prezentu faktan staton de la movado. Ne estas mirinde, ke do ekz. en turismo la rolo de Esperanto limiĝas kvazaŭ per kelkdeko da esperantlingvaj broŝuroj, kaj la utilaj spertoj de la Sveda kaj Estona Esperanta turismo ne trovis imitantojn.

La landaj centroj krom la gvidado de la enlanda

Matej Capek-Chod k. a. — la nombro de la ĉeĥoslovakaj verkistoj estas sufiĉe granda kaj tiuj ĉi nomoj, al kiuj ni devas aldoni ankoraŭ multajn aliajn, tiujn de Malřov, Gregorov, Srmek, Jaroslav Durych (majstra rakonto »Tri dukatoj«), Tilschov, Jan Vrba, Karel Capek — ĉiuj ĉi nomoj signifas la ĉefajn etapojn de la ĉeĥoslovak prozo en ĉiuj ĝiaj fazoj kaj en ĝia tuta progresado.

El la poetoj oni devas mencii unualoke la fekundan kaj genian, cetere konatan ankaŭ ekster la limoj de sia patrujo, Jaroslav Vrchlick; la grandan slovakon lirikulon Pavel Hviezdoslav; la senteman poeton Jan Neruda; la romantikulon Julius Zeyer, la nacian bardon Svatopluk Cech, la impresioniston Antonn Sova, Janko Jesensky, Petr Bezruĉ estas la malĝoja poeto de l' prematoj, liaj poemoj spiras trankvilan ribelon.

Kompreneble mi ne mencii ĉiujn aŭtorojn, kontribuintajn al la antologio. Povas esti, ke mi preterlasis nomon, kiu en la ĉeĥoslovaka literaturo ludas multe pli gravan rolon. Tiam la ĉeĥoslovakaj legantoj indulgeme pardonos al mi, konsiderante, ke en tiaj okazoj la recenzisto skribas sub tute subjektiva impresio, ĉar tralego de nur unu novelo, rakonteto aŭ poemo ne povas prezenti al li klaran bildon pri la tuta verkaro de la resp. aŭtoro.

La lingvo de la traduko estas ĝenerale tre bona: oni ja scias, ke la slavaj Esperantistoj ĉiam plejparte bone uzas nian lingvon. Ilia lingvouzo estas ne sole ĝusta kaj

movado devas serĉi direktojn laŭ internacia kampo, kion en preta formo devus doni UEA. Ni ne povas esti kontentaj pri la laborkampoj de UEA pro la proporcioj de ilia prijuĝita graveco — jen la kaŭzo de nia decido.

Post la Roma kongreso okazis interparolo de nia sekretario kun la prezidanto kaj direktoro de UEA pri nia decido kaj deklaro. La resumo estis: se EAE ne povas pagi, ĝi staru flanke de la movado ĝis pasos la krizo. Ni kuraĝas aserti, ke en Estonio la movado estas unu el la plej viglaj. Se niaj spertoj ne estas sciindaj, se UEA estas indiferenta rilate al nia nuna vigleco kaj farto (progreseblecoj por estonteco), se ni ne rajtas el niaj vidpunktoj kunparoli pri la bezonoj de la movado en internacia kampo — ni protestas antaŭ la publika opinio de la esperantistaro kontraŭ tia gvidado de la Esperanto-movado.

Se UEA bezonas kaj vere akceptas sugestojn, kiel ĝia direktoro deziresprimis en la laborkunsido de la lasta kongreso kaj se UEA deziras kunigi ĉiujn landajn asociojn en UEA, kiel deklaras ĝia prezidanto en la Antaŭparolo al la Oficiala Raportaro (1935), kaj ĉar la prezidanto konstatis la necesecon de iama revizio de la statuto de UEA, ni volonte atendos reprimtrakton de nia situacio por principa decido, ĉar nia situacio ne estas la sola tiaspeca, sed nur unu ekzemplo el multaj aliaj similaj.

\*

Malpli ĝentila estas Bert Turner, kiu en la »Sur Posteno« (N-ro 33) jene afablas al k-do Lanti; Herezulo kaj eble al SAT:

La plena ekstremo de l' barba blankul'  
Montriĝas en verk' »Herezaĵo.«  
Jen plua atesto, ke tiu aĉul'  
Troviĝas jam nun sur postaĵo.  
Sed tute ne ĝenas al IPE-anar'  
La ranca vomaj' de l' kreteno.  
Ni sovetamikoj en plensolidar'  
Viciĝas en front' »Sur Posteno!!«

\*

Nun ni povas plenrajte almeti la jenan strofon de anonima poeto en la *Informoj de Estonio*. Titolo: *Esperantistaj tipoj*. (Majo)

Ekzistas tiuj diversaj tipoj  
— kun noblaj principoj —  
ne nur en nia lando malgranda,  
sed en la tuta mondo Esperanta  
en kvanto  
sufiĉe granda.

korekta, sed — kaj tio estas multe pli grava — ankaŭ facila kaj flua.

En la poemtradukoj frapas la leganton la granda talento de Miloř Luk, kiu malkaŝas mirindan senton poetan. Volontege mi citus ĉi tie ekzemplon de lia perfekta tradukarto, se la tuta artikolo jam sen tio ne estus tre longa. Tio tamen ne signifas, ke la ceteraj kunlaborintoj meritas malpli grandan atenton. Kontraŭe, la nomoj de Ginz, Kamaryt, Cech, Hromada, Hladky, Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Sklenĉka, Rosa, Pumpr kaj ĉiuj ceteraj estas la plej bona garantio pri la altnivela traduko. Ili ĉiuj indas nian plej koran dankon pro la granda donaco, kiun ili faris al nia Esperanta literaturo, riĉigante ĝin per tiom valora kaj impona verko.

Kaj ankaŭ al AELA estu dirita nia danko pro tio, ke ĝi ebligis la aperon de tiu valora libro.

I. Lejzerowicz

JEROME K. JEROME: Tri homoj en boato, por ne paroli pri la hundo. El la angla tradukis G. Badash. Gaja historio pri libertempa vivo. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt. Formato 20x13.5 cm. 256 paĝa. Prezo: broŝurita svfr. 4.—, bindita 5.50 plus 10% por sendkostoj. Unua libro de la beletristika serio de AELA 1935.

La ĝisnunaj tradukoj en Esperanton el angla lingvo estis plejparte pezaj klasikaj verkoj, aŭ modernaj efemeraj romanoj, kiujn oni malfacile trovas en la memoro tagon post lego. Sed nun Literatura Mondo prezentas al

Do — ĉu ne estas stulte kaj kompromite,  
se la esperantistoj opinias sin elito,  
homoj de pli alta kvalito?  
Unuvorte jam formortas »la interna ideo«,  
inter si batalas la pacarmeo.  
Ho, verduloj, verduloj!  
Unue ni kulturu nian propran rondon,  
Nur tiam povos venki ni la tutan mondon.

\* \* \*

*Kvara bildo. Amara aktualajo kun malnova dato  
kaj poste »Vivu la krizo!«*

Parolas la taglibro de mortinta hungara verkisto (G.  
Gárdonyi. En Hungara Heroldo No 1. 1935):  
19 aŭgusto 1915.

Militdragono flugas super urbon (Londono) kaj de-  
faligas bombon.

— Sukcesis! — oni diras supre kun ĝojo.

La bombo mortigis maljunulon kaj infanon.

— Sukcesis!

Malamikaro ĉirkaŭfermas urbon (Kovno), mortintoj  
kaj vunditoj faladas milope.

Triumfa kriego, mortanta ĝemveo.

Sukcesis!

Te Deum: aŭdiĝas de la venkintoj. „Miserere“ de la  
venkitoj.

La kapitalistoj ridetante rigardas la borsan rubrikon:  
Sukcesis!

\*

*El Vivu la krizo.*

R. Schwartz.

Mi konkludas do rezone:  
Ĉio nun funkcias bone,  
Ĉar ĝentile, am-afekte  
Min salutas tre respektite  
Eĉ l' enterigist-komiz'!  
Do ne ploru, kara frato,  
Pri fiktiva mizerstato,  
Sed ĉielon ni instigu,  
Ke ĝi longe plilongigu  
Belan tempon de la Kriz'!

(Franca Esp-isto Junio)

\* \* \*

*Kvina bildo: Strofoj kaj etaj poemoj de originalaj  
poetoj.*

ni verkon, kiu estis populara inter anglaj legantoj de tri  
generacioj kaj hodiaŭ estas esence tiom aktuale ĝuebla  
por ĉistra legado, kiom hieraŭ por niaj gepatroj kaj  
antaŭhieraŭ por niaj geavoj.

Eĉ la plej pesimista observanto de la nuna mond-  
stato devas konfesi, ke por iu parto de la proleta klaso  
ĝi prezentas pli larĝan vivon, eĉ se por alia granda parto  
ĝi alportis ekonomian mizeron, kiu terure premas la  
spiritan vivon. Mi aludas al la pli libera vivo de multaj  
gejunuloj rilate al sportoj, vestoj, kino kaj libroj: aferoj  
antaŭe nekonataj aŭ konataj nur de malproksime kaj  
precipe aludas nun al la disvastiĝinta kutimo inter urbaj  
gejunuloj, libertempoj per vagadoj, tendoj, riverboatoj kaj  
ĉiuj eblecoj de la plenaera kampara vivo.

Guste tial la verko de Jerome K. Jerome trovas  
novan aprezon inter la junuloj de nia generacio. Post  
aklamado en pasinta generacio de tiuj, kies situacio per-  
mesis ĉiujaran eskapon el la urba vivo por kelksemajna  
libera vivo. La rakonto en si mem estas tre simpla, pri  
trio de viroj, kiuj ekskursas dum kelka tempo en boateto,  
esplorante la historion, la trinkejojn kaj la ĉiutagajn  
aventurojn, kiujn prezentas la Tamizo. La ĉarmo de la  
libro konsistas en la gaja, bonkora humuro. La aŭtoro

El »Vesperhore« (Kanamatu)

Foje  
vesperhore  
kampovoj  
promenante sole  
mi ekvidis ĝoje  
stelon oran  
briletadi sola  
en ĉielo fora  
jam purpurkolora.

(Aperis en »Paco« — Japanujo — Sept. 1935.)

\*

*Heroldo de l' Printempo.*

(Judith Krievs)

En senfine blua, sorĉa firmamento  
Tintas arĝentsone dolĉa sonoril',  
Alaŭdet' — heroldo de l' Printempfeino —  
Plektas melodion el sunora bril'.

Tintu, sonorilo, vin reĉhos koro!

Ridu, melodio, vin imitos buŝ'!

Kanto sentoriĉa la animon savis

De la vintro griza kaj glacia tuŝ'.

Aperis en »Ondo de Daŭgava« aŭg. 1935.

\*

ORKIDEO.

— L. Jevsejeva —

Sub la ĉiela blu' tropika  
Vin naskis surda nokta hor'  
Nun en kristala vazo mortas  
Beleco ekzotika for.

Mi arde kisas vin, mortantan,

Nektaron lastan trinkas buŝ'.

Vin ebrigaas kis' pasia,

Ekscitas vin la lipa tuŝ'.

Vin kisas mi, kaj sala larmo

Sin kaŝas honte gut' post gut'

En vaz' kristala. Orkideo

Mortsvenas en la amservut'.

Aperis en »Ondo de Daŭgava«, febr. 1935.

\*

Jen la gajninto de la »Floraj Ludoj«. (Aperis en  
la »Kataluna Esp-isto«, Julio 1935.):

MIA AMO

— Madeleine Vuille (Mad. Mcvo) —

Simile al rivero bru-akva kaj rapida,

Torentas mia amo sur voj' de la viv'

Kaj arde ĝi verŝadas, en vigla kor-aktiv',

La ondojn plej pasiajn de l' sento nedivida,

estis majstro de iu speco de ĉiutageca humuro, naiya, sed  
tamen profunda, kiun oni kutime taksas esence angla  
kaj la amuzaj, absurdaj aventuroj de la tri junuloj kaj  
ilia hundo estos bonvenaj al la tutmonda legantaro.

La sukceso de la libro espereble estos same granda,  
kiel tiu de la fama originala verko de John Merchant:  
Tri Angloj Alilande. Ĝia humuro estas parenca al tiu de  
Jerome K. Jerome. Sed la pli malnova aŭtoro elektis  
verki pli profunde kaj tuŝas delikate, sed certamane  
multajn moralajn kaj historiajn flankojn de la vivo. Tiel  
la leganto de la libro ricevas ne nur kontakton kun menso  
multflanka de homo, kies humaneco kaj bonkoro ĉiam  
simpatie koloras lumon, kiun li ĵetas sur simplajn hom-  
ojn de la ĉiutago, sed samtempe memorigojn pri gajaj  
epizodoj dum la propraj libertempoj, ekskursoj, kaj  
nepedantaj instruoj pri la historia fono de la mondfama  
rivero.

La nomo de la tradukinto estas relative nova en nia  
movado. Lia laboro estas ĝenerale kompetente farita  
kaj se veras, ke li povas ankoraŭ lerni en la traduka  
arto, egale veras, ke per sia nuna donaco al nia literaturo  
li povas multon instrui al ni.

K. R. C. Sturmer.

Simile al la monto majeste bel-solida,  
Klarege siluetas, en firma efektiv',  
La amo mia granda, potenca en masiv',  
Profunda kaj senlima, kun volo plej decida.

Simile al muziko je dolĉa la akcent',  
Vibradas mia amo en sono harmonia,  
Kun noblaj la agordoj de la sincera sent'.  
Simile al violo parfuma kaj gracia,  
Floradas mia amo intime en silent',  
Guante la feliĉon en revo emocia...

\*

La talentan verkiston de la jenaj du strofoj la kruela  
morto forrabis; lia nomo: *Julius Karnas*.

Malgranda iĝas lia kor'  
sed granda l'emoci';  
li fine kison ŝtelas for  
de l' lipoj sen konsci';  
dum kantas birdo en la nest';  
joho, joholdriho,  
por koro estas amo fest',  
joholdriholdriho!

Denove vagas la junul'  
ridante pro l' hezit',  
dum dolĉe revas sub betul',  
knabin', sur herbolit'.  
Kaj kantas birdo en la nest':  
joho, jeheldriho,  
por koro estas amo fest',  
joholdriholdriho!

Aperis samloke.

\*

Kaj laste unu strofo el la 3-a n-ro de *L' Esperanto*  
(Italujo), por kiu ne nur la aŭtoro »*Esperanto Institut*  
*Ciam Pli Alti*« Rotterdam — kiel povas tuta instituto  
kunmeti tiom da nescio kaj mallerto! — sed ankaŭ la  
est. redakcio meritas karceron kun kelkaj fastotagoj: (Ti-  
to'o: Al Roma!)

Ho, bela Romo, ho, bela Romo  
Kie loĝas la Patro ni'  
Ho, bela Romo, Kristana Romo,  
Kiom benita estas Vi.  
Ni malatentos ĉian pen'  
Por meriti la Patran ben'  
Ho, bela Romo, Kristana Romo,  
Atendu nin, ni certe ven'.

PHILIP OPPENHEIM: RICA KAJ SEN MONO.  
(Romano trad. el la angla de Fred. E. Wadham. Eld.  
The Esp. Publishing Co. Ltd. 222 p. Prezo: 4 ŝ. afr.  
bindita.)

Cu estis, ĉu ne estis, eble trans la Fabeloceano vivis  
tre-tre potenca reĝo; la reĝo havis filon. La reĝido estis  
tre-tre riĉa, tamen li estis ĉiam malgaja kaj malkontenta.  
Multaj kuracistoj serĉis la kaŭzon de tiu stranga malsano.  
fine grandbarbulo donis al li la jenan konsilon: »Demetu  
por unu jaro viajn reĝidajn ornamojn, forgesu hejme  
vian smokingon, aŭtomobilon, ŝoforon, serviston, monon,  
kaj surmetu anstataŭe la ĉifonojn de senlabora malriĉulo  
kaj foriru por unu jaro. Sed ne rerigardu, ĉar vi iĝos  
salidolo! La reĝido brave eltenis kaj fine li ne nur resan-  
iĝis, sed ankaŭ ektrovis la forserĉitan stelokulan reĝidino  
kaj ili eĉ nun feliĉe vivas trans la Fabeloceano, en  
Harley-street, en Londono, kie sinjoro Oppenheim verkas  
siajn agrablajn feinfabelojn. La reĝidoj estas aktuale bone  
kombitaj milionuloj, kies ĉarman bonvolon volonte ĝuas  
la granda infano de la dudeka jarcento, kiu cetere tre  
ŝatas la similajn historiojn en la kino. Oni ne povas nei, ke  
la romano facile legiĝas kaj eĉ la recenzanto rapide konstata-  
tas, ke estus misago surmeti la plej mikroskopajn okul-

Tiu *apostrofema* instituto estas iom apostata el la vid-  
punkto de la esp-a poetiko.

\* \* \*

Sesa bildo: *Kelkaj tradukaĵoj*.

### LA NAJTINGALO

— (*Theodor Storm*, 1817—1888) —  
Tutnokte el ĝardena fon'  
Laŭtigis birdokanto  
Kaj jen pro ĝia ĉarma ton',  
Ehanta, reehanta son'  
Ekfloris rozoplanto.  
Petola estis l' infanet'.  
Promenas nun en revoj,  
Capelon mane portas ŝi,  
Atentas ne pri sunradi',  
Pri tagoj aŭ pri devoj.  
Tutnokte el ĝardena fon'  
Laŭtigis birdokanto  
Kaj jen pro ĝia ĉarma ton'.  
Ehanta, reehanta son'  
Ekfloris rozoplanto.

Trad. d-ro W. Biehler.

Aperis en »Verda Revuo«, Aprilo.

\*

### El »LA NOKTO«

— *Verner Von Heidenstam* —  
Vi min demandas, kial lum'  
sub mia pord' rubandas.  
En ĉiu nokt' hezite, dum  
promeno vi demandas.  
Jen la sekret' de mia kor',  
fabelo — sed forirus  
tuj la subtila bonodor',  
se mi al iu dirus.

Tradukis: *Magda Carlsson*.

(Sveda Esp. Gazeto, sept.)

\*

### El »EKDORMAS LAG« (Svisa popolokanto)

Ekdormas lag' en ombro bela  
Silentas bird' ekmortas tag'  
Kaj per flugilo plej malhela  
Alvenas nokto sur la lag'.

Tradukanto: *Mad. Mevo*.

Aperis en »Semanto«, aŭg.)

(*Daŭrigota*.)

Kompilis: *Fersll*.

vitrojn de la skrupuloj. Temas nek pri pli, nek pri malpli,  
ol pri fabelo por infanoj, kiuj estas lacaj, ĉar ili ludis tro  
multe en la polvo kaj koto, kiun oni nomas malriĉeco  
kaj senlaboreco, kaj nun ili estas dormemaj kaj eĉ la  
lulkanto de onklo Oppenheim ili eksongos pri la afabla  
reĝido, kiu feliĉigas sian tutan ĉirkaŭantaron kaj krome  
ankaŭ la leganton. La angela naiveco de la romano, kiu  
ŝajnas esti pli proksima parenco al la filmromantiko, ol  
al Dickens, ne impresas malfavore kaj finfine ni povas  
nur ripeti, ke neniu trompiĝos, kiu serĉas facilan legajon.

La traduko ĝenerale estas bona. Oni vidas tuj, ke la  
tradukinto scias la lingvon kaj oni sentas eĉ sukcesan  
klopodon je stila vigleco. Kelkloke tamen ne mankas  
makuletoj: »Mi tute ne estas certa, ke mi ne unu tagon  
sekvos vian konsilon« anstataŭ: »ke iun tagon mi ne  
sekvos...« Stranga esprimo: »enkonduki iun en la ĉe-  
eston de la kuracisto (plurfoje)«. Poste: »superrigardi«  
estas uzata en la senco: esplori, observi, kontroli. Kial  
»valeto« (eta valo?) anstataŭ »ĉambristo«? Anstataŭ »buk-  
mekro« eble pli taŭgas la simpla »vetlibristo«. Krome,  
mi kredas, ke »trans« estas neĝuste uzata en la senco »de  
unu rando ĝis la alia«, ĉar ĝia senco estas proksimume:  
malantaŭ; disiganta objekto. »Uloj« ne signifas *personoj*,

sed *personaĉoj*. Tiaj makuloj estus facile forigeblaj per kompetenta revizio, kaj tiam restus vere vigla, verva traduko.

La eksterajo de la libro estas bela kaj bona, nur la preseraroj povus esti iom pli maloftaj.

F. Szilágyi.

ESPERANTAJ HISTORIEtoj I. de Peter Frey. Haderslev, 1935. Danland, Clausenvej. 26.— 47. p. 13.5×19.5 form. prezo 35 ned. cent. bona papero, broŝurita, simpla, moderna kovrilo, ĉirkaŭtranĉita.

La unua rimarko estas, ke ne temas pri »esperantaj« historioj, sed pri diversaj gajaj kaj malgajaj rakontetoj kaj anekdotoj — en Esperanto. Laŭ tia titolado oni povus nomi tradukon de ia ajn romano »*Esperanta Romano*«, sed tio ja erarigas la legantojn! La celo de la libreto estas servi, kiel »*Unua Legolibro*« post kursoj, por ekzercu kaj por havigi al komencantoj facilan legadon. Por similaj celoj ni jam havas kelkajn librojn, anekdotokolektojn kaj »postkursajn« librojn, inter kiuj la plej bonaj restas tamen la »*Unua Legolibro*« de Kabe kaj la »*Fundamenta Krestomatio*«. Al la lastnoma deziras eble fari preparon la menciita libreto, ĉar kelkaj historioj estas prenitaj el ĝi, kun signo: provo el »*Fundamenta Krestomatio*«. Kelkaj danaj kompetentuloj trarigardis la korektojn kaj la libreto estas vere taŭga kaj bona por la destinita celo.

Kelkaj malgrandaj korektindaĵoj tamen restis. Ili estu ŝanĝotaj en la esperata dua eldono: »La kuracisto, kiu jam antaŭe multfoje diris...« kaj ne »multfoje antaŭe diris«, ĉar »multfoje« rilatas al »diris«. ... ili trovis la fratinton en ŝia seĝo...« kaj ne »en ŝia seĝo«. »Li proponis, ke li volas suprenrampi...« kaj ne »volos«, ĉar kiam li diris, la volo jam ekzistis! »El unu el siaj kofroj« kaj ne »De unu el siaj kofroj« — »prenis« ktp. »Dum kiam« anstataŭ simple »dum« estas laŭ *Plena Vortaro* prave »*senutila, nekonsilinda!*« — »Venis de pirata ŝipo« Kio? Mankas subjekto! Almenaŭ »Ĝi venis;« »Ke ĉio bone fartu, vi mem zorgeme vartu!« — anstataŭ »Se ĉio bone fartu...« Post »se« povus stari nur kondiĉa modo! »Cemizon mi efektive (aŭ tute) ne posedas« anstataŭ »mi vere ne posedas«. »Demandis al la komercisto: Pli bone de la komercisto.« »distancon trapasendan: tie vere sufiĉus »trapasotan«, do ne necesas en »unua legolibro« la sufikso »end«. Jen ĉio. Do la libreton ni rekomendas tiel por grupvesperoj, kiel por distraĵo mallonga, por rerakonto kaj ekzercado. P. B.

JAN WOLSKI: ĈU ĜI ESTAS NUR FABELO? Eldono de Esperanta Eldon-Kooperativo AL Jeruzolimskie 101, Varsovio, 1935. El pola lingvo tr. Kpt. Roman Dabrowski, 157 p., ilustrita per desegnaĵoj.

Kiel la eldonejo montras, ĝi estas kooperativa romano — por junularo. Sed ankaŭ plenaĝuloj povas ĝui ĝin kaj lerni el ĝi. Wolski ne estas ia fama verkisto, sed entuziasma batalanto por kooperativa movado kaj por la junularo. La simpla, bela libro rememorigas min per kelkaj rakontoj la faman libron de »*Koro*« de Amicis. Eble por kelkaj estas troa, ke la kooperativa movado estas tiel entuziasmiga, kiel ekzemple por multaj la esperantista movado aŭ skoltismo. En la libro estas multaj aferoj, kiuj rememorigas la skoltismon: la memstara laboro memvola de junuloj, helpemo al malsanuloj, malriĉuloj, unu al alia, internacia libertempejo, infaninterŝanĝo, reciproka lernado, vizitado ktp., ĉiuj belaj aferoj. Laŭ la libro, en Polujo jam estas tiaj junularaj kooperativaj laborejoj, kie junuloj laboras, do mi ne povas tion prijuĝi, sed certe estas iom ne kredinda por multaj, ke junularo tiel ĝenerale interesigas pri tia ŝajne komerca laborado kaj ĉiam troviĝas — laŭ la libro — sufiĉaj memvoluloj por ĉiaspeca laboro. Mi spertis ĉe skoltoj, kiuj ankaŭ mem elektas kvazaŭ plenaĝulan laboron — ke, malgraŭ promesoj kaj bonvoloj, sen energiaj gvidantoj ofte oni ne sukcesas plenumi multajn aferojn. Do, vere, ŝajnas »Fabelo« la deziro, ke la kooperativo de junularo disvastiĝu tra la tuta tero; kvankam la idealo estas belega kaj la aŭtoro, speciale por la esp-a eldono, aldonis ĉapitron, laŭ kiu la helplingvo por tiu »frateco de la popoloj« devas esti Esp-o! La

traduko estas verŝajne laŭebla imito de la originala infanca kaj porinfana stilo, tial ĝi estas eble kelkloke iom stranga, sed despli interesa kaj donas lokan koloron al la tuta verko, ian intiman etoson kaj varmecon. Kooperativo, multaj polaj esperantistoj kune korektis la tradukon. La uzo de kelkaj specialaj infanjaj aŭ polaj kunmetaĵoj en esp-a adaptado — kaj la klarigoj ĉe la fino de la libro, faras la verkon eĉ pli interesa. La junularo esperantista, leginte la libron, lernos taksu la solidarecon kaj komunan laboron, eĉ se ĝi ne povos — pro manko de sufiĉaj gvidantoj — realigi la tutmondan junularan kooperativan movadon. Al kio mi tamen dezirus sukceson, kvankam multaj komercistoj ne ĝoje legos la klarigon de malutilo de komercejoj, butikoj por pruvi la neceson de kooperativa movado! Nur kelkloke estas ne ĝenaj preseraroj, la tuta libro estas zorge preparita kaj rekomendinda malgraŭ la tendenco aŭ eble ĝuste pro tio.

El kelkaj esprimoj, kiuj ne plaĉis persone al mi: »ludi je kamentubistoj« anstataŭ »ludi kamentubistojn«; »kiu ne volas, povas ne veni« anst. »ne devas veni«; »ankaŭ ne unu avo eltreniĝis« anst. »eĉ ne unu avo...«; »de kio komenci« anst. »kun kio — aŭ per kio komenci«; »al ne unu azenuleto eĉ larmoj ekbrilas« volas signifi, ke ne al unu, sed al kelkaj, multaj! Ĉu infanoj vere estis »*frivolaj*«, eble kelklande oni komprenas alian sencan sub tiu ĉi vorto! Cetere tiuj ĉi malgataĵoj kaj kelkaj aliaj tute ne ĝenas kaj ne forprenas la valoron de la libro.

P. B.

PETRO DANOV. LA SPIRITO KAJ LA KARNO. »Vojo, Vero, Forto kaj Vivo«. N-ro 2. Eldonis biblioteko »Nova Kulturo«. Sevlievo, Bulgarujo, 1935. Broŝurita. 67 p. Prezo: sv. fr. 1.—

La tria serio de la prelegoj de »*Majstro Danov*« en Esperanto. Mi ne diras ion surprizan, se mi rimarkas, ke ili ne diferencas de la pli fruaj similaj prelegoj laŭ rapidaj transiroj de la ĉefa temo al epizodoj, alegoriaj kaj materiaj klarigoj, ekzemploj. Eble kiel predikoj ili bone efikas, sed legante, oni precipe la simpla homo, por kiu li tiel detale klarigas ĉion, perdiĝas inter la ideoj ekaperintaj; dum por aliaj ĉi tiuj ideoj ŝajnas ofte naivaj kaj ne efikaj. Ĉiuj tri prelegoj estis dirataj antaŭ pli, ol 20 jaroj. Iliaj pravecon kaj valoron pravas, ke eĉ nun ilia enhavo estas vera, akceptebla kaj — malgraŭ la nekontinua stilo — leginda por tiuj, kiuj ŝatas mediti. Kvankam kelkaj partetoj estas preskaŭ ne kompreneblaj. La prelegoj estas: »Flusoj kaj malflusoj en la Vivo.«, »La nova Fundamento« kaj »Pasko«.

Kompreneble, la enhavon de tiaj traktatoj estas malfacilege resumi, mi eĉ ne provas tion. Nur kelkajn ĉefajn ideojn mi provas mencii: En la unua prelego estas pritrakita la reciproka influo de la spirito kaj la karno. Oni devas ekkoni la ritman movon, la leĝon de la tajdo; de la fluso kaj malfluso en la vivo. Danov parolas pri la leĝoj de la kontrasto kaj de la simileco, kiel regantaj en nia mondo. La fluso-malfluso estas levigo, mallevigo, progreso, malprogreso, bona sento, malbona sento, ktp. de la vivo, de la homo, de la homaro. Bedaŭrinde iom ĝenas, ke Danov sub fluso komprenas jen ian altlevigon, bonecon, jen, en alia ekzemplo, la kontraŭon. Kelkaj frazoj estas menciindaj: »Kiam iu predikanto aŭ oratoro predikas en preĝejo aŭ en parlamento, li devas forigi ĉiujn sedimentojn el sia stomako, el sia koro, el sia menso kaj tiam li parolu al la homoj.« Tio rilatas ne nur al paroloj, sed al ĉiuj agoj por esti en bona ritmo, en »fluso«. »Ni devas eliri el tiu malluma ĉambro de nia egoismo kaj eniri en la leĝon de la simileco, de la amo.« »Preĝi — tio estas la plej alta kaj nobla okupigo, kiun oni povas fari en tiu ĉi mondo.«

»Kiamaniere ni estos bonaj, kiam ĉiunmomente la mensogo estas nia akompananto?« — »Ofero kaj abnegacio por la ceteraj — tio estas kristanismo.«

La dua prelego temas pri la nova fundamento de la vivo. Por ĉiu vivo, agado, penso necesas fundamento. Kaj la vera fundamento povas esti ŝanĝita laŭ ekstera formo al bono aŭ malbono, sed neniam esence. La homoj eraras,

*Kara kamarado Waringhien*

En via recenzo pri la libro de Sturmer, vi mencias mian »malpravan« vidpunkton, rilate al la rolo kaj signifo de esp-o. Ne kredu, ke mi intencas polemiki kontraŭ vin pri tio. Tute ne! Mi ja scias, ke ne mankas ŝajne bonaj argumentoj por montri mian »malpravan.« Tamen mi restas ĉe la opinio, ke esp-o supervenkos la naciajn lingvojn, aŭ... *neniam* venkos, neniom ludos eĉ la rolon, kiun Zamenhof kaj la plimulto da esp-istoj difinis al la artefarita lingvo.

Ne intencante longe argumentadi por surbazigi mian tezon, mi simple faros jenajn rimarkigojn kun la nura celo montri, ke mi ne tiom fantazias, kiom oni povas supozi ĉe unua ekpenso pri la temo.

Unue mi diru, ke la dezirinda aŭ nedezirinda, ĉu esp-o anstataŭos aŭ ne la naciajn lingvojn estas ekster la diskuto: niaj deziroj aŭ timoj estas tute sen influo en tiu afero, *se ni utiligas kaj praktikadas esp-on*. Kiu fakte timus, ke esp-o povus forpuŝi la karajn naciajn lingvojn, tiu devus nepre forlasi la esp-an movadon kaj provi mallerni nian lingvon.

Oni do bonvolu pripensi jenon: Se esp-o posedas la kvalitojn, kiujn ni atribuas al ĝi; se post pli malpli longa tempo la uzado de nia lingvo ĝeneraliĝos ĉie en la mondo, tiam ŝajnas al mi neeviteble, ke la naciaj lingvoj tendencos pli kaj pli fariĝi duagradaĵoj, rilate ilian teknican, literaturan, kulturalan rolon.\* Aŭtoro certe preferos eldoni siajn verkojn en lingvo tutmonde konata de milionoj kaj centmilionoj da homoj. Famaj naciistaj verkistoj irlandaj (ekz. J. Yeats), la poeto certe ne konsentos rezigni verki anglalingve, eĉ se iam la irlandaj naciistoj sukcesus revivigi la gaean idiomon tra la tuta

\* Rilate al la »disdialektigo« de esp-o, mi simple diru, ke ĝi ja estus ebla, nur *se jam nun* la tuta mondo, per mi ne scias kia miraklo, decidus alpreni kaj praktikadi nian lingvon.

pensante, ke ili estas bonaj. Ili devas lerni la novan fundamenton, la instruon de Kristo, ke ni estas *sub neŝanĝebla regado de lego*. Por konstrui ian ponton: penson, laboron, aŭ la vivon, oni bezonas ĉiam du apogopontojn. Ili estas: la ĉielo kaj la tero, — la amo al Dio kaj al la proksimumo, — la edzo kaj la edzino, ktp. La pensoj, projektoj ofte ne realiĝas, — ne pro maljusta sorto, sed — ĉar ni staris sur malbona fundamento. Oni devas serĉi la kaŭzon de la malsukceso, malfeliĉo, ktp., oni devas pensi, vivi korekte, ne atendi instruon poste en la ĉielo, sed jam dum la tera vivo, ĉi tie boniĝi. Kelkaj sentencoj: »Por ke vi povu scii, ĉu vi havas fundamenton, ĉu vi ĝin trovis: en la momento, kiam vi trovis viajn apogajn punktojn, vi devas eksenti profundan trankvilecon.« — Ni devas konstrui laŭ difinitiva plano.« — »Se vi ne povas ekregi viajn cerbajn centrojn, viajn sentojn, se vi ne povas direkti vian volon, kiamaniere vi direktos ion ekster vi?« — Kristanismo estas amo al la proksimumo, ĝi estas scienco pri la amo kaj kiu ellernos tiun sciencon, tiu povas konstrui.« — »... en la donaco devas partopreni la buŝo, la penso kaj la koro, en ĝi devas esti enmetita la homa saĝo, scio kaj amo.« — »Vera sanktulo, tio signifas, povi regi la du principojn de la vivo tiel, ke vi ilin uzu por via evoluo...« — »Komencu kun viaj pensoj.« — »Vi havas malbonan penson, tio estas milito. Vi naskiĝas, vi mortas, tio estas milito. La vivo estas milito, tamen tiu milito devas esti bazita sur la principo: ni ĝajnu, sed ni ne perdu.« — »Neŭtraleco ne povas esti;

insulo. Estas natura deziro ĉe aŭtoro havi kiom eble plej vastan publikon.

Ĉu mi estas tro pesimista, opiniante, ke verŝajne forpasos almenaŭ unu jarcento antaŭ ol ĝeneraliĝos la uzado de esp-o? Aliflanke, ĉu estas signo de troa fantazimo antaŭvidi, ke post tiu relative longa tempo la okazoj kaj rimedoj por ke la homoj el ĉiuj kontinentoj alproksimiĝu kaj interrilatiĝu fariĝos neimageble pli oftaj kaj pli oportunaj ol ili estas nun inter diversaj provincaj en iu ajn nacio?

Se ne estas tro malsaĝe havi tian opinion, ŝajnas al mi, ke la *nuntempa* danĝero pri disdialektigo — se okazus la miraklo, kiun mi aludis pli supre — fariĝos tre neverŝajna.

Unuvorte mi bazas mian opinion sur tiuj konsideroj, ke esp-o finvenkos nur post longa tempo, kaj ke tiam la nunaj kaŭzoj pri disdialektigo ne plu ekzistos.

Mi jam diris sufiĉe por ke la leganto sciu, ke mi ne estas tiom fantaziema, kiom li — aŭ ŝi — (ĉu estus korekte diri: ĝi?) povus kredi ĉe la legado de via diro pri la demando. Permesu tamen, ke mi aldiru ankoraŭ kelkajn vortojn pri mia propra sperto ĉiutage.

Esperanto estas mia hejma lingvo; per ĝi mi ĝenerale esprimas miajn pensojn pli facile ol per la franca lingvo. Kaj tia konstato naskis ĉe mi la esperon, ke estonte pli kaj pli da homoj akiros la saman sperton. Se inter ili troviĝos geniaj verkistoj — kiaj ankoraŭ ne ekzistas en nia movado — tiam nia lingvo ricevos nedetruoblan fundamenton, sur kiu elkreskos mondliteraturo, kapabla forpuŝi duarangen la naciajn lingvojn kaj eĉ iom post iom entombigi ilin...

Kaj se mi fantazias, oni bonvolu pardonu tiun tute sendanĝeran manion. Nia movado eble estus multe pli vasta, vigla kaj firma, se ĉiuj nunaj esperantanoj fariĝus veraj, ĝisostaj *esperantistoj*, t. e. homoj ĉe kiuj la artefarita lingvo fariĝis viva, fariĝis la hejma, la preferata esprimilo...

Kun sennacieca saluto

E. Lanti

estas granda batalo en la mondo, ĉiuj militas, ĉiu devas iri ĉe unu flanko aŭ ĉe alia, por ke estu solvita la granda problemo.« — »La ĝojo ĉiam dependas de sufero.« — »Kien ajn vi eniru, ĝojon kaj gajecon vi enportu.« Sed al tio necesas, scio, Dia amo, kunigo kun Kristo, »ĉar en la kunigo estas la forto, laboro, kreo, pensoj, sentoj, celo, kulturo.« — Ni devas vivi la vivon tiel, kiel ĝi estas, pensante, ke ĝi estas la plej bona por ni, plena de eblecoj, de riĉaĵoj por ni, se ni povas trovi la novan fundamenton.

La tria prelego klarigas sub la titolo »Pasko« kaj sub la devizo: »instrui ĉiujn popolojn« la problemojn de la revivigo, de la *triuono* kaj de la *kruco*. La pritrakto pri la granda forto de la vorto rememoras la instruojn de »Oomoto« pri la *vortanimismo*. La vojo estas la celado al Dio. Sed la homaro falis de tiu ĉi vojo en fluan direktitan malsupren. Kristo venis por eltiri el tiu fluo kaj meti la homon en la kontraŭan fluan, denove suprenirontan. Jen la revivigo! La triuono estas diaj saĝo, amo kaj *evoluo*. Sed por kompreni la instruojn kaj esprimojn, oni devas rezigni la teran, eksteran mondon, kiu, havas nur transiran karakteron. Por revivigi oni devas liberiĝi de la malhelpoj hereditaj, de ĉiuj malbonaj pensoj, virtoj, agoj. Kelkaj instruoj: »Kion ajn faru, la homo ne povas eviti la konsekvencojn de sia vivo.« — »Ĉiuj pensoj, ĉiuj sentoj efikas ne nur al vi, sed ankaŭ al viaj proksimumoj.« — »Ne donu lokon al malbonaj pensoj, ĉar ili kreas siajn formojn kaj en la estonteco ili malhelpos al vi.« La kruco estas en la menso, en la koro. Oni do purigu la propran

menson kaj koron. »Ĉiuj homoj estas vivaj krucoj.« La nuntempaj homoj estas viktimoj de sia egoismo. Cio, astro, ŝtato, homoj havas reciproke influojn unu al la alia. La interrompita ekvilibro de la homaro estas reakirebla nur per milito. Tio estas leĝo. Cio estas milito. Oni devas lerni obedi. Kiu ne vivas laŭ la difino de Dio, devas renaskiĝi. En la homo detruas la dubo, envio, malbonaj pensoj. Ĉiuj devas reciproke helpi kaj ekiri la vojon de la releviĝo.

La lasta ĉapitro ne estas prelego, sed pritrakto pri la »Granda Universala Frateco«. Dum la tri predikoj ŝajnigas simplan kristanan kredon, tiu ĉi ĉapitro malkaŝas la okultan kredon de la adeptoj de Danov. La membroj de tiu »Frataro« estas pli perfektaj spiritaĵoj, kiuj evoluis dum jarmilardoj, kiuj direktas kaj kreas la mondon. Ili formas hierarkion. Danov klarigas la tri sunsistemojn preskaŭ simile, kiel »Oomoto« la tri mondojn. Li klarigas la ekziston de spiritoj. La anĝeloj havas specialan korpon. Ili gvidas la teran evoluon al perfekteco kaj lumo. Ĉiu tera geniulo, inventisto, ktp. estas servisto de la Universala Frataro. Malantaŭ ĉiu granda ago ili staras. Kristo estas la ĉefo, — sed ĉiuj *Diaj Filoj* estas Kristoj, kreante, kaj donante amon kaj vivon. Ili tamen allasas suferojn, »ĉar nur la sufero kapablas nobligi kaj pravigi.« La pozitivaj fortoj estas la *Blankaj Fratoj*, la negativaj, kontraŭagantaj la *Nigraj Fratoj*. Sed la blankaj devas venki. La komunikado inter la videbla kaj nevidebla mondo estos iam sur pli perfekta tero restarigota kaj Danov finas per similaj vortoj, kiel *Zamenhof* en sia fama »*Prego*«: »*ekregos la unika Amo, la unika Saĝo kaj la unika Vero*« kaj estos »*sankta paco kaj harmonio*.«

Domage, ke libro kun tiom da altaj idealoj enhavas tiom da nebulaĵoj frazoj kaj stilajn kaj gramatikajn erarojn. Krom la lasta ĉapitro preskaŭ sur ĉiu tria paĝo mi notis tiajn. Estas neeble ilin ĉiujn mencii, tamen permesu kelkajn. »Nia paĉjo tumultas.« »Sanktulo sanktulon ne toleras.« »Kiam formiĝos la spirsistemo, la infano devas naskiĝi tuj.« »La nigra viro aŭ virino prezentas la tenton en la mondo.« »Se oni min mensogos, mi estos malsaga.« »Kiu ne povas malami, tiu ne povas ankaŭ ami.« Ĉu ne strangaj? Aŭ la ideoj — aŭ la traduko. Mi pensas, ke la lasta, ĉar multloke estas korektindaĵoj. Mi despli sentis tion, ĉar ĵus nun mi legis ankaŭ similtajn — sed flujajn, belstilajn pritraktaĵojn en la »*Nova Tago*«, gazeto de la *Bahaistoj*. Kial ne povas simile verki la »*Nova Kulturo*?«

Permesu kelkajn gramatikaĵojn: Multloke mankas la akuzativa »n«, ekzemple »vi devas eniri en la leĝo«, »mi iras ĉe Dio«, »tie, kie Dio eniras«, »vi metos sur viajn ŝultroj la krucon«, »mi falos malsupren ĉe la serpento«, »venadu ĉe mi«, »alportu la diamantojn sur fiksita loko« (sur lokon, pli bone: *al*), »La du vortoj signifas la du apogpunktojn«, »ŝi metu lin en malbono«, »Oni oficistigis lin, kiel sekretario.« Jam en pli fruaj eldonoj mi kritikis, ke estas pli bone uzi anstataŭ »ĉe« »al«. Kion signifas: *oktopodo*. *Pronunci* estas uzata en senco »eldiri«. »Aperis en la dua semajno« (pli bona: »en la sekvanta semajno«). »La monon estas enterigita...« (do superflua »n«). »Se vi volas ĵeti vian haŭton...« (pli bona: »forĵeti«). »Ekskomunikos de la eklezio« (pli bona: »el la eklezio«). »Se hodiaŭ vi estas bone...« anstataŭ »bona«. »Vi estos pretaj oni vin surnajligu sur ĝin.« (antaŭ »oni« necesas »ke«). »tralegu ĉiutage po iom.« (»po« ne estas neces). »Oni kaptos sin ĉe viaj vestoj.« (anstataŭ »sin« estu »vin«). »Tamen ne post multe« (anstataŭ »post ne multe«). »Mi komencis honti de mi mem« (anstataŭ laŭ la senco »pri mi mem«). Jam en pli fruaj eldonoj oni uzis pasintan tempon anstataŭ kondiĉa modo: »se li ne invitis tiun homon« (anstataŭ »se li ne estus invitinta...«). »Se vi estis saĝa, vi ne volus de Dio.« (anstataŭ »Se vi estus saĝa...«) ktp. »Unu lupu unu granda osto formiĝis en ĝia gorgo« (mankas ĉe la komenco »Al« aŭ eble »Cec«). »Kian utilon por vi de tiuj sciencoj« (anstataŭ: »Kion utilas por vi tiuj sciencoj« aŭ »Kion utilon vi havas de

tiuj sciencoj«). »Punktodemandoj, punktokrioj.«\* »Ankaŭ pri tio estas kaŭzoj.« (anstataŭ »Ankaŭ tiu havas kaŭzon.«). »Ĉu ni aprobu la vorton »alies«?«\*\* Mi menciis ĉion ĉi, esperante, ke estonte la teksto de la similaj eldonaĵoj estos inda al la enhavo. P. B.

EMMA L. OSMOND: KIKI. Travivaĵoj de Kiki. II. Esperanto-Junula Biblioteko. Nro 4. Eld.: Heroldo de Esperanto, Köln, Germanujo. Malgrandformata kajero 34 paĝa. Prezo: RM. —.25.

Malgrandaj, ĉarmaj, simplaj rakontetoj pri la vivo de knabineto Kiki en lernejo, en la kamparo, dum ludoj. Pro la simplaj, facile kompreneblaj frazoj taŭga por ĝunularo sub la 10-a jaro. Ne estas ia aventura aŭ ekscita, kio tre allogus la junajn legantojn. La nomo Osmond certigas bonan tekston kaj stilon. Kelkaj rimarkoj nur: »faktoj eniris je unu orelo«, Se jam estas »eniris«, kial ne »en unu orelon« anstataŭ »je«. Cetere por verketo destinita por komencantoj, mi proponas ne uzi multajn maloftajn vortojn kaj vortkunmetaĵojn. La kajero taŭgas, kiel legolibreto por kursoj kaj por postkursaj ekzercoj. P. B.

AL LA HOMOJKONECO de W. Veith. Tradukis V. Wachutka. Aŭtoro eldono, Deutsch-Gabel, C. S. R. 16-paĝa. Formato 9×15,5 cm. Prezo: 2.50 Kč. Ilustrita. Skizo pri la diversaj homkarakteroj kaj krimtipoj. La traduko estas tiom malbona, ke ĝi ne nur malhelpas la komprenon de la pritraktita temo, sed ankaŭ grave malutilas al la esperanta propagando kaj al la aŭtoro mem. La broŝuro estas neniel rekomendinda.

UNUA SLOVAKA KRISTANA PRINCO. 14 paĝa belpresita kajero eldonita en 1933 de la Komitato de Pribina-festoj en Nitra, Ĉeĥoslovakio. Bona traduko de St. Kamaryt. Laŭ verko de dro J. Hodál.

La kajero donas detalan mallongan trarigardon pri la respubliko kaj ties partoj kaj nur kelkaj paĝoj estas pri princo Pribina. Oni estus atendinta ĉefe legi pri la princo kaj vidi bildojn pri li kaj pri la loko, sed la kajero estas iom politika propagandilo pri la ŝtato kaj ne kiel oni pensus religia kajero. Kial uzi la formon »madjaro« por »hungaroj«, kiam la »hungaroj« mem neniam uzas en Esperanto la vorton »madjaro« kaj la kajero mem uzas por la lando »Hungario«-n? Ĉu estas ia esenca diferenco? Vere iam mem la hungara profesoro *Török* proponis la formon »magjaro« (en hungara lingvo »magyar«), sed neniu sekvis lin. Simile, kiel ankaŭ la »finnoj« kaj »japanoj« toleras la internacian esprimon por sia nacio, uzante tamen tute alian vorton en sia propra lingvo.

FREUDE DURCH ESPERANTO. Ein Lehrgang für Kurse und Selbstunterricht von Hugo Steiner. Eldonis »Das kleine Volksblatt« en Vieno. Paĝoj 96. 18×13.5 cm. Prezo: 2 ŝilingoj (bindita).

Tiu ĉi lernolibro por germanoj estas la rezulto de multjara sperto de la konata viena Esperantisto, Hugo Steiner, kiu per tiu libro pruvis, ke li estas ne nur bona organizanto de Esp. aferoj, sed ankaŭ bona instruanto pri nia lingvo. Espereble tiu ĉi lernolibro estos sukcese uzata de kursgvidantoj, kiuj ankoraŭ ne aplikas la rektan metodon. Ankaŭ memlernantoj trovos en la libro riĉan vortmaterialon kaj bonajn klarigojn pri la gramatiko de E-o.

Al la libro estas aldonita aparta folio kun ĝustigo de la preseraroj, kaj kun informoj pri la Germana Esperanto-Asocio kaj la Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakio. Ĉu ne estas strange, ke Hugo Steiner, la viena propagandisto, en libro eldonita en Vieno, diskonigas fremdlandajn organizaĵojn, anstataŭ rekomendi la propran, t. e. aŭstrian landan E-asocion, kiu la sola povas ja interesi la novajn Esperantistojn de Aŭstrio?

I. Lejzerowicz

\* La uzo de la komoj ne estas laŭ regula en la traduko.)

\*\* Sajne »N. K.« ne legis niajn pli fruajn kritikojn pri similaj eraroj!

JULIE SUPICHOVÁ: ESPERANTSKY DOPISOVATEL. (ESPERANTO-KORESPONDANTO.) Eldonis Josef Svoboda, Praha-Pankrác, 796. 14/4 paĝoj. Prezo Kč. 12.— (= 2 sv. fr.) afr.

Nia diligenta praga pionirino, kies pluraj verkoj sin montris tre utilaj kaj efikaj, surprizas nin per nova plaĉa libreto, prezentanta riĉnombrajn, zorge elektitajn modelojn de privat- kaj komercletera frazaro, de gazetaj anoncoj k. s. Neampleksa, sed celkonscie aranĝita kaj (ĉefe!) fidinda vortareto ĉeĥa-esperanta finas la praktikan kompendion, kiu nepre faros bonan servon precipe al komencantoj kaj aŭtodidaktaj kaj kiun povos uzi ankaŭ alinacianoj por lerni almenaŭ la elementojn de la ĉeĥa letera stilo.

Erarojn mi trovis nemultajn: [pĝ. 34.] mi... plenumis vian... *komisionon* (ĝuste: *komision*); [34.] rapidan fretaĵon, rapidfrete (ĝuste: *frajtaĵon*, *-frajte*); [48., 49., 76.] la 27-a februaro, la 6-an julion k. s. (ĝuste: *de februaro ktp.*); [51.] en eldoncifro (?) de 10.000 ekzempleroj (ĝuste: en 10.000 ekz.); [82.] *Ilia*... aero (ĝuste: *Gia* aŭ *Ties* aŭ *La tiea*; en la antaŭa frazo oni parolas ja pri montegaro); [86.] *dum* la venonta jaro (ĝuste: *en*; temas ja nur pri 3 semajnoj); [96.] ĉu vi mendas la librojn binditajn aŭ broŝuritaĵojn (ĝuste: *binditaj* aŭ *broŝuritaĵoj*). Kelkloke mankas komo: [15.] Fraŭlino M. K., oficistino en M. O. // kaj sinjoro...; [104.] mi esperis viziti la... Foiron, kiu... okazos... // kaj ĝojis...

Por eventuala dua eldono mi proponas ankoraŭ jenajn ŝanĝojn: [pĝ. 9.] mi gratulas *pri*... sukceso (anst. *al*); [13.] *tetrinkado* aŭ *tea kunveno* (anst. *teomuzo*); [17.] kion mi deziris *elsci* (anst. *sciigi*); [21.] *estante embarasita* (anst. *en embaraso*); [27., 28., 33., 42., 52.] *referente al* (anst. *rilatante* + akuz); [29., 39.] *en la estonte* aŭ *la venontan fojon* (anst. *venonte*); [32.] *sendu*... kaj *registrigu* (anst. *sendu*... *registrite*; simile 57; ankaŭ sur la pĝ. 28 *almetite* estas forstrekinda); [35.] *disponeblan kvanton da varo* (anst. *tiom da komercaĵo, kiom estas disponebla*); [35.] *livertempo estis*... *observata* (anst. *atentata*); [48.] *kvitigo* de... fakturo (anst. *egaligo*); [51.] *nombro da*... firmoj (anst. *de*); [53., 85.] mi almetas... *kopiojn* de miaj atestoj k. s. (anst. *miajn atestojn en kopio*); [56.] *el ĉiu ajn lando* (anst. *kiu*); [58.] *pasigi mian*... *libertempon* (anst. *forpermeson*); [64.] *dankojn*... *pro* la... akcepto (anst. *por*); [78.] *centro* (anst. *centrojo*). — Post la verbo *peti* mi rekomendas uzi akuzativon anst. la prepozicio *pri* [pĝ. 63 ktp.] kaj precipe infinitivon anst. imperativo [pĝ. 29, 33, 47, 54, 55, 57, 58, 93, 108]; la prepozicio *je* kelkloke estas evitebla [pĝ. 19: *vi ne koleras je mi, prefere min*; 31: *ni atentigas... je la... aŭto*, prefere *pri*; 44: *fidu je nia diskreteco*, prefere *nian diskretecon*; ie mankas la artikolo [39: *esplorinte kvaliton*; 44: *informu min pri financa stato*, ie ĝi male estas superflua [40: *mi deziris binditajn ekzemplerojn*, ne la broŝuritaĵoj; 42: *admoni vin al (aŭ pri) la gustaj sendoj*]; iuloke sufiĉas indikativo anst. kondicionalo [54: *kiuj dezirus korespondi*; 55, 56, 59, 60, 63, 88, 92, 94]; kelkaj pleonasmoj estas forstrekindaj [18: *mi ne estis libera eĉ unu momenton*; 24: *efektive, mi vere bedaŭras*; 25: *ankoraŭ senĉese malsaneta*; 62: *de nun la nova adreso*; 64: *mi almetas unu servokuponon... kaj... unu... respondkuponon*]; la monatomojn [99 ktp.] oni prefere skribu malgrandlitere. — Pliboniginda ŝajnas la stilo sur la pĝ. 77: *... enhavas sufiĉe da forto por pasigi la tempon de... prijuĝoj kaj de oportuneco, kiuj ĝis nun malhelpas... (pli ĝuste: estas sufiĉe forta por venki la ĝisnunajn antaŭjuĝojn kaj indiferentecon, kiuj malhelpas...)*.

Miloš Lukáš.

ESPERANTO-IDO VORTARO, 68-paĝa (Prezo svfr. 1.—) kaj INTERNACIA LERNOLIBRO por Esperantistoj, 32-paĝa (Prezo svfr. 0.50). Eldonis Germana Ido-Federuro, 75 Soorstr., Berlin-Charlottenburg 9. Formato 10,5×15 cm. Ambaŭ libretoj, cetere plej bonguste prezentitaj, atestas pri granda fido flanke de la eldonintoj. Ili estos fonto de utilaj komparaĵoj por tiuj, kiuj deziras

formi al si objektivan opinion pri Ido. Ankaŭ la kolektantoj de la diversspecaj mondlingvaj eldonaĵoj povos aldoni tiujn du kuriozaĵojn al sia jam tre riĉa kolekto. La aŭtoro, kiu en pluraj lokoj montras necion aŭ ignoron de la konvena esperanta termino, pravigas sian intencon per la iama reform-projekto de Zamenhof.

4000 VORTOJ, ESPERANTO-KROATA-SERBA VORTARETO. Eldonis Eldona Rondo Esperantista, Osijek, 1935. 86-paĝa. Formato 12×8,5 cm. Prezo: 8 dinaroj. Tre klare presita libreto kun multaj neoficialaj vortoj. La jenaj troviĝas en la dua eldono de la Plena Vortaro: beata, evento, kiosko, masakri, nervoza, rara, relikvo, remizo, sakri, siesto, situo, skolto, sledo, slojdo, stoko, stumbli kaj tiktako. Ĝi enhavas krome kelkajn aliajn kiel: jubili, mesaĝo, plumpa, reflekso, vagabondo, trista, ktp. La vorto *relaĵo* estas versajne preseraro. Dank' al sia malalta prezo tiu vortareto estos tre taŭga por disvastigi la uzon de la necesaj »neologismoj«, kiuj atendas sian baldaŭnan oficialigon.

SIGNIFAJ KURACLOKOJ, BANEJOJ KAJ SOMERRESTADEJOJ EN SLOVENIO. Jugoslavio. Afiŝformata folio eldonita de Asocio por Fremdultrafiko en Slovenio — Vojaĝoficejo »Putnik« en Ljubljana. Kun tri fotoj kaj landkarto de Slovenio, detala listo de ĉiuj vizitindaj lokoj, hoteladreso, sportlokoj, ktp. Taŭga kaj utila turisma informilo por tiuj, kiuj volas viziti la regionon.

P. B.

KOLIN. Eldonis Esperantista Klubo, Kolin. Kajereto. 16 p. (2 ekz.: 1 resp. kup.). Priskribo de historio pri Kolin en Ĉeĥoslovakio. Promeno tra la urbo. Kelkaj fotoj. Bona traduko de Jan. Janda. Sed tian turisman propagandilon oni devus sendi senpage. Nur malmultajn intereso malgranda urbeto ne multe konata tiom, ke oni speciale mendus ĝin.

LYONA FOIRO. Granda, bela afiŝo kun esperanta teksto. Oni povas gratuli, ke la Foiro de Lyon konstante tiel belajn propagandilojn eldonas en Esperanto. Grupoj kaj komercejoj elmetu ilin.

## Recenzotaj libroj

DU NOVELOJ de JIRI SUMIN kaj RUZENA SVOBODOVA. Eld. kaj trad. Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomoucz, Riegrova 21. 18,5×13 cm. 81 paĝa. Prezo Kč. 13.— afranke.

WILLY WOOD: BLUA SANGO. Trad. Willy van Zoest, Romano. Eldonis eldonejo Helmond, Helmond, Nederlando. 20×13 cm. 187 paĝa. Prezo bind. guld. 1.25 (1934).

A. ISBACH: KUN PAFILO KAJ LIBRO. Trad. V. Zamjatnin, Romano. Eldonis Ekrelo, Amsterdam 2. Postbus 5, Formato 17×12 cm. 266 paĝa. Prezo 3.— svfr.

Dr. FRANCISKO SZILÁGYI: KURS I ESPERANTO. Internacia Esperanto-lernolibro. Eldonis Eldona Societo Esperanto, Stockholm I. Fack 698. Formato 22,5×15 cm. 96 paĝa. Prezo 2.— svedaj kronoj plus sendkostoj.

HISTORIO DE LA SKISMO EN LA LABORISTA ESPERANTO MOVADO. Eldonis SAT, Paris 20, 67 Av. Gambetta. 21×13,5 cm. 20 paĝa. Prezo unu respondkuponon.

A. STIRNBERG: PASKO. Trad. S. Engholm. Eldona Societo Esperanto, Stockholm I. Fack 698.

Dramo. Formato 21×14.5 cm. 88 paĝa. Prezo kr. 1.50 plus sendkostoĵ.

LA ROCHEFOUGAUD: MAKSIMOJ. Tradukis G. Waringhien. Eldonis Felix Alcan, Paris, 108 Bd. du St. Germain. Formato 23×14 cm. 112 paĝa. Prezo 10.— frfr.

EL TRAGEDIOJ DE SHAKESPEARE. Kompilis Mijake Sihej. Eld. Japana Esperanto-Instituto, Tokio, Hongoo-Motomaĉi 18×11. cm. 100 paĝa. Prezo 0.90 svfr. plus 10%.

EL SLAVA LITERATURO. Kompilis F. Ossaka. Eldonis Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 18×11 cm. 74 paĝa. Prezo 0.90 svfr. plus 10%.

EL FRANCA LITERATURO. Kompilis N. Kawasaki. Eldonis Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 18×11 cm. 66 paĝa. Prezo 0.90 svfr. plus 10%.

V. BLASCO-IBANEZ: SANGO KAJ SABLO Trad. R. de Salas Bonal. Eldonis Aragona Esp. Federacio de la tradukinto Zaragoza, 9 Cervantes, Hispanujo, Romano. Formato 22×16 cm. 232 paĝa. Prezo afranke 4.— svfr.

E. LANTI kaj M. IVN: CU SOCIALISMO KONSTRUIGAS EN SOVETIO? Eldonis Esperanto, Paris 14 Av. de Corbéra, 19×12 cm. 80 paĝa.

E. PHILIP OPPENHEIM: LA ORA STUPARO. Romano. Trad. Brightona Esperanto-Klubo. Reviziis M. de Waard. Eldonis Esperanto Publishing Company Ltd. London, WC1, 142 High Holborn. 20×15 cm.; 278 paĝa. Prezo binde, afranke 3.— svfr.

BES-ADRESARO. J. Berger. Eld. Potštejn, ĈSR. 15×11.5 cm. 64 teksto kaj 22 anoncpaĝoj. Prezo 1.— svfr.

HENRY DRUMMOND: KVIN PAROLADOJ. Trad. Arthur T. Maling. Eld. F. H. Hunbury, Romford. Hornchurch, 132 Slewins Lane, Britujo. 24×12 cm. 88 paĝa. Prezo?

G. WARINGHIEN: FACILAJ ESPERANTJ LEĜAJOJ. Eld. Esperantista Centra Librejo, Paris. 17.5×11.5 cm. 96 paĝa. Prezo 5.— francaj frankoj plus 30% por sendkostoĵ.

EDMOND PRIVAT: INTERPOPOLA KONDUTO Eldonis Literatura Mondo, Budapest. 20×13.5 cm. 154 paĝa. Prezo svfr. 3.— broŝ. 4.50 bind. 5.— lukse bindita sur senligna papero. Plus 10% por sendkostoĵ. Unua libro de AELA 1935. arta-sciencia serio.

JESUS AMAYA: HISPANAMERIKA VORTARO. Eld. Lumen, Mejiko D. F. Ap. 59. 12×10 cm. 112 paĝa. Prezo 0.45 svfr.

## Informoj al AELA-membroj

Kiam ni skribas ĉi tiujn liniojn, la unuaj tri libroj de AELA 1935 estas jam ekspedataj. Kun la ekspedo ni klarigas al ĉiu membro la kaŭzon de malfruo kaj ni laboras plenforte, por ke malgraŭ ĉio ni pretigu ĉiujn librojn de tiu ĉi jaro ĝis januaro 1936. Ni esperas, ke niaj membroj, kiuj havis kaŭzon fidi nin, havos tiun kaŭzon ankaŭ en la estonto.

Estas bedaŭrinde, ke la Ĉeĥoslovaka Antologio, malgraŭ nia plurfoje promeso, ne povis esti ankoraŭ dissendita, kvankam de majo ĝi jam prete atendas la enkovertigon. Bedaŭrinde la ilustraĵoj ankoraŭ ĉiam kuŝas en la hungara doganejo kaj atendas la permeson de tri ministrioj, petitaj unu post la alia. Du ni jam havas kaj ni esperas, ke ankaŭ la ricevo de la tria ebligos tre baldaŭnan dissendon. Ni petas pardonon pro tiu ĉi malfruo. La nunaj cirkonstancoj en Mezeŭropo ebligas ĉian farson.

Aperis do kaj estas dissendita jam

**Plena Gramatiko de Esperanto**

**Jerome: Tri homoj en boato**

**Privat: Interpopola konduto**

Se iu paginta membro ne ricevis siajn librojn, bonvolu skribi al ni.

Kelkaj membroj reklamaciis, ke ili ne ricevis sialtempe la duan numeron de Lingvo-Libro. Ni petas bonvole atenti, ke la gazeton ni ĉiam ekspedas nur kun iu libro. Ĉar la gazeto estas por la AELA-membroj kvazaŭ senpaga aldono, ni ne povas akcepti la devon aparte dissendi ĝin. Ankaŭ la nuna numero disiros kun la oktobrokomenca numero de Literatura Mondo, sed la AELA-membroj ĝin ricevos nur kun la laŭvica libro, tamen ne pli malfrue verŝajne, ol meze de novembro. (En oktobro por serio C kaj en novembro por serioj A kaj B).

Ĉar la libroj komence aperis tiel malfrue, ni plilongigas la aliĝadon por 1935 ĝis 31. decembro 1935. Ni memorigu ĉi tie, ke la lingvoserio ankaŭ nun kostas nur 10.— svfr. apenaŭ 1.20 svfr. pli, ol la sola Plena Gramatiko. Pri tio atentigu eble viajn amikojn.

*Favorprezaj libroj.* Antaŭaj numeroj de Lingvo-Libro anoncis, ke ni endas kelkajn ekzemplerojn de la Faraono por svfr. 5.— kaj kelkajn el la Nova Gramatika Libro de Stamatiadis por 3.— svfr. El la supraj libroj estas haveblaj ankoraŭ kelkaj ekzempleroj. Krom tio ni havigis al ni kvin ekzemplerojn de la jam delonge efektive nericevebla interesa verko de Kotzin: *Historio kaj Teorio de Ido*, kiujn ekzemplerojn, iom difektajn, ni disponigas al niaj membroj por po 5.— svfr. afrankitajn. Cetere ni havas ĉe ni kvanton da difektaj libroj, kies liston ni sendos al ĉiu petanto kaj sendanto de respondkupono.

La venontjara programo estas jam preskaŭ tute plena kaj konsistas el kelkaj tre interesaj verkoj. Ĝin ni tamen publikigos nur en la kvara numero de Lingvo-Libro, samtempe lasante la necesan tempon por pripenso. Ni nur ripetu, ke ni zorgis, ke la nuna serio konsistu el ekstreme interesaj verkoj.

**ERNST ERICH SCHRENZEL:**

## A B E S I N I O

**Lando sen malsato, lando sen tempo**

estas la titolo de la plej mondfama verko pri tiu ĉi interesa lando.

Kun preskaŭ 150 ilustraĵoj, sur grandformataj 300 paĝoj ĝi diras ĉion, kion ni devas scii pri la fokuso de la nuna milita situacio.

Tiun verkon tradukas nun s-ano *Jenny Weleminski* laŭ la komisiono de «Literatura Mondo». Ĝi aperos post nur kelkaj semajnoj kaj estos plej bona pruvilo en la manoj de la esperantista propagandisto pri la taŭgeco de Esperanto por konigo de popoloj. Tiu ĉi verko en la nuna aŭtumo estis tradukita en ĉiujn gravajn lingvojn kaj nun ĝi ne mankos ankaŭ en Esperanto.

Tamen, tio havas unu kondiĉon: ke estu minimume 150 (unucent kvindek) antaŭmendantoj, kiuj deziras aĉeti luksan eldonon broŝuritan por svfr. 8.—, binditan por 9.50. Por tiu prezo la mendanto ricevos libron presitan sur luksa papero kaj numeritan. La bindo estos ledumita.

La prezo de la ordinara eldono estos svfr. 6.— resp. 7.50 plus 10%. Per via mendo por luksa eldono vi helpos efektive al eldono de tre interesa verko. Ni atendas vian mendon plej malfrue ĝis komenco de decembro, por ke la libro povu aperi ankoraŭ en tiu ĉi jaro kaj estu dokumento pri tio, ke la esperantistoj interesigas pri la grandaj problemoj de la mondo.

Antaŭmendojn sendu al «Literatura Mondo».



# LINGVO \* LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt IX. Mester-utca 53. V. 5. Hungarujo. Aparte acetebla. Unu numero kosta 0.20 sv. fr. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspedataj kosta nur 0.30 svisaj frankoj aŭ proksimuman egalvaloron.

Aperas kvaronjare • Nro 4. 1935

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

## Pri la vortoficialigo

La lasta listo de oficialigitaj vortoj estigis grandan bruon en Esperantujo. Tio, cetere, estas jam tute kutima akompanaĵo de ĉiu nova listo, ekde la lasta propono de la karmemora Grosjean-Maupin en 1932; tiun liston, pro la tro granda bruo, oni eĉ rezignis oficialigi.

La situacio de la Akademio, vere, ne estas envidinda. Se ĝi volas oficialigi, eĉ plej timeme, tuj aŭdigas la alarmsignaloj de la malmultvortistoj, kiuj lastatempe ŝajnis preskaŭ prepari revolucion. Kaj se ĝi ne oficialigas, pli kaj pli okulfrappe evidentiĝos la mankoj de la oficiala vortaro kompare al la efektive uzata, precipe literatura vortprovizo, grandparte registrita en la »Plena Vortaro« de SAT.

La demando nun estas, kian sintenon alprenu nia Akademio antaŭ tiu ĉi nekontestebla fakto.

Nu, la unua eblaĵo estas la pasiveco. La Akademio povas rigardi la literaturon nur ornamo sed ne ĉefa celo de nia movado kaj ĝi povas deklari, ke ĝin tute ne koncernas la literatura lingvo-evoluo. Baze de tia konsidero, ĝi povas sin tute deteni de plua oficialigo, ĉar la ĝisnuna vortprovizo ja estas jam sufiĉa, eĉ troa, por la komuna lingvo. Tio tute ne estus danĝera nun, kiam ni havas en la Plena Vortaro (eble ankaŭ en la Parnasa Gvidlibro) sufiĉan garantion pri la unueca uzo de la literatura lingvo.

Tamen, oni povas rajte demandi, kian taskon ankoraŭ havos niaj Lingvaj Institucioj, se ili tiel deklaras sin neinteresataj pri la »vortpaŝtado«, kiu ĝis nun estis ilia ĉefa okupo. Mi kredas, ke ili ne povas sin tiel flankenstarigi, ne volante deklari sin mem definitive mortintaj.

Nu, sed ankaŭ la nuna sinteno montras nur ŝajnan vivon. Elektu 20—25 vortojn el la Z-a vorto-stoko kaj deklari tiujn oficialaj, havas la aspekton de »ut aliquid facere videatur«. Kaj la granda bruo montras, ke eĉ per tia singardemo la Akademio ne ŝparas al si malagrablajn atakojn, do, tiel agante, ĝi kunligas nur »senutilon kun malagrablo«. Ne estas ja malfacile antaŭdiri, ke tiuj atakoj reripetiĝos de ĉiu nova aldono. Tio certe ne kreas agrablajn atmosferon kaj povas ŝajni al nekompetenta leganto, ke niaj lingvaj institucioj kulpas pri danĝera neologismemo kaj reformemo, kvankam ili oficialigas nur vortojn uzatajn de ĉiuj, ofte eĉ de la atakantoj mem.

Kiel oni povas eviti ĉion ĉi?

Nu, tute ĉesigi la atakojn oni neniam povos. Sed oni povas eltiri ilian venen-denton, se la Akademio tenas sin al strikta sistemo. Oni zorge ellaboru sistemon de oficialigo, kaj ĝin voĉdonigu per la Lingva Komitato. Poste oni procedu laŭ tiu strikte fiksita sistemo.

Tia sistemo estus ekzemple, se la Akademio kon-

siderus ĉe la oficialigo, sen alia pripensado, simple la efektivan uzatecon de la vortoj. La uzatecon necesi por oficialigo oni povus determini eĉ tute precize, per nombro (ekz-e: vorto renkontita almenaŭ centfoje, ĉe dek diversaj konsiderindaj aŭtoroj).

Sed antaŭ ol prepari tian sistemon, la Akademio devas pagi gravan ŝuldon: likvidi plene la demandon pri la zamenhofaj vortoj.

Nun, 18 jarojn post la morto de Zamenhof, tio estas vere urĝa tasko. Kaj ĝi eĉ ne postulas tro grandan laboron: la z-aj vortoj ja estas jam kolektitaj en la Zamenhofa Radikaro de Wüster kaj en la Plena Vortaro; eble nur la Andersen-tradukojn oni devas ankoraŭ traesplori. Jen tasko, kiun oni povas kaj devas fine fari; ne iomete post iomete, sed per unu fojo, definitive.

Sed, oni povas demandi, kiujn vortojn do oni oficialigu. Nu, la respondo estas simpla: ĉiujn *senescepte*.

Ĉi tiu respondo certe ŝajnos absurda al pluraj. Sed ĝin oni povas tre facile pravigi.

Nome, la z-aj vortoj havas en nia lingvo specialan signifon. Unue, ili kuŝas en la z-a verkaro, kiu, kiel la bazo de nia literatura lingvo, devas esti nepre alirebligita por la senmanka kompreno de ĉiu esp-isto. Due, ĉiu z-a vorto, pli ol iu ajn alia, havas la ŝancon esti uzata de aliaj aŭtoroj: certe neniu povas riproĉi aŭtoron pro tio, ke li uzas vorton, kiun Z mem trovis necesa. Tion klare rekonis ekzemple Wüster, kiu en sia Enciklopedia Vortaro alprenis senescepte ĉiujn vortojn z-ajn. Vere, laŭ la supraj konsideroj, oni povas diri, ke Esperanta-nacia vortaro, en kiu la z-aj vortoj mankas, estas nekompleta. Des pli ili devas troviĝi en la oficiala listo.

La kontraŭdiro, ke Z uzis ankaŭ vortojn, kiujn li poste forlasis, aŭ kiujn neniu uzis post li, pledas plie por ol kontraŭ la registrado de la tuta z-a vortprovizo. Des pli necesa estas nome, listigi oficiale ĉiujn vortojn, eĉ tiujn ĉi arkaikajn, *markante ĉi lastajn per signo de arkaikeco* kaj montrante apude la uzindan formon. Nur tiamaniere oni ja povas orienti la esperantistojn, kiu z-ajo estas imitinda kaj kiu estas evitinda arkaikaĵo. En la nuna stato, oni povas kredi pri tia vorto, ke ĝi estas bona formo uzinda, sed ankoraŭ ne alvenis ĝia vico ĉe la iom-post-iom oficialigoj.

Tiaj vortoj estus ekzemple: *abstemio* (abstinado), *aglomerato* (aglomeraĵo), *administrato* (administranto), *albinoso* (albino), *iniciativo* (iniciato) ktp., ktp., ktp.

Ĉerte, la oficialigo de ĉiuj z-aj vortoj ege ŝveligos la oficialan vorto-stokon (ekzistas runde 150 z-aj

# Kritika esploro pri la „Plena Vortaro“

— G. M. Butler —

(Fino.)

PLIBONIGOJ DIFINAJ: Acido (kombinaĵo, kies hidrogenon povas anstataŭi metalo) 19a; agaragaro (gelateno-simila substanco el agloj) 22a; almenaŭ (forigu) 428b; brako (humero) 272h; buŝingo (buŝpeco) 261g; de kiu blovas la vento (295a); ceruzo (PbCO<sub>3</sub>) 67b; emetiko (antimon-kalia) 109b; fendo (trueto) 272a; gipso (kalcisulfata ŝtono) 155a; horizontala (transversa) 51b; noto kaj (aŭ) 127h; izotopa (kies hemiaj ecoj estas semaj, sed...) 206g; klav (klap) 136c, 176b, 232h, 261h; koloroj (specoj) 228c, 480g; komponi (4) (pli bone: kombini) 243a; kvinto je (oktavo de) 503f; kupra (latuna) 415g, 482f.

PLIBONIGOJ VORTAJ: Elpli (forpeli) 490b; eviti (malhelpi) 158c; fare (donita) 417g; intertempo (amplekso) 150a; komponon (konsiston) 140c; konigi (doni) 192g; kruro (tibia) 153g; luciĝa (enuiga) 236d; malkovrita (nekovrita) 118h; malrekoni (nuligi) 248d; morala (mensa) 164d; montarecaj (montaj) 438h; nombro (numero) 192d; nuran (solan) 490e; plenumata (farata) 29d; regeneras (rebonigas) 172f; streĉa (strikta) 411g; taksis (opiniis) 490f; viando (karno) 333a, 416b, 445f; vivaj (helaj) 214a.

PLIBONIGOJ RILATE VORTORDON. Ne ankoraŭ (ankoraŭ ne) 194h, 209h, 272a, 320d, 391h; bovoviro (virbovo) 464f; templimo (limtempo) 200a. Skribu aŭdigas ne 42h; estas ne granda 98e; konsistas ne 193b; postulas ne rapidecon 400b; tio estas ne socia 434c.

AFIKSOJ. Ĉe la vortoj bicikl(et)o, bot(et)o, ordin(i)gi, la sufikso ŝajnas nenecesa; ĉe fabrik(e)jo preferinda (malgraŭ la fakto, ke Z. uzis fabriko). Skribu estonteco anstataŭ estonto (Vidu L. K. p. 59.) ĉe 45c, 47d, 90c, 318g, 382f, 397g, 424c, 479a; kaj pasinteco anstataŭ pasinto ĉe 105b. Oni forstreku ig ĉe mov(ig)as 83h, lev(ig)as 93g, mov(ig)i 106c, komunik(ig)i 427g, nekuntir(ig)ebila 468f, kaj aldonu ĝin ĉe hontigante 177f, sin kuŝigi 278e, boligataj 346f, perfektigebla 361h, neboligita 380b, anstataŭigota 392f, pasigas 86a, 495b. Forstreku ig ĉe diferenc(ig)as 397c, 436c, grup(ig)o 484c, kaj aldonu ĝin ĉe neŝanĝigemo 11h, komencigantajn 231h (bis), ruliĝanta 286h, afliktiĝi 371a, komencigis 372c, ŝanĝigema 442f, 454g, 493g, 498a. Ĉe 65g, 279d, 299b, 313d, 339d, 340f, 409h, 410b, -foje devas esti -oble. Ĉe 174f, 191g, 359g, 363e, 367ag, 428h, reprezenti devas esti prezenti. Um ŝajnas senutila ĉe proprum: 177a, 219d, 354d, 390fg, 491a, 497c. Faru la jenajn plibonigojn: adresulo (adresito) 207b, 378e, 421h; arbitraciulo (arbitracianto) 209e; (mal)pravanto ([mal]pravulo) 500g; kondukanto (kondukilo) 106e.

GRAMATIKAJOJ. Aldonu la akuzativon »n« ĉe en kiun 67f, 487b, bonŝancigan 127f, akordiĝantajn (bis) 200d, sur la tablon 259b, signon 481e. Forstreku la »n« ĉe diversaj direktoj 88a, returne 93e, kuireja trapikilo

270d; lia seĝo, sama ĉambro, piedestalo, 295h; kontraŭa direktoj 346d, kontraŭa direkto 452g, ĉiudirekte 488e, malproksime 467f, iu direkto 485g. Forstreku la Rimarkon ĉe ekster 102d (ekster la akvo kaj ekster la akvon ne estas sama afero!). Skribu ita, ne ata, ĉe alligita 135g, malfermitajn 136b, pentritaj 144e, kovritaj 222c, evititaj, enkondukita 257h, kunigitaj 435e; sed ata, ne ita, ĉe kantata 218c, nekonata 491c, konata 498g.

Oni renkontas la modan ŝanceliĝadon inter de, post, de post, depost, ekde, kaj eke de (99e, 272d). Ekz.: sur pago 207. ni renkontas ekde trifoje kaj depost sesfoje: en ĉiu el la naŭ frazoj la ĝusta vorto estas simple — de! Se oni uzas la esprimojn de post kaj eke de, certe la unua kaj eble la dua devas skribiĝi per du vortoj (vidu Rim. 377d). Ĉe la frazo *Li rigardis al mi de post la ĵurnalo* la vortoj de post estas evidente bonaj. Sed malgraŭ du-tri Zamenhofaj ekzemploj (377c) (*de post*, ne *depost*), mi rekomendas, ke oni ordinaro evitu de post, ĉar ĝi malofte estas uzebila logike kun tempa signifo (*de post lundo signifas de iu tempo post lundo*; tamen oni volas diri simple: *de lundo*). Ek de estas almenaŭ dube bona. Ĉe 192e, 210a, 331h, 353e, anstataŭ depost skribu aŭ de aŭ post laŭ la ideo esprimenda: forstreku depost 77c, kaj anstataŭ ĝi skribi en la lastaj 441e, kaj dum 296e. Anstataŭigu ekde per de ĉe 62g, 93a, 108h, 127e, 305h, 337a (bis), 462h, 477a. Forstreku ekde la sunleviĝo (502f), kaj lasu la frazon kiel ĝin skribis Zamenhof: *tuj post la sunleviĝo*. Ne estas bone unuvortigi du prepoziciojn (*alsur, deper, elinter*). Kion signifas *elde* 262e? Oni uzas ĉu anstataŭ aŭ ĉe 90g (aŭ societo) kaj 92e (aŭ sian okupon). Anstataŭ ĉu ... ĉu skribu aŭ ... aŭ ĉe 69f, 92c, 94d, 119b, 219e, 223c, 233g, 244 de, 256d, 316f, 325d, 335b, 338f, 348e (bis), 379f, 392h, 413b, 434c, 462h, 503d. Skribu ĉesigi aĝi... (agon...) 168a; daŭras moviĝi (daŭre moviĝas) 404f; daŭrigi (daŭre) posedi 252h.

Oni ne uzu la akuzativon post ĉe. Skribu: iri al la onklo 27a, al mia onklo, al li 70h; apogi trabon sur muron 39c; venu al mi 70h; 200c; en la havenon 170d; al la kuracisto, al la notario 204a.

Ĉe 73a skribu dek jarojn (jaroj ĉe Rut I, 4 estas evidenta eraro: komparu Jos. 8, 12; Juĝ. 3, 29, k. m. a.); 60 jarojn, cent frankojn. Ĉe 73b skribu ĉirkaŭ 400, ĉirkaŭ tri, ĉirkaŭ 60; ĉirkaŭ 5000, 287d; ĉirkaŭ 100, 389c. Komparu I Reg. 22, 6, kiel ĝin skribis Zamenhof. Oni povus esti klariginta (308e, 426c), ke preferinda estas sin- kiam la signifo estas refleksiva (ekz.: *sinamo, sindefendo* = oni sin amas), alie mem- (ekz.: *memevidenta, memstara* = oni ne evidentas sin!).

PREPOZICIOJ. La jenaj sugestitaj aliĝoj estas konformaj al Zamenhofa uzado: en kelkaj lokoj ili korektas sendubajn erarojn; en aliaj ili montras la pli konvenan esprimon el du eblaĵoj. Ekz., sur pago 36 ni ren-

neoficialaj vortoj nur sub la komenc-litero A). Sed fine la L. K. devas decidi pri la sorto de la oficiala listo: ĉu ĝi restu listo malproksime lamanta post la efektive uzata vortprovizo, do io tute senutila kaj ne-atentata eĉ de la plej bonintencaj verkistoj, aŭ ĝi akiru por si nepran valoron per tio, ke ĝi fidele spegulas almenaŭ la z-an vort-uzon, prezentante eĉ ties fidindan kritikon laŭ la aktuala lingvo-uzo.

Mi ne kredas, ke la L. K., demandate *principe* pri tio, ĉu oni plenumu tiun ĉi taskon laŭ la supre eksplikita metodo, respondus nee. Kaj mi estas certa,

ke eĉ la atakoj forestus, malgraŭ la longeco de la nova listo, ĉar ja temus pri-sistema laboro (la plej vunda punkto de la ĝisnunaj oficialigoj estis ĝuste ilia kaprica sensistemeco). Kaj la oficialiga funkcio de la L. K. tiamaniere pli efike plenumus eĉ sian *bremsantan* taskon. Nuntempe, ĝuste la ne registritaj z-aj vortoj, inter ili tre multaj ofte uzataj, forprenas multe el la graveco de la oficiala listo. Ĉar se oni kun trankvila konscienco povas uzi neoficialan z-an vorton, evidente oni pli facile decidus uzi ankaŭ nezamenhofan neologismon. (-y)

kontas *proksima al, el, je*: en ĉiu okazo estus pli bone skribi *de*. Oni studu la ekzemplojn donitajn kun la kunteksto. La vorto donita en P. V. staras interkrampe.

AL (JE): *Egal(valor)a al* 98g, 191g, 330c; *konform(a)(e)(igi) al* 210f, 249d, 334b; *kred(i)(o) al* 128bc (5-foje); *parenca al* 18g, 263h, 361b, 362e; *proporcio al* 406a; *simila al* 24c, 63b, 208a, 211h, 310b, 413a, 429a. AL (KUN): *konforma al* 77e (3-foje), 210e, 249d.

CE (INTER): *ĉe homoj* 312g. CE (JE): *ĉe la temperaturo* 58h, *ĉe montado* 125e, *ĉe la pordo* 375h (3-foje 163b).

DA (DE): *Abundo da* 324d; *aro da* 254h, 441a; *atomoj da* 28f; *dozo da* 93f; *guto da* 284e; *kvanto da* 93ef; *laĉo da* 260f; *maso da* 304h; *nombro da* 281e; *peco da* 131h, 262e, 273a, 317d, 368e, 440d, 505a, 510a; *provizo da* 392e, 458b (bis); *rezervo da* 468g; *serio da* 388f; *tavolo da* 41f, 329e, 434a. DA (EL): *peco da* 442a (bis), 461h (bis), 476e; *tavolo da* 343a.

DE (DA): *Bezono de* 490a; *duono de* 207g, 317f, 364e; *frakcio de* 41 489c; *kunigajo de* 213h; *speco de* 271b. DE (EL): *Parto de* 40f, 267a. DE (JE): *diferenca de* 98f, 331c, 344cb (4-foje), 397e; *konscio de* 177f; *libera de* 208a; *longo de* 208d; *manko de* 298f, 432g; *mortis de* 208b; *plen(a)(igi)(igi) de* 59a, 93d, 111c (bis), 112d, 197a (bis), 369gh, 373d, 448h, 500b, 505d; *malproksima de* 435b; *malsan(a)(igi)(ulo) de* 125b, 208c, 397h; *suferi de* 208e. DE (PER): *drapirigis de* 94a; *malsan(a)(ulo) de* 124g (bis); *pala de* 348g. DE (PRO): *fandiĝi de* 121h; *fendiĝi de* 268e; *frapiĝi de* 143c; *griza de* 207g; *malfluenciĝi de* 155e; *malsan(a)(ulo) de* 124g (bis), 188b, 494e; *malvarmiĝi de* 494d; *morti de* 319g, 358b; *rabia de* 397b; *raŭkiĝi de* 400h (bis); *rigidiĝi de* 409e; *senkonsciiginta de* 213e; *spiri de* 164c; *sufokiĝi de* 448 (bis), *sulkiĝi de* 458h, *ŝaŭmi de* 455g; *suferi de* 56ab (3-foje), 283a, 436g, 447h (bis), 510g; *tremi de* 145d; *tusi de* 486c; *varma de* 494a; *vibri de* 501e. *De kompato* 268c, *de malespero* 289g, *de malsatego* 268d, *de surprizo* 138g. Oni memoru, ke Zamenhof uzas *pro* por montri *motivon*, kaj *de* por montri *kaŭzon*. Ĉe la jenaj frazoj, anstataŭ *pro* estus pli bone skribi *selve de* 211b, aŭ *kaŭze de* 101ef, 138f, 161f, 182a, 186a, 203a, 268b, 268h (bis), 283b, 284e, 399e, 444g, 456b, 470a, 478a, 490h; ankaŭ antaŭ *ekscito* 486c, *febros* 80c, *gasoj* 311d, *glitado* 156h, *inflamo* 225b, *malsano*, *pasio*, 144c.

EL (DA): *aro el kvin* 293f, 411c; *grupo el* 153f; *milsaĵo el* 416a. EL (DE): *aro el* 350f (3-foje); *konsistanta el* 67d; *vico el* 413d; EL (JE): *liberigi el* 460e; EL (PER): *formita el* 214f.

EN (AL): *disigi en direktoj* 85f; *sin ekzerci en batalo* 431h; *partopreni en* 244a, 260a. EN (CE): *en la komenco* 186f. EN (EL): *konsistanta en* 89a; EN (KUN): *en formo de* 279e. EN (JE): *partopreni en* 208c, 353a (bis); *en nomo* 480f; *en horo* 177h, *en mateno* 208d, *en momento* 458f, 501h.

INTER (DE): *rilato inter du kvantoj* 203b.

JE (DE): *nekredon je* 266e; *senigi je* 39f, 170c, 317d, 422g.

KUN (AL): *kompar(i)(ebla) kun* 159b, 329h, 363g; *kunigi kun* 242d (bis); *kunligi kun* 147f, 159c (bis); *paralele kun* 274d; *kontraste kun* 43b (kaj en 20 aliaj lokoj). KUN (DE): *kun koloro* 294c, 433a; *kun odoro* 126e, 302c; *kun strukturo* 432b; KUN (EL): *kontraste kun* 428f; KUN (JE): *kontraste kun* 437c.

LAU (AL): *laŭ la direkto* 113b.

PER (CE): *per la suno* 57e. PER (JE): *provizi per* 57g; PER (KUN): *farita per ili* 273a. PER (PRO): *akiritita per* 278e; *iras per* 501e; *miriga per*, 444h.

PO (DA): *grupoj po du* 278h.

POR (AL): *dresi por* 261e; *rezervita por* 168h. POR (DE): *nekapabla por* 74f. POR (JE): *utila por* 208a. POR (superlua): *inklinon (por)*, 224f; *(por) fini* 275b.

PRI (JE): *risko pri* 461h.

SUR (EN): *sur la ĉielo* 395a, *sur la strato* 353f, 452e, 494d. (*Sur la ĉielo* = in the sky. *En la ĉielo* = in heaven).

Oni ofte forgesas, ke post *-ata, -ita, -ota*, la vorto *de* montras la aganton (angle: by); kaj tiu forgeso kondukas al obskuraĵoj.

Ĉe la jenaj frazoj skribu *de* anstataŭ *je, per, aŭ pro*: *akompanata de* 341f; *asfiksiita de* 44a; *banata de* 51d; *karakterizata de* 52e (kaj centfoje); *kaŭzita de* 97c, 174b, 309d; *kovrita de* 267e, 284b, 301e, 332e, 350e, 356a, 399e, 443d, 503a; *obstrukcita de* 204h; *produktata de* 346h; *valuita de* 510b (bis). Sed skribu *apartigita el* 352h; *derivita el* 19c, 76g, 86e, 182e, 183f, 184c, 185d, 423a; *liberigita el* 281b (bis); *ŝirita el* 350e; *apartigita je* 60g, 105a, 275h; *disigita je* 37g; *akiritita per* 104c; *enbrakitaj per* 265f; *plenigita per* 336a; *protektata per* 216a; *strekita de ĉe unu ekstremo* 430e; *levi(ta) de sur la tero* 358bc; *limigita ĉe* 97d.

Ĉe *kvazaŭ* oni forstreku. Rim. 1. La finajo *-us* ne havas tempan valoron, kaj post *kvazaŭ* oni rajtas kaj devas uzi aŭ *-is, -as, -os*, aŭ *-us*, laŭ la ideo esprimenda. Insisti pri neologika kaj ĉiama *-us* post *kvazaŭ*, estas forjeti valoran distingon: ĉi tie ne Zamenhof, sed la P. V. estas »malprava«. Komparu la frazojn: *Vi aspektas, kvazaŭ (a) vi vidis fantomon; (b) vi vidas fantomon; (c) vi vidus fantomon; (d) vi vidus fantomon*. La signifo estas: *vi aspektas, kiel vi aspektus, se vi estus (a) vidinta, (b) vidanta, (c) vidonta, (d) vidunta fantomon*. Alivorte: *laŭaspekte vi vidis (vidas, vidus, vidus) fantomon*.

Oni ellasas la vorton *la* en tre multaj lokoj, en kiuj ĝi estas bezonata (ekz.: *ekde kolo ĝis ventro* = *de la kolo ĝis la ventro*), sendube por ŝpari lokon. Tamen preskaŭ samofte oni uzas *la* superfluan. Ekz.: *de (la) akvo, de (la) peco, de (la) aero*, 140c. Oni interŝanĝu pli kaj *plej*, ĉe *pliproponanto* 47e kaj *el du malbonoj (elektu la) plej malgrandan* 106a. Anstataŭ *plie* skribu *plue* ĉe 28b (bis), 92e; kaj *ĉetere* ĉe 342d. Anstataŭ *plia* skribu *plua* ĉe 261a, 267f, 270e.

Forstreku la lastan frazon sub *ol* 339e, kiu devus teksti: *kaj vidinte la kapitanon, li... kaj skribu prefere ol* 423b.

Ĉe *po* (372gh), oni forstreku la tutan rimarkon. Ĉe *talentojn, reprezentantojn* (372h) forstreku la »n«. La citita vorto *dolarojn* estas la sola okazo, (en la jaro 1888, sed neniam poste), en kiu Zamenhof skribis akuzativon post *po*. La Lingva Respondo parte citita pri tiu demando (dato 1891) devus esti legata plene. Forstreku kelkajn erarajn kunmetaĵojn per *po*, kaj faru la jenajn korektojn: *po dek frankoj por horo* 178a, *po dek frankoj por ĉiu* 218g, *po dek markoj por metro* 263b, *po du pipoj en tago* 366e, *po kiom da pulsobatoj en minuto* 394e, *por metro* 492a.

Ĉe 49g, 293e, anstataŭ *sen... nek*, oni skribu *sen... kaj (sen)*.

Ĉe 359c Zamenhof skribis la frazon *iras trans limo sen pago kaj timo*, ŝanĝita formo en P. V. estas erara.

PRESERAROJ: 9h klarigi. kial; 10f fervora; 24a jaŭdon; 30f Al (ne AL); 52e kapro; 55g tiaj bestaĵoj; 61h tiel, ke; 72b ĉi tiu (du vortoj) k. s.; 73e enterigitoj; 103c ŝiajn ŝuojn; 106b kontentigebla; 107d skandinava; 108g obstrukco; 120e puŝigo; 141f postesignoj; 149a 2 Akiri; 149d kuriozaĵoj; 154c aŭdinte; 167b dense; 170b neniu; 178d kulturata; 180e— —; 187c ŝraŭbutnilo;

# REVUO DE REVUOJ

## La voĉo de l' mondo, aŭ nia rapida filmraporto

Unua bildo. En la mondon venis nova sento.

Granda batalo ĉirkaŭ la »Himno Esperantista« en la Heroldo. Aŭskultu. R. Ulbrich diras inter aliaj la jenon:

Ni estu sinceraj: nek la teksto nek la melodio de »La Espero« estas altrangaj. Kiel montras al ni la naciaj himnoj, speciale la elekto de la melodio estas grava. La himno devas esti kortuŝa, entuziasmiga, la koro devas »bati pli alte«, kiam oni aŭdas ĝin. Se ni de tiu ĉi vidpunkto rigardas nian himnon, ni devas konstati, ke unuavice laŭmelodie »La Espero« estas diletantaĵo, ke ĝi neniel kapablas entuziasmigi la kantanton.

Brian Price-Heywood havas similan opinionon, nur la solvo estas alia. (Ulbrich proponas melodion de Kienzl.)

Post tiom da jaroj anstataŭigi la tekston de »La Espero«, estus apenaŭ eble kaj nedezirinde. Cetere ĝi estas stile kaj enhave bona, kvankam eble iom tro optimisma por nia senluziigita tempo. Restas la demando pri ŝanĝo de la melodio. Inter la esperantistoj verŝajne ne troviĝus unuaklasa komponisto (kial kontentigi per duaklasa?). Kial entute peti pri nova komponaĵo, kiam la mondo jam krevas pro troo da melodioj? Ĉu ne plej simple komitato de muzikemaj, kompetentaj kaj interesitaj samideanoj elektu jam ekzistantan, forgesitan aŭ neuzatan melodion kun vira ritmo kaj muzike senriproĉa formo? Ekzistas multaj tiaj en la angla himnaro. Sed antaŭ ĉio ni evitu sentimentalecon.

Du kontraŭopinioj:

S-ro V. R. parolas:

Ĉu nia himno ne plu estas sufiĉe bona? Mi ne estas malnova esperantisto; tamen mi opinias, ke himno disvastigita en la tuta mondo, kantata de antaŭ jardekoj, ankaŭ nuntempe devas esti sufiĉe bona, eĉ se la melodio ne estas altranga. Ĉu ni honoros D-ron Zamenhof, forigonte lian himnon? Aŭ eĉ nur ĝian melodion? Mi ne kredas tion!

Kial mankas ofte dum kunsidoj varmo kaj entuziasmo, kvankam tie parolas bona oratoro? Ĉu kulpas pri tio la bona oratoro aŭ la malbonaj aŭskultantoj? Same pri la himno. Se nia himno havus pli belsonan melodion, ĉu ĝi estus kantata pli bone de malbona kantantaro? Laŭ mia konstato la kaŭzo pri malbona kantado de nia himno estas, ke multaj eĉ malnovaj esperantistoj ne scias sufiĉe parkere nian himnon.

K. Wiczorek: La himnon verkis nia majstro Zamenhof, kaj necese estas, fundamentigi ĝin kiel himnon firman, laŭtekste neŝangeblan. Tion ni ŝuldas al nia mortinta majstro Zamenhof.

Rilate la melodion, mi ne ŝatas kritiki ĝin, ĉar nia majstro ne malaprobis ĝin, — kontraŭe, li kunkantis ĝin. Ŝajnas, ke nun aperas tre fervoraj reformemuloj, por havigi al si meritplenan nomon. Ni malnovaj seriozaj espe-

rantistoj, ni malfermu la okulojn kaj ne permesu fuŝi aŭ mallongigi tekston, verkitan de Zamenhof, — kaj se al kritikemulo ne plaĉas la melodio de nia fervora, mortinta batalinto Ménéil, tiam li ne kunkantu ĝin. Ankaŭ la primelodio estu oficiale fundamentigita, kaj de esperantistoj ĝi estu tradicie respektata kaj kantata.

Dua temo. Nova neologismo, aŭ kion signifas *njuso*. (»Suda Kruceto«, Nov. 1935.)

»Per *njuso* ni celis la anglan »News«. Kaj »News« signifas laŭ nia sperto ĵurnalista rebakaĵo, precipe el ĉiuj specaj banalaĵoj urĝe kolektitaj.«

La sama revuo skribas pri la jena frazo de Warinĝhien: La angla lingvo komencas alpreni en Usono aspekton pli kaj pli distingantan *disde* tiu, kiun ĝi konservas en Anglujo. ... Ĉiokaze la tempo jam venis, kiam gramatikistoj ĉesu diri pri la »unusola, unufoje por ĉiam fiksita signifo« de la prepozicioj en Esperanto.

Tria bildo. Novajo el Germanujo. El la adiaŭo de F. Ellersiek:

Post kiam mia Esperanto-Eldonejo Friedrich Ellersiek G. m. b. H. jam en fino de Novembro n. j. ĉesigis sian funkcion, per ĉi tiu numero finiĝas ankaŭ la elvenado de »Germana Esperantisto« kaj de ĝia aldono »Esperanto-Praktiko« por antaŭvidebla tempo. Per tio malaperas el la Esperanto-gazetaro la plej malnova el ĉiuj ankoraŭ ekzistantaj gazetoj, kiu dum la daŭro de 32 jaroj seninterrompe elvenis, kiu metis la fundamentan ŝtonon por la Esperanto-movado en Germanujo kaj ĉiam kiel komplezema helpanto fidele asistis la ĉefan reprezentanton de ĉi tiu movado, la Germanan Esperanto-Asocion, tre ofte eĉ ignorante la financajn kaj ceterajn interesojn de la eldonejo.

Nur al la nuna gvidanto de la asocio estis rezervite, ĉesigi ĉi tiun interrilaton, ĉar mi ne povis akcepti ĝia faritajn al mi proponojn pri la restigo de la gazeto kiel oficiala organo de GEA. Per la forigo de la asocio kiel amasabonanto, la gazeto perdis sian bazon por plua ekzistado.

»Tiel finiĝas granda amo«. Ĉi tiu titolo de konata filmo tre bone taŭgas por mia agado kiel Esperanto-eldonisto. Dum 26 jaroj mi laboris kiel tia por la Esperanto-movado en Germanujo kaj oferis al ĝi la plej bonan epokon de mia vivo kaj ankaŭ ĉiujn miajn monrimedojn...

Kvara bildo: Novnaskito en Esperantujo.

Jen du pensoj el la »Regno de pensoj« kaj ties alvoko (R. de P. estas »de ĉiuj dependa organo de bono kaj belo«. La pagvaluto estas tre simpata: »Oni pagas per bonaj agoj...«):

Cervantes: Sur la granda temphorloĝo trovas sin la limvorto »Nun«. La strato »Poste« kondukas al celo »Neniam«.

Aristoteles: La virto, se eĉ ne influas la feliĉon, meritigas nian penson kaj inklinon.

187b obstrukca; 189g konfuzajtoj; 191f leginda; 194g agitantoj; 202d bestoj; 206a paperojn; 207f —; 212f alvenis; 214c ĝis; 214f sanktigita; 215b erarojn; 221a juĝu; 222h ne karno; 224b Sang-o; 225g Kaŭĉuko; 228b mangajojn; 230e terapeŭtikaj; 232c terapeŭtiko; 240e longforma; 249b regnoj; 249h malbenon; 250b maltrank—; 251a Normandoj; 251h R (ne Rk); 252d OBEI; 265e ĉeba; 269a lia lango, la tempo; 269h plumbo; 275f ekstremajtoj; 279b en ĝi; 281f interezoj; 287d ĉirkaŭ; 293c popolamaso; 293f objektoj; 295 plumbo; 303a eraroj; 316g ne atinginte; 319f zorgon; 323e loĝataj; 327g mensogi; 332a dek-unua, monahiĝi; 333g necesan; 334e multajn leterojn; 342c agrablajn; 352c pensas; 353g trans la riveron; 354h elpaŝi; 372d kaŭĉuka; 372g 15 paĝojn; 375e ni elportu; 375g ricevi; 376e mangaj; 376f sojlon; 383h ŝi preterpasis; 384f unu solan; 395h sian primitivan;

396e tia lingvo; 398h rajtojn; 402d ni reĝas; 403f dissendo; 406b 4 (ne: 3); 412e unu sola; 427g postesigno; 427h ne konsilinde; 433h korundo; 435e neŝerca; 442c senŝange; 442d timigos; 442e fulmis; 442e ĉu ia; 444f iom post iom; 449b longforma; 449d principon; 453h aŭtoritatoj; 455h reciproke; 463g moviĝi; 467g modereco; 470b ŝajnis; 473b tia malbono; 473g anoncisto; 479g la lipojn; 481a plugilo; 481a Dion; 481d Dion; 481e signon; 494d ili povas malvarmigi; 494h loĝanta; 502a fragoj; 502g sia sinjoro; 503c sendangerigi; 503c belaj; 504g dividiganta; 509e pli bona; 510c kaŭĉukon.

Mi treege esperas, ke ĉi tiuj notetoj ne fortimigos iun ajn, kiu pripensas aceton de la libro. Kontraŭe, ili celas lin instigi al ĝia acetato kaj studado. Estas facile kritiki tiun aŭ alian ereton en verko tia; sed listigi la multajn bonajojn en la volumo estus tasko senfina.

*Senpage* aliĝu ĉiuj al »Regno de Pensoj«, libera, mistera senfino. — La pensoj estas la plej delikataj, la plej potencaj fortoj de la universo. Bela, vera kaj forta penso estas nepereema: ĝi transvivos ĉiujn monumentojn de niaj kulturoj kaj finfine venkos tutan materialismon surteran. Do, ekkaptu ĉiun belan, vigan kaj bonhavan ideon, kiu survoje antaŭ vi ekbrilos, kaj oferu ĝin sur niaj pagoj al ĉiuj en vasta Esperantujo, kontraŭ reciproka servo de

*Esperanto, Mukaĉevo (CSR.), Internat. ul 42.*  
*Kvina bildo.* Pri la »Plena Gramatiko« parolas C. Aymonier en »Franca Esperantisto« (Dec. 1935.):

»... La originaleco de tiu nova gramatiko kuŝas en tio, ke ĝi estas historia kaj kritika, ke ĝi celas komprenigi la evoluon de la lingvo, konstati ĝiajn tendencojn, registri la rezultojn akiritajn ĝis hodiaŭ, starigi kvazaŭ bilancon, kiu kompletigas la Plenan Vortaron ktp.«

*Sesa bildo. La rabistoj.* (El »Nia Gazeto«, Nov. 1935. El la samtitola artikolo de S. Grenkamp.)

»Por tiri profiton el laboro de aliaj iu esperanta malhonestulo sub la nomo de eldonejo *Shanghai Sago Keishi* faris falsajojn de multaj gravaj esp. libroj.

Inter tiuj libroj troviĝas: Plena Vortaro de SAT, Kompleta Gramatiko de Fruictier—Grenkamp, Viktimoj de Baghy ktp.

Profitante el tio, ke la hina registaro ne subskribis ankoraŭ la Bernan Konvencion, ke ne ekzistas leĝa defendo, la modernaj esp-istaj ŝtelistoj ne ĝenas sin por falsi kaj eldoni la plej bonajn verkojn sen permeso de la koncernaj aŭtoroj.«

*Sepa bildo.* Por la varioeco iom da poeziaĵoj — tradukitaj.

1. El la poemo »*Ĉiam ekzistas poezi*« de G. A. Bécquer. (En »Nia Vivo«, Nov. 1935. Tradukis Ramon de Salas.) Jen la kvara strofo:

»Dum ni eksentos, ke l' anim' gajigas  
Sen rido ĉe la buŝ',  
Dum ni malĝojos sen la sento tamen  
Je varma larmotuŝ',  
Dum batalados nia kap' kaj koro  
Laŭ daŭra kolizi',  
Dum dolĉememoroj kaj esperoj estos,  
Ekzistos poezi'.«

2. Io el la bulgara poezio. El la bela poemo de A. Dalchev »*Vespero*« (Trad. Ivan Dobrev.) la lastaj vortoj:

»Pro kio ni ne povas tuj ekesti  
ĉi tie, tie, ĉiuloke — kie  
potence kaj senfine batas vivo?  
Senĉese mortas ni kaj malaperas  
nun desur jena loko, poste — desur tiu  
ĝis kiam tute malaperos ni.«

(*Bulgara Esp-isto*, Okt. 1935.)

3. Unu strofo el la »*Balado por Kristnasko*« de J. Richepin. (El la franca: *Mad Mevo* en »*La Semanto*«, Dec. 1935.)

»Gi venas, jen anoncas krio!  
Sed ne krio klara, ĝoj-senta,  
Kiam, pro vintro kaj glacio,  
La gorĝo doloras, turmenta.  
Vi, ho ve, per ĝemo lamenta,  
Salutas plore »ĝian« venon,  
Mordataj de l' frostoj serpenta,  
Vi, kiuj ne havas kamenon.«

*Oka bildo.* Jen tuta, ĉarma japana fabelo el »*La Juna Vivo*«, Dec. 1935.:

*Tri knabinetoj.* (*Ujaka Akita.*)

Antaŭ ĉirkaŭ trimil jaroj en Hindujo minacis mizero de malsatego. Pro manko de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ĉiutage mortis miloj da homoj — precipe la suĉinfanoj mortis plej unue, ĉar la mamoj de la patrinoj ne plu donis lakton.

Por savi la popolon, la reĝo disdonis rizon el sia grenejo; tamen tio helpis preskaŭ nenion, ĉar la malfeliĉaj homoj nombris tro multe.

Iun tagon rapidis tri knabinetoj, ĉiu kun unu pota sur la ŝultro. La unua knabineto surhavis purpuran ves-

ton, la dua ruĝan kaj la tria grizan. La unua kaj dua knabinetoj rapidis kun tute gaja mieno, sed la lasta kun malvigla kaj malgaja mieno.

Kiam la tri knabinetoj iris tra densa arbaro, ili renkontis Budhon, kun nuda kapo kaj nudaj piedoj.

»Amataj infanoj«, Budho demandis, »kien vi ĉiuj rapidas?«

»Mi volas iri por donaci al la malfeliĉaj homoj«, respondis la unua. »Mi kunportas poton plenan de tute freŝa lakto.«

»Mi.« respondis la dua, »mi portas aroman supon.«

»Mi... mi...« la lasta knabineto respondis veniense, »ĉar mi estas malriĉa kaj posedas nenion por donaci, mi ĉerpis akvon el fonto kaj alportis.«

Tion aŭdinte, Budho ekparolis admone: »Miaj infanoj, donaci al aliuloj estas ja laŭdinda ago. Kiel ĝojos la malfeliĉaj homoj pro viaj donacoj! Sed karaj, la plej granda donaco estas ja, konstrui mondon, en kiu neniu bezonas donaci kaj neniu bezonas peti donacon! Amataj etulinoj, donaci al aliuloj estas ja bonega ago, tamen tia donaco ne estas la plej granda donaco. Karaj infanoj, la plej grandan donacon povus fari la plej malriĉa persono en la mondo. Infanoj, ne fieru, nek hontu! Kiel ĝojos la malfeliĉaj homoj pro viaj donacoj!«

La tri knabinetoj kviete pluiris laŭ la vojo kun sampezaj potoj sur la ŝultroj.

Tokio.

El la japana: S. Nanya.

*Naua bildo.* Poemo originala de *Aleksandro Liljer* en »*Svenska Arbetar Esperantisten*« (Nov. kaj Dec. 1935.):

*La nova muzikilo*

Ekzistas multaj muzikiloj  
en ĉiu gent', en ĉiu land' —  
Jen violon' la plej subtila  
kun plore-melodia kant'.  
Kaj die pastorala psalmo  
Plendanta simple al ĉiel'  
El sub soifplena palmo  
Kaj de paŝtista alpo-kel'.  
Ekzistas pluraj muzikiloj  
Ĉe l' gentoj de la tuta mond' —  
Jen la arĝentaj sonoriloj,  
Brilantaj ĉe la cirka rond'.  
Kaj ankaŭ etaj kastanjetoj  
Gojridon ĵetas el Sevil' —  
Imitu ilin vi, poetoj —  
Ho, kia bel'! Ho, kia bril'!  
Zurmà revema de Kaŭkazo  
Kaj kobra de Ukraini'  
Eterne sonas sub la kvazaŭ  
Dolorpremita harmoni'.  
Silentas tute la timpano  
Kaj mute bruas la tamtam'...  
Ĉar mankas ĉe la homoj pano  
Kaj ne brulegas viva flam'...  
Sed Esperanto, Esperanto —  
La fabelema muzikil',  
Al vi la plej sinceran kanton  
Kaj oran gloron de ĵarnuil'.  
Vi tiom flue kaj facile  
Varias kiel ocean' —  
Jen estas vi marmortrankvila  
Kaj jen — subita uragan'...  
Vi ploras, kiel violono  
Vi ridas kiel tamburin'  
Eterne juna kaj belsona  
Vi ĉarmas min, vi ĉarmas min!  
Kaj nun mi sidas en la ĉambro  
Sub nokta orumita lunn'.  
Finante mian ditirambon  
Per la neparolema plum'.  
Jam palpebrumas laca lampo  
Kaj en ĝarden' — pluvega frap  
Balancas sin en ritmo jamba  
Malsuprenkliniĝinta kap'...

Komp. l's: Fersil

DE POST, KVAZAU, PO

Sro Butler, la aŭtoro de la grava, detala kaj tre valorata kritika artikolo pri la Plena Vortaro (vd. en la tria kaj nuna numero de L. L.) permesu al mi, ke mi kontraŭdiru kelkajn liajn opiniojn.

1. Mi ne komprenas lian antipation kontraŭ *de post* kaj *ekde*. Estas sendube, ke la multflanka uzo de la prepozicio DE ne malofte estas malagrabla. Estas do oportune havi rimedojn, per kiuj oni, neces-okaze, povas distingi inter ĝiaj diversaj sencoj. Sen tiaj rimedoj kelkfoje oni povas eviti la dubsencecon nur per speciala vort-ordo, kaj, laŭ mia opinio, tia deviga vort-ordo estas pli kontraŭa al la spirito de E-o, ol duobla prepozicio.

Mi opinias, ke EKDE estas tre feliĉa trovaĵo de Grabowski. Ĝi estas vorto pli malpeza ol DE POST, post ĝi oni povas apostrofi la artikolon (*ekde T*), kaj ankaŭ teorie ĝi estas neriproĉebla, ĉar EK ja estas prefikso kaj neniam fundamenta regulo malpermesas ĝin uzi ankaŭ ĉe prepozicio. Krome, ĝi estas uzebla egale ĉe substantivo signanta tempopunkton kaj ĉe substantivo signanta tempodaŭron, dum DE POST taŭgas nur en la unua okazo (*de post du jaroj* ja signifas *de la fino de du jaroj*).

Mi riproĉus la uzon de la supraj formoj nur en la okazoj, kiam la tempa senco estas evidenta. Do *ekde tiam, de post nun* ŝajnas al mi malagrabla pleonasmoj.

2. Parolante pri la modo post KVAZAU, la aŭtoro evidente kontraŭdiras sin mem. La strukturon de la KVAZAU-propozicioj li analizas tre ĝuste: *vi aspektas, kiel vi aspektas, se vi estUS vidanta, se vi estUS vidanta fantomon* — kaj poste li malatentas, ke *estus vidanta* estas simple *vidas* kaj ke *estus vidanta* estas — *estus vidanta*. Alidire, ĝuste el la analizo, kiun li faras, nekontesteble sekvas la neceso de kondicionalo post KVAZAU, ĉar la kondicionala latentaj prepozicio *kiel vi aspektUS* nepre devas sekvi kondicionalan SE-prepozicion. Laŭ la gramatika logiko, kondicionala ĉefprepozicio neniam povas sekvi indikativan subprepozicion enkondukitan per SE. Laŭ mia lingva sento, ĉiu indikativa KVAZAU-prepozicio estas same malgramatika, kiel la frazo: *estUS bone, se vi helpOS*. Estas ja evidente, ke la prepozicio devas havi la saman modon, kiun indikas la struktura analizo.

Alia estas la okazo ĉe la frazo: *laŭaspekte vi vidis, vidas fantomon*. Ĉi tie ne temas plu pri kompleksa frazo kun ĉefprepozicio (*vi aspektas*), latentaj subprepozicio kondicionala, fiktive kompara (*kiel vi aspektas*) kaj dua-grada subprepozicio (*se vi vidus*), sed pri *simplica frazo*.

Tom analogaj estas la particip-adverboj. *Se mi havus panon, mi ĝin manĝus* — povas esti esprimita jene: *havante panon, mi ĝin manĝus*. Ĉi tie do oni esprimas la fikтивan SE-prepozicion per indikativa participo. Sed el tio certe oni ne povas konkludi, ke ĝusta estus la frazo: *se mi havAS panon, mi ĝin manĝus*.

3. Parolante pri PO, laŭ mia opinio la aŭtoro estas tro kategoria. La tradicio ja pledas por nominativo post PO, sed la gramatika logiko kaj certe ankaŭ la gramatika sento de tre multaj, pledas por akuzativo, kiu pli kaj pli venkas. Kaj tio, vere, estas salutinda. La multajn erarojn pri la uzo de PO kaŭzas ĝuste la altrudita, nenatura nominativo.

PO estas plie adverbo ol prepozicio. Tion pravas, ke ĝi povas esti uzata ankaŭ ĉe subjekto: *en la vicoj marŝis po kvar soldatoj*. Estas evidente, ke efektiva prepozicio ne povas antaŭi subjekton. Poste, kiel Lippmann atentigis, substantivo staranta post PO povas stari en akuzativo de

direkto: *oni kondukis la tri gastojn en po unu ĉambron*. Kial do estus escepto la objekta akuzativo?

Poste, la akuzativo kaj PRI estas ofte egale uzebla. Nu, oni povas diri: *la studentoj devas respondi en tri ekzamenoj pri po du demandoj*. Kial do oni ne povus diri, ke ili devas respondi *po du demandojn*?

Nun ni rigardu la *sencan* de PO. Kion ĝi faras? Ĝi multobligas la diritan nombron per tiom, en kiom da partojn oni dividas la multobligitan kvanton. Do: *mi donis al la tri infanoj po tri pomojn* signifas: *mi donis al la tri infanoj tri kaj tri kaj tri (aŭ trioble tri) pomojn*. Kiel ĉi tie oni metas akuzativon, tiel same ĝi necesas ankaŭ post PO.

Konklude: eĉ se la nominativon post PO, kiel tradician kaj zamenhofan, oni ne povas diri erara, la akuzativo estas pli logika, do neniel kondamnebla. (y)

PADUSO

Neologismoj! Kiom da inko jam fluis pri tiu temo en Esperantujo! La diskutado daŭras akre, kaj mi certe ne intencas eniri en ĝin. Estas por mi tro danĝera tereno, tiom pli ke mi jam havas mian propran opinion pri la demando. Efektive ŝajnas al mi ke la vero, kiel preskaŭ ĉiam, kuŝas en la mezo, nome: nia lingvo devas ĉion esprimi, kaj por tio ĝi estas devigata eltrovi aŭ kunmetitan vorton aŭ eĉ, se tia vorto ne estas trovebla, novan radikon necesan por prezenti novan objekton aŭ ideon ankoraŭ esperante ne esprimitan. Sed kiam la taŭga vorto jam ekzistas, ĉu radike, ĉu kunmetite, nova radiko estas nur balasto kiu komplikigas kaj malutila malfaciligas la lingvon.

Tion ĉi mi tuj pravas per malgranda rakonto. Ĝi temas pri »paduso«. Kiam mi estis en Stockholm ĉe la internacia kongreso, mi vizitis, kompreneble, la esperantan librovendejon kaj tie, inter aliaj libroj, allogis min la bela legendo pri Gösta Berling, de Selma Lagerlöf, kiun talente esperantigis nia meritplena sveda samideano Stellan Engholm. Legante tiun interesejan libron, mi rimarkis la jenan frazon kaploke de la dua parto: »Kiaodoro! Verdire estas abrotano kaj lavendo, paduso kaj siringo kaj narciso.«

Kio estas paduso? Ĉu vi scias? Mi vetas ke ne. Sed nun mi tre bone scias. Kaj kiamaniere mi lernis la precizan signifon de tiu vorto, mi tuj rakontos al vi.

Vere kiam mi unufoje legis tiun vorton, mi ne tre atentis pri ĝi. Sed la sekvantan sabaton, mi iris kiel kutime al la »Centra Kafejo« por ĉeesti la semajnan sabatan kunvenon de nia grupo. Tie, »Antaŭen!« kuŝis sur la tablo. Iu el ni legis laŭte la tre belan artikolon de E. Carlsten pri lia vojaĝo »En lando de la nokteza suno«. Subite, oni aŭdis la vorton »paduso«. Kio estas »paduso«, ekkriis unu el la aŭskultantoj. Neniu povis respondi taŭge. Certe estas kreskaĵo, diris iu. Jes, respondis alia, sed kia kreskaĵo? Ĉu estas florplanto aŭ arbo, aŭ arbeto? Neniu povis solvi la demandon. Mi kredas, ke estas floro, diris iu. Mi tute ne asertas, diris alia. Oni multe diskutis sen rezulto. Finfine, mi diris: — Atendu la venontan sabaton. Dum la semajno mi serĉos. Vi ankaŭ, bonvolu serĉi. Konsentite, respondis ĉiuj.

Post rehejmenigo, mi tuj prenis mian esperantan vortaron de Grosjean-Maupin, kiu estas titolita: »Kompleta Esperanta-franca Vortaro«. Sed mi ne trovis en ĝi la vorton: »paduso«. Mi ekpensis: eble ĝi estas trovebla en la »Plena Vortaro«. Mi foliumis ĝin, vane. Jam estis

# Kiom estas la nombro de la dekdu apostoloj?

La kristana dekduo konsistas precize el dekdu apostoloj. En Esperantujo ni estas iom pli, precize 119 ĉef-kaj help-apostoloj.

Esperantujo balotis, kiuj estas ĝiaj dekdu apostoloj. Nia simpatia kolego, aperanta en Rumanujo, la USE-ĜHO voĉdonigis sian publikon pri la plej nova ordeno de nia ordenriĉa movado. La gazeto agis ĝuste, ĉar ĝi donis al la publiko interesajn, al la bona eta esperantista publiko ĝi diris: »Nun ni ludu apostolludon« kaj la esperantistaro ĝoje ekludis. Se mi volas tute serioze raporti pri la ludo, mi havas nur solan rimarkon, kial oni ne fondis alititolan ordenon, ekz. »la plej bravaj pioniroj de nia movado«, aŭ io simila.

Kial ĉi tiu harfendado? Nu, je mia honoro, mi ne estas malkontenta: iom mire mi vidis mian modestan personon sur la 51-a loko. Do, nun ni — kiel mi jam diris — *habemus papam*, pli ĝuste la apostolan dekduon kaj la nomojn de la kandidataro. Se mi ne havos alian laboron, mi kompletigos mian belsonan, longan kaj sensaljaran titolon per tiu ĉi lasta. Sed nun ja ne temas pri mi, sed pri la unua kaj unika apostol-elekto de la mondo.

La unua apostol-elekto pruvas, ke la esp-istaro, — honoron al la esceptoj — antaŭ la baloto ne pasigis tro multe da tempo per la meditado pri la vorto »apostolo«. Kaj la vorto restis verŝajne malatentata.

Imagu, ke la kristanaro, nun balotante pri sia apostolaro, elektus *Judson*. Iom similan faris la balotantaro, kiu elektis kvarloke markizon *de Beaufront*, la iaman bravan pioniron de Esp., kiu poste iĝis ties akra mal-amiko kaj gvidanto de la Ido-bataloj. Jes, mi komprenas. Laŭ la balotintoj la apostoleco estas demetebla, kiel la subvestoj. La kandidataro havas amplekskarakteran nomaron, en tiu mi trovis nomon de fervora okcidentalisto, nu kaj mi legis nomon de fervora misiisto de la Esperanto-kredo, kies apostolecon blasfemantaj hotelposedantoj kaj aliaj posedantoj pridubas. Eble iam ili estis apostoloj, ĉu ne? Sed laŭ mia konservativa opinio la apostoleco devas signifi ĝismortan, aŭ ĝisnunan senriproĉan agadon. Aŭ eble mi eraras?

Alia sperto, ke la esp-istaro ne konas sian historion, eĉ ne la estanton. Se mia akuzo estus maljusta, tiam ne mankus *almenaŭ* el la mikŝvalora kandidataro la nomo de

*d-ro Javal*, la blinda doktoro, kies 100.000 franka mon-offero kaj laboro ne sufiĉis enirigi lin en la elegantan societeton. Ho, forgesema popolo! Kaj tiam ekz. la brava »nestoro« de la sveda movado *Paul Nylén* ne starus sur la 75-a loko kaj tiam ne mankus el la listo de la kandidatoj tiaj nomoj, kiel ekz. *Sam Jansson*, *Helmi Dresen*, ktp., ktp.

Estas pripensinde cetere, ĉu oni povas apostoligi profesiulojn? Oni povas esti bona propagandisto, bona pioniro de movado, en kiu kaj el kiu oni vivas, aŭ vivis profesie, — mi parolas ankaŭ kontraŭ mi mem — sed ĉu oni povas esti *apostolo*, aŭ kandidato por kontraŭvaloro? Imagu, ke bakisto vendas al vi bonegan bulkon kaj vi dankas per la deklaro: »Vi estas apostolo de la bak-industrio.« Multaj eminentaj, honestaj kaj bravaj nomoj el la apostolaro ne estas apostoloj, sed kuragaj pioniroj aŭ batalantoj aŭ laborantoj de nia ŝatata movado.

La balotado montras kelkloke fortajn naciajn influojn; la italoj bonorganizite balotis, la nordanoj ne interesigis; ĉiokaze la revuo nun havas konfidindajn informojn pri tio, en kiuj landoj oni interesigas pri USE-ĜHO?

Povas esti, ke la afero ne haltos nun, *eble post la profanigo de la vorto: apostolo, la esperantistaro fondos kvindek- aŭ centmembran sanktularon*, kio certe plifortigos la esperantisman spiriton. Imagu, ke la komencantoverkisto petos inspiron kun ekĝemo: »Ho, Sankta Julio Baghy, helpu!« »Ho, Sankta Jean Forge-Fethke, ne for-lasu min!« Kiel bele estus: »Ho, Sankta Lejzerovicz!« Aŭ la rondvojaĝantaj pieduloj dirus: »En la nomo de Sankta Laksmishwar Sinha mi petas samideanan helpon.« (Ĉu oni kuragus ne doni?) Aŭ se vi volus akiri ministerian subtenon, ĉu ne estus efika la ekspiro: »Ho, Sankta Hugo Steiner! Vi estas hejme ĉie!«

Kaj tiam Ludoviko Lazaro Zamenhof trarigardus ĉe iu steltruo de post la ĉielkurteno kaj kontente dirus:

»Tro multaj ne estas miaj adeptoj, sed ili estas des-pli gravaj!«

Tamen, provizore mi proponas, ke ni elseliĝu de la altaj ĉevaloj kaj *humile* ni iru »*per pedes Apostolorum*«.

F. Szilágyi

la 51-a apostolo.

malfrue. Kion vi ankoraŭ serĉas, diris al mi mia edzino. Estas nun preskaŭ noktmezo; venu al dormoĉambro.

Mi kvazaŭ mehanike enlitiĝis; sed mi ne povis endormiĝi. Dum la tuta nokto mi cerbumadis pri paduso, imagante ĉiaspecajn kreskaĵojn de plej humila kampfloro ĝis plej altkreska arbo. Matene, mi malbonhumore el-litiĝis, tute laca mense. Dumtage mi ofte ekpensis pri tiu malbeninda paduso. Vespere, post mia laboro, mi daŭrigis la serĉadon. Unue mi prezentis al mi, ke la vorto havas latinan aspekton. Mi ekprenis mian latinan vortaron en kiu mi trovis »Padus«: rivero en Italujo, kaj »padusa«, suda brako de tiu rivero kiu trafluas la urbon Ravenna. Je tiu trovo mi fariĝis revema. Rivero, ĉu granda, ĉu malgranda, ne povas esti la padusa kreskaĵo el Svedlando aŭ Laponio. Pli kaj pli mi ekecbumis. Ĉu tiu mistera florplanto devenas el norda Italujo? Mi ne sciis. Mi ankoraŭ foliumis anglan, germanan, hispanan vortarojn. Sed en neniu estis eble trovi ion kontentigan. Mi ne plibone sukcesis per francaj leksikonoj. Malesperante, mi forjetis ĉiujn miajn librojn kaj naŭzite mi restis ĝis la sekvanta sabato sen legi eĉ unu esperantan vorton. Dum kelkaj tagoj mi ne plu pensis pri paduso.

Sed sabato rapide alvenis kaj kun ĝi la kutima

kunveno. Kiam ni sidigis ĉirkaŭ la tablo, la unua demando estis: Ĉu vi scias kio estas paduso? Mi estis devigata konfesi mian nescion. Ankaŭ la aliaj serĉis, sed vane, kiel mi. Neniu sciis solvi la enigmon. Tion vidante, Sinjoro Vernay, la simpatia kaj sindonema ĉef-redaktoro de »Antaŭen«, deklaris solene, ke li skribis, por havi informojn, al Svedujo mem, pri la netrovebla vorto. Li tion faris kaj jen la klarigo kiun li ricevis el Svedujo: »Paduso estas mezgranda arbo kun ovalaj sed pintaj folioj kaj blankaj, forte odorantaj floroj. La fruktoj estas nigraj, same grandaj kiel pizoj kaj ne tute bongustaj, tamen manĝeblaj.« La afabla sveda korespondanto aldonis, ke oni rekonas paduson per ĝiaj longformaj florpanikloj. Por tute klare montri al ni, kia arbo estas paduso, Sinjoro Vernay prezentis belan kolorbildon de ĝi kaj de ĝiaj fruktoj. Sub la bildo estis la scienca nomo de la arbo. Ĝi novlatine nomiĝas: »*Cerasus Padus*« aŭ »*Prunus Padus*«. Tion leginte kaj vidinte, mi tuj komprenis la vorton »Paduso«. Ĝi estas nur la esperanta formo de »padus«, kiu estas artefarita novlatinaĵo netrovebla en la klasikaj latinaj vortaroj, uzataj de la francaj liceanoj kaj gimnazianoj. Sed samtempe, rimarko ekvenis fulmrapide en mia spiriton: — Paduso ne estas

VICENTE BLASCO IBANEZ: SANGO KAJ SABLO.  
(Romano de tipaj hispanaj moroj. Tradukis: Ramon de Salas Bonal. Eldonis: Aragona Esp. Federacio, Zaragoza. Cervantes g. 232 p. 22×16.5 cm. Kun tre bela titolpaĝo, bona papero. Prezo svfr. 4.— plus sendkostoj.)

Blasco Ibanez signifas en la hispana literaturo pioniron de la realismo. Sed lia realismo ne estas senkondiĉa; en liaj romanoj arte kaj senperforte amplektiĝas iom da simbolismo kaj iom da plus-akcento de la tendenco literaturo. Sed la diversaj ingrediencoj ne elŝovigas kaj liaj romanoj neniam estas trompezuritaĵoj, neniam estas paperodoraj. Ankaŭ en la »Sango kaj sablo« pulsas la sango kaj polvas la sablo, kiel la vivo mem.

Oni povas mallonge fini pri la temo de la romano. Plebdevena toreadoro brilas kaj poste malvenkas.

Parto de la brilo kaj malvenko okazas en la areno, parto en la amo. Aristokratino, kiu lin ne komprenas kaj samklasano, kiun li ne komprenas. La skizo ne montras multe, sed ĉiu tolo estas blanka kaj Ibanez estas unu el la plej riĉfantaziaj vortpentristoj. La karakteroj estas akre konturitaĵoj; ne estas surpriza la demono, nek la sindono de la mildulino, nek la sopiro de la simplulo, sed estas surprizaj la koloroj sur koloroj, la vervo, la amo, en kies varmon vindas la aŭtoro la ĉefrolantojn: precipe la toreadoron kaj la taŭron, kies komunan fatalon postulas kaj pretendas la plaĉo kaj la kaprico de la plenpotenca publiko.

Ibanez ne glorigas la taŭro-spektaklojn, sed tre saĝe, iuloke li atentigas per la vortoj de iu epizoda rolanto, ke oni ne rajtas furiozi pro la krueleco de la taŭro-spektakloj en Hispanujo, dum oni toleras kaj prisilentas krudaĵojn kaj kruelecojn, kies suferobjekto estas mem la

Homo, (aŭ ni tamen ne uzu la grandan literon), la malgranda homo en la plej diversaj partoj de la mondo.

La tradukinto, kies inteligentan enkondukon plezure ni legis, videble timas, ke la leganto vidos post la romano grandan taŭr-arenon, anstataŭ la vera vivo de Hispanujo. Sed tiu timo estas superflua, ĉar la romano kreas tiel homan, tiel *malfremdan* vivon kaj sentaron, ke fine ni eĉ tion forgesas, ke temas pri Hispanujo.

La laboro de la tradukinto estis granda kaj respekta. Tamen estas manko, eĉ mankoj. La sveda eldonejo havas sanan principon, t. e., ke la svedaj tradukaĵoj estas kontrolitaj de fremdlandaj esp-istoj. Se la hispana eldonejo estus sekvinta la saman principon, certe nun ni havus malpli da riproĉetoj kaj pli da plezuro. La plej okulpika strangajo estas la amasa uzo de »kiel se« anstataŭ »kvazaŭ«. Unu ekzemplo el la centoj: »Li sentiĝis (?) nenigita same, kiel se subite rekuniĝus sur lin la: *ĵus pasintaj, noktaj lacigoj*«. (Cetere tiu ĉi frazo ne povas esti modelo de klara traduko.) — Ofte ni vidis hispanisman miskomprenon pri la vorteto *mem*. Ekz. . . . *kiu ĵus alvenis el Parizo mem*. (Laŭ mia sento la vorteto »mem« povas plifortigi en tiu ĉi frazo nur la vorton: *kiu*. *Kial li ne sin dungas, kiel soldato?* — ni legas aliloke. La uzo de la refleksiiva pronomo ŝajnas al ni nenatura. La tradukinto iom misuzas kaj trouzas la afiksojn: *Kia feliĉajo!* — li diras, sed sufiĉus diri: *Kia feliĉo!* Amase estas uzita la sufikso: *-ul-* ofte senbezone. Ni ne kredas, ke Ibanez volis diri tion, kion ni legis en la jena frazo: »*Si supreniĝis malpeze sur la ĉevalon malgraŭ siaj ekscitantaj karnaj belajoj*. Oni ne povas nei per »*nek*« ĵone: »*Nek eĉ Castelar parolus tiel*. (Ankaŭ tia uzo estas sufiĉe ofta.) Kelkloke la forlaso de la difinita artikolo ĝenas nin, aŭ aliaj

la arbo mem: estas nur adjektivo kiu kvalifikas propran specon de ĉerizujo aŭ prunujo. Do, oni devus diri *padusa ĉerizarbo* aŭ *prunarbo*. Kia estas tiu speco? Denove ni rigardis la bildon, kaj sinjoro Vernay diris al ni, — ĝi estas »un merisier«. Efektive, mi diris, la fruktoj estas merizoj, kaj la arbo estas merizarbo. Merizarbo? Ĉu ĝi estas esperanta vorto, ekdiris iu el ni? Certe, mi respondis. Ĉu vi havas viajn vortarojn? Tuj ĉiuj foliumis febre kaj baldaŭ oni aŭdis ĝojajn ekkriojn. Mi trovis! mi trovis! Mi trovis ankaŭ. Ĉiuj vortaroj enhavis la vorton »merizo«. Ĝi eĉ estas en la Fundamento. La Plena Vortaro difinas ĝin »frukto de merizarbo«, kaj difinas merizarbon: »sovaĝa ĉerizujo«. Merizoj estas la malgrandaj fruktoj, kiujn la angloj kaj la germanoj nomas birdoĉerizoj. Ili iam estis tiel nomataj en la latina lingvo. Ni ne povis nin deteni: Ridego brue eksplodis en la ĉambro. Aŭdante ĝin, la kelnero alvenis rapideme, kaj kiam mi vidis lin rigardanta nin per grandaj mirigitaj okuloj, ni pli forte ridegis. Tiu kunveno estis eble la plej gaja el ĉiuj, kiujn ni havis de longa tempo en la »Centra Kafejo«. Feliĉiga paduso! Ni tre ŝatas tiun neologismon. Ĝi tiel bone ĝojigis min, ke ĝi fariĝis por ni neforgebla ĝojigaĵo!

Sed nun ni estu seriozaj. La vorto: »merizo« devenas de la malalta latina vorto »meserasus«, kiu signifas »malbonan ĉerizarbon«. Ĝia frukto estas eta kaj nigra. El ĝi oni fabrikas kirŝon. El la ligno de tiu arbo oni faras bonajn meblojn, precipe seĝojn kaj brakseĝojn. Tiu sovaĝa arbo multe plibonigas per kulturo. Tiam ĝi produktas la rugblankan ĉerizon kiu estas bonega. Sed krom tiu arbo, ekzistas ankoraŭ arbeto el la sama familio kiun la botanistoj nomas: »*Cerasus padus*« kaj Engholm »*paduso*«, kies freŝa ligno malagrabla odoras. Tiu arbeto, kiu kreskas en preskaŭ ĉiuj montetoplenaj lokoj de

Eŭropo, havas florpaniklojn, kiuj fruktante naskas nigran beraron. Tiu aparteco permesas nomi ĝin tute korekte en Esperanto: »PANIKLOMERIZUJO« laŭ ĝiaj floroj, aŭ ankoraŭ pli bone: »BERARMERIZUJO« laŭ ĝiaj fruktoj, por diferencigi ĝin de la ordinara merizarbo.

Tiuj klasnomoj, konformaj al la spirito de nia lingvo, estus certe pli facile kompreneblaj ol paduso, por ĉiuj esperantistoj.\*

G. DEGAND.

\* Sed eble iom tro longaj, precipe en poemo. Ni imagu nur la belan poemon de Hilda Dresen kun tia komenco:

*Paniklomerizujo, reĝino de P nordo . . .*

Ni timas, ke la vorto »paduso«, kiu cetere ankaŭ al ni ege ne plaĉas, kiel ne plaĉas al ni ĉiu vorto, en kiu, antaŭ la E-a o-finaĵo estas konservita la latina *-us*, do, ni timas, ke la vorto *paduso* certe vivos, se oni ne povas proponi anstataŭ ĝi pli mallongan radikvorton (RED.).

#### DISKRETA DEMANDO.

En la lasta numero de »Nia Gazeto« mi legas en neŝubskribita artikolo:

... Lingva Komitato, en kiu multaj anoj fariĝis ĝiaj membroj, ĉar — ili ne scias Esperanton, kaj kies prezidanto faras, kion li volas, ne atentante iun ajn.«

Nu, atendu iomete. Kiun devus unuavice kaj eble ekskuzive atenti la prezidanto de la Lingva Komitato? Evidente, la anojn de la dirita institucio.

Sed — jen estas la diskreta demando — se la artikolverkinto rigardas la anojn de la L. K. tiel senvaloraj fuŝuloj, kial li malaprobos do, ke ilia prezidanto ne tre atentis ilin?

Jen ĉio. Mi finas.

M. Alice Pik.



malkorektaĵoj, kiuj entute estus facile forigeblaj kaj tiam ni rajtus senkondiĉe laŭdi la tre grandan laboron de la tradukinto.

La eldonejo produktis belan libron, sed certe estos kelkaj, kiuj ektimos pro la tro malgrandaj literoj.

F. Szilágyi.

A. STRINDBERG: »PASKO«. (El la sveda: St. Eng-holm. Eldona Societo Esperanta, Stockholm. 88 p. Prezo: Sv. kr. 1.50).

Tiu ĉi triakta dramo de Strindberg komenciĝas per la muziko de Haydn: »Sep vortoj de Kristo.« Kaj la dramo okazas dum tri tagoj: Sankta Ĵaŭdo, Sankta Vendredo kaj Sankta Sabato. La grandkontura, preskaŭ ĝis la naiveco simpligita temo de la dramo konscie kaj intence rememorigas la mezepokajn misteriojn; la dramo estas paralela kun ili, malgraŭ tio, ke ĝia temo estas el niaj ĉiutagoj. Sankta Ĵaŭdo: malfeliĉa familio. La patro kondamnita, la filino nervmalsana, la filo malsukcesas, kiel instruisto. Sankta Vendredo: la suferoj kulminas, ĉar ĉiuj devas suferi en la Sankta Vendredo por memori al si la suferojn de Kristo sur la kruco. Sankta Sabato: plena serenigo, revivigo. Super la dramo altiĝas minacanta figuro de la Kreditoro, ĝis (la sanktan Sabaton) klariĝas, ke li savas la kompatindan familion. La sugestio de la ne-ĉestanto, la akra karakterizo kaj sentigo de la forestanta ĉefrolanto estas artaĵo de artaĵoj; alia ekzemplo pri tio estas la granda historia dramo de Strindberg, la *Gustav Vasa*, en kies unua akto absolute regas la persono de la nerolanta reĝo. Kun la fortaj, malhelaj koloroj, samtempe aperas ankaŭ subtilaĵoj, mildaj detaloj kaj ili kune klarigas la tute originalan Strindbergan efekton.

La traduko estas altnivela laboro de Stellan Eng-holm, kiu serĉas kaj trovas solvojn. Kiam la lingvo montras sin tro longa por arde rapidaj dialogoj, li paroligas la rolantojn en frazetoj sen persona pronomo. La eksterajo de la libro estas bela, kiel kutime ĉe la eldonaĵoj de la Syeda Eldonejo.

F. Szilágyi.

E. PHILLIPS OPPENHEIM: LA ORA STUPARO. Tradukis Esperantista Societo de Romford. 278 pĝ. Formo: 12x18.5 cm. Prezo: bind. 3 ŝil. 6 p. (afranko 6 p.). Eldonis Esperanto Publishing Co., 142 High Holborn.

Oppenheim, lerta kaj ruza aŭtoro de grandvendaj detektivromanoj, ĉi-foje celis pli alten. Li verkis ion utopian pri la kreo de mondpaĉo. Amerika miliardulo, kies du filoj mortis en la mondmilito, anoncas decidan militon al la milito. Per sia potenco gazetaro li komencas kaj per giganta financa manovro li finas triumfe tiun militon: li tiras al si per siaj lertaj spekulacioj la tutan orrezervon de la ŝtatoj kaj per tio devigas ilin obei: subskribi kontrakton, kiu malebligas ĉian militon.

La kvalitoj de Oppenheim: interesa templekto, rapida fluo de la rakonto, surprizaj turnoj ktp. montriĝas ankaŭ en tiu ĉi verko. Sed funde la libro estas nekuracebla naiĉa. La militismon de nia epoko ja ne kreas kelkajn malbonintencajn malhomojn, al kiuj oni povas trudi prudenton per financa kapo-frapo. La imperialismon vivtenas profundaj ekonomiaj kaŭzoj, sen kies elimino (t. e. sen la ekonomia transorganizo de la mondo) ĉia pacisma klopodo devas senespere fiaski. Estas sendube, ke la usona miliardulo mirkonsterne vidus, ke la ŝtatoj, anstataŭ lin obei, simple — forlasus la or-bazon.

La traduko estas sufiĉe flua, facile legebla. Sed lingvaj eraroj kaj mallertajtoj ne mankas. Jen, mi faris el ili kelkajn bukedojn:

Pri la tempoj kaj modoj de la verboj la tradukintoj oftege eraras. Ili ne sentas ekzemple, ke en eksplikaj KE-prepozicioj la tempo estas relativa, ĝia nuntempo montras la tempon de la ĉefpropozicio. Tiel oni legas: *li skribis, ke li vivis (vivas); mi estis certa, ke la perloj estis falsaj (estas); plej interesa estas la jena ekzemplo: mi pensis, ke mi komprenis la aferon, antaŭ ol mi envenis* — ĉi tiu frazo signifas: *mi pensis, ke antaŭ mia enveno mi komprenis la aferon* — kvankam la tradukintoj volis esprimi: *mi pensis antaŭ mia enveno, ke mi komprenAS la aferon*. Male, ĉe rilataj subprepozicioj ili uzas relativajn tempojn

anstataŭ absolutaj: *Mayer estis... viro... kun blonda hararo, kiu evidente estAS perulco (estIS)*. Aliaj eraroj: *la pordo restis malfermata (-ita); mi esperas, ke vi gajnu (-os); atenti, ke oni ne ĝenos (-u); kial ne malaltigu lin (-i)*. Ekzistas krome multaj superfluaĵ kondicionaloj, kiujn mi nun ne havas lokon surpingligi.

Alia malforta punkto de la tradukintoj estas la transitiveco de la verboj: *ĉesi agadon (-igi); mi nauzas (-iĝas); vizaĝo suprenturnis (-iĝis); konvinkiga (konvinka); ŝrumpita (-inta); flirti la manon (flirtiĝi, pli ĝuste ŝvingi); vi vin kondutos; movante (-igante); kiam vi komenciĝos (komencos); interesigi iun (interesi); signo de bonveno (bonvenigo)*.

Stranga estas la uzo de AJN en demandaj frazoj: *Kion ajn vi faras ĉi tie? Kaj tia superflua AJN estas tre ofta; mi vane rompas al mi la kapon, kial la tradukintoj ĝin trovis necesa*.

Ofta estas la uzo de absoluta adjekto laŭ la jena ekzemplo: *li demandis, la okuloj alfikisAtaj (kun okuloj alfikistaj)*.

Superfluaĵ akuzativoj: *ĉu ian sukceson? (ĉu ia sukceso; tio estas: ĉu estas, ekzistas?)*; *skrupulojn, sinjoro (-oj; tio estas: ekzistas); kion li nomas ripetajn bombojn (ĉeferaro!)*. Male, mankas la akuzativo: *vi havas imagon, kia Jules Verne* (tio signifas: via imago similas al Jules Verne, dum oni devus esprimi: *vi havas fantazion, kiaN [havas] J. V.*).

Anglismoj: *ŝi sin indulĝis per grimaceto; kontroli (regi, estri); kopio (ekzemplero); la lifto ŝutis supren (sin pafis, pafiĝis)*.

Fine, strangaj aŭ pezaj frazkonstruoj: *estas de li, ke mi scias (estas li, de kiu mi scias); se oni imagas lin kiel mariston, estas kiel oficiron, ne kiel kapitanon (do kiel oficiron...); ne ĝenu vin, ĉar li estas via estro (ke li estas...); mi ne scias tion, kio ĝenas lin (kial tion?); kaj la plej kurioza el ĉiuj: la virino, kiun li jam decidis ĉirkaŭrigardante, estas plej alloga (la virino, kiu, li jam decidis, estas plej alloga; aŭ: la virino, pri kiu li jam decidis, ke ŝi estas plej alloga)*.

Eĉ se la supraj riproĉindaĵoj, krom kelkaj malmultaj esceptoj, ne difektas la fluan kompreneblecon de la libro, tamen estus pli agrable, se ili estus elsarkitaj. Eble pleje ĝojus la recenzanto, se al li estus ŝparita tiu ĉi beda laboro de skarabet-kolektado.

Alex Kay.

M. HIROKAZU KAJI: JAPANUJO HODIAU. (Eldonejo en Tokio, Jamato. 110 p. Prezo: svfr. 1.60 afrankite. Tole bindita.)

Bela eldonaĵo kun ilustraĵoj. Modelo de konvastigaj verkoj, kiun karakterizas klopodo por laŭdinda kaj sekunda objektiveco. Eble la historia parto estas iom ŝarĝita de nomoj. De alia flanko la plej nunaj ĉapitroj pri la diversaj industrioj — kun la plej lastaj statistikaj indikoj estas tre interesaj. Mankas nur geografia karto. Oni absolute bezonas tiajn verkojn, kiuj prezentas la vivon, tia, kia ĝi estas. La aŭtoro kompreneble ne elĉerpis ĉiujn temojn, kiuj nin interesus, sed tion oni eĉ ne povis atendi laŭ la cirkonstancoj.

Krom la konstatoj nur en lasta ĉapitro oni povas trovi sent-esprimojn kaj deklarojn kaj tiu ĉi fakto mem laŭdas la aŭtoron, kiu ne uzis la ŝablonajn apostrofojn de similaj verkoj. Oni povas eventuale diskuti pri la deklaroj de tiu lasta ĉapitro, sed tute ne pri la bonvolo de la konsciencia kaj lerta aŭtoro.

Car temas pri japana verko, oni devas konstati, ke neologismoj ne mankas.

F. Szilágyi.

LA UNUAJ PASOJ EN NOVA MONDO. Legolibreto de Annie Rebers. 5 kajoroj. Eld. Federacio de Laboristaj Esp-istoj en la regiono de la nederlanda lingvo. Paĝombro po unu kajero 16, prezo po unu 12½ holandaj ct.

La aŭtoro estas lerta pedagogo. Oni povus eventuale elserĉi kelke da formoj kaj vortoj, kiuj el absoluta vidpunkto estas surprizaj post rektmetoda unua kurso, sed ni ne rajtas forgesi, ke la aŭtoro adaptis sin al certa kurso, al difinita materialo de la antaŭa kurso. Atentante tiun

fakton, neniu povas dubi pri la unuaranga lerteco de la verkistino. Generale mia sola ne-aproba rimarko estas, ke la generala tono estas kelkloke tro infana. Neniu miskomprenu min, absolute mi ne volas ekzili la freŝan bonhumoron en la kursoj, eĉ... tamen, kiam kurso ĉesas esti karikaturo de infanternejo, sed preskaŭ serioze ludas infanternejon, nepre vekigas sub aŭ sur la konscio de la lernanto ia gena sento de la perforta primitiveco. Felice, la aŭtorino, ankaŭ tiurilate ne perdas la ekvilibron, kvankam foje-foje ŝi eksanceliĝas. Specialajn rimarkojn mi preskaŭ ne povas elŝviti. La libro estas ne riproĉebla el gramatika vidpunkto. Eble estas kelkaj formoj, kiuj ne estas kutimaj, sed ili tamen estas korektaj. Mi mencias nur unu, kiu estas iom malsimpla: Vi ne estas *amiko de ni*. (anst. nia.) Resюме: rekomendinda, bona verko. F. Szilágyi.

✓ **VUNUA PASO AL LA VOJO DE SCIENCO. ASTRO-NOMIO.** Kompilis kaj eldonis Jodaŝien, 1935. 2/4 paĝa malgranda kajereto. Prezo 1 respondkupono.

Oni bezonas popularan sciencon bibliotekon en Esperanto, sed estas demando, ĉu tia eta kajereto, kies enhavo ne estas alia, ol artikolo en scienca aŭ junulara gazeto, pliriĉigas nian sciencon literaturon. Ĝi estas tre mallonga kaj konciza priskribo de la ĉefaj sciindaĵoj pri astronomio kaj aldono de sciigoj el la «Scienca Gazeto» pri satelitoj kaj falantaj steloj. La teksto estas ĝenerale bona kaj komprenebla. Kelkaj fakvortoj bezonas klarigon. En la frazo «La Suno lumigas definitan parton de la Tero» estus eble pli ĝuste: «parton de la Tero», ĉar kiu difinis la lumigitan parton antaŭe (se ni nur ne pensas pri ia supera Estajo). Kial uzi «rivoluas», kiam «rondiras» aŭ «ĉirkaŭiras» simile taŭgas? Kelkfoje estas «movas» anstataŭ «moviĝas». Ankaŭ kelkajn aliajn malglataĵojn kaj preserarojn mi trovis. Kun la ilustraĵoj, interesa kajero, precipe por junuloj.

— — — PB.

✓ **JULIE SUPICHOVA: SAMIDEANA VORTARO.** Eldonis A. Prazák, Jablonné n. Orlici. C. S. R. 14×9.5 cm. 20 paĝa. Prezo 2.50 Kč. afranke.

Tiu ĉi vortaro estas fakte kolekto de sentencoj, ligitaj al po unu vorto de la vortaro. La koncerna vorto fakte estas nur la komenco de la respektiva frazo kaj tial ni preferu donus al la verketo la titolon: «samideanaj sentencoj». Multaj esperantistoj certe volonte legos la saĝajn konsilojn, entenatajn en tiu ĉi «vortaro».

✓ **ŬSTJEPAN MIŠAK: TRA MISTERA ORIENTO** kaj de la sama aŭtoro, **ESPERANTO EN TURKUJO** kaj **MIA AGO.** formatu 10×8 cm. la unua 44. la dua 20-paĝa.

Memoraĵoj de la Esp-a pioniro en Adana (Turkujo, Giritli Nahallesi nro 110). Prezo de la unua 2, de la dua unu respondkupono.

Bedaŭrinde la agema samideano ankoraŭ ne povis tute perfekte ellerni nian lingvon kaj tial ni trovas kelkajn gramatikajn eraretojn en la verketo. La entuziasmo kaj agemo ĉiokaze estas laŭdindaj.

**ESPERANTA KANTARETO** de H. Salokannel. Finnaj religiaj kaj popolaj kantoj. 15×11 cm. 16 paĝa. Mendebila ĉe la kompilinto en Uusikaupunki. La verketo certe kompensas mankon, ĉar en kunvenoj estas tre grave havi taŭgajn tekstojn por konataj kantoj.

✓ **AL LA MEMORO DE VIKTOR HUGO** eldonis la Universitata Esperanto-Klubo en Lyon (ĉe sro Richard Levin, 55 rue Félix Faure) skribmaŝine multobligitan okpaĝan folion. Ĝi entenas desegnitajn portretojn, la protokolon de memorkunsido kaj kelkajn poemtradukojn. Bedaŭrinde ili ne portas sur si eĉ la ombron de la genio de Hugo. La kajero estas havebla ĉe sro Levin por 3.— francaj frankoj.

✓ **JARLIBRO DE LA LINGVA KOMITATO.** 1935. 15.5×12 cm. 40 paĝa. Eldonis Esperantista Centra Librojo, Paris 6e, 11 rue de Sévres, prezo 2.— frfr.

Ĝi enhavas la statutojn de L.K., ties internan regularon liston pri L. K.-anoj kaj Akademianoj, mallongan historion, landnomojn laŭ la zamenhafa sistemo kaj fine la avare elektitajn vortojn oficialigitajn en tiu ĉi jaro, kun

la tradukoj angla, franca, germana, hispana, itala kaj pola. Maldika, sed interesa dokumento.

✓ **GRAMATICHÉ.** Vocabulari ed. Eserciis di Lenghe Internacjonal Esperanto. Kompilis Dr. A. Tollini L. K. Udine. Eld. Esperanto, Udine, Piazza Vittorio Eman. 9A. Poŝformo, 32 paĝoj. Enkonduko itala pri la movado kaj la lingvo. 7 paĝoj gramatiko. 21 p. vortareto esperanta-friula. Ĝi ŝajnas esti simila al la ŝlosiloj kaj servas por sama celo.

✓ **LA LANDO DE REMBRANDT.** Faldprospekto, eldonita de la Federacio de Nederlandaj Societoj por Interirato kun fremduloj, Den Haag, Lange Voorhuis 102. Pro la enhavo kaj ekstero ĉi tiu prospekto estas vicigebla al la plej sukcesaj. Tafa propagando por la Rembrandt-ekspozicio. Ni deziras, ke ĝin ne nur petu senpage multaj esperantistoj, sed ke ĝi altiru al Nederlando multajn intereseatajn samideanojn.

✓ **DUDEKSESA U. K. de E.** Eldonis UEA, Genève. 1 Tour de l'He. 21×14.5 cm. 156 paĝa. Entenas la protokolon de la kongresaj kunsidoj, la raportojn de UEA, ICK kaj Akademio.

Interesa libro ankaŭ por tiuj, kiuj volas, malgraŭ sia manko de mono, konatiĝi kun la stato de nia movado, kvankam mankas el ĝi resuma historio de la E-movado en ĉiuj ŝtatoj. Tamen, ni trovas en ĝi ĉion, kion faris dum unu jaro la tri plej gravaj organizaĵoj esperantistaj kaj tial la verko estas nepre necesa dokumento.

✓ **DUDEKSEPA U. K. de E.** Eldonis UEA. 21×14.5 cm. 68 paĝa. Kun la raportoĵ nur de UEA kaj la Akademio. La Protokolo certe estos eldonata aparte.

Pri tiu ĉi ni povas diri la saman, kiel pri la supra, se ni ne volas detale pritrakti la agadon de UEA. Tio tamen transpaŝus la kadrojn de nia recenza rubriko. Legu kaj tiru mem la konkludojn.

**KOSTUMOJ EN BRUCKNER-LANDO** estas la titolo de tre bela multkolora faldprospekto, eldonita de la fremdultrafikoficejo LINZ, Aŭstrio. Ĝi inde kaj bonguste propagandas la Bruckner-semajnon, aranĝitan en la naskurbo de la fama komponisto. Ĝia valoro ne estas efemera: ĝi ĉiam kapablos altiri al si la okulojn de ĉiu belamanto.

**VIENA FOIRO** estas la titolo de trikolora, okpaĝa faldprospekto, senpage havebla de Wiener Messe, Wien VII. Messeplatz 1. Per malmultaj vortoj kaj kelkaj artaj bildoj ĝi bone prezentas la avantaĝojn de la foira arango.

**FRANGLINGVAN KATALOGON** de la fotoj, ekspoziciataj en la dua ekspozicio en Elbeuf, dissendis la Societo de Amatoraj Fotografistoj. Estas interese, ke bonan kvanton da ekspoziciitaj bildoj oni havigis per la alvokoj en Esperanto-Gazetaro. Tiu laboron organizis la ĉiam agema delegito de UEA, s-ro G. Saget.

✓ **GVIDFOLIO POR VOJAGANTOJ EN MANĈOUKUO** 8 paĝa bele ilustrita prospekto eldonita de la Sud-Manĉuria Fervoja Kompanio (S. M. R.) *Dairen*, Sud-Manĉurio. La interesa informilo montras la modernan komforton kaj belajn partojn de la nova ŝtato, tute laŭ novstila eŭropa prospektformo. Inda por peti senpage kaj ĉie konigi. Sed kial diversaj landnomoj: Manĉoukuo kaj Manĉurio. (La lasta estus rekomendinda pro internacia uzado). Adreso: The South Manchuria Railway Company, Head Office, Dairen, Nachuria.

✓ **BUDAPEST LA METROPOLO DE SANIGBANEJOJ.** 4 paĝa ilustrita prospekto de la Centra Komitato de la Termalbanejoj kaj Resanigejoj de Budapeŝt, V., Vigadóplaco 3. Ĝi montras, ke ankaŭ la plej nova turisma oficejo de Budapeŝt uzas Esperanton por eksterlanda propagando kaj malkaŝas antaŭ la mondo, ke Budapeŝt estas vizitinda pro siaj multnombraj diversaj kaj efikaj sanigfontoj kaj banejoj. Tiu ĉi fakto ĝenerale oni ne konas eksterlande, do Esperanto taŭgas ĝin konigi. Petu la prospektojn.

**GLUMARKOJ PRI FRIULIO.** Dekses glumarkoj pri itala landparto: Friulio, Udine, presita sur diverskoloraj folioj. Prezo de folio Lira —.30 (Esperanto-Udine, Piazza Vittorio Eman 9A. Italio).

# INFORMOJ DE AELA

PROGRAMO POR 1936

## LETERO AL AELA-ANO

Kara Samideano! KREDU, ke niaj deziroj estas tute konformaj al la viaj. Ni deziras, deziregas reguligi nian agadon kaj akuratigi la aperon de niaj libroj. Por tio ni faras ĉian eblan fortostreĉon kaj ni esperas, ke ĝis la fino de la jaro ni sukcesos efektiviĝi nian programon de 1935 kaj 1936, por ke la jaron 1937 ni komencu sen program-restaĵo.

Ni scias, ke lastatempe ni trouzis vian paciencon. Sed kiam vi faras komparon inter ni kaj la samspecaj nacilingvaj eldonejoj, vi devas konsideri bonvole nian absolute specialan situacion.

1. Nacilingva eldonejo laboras per kapitalo turnebla plurfoje en ĉiu jaro, ĉar la eldonaĵoj rapide trovas aĉetantojn; nia eldonejo havas nur kelkcent membrojn, kies kotizoj kovras apenaŭ la duonon de la kostoj por la presita kvanto. Por igi la eldonon malmultekosta, ni devas presi 2000 ekzemplerojn el ĉiu libro kaj dividi la preskostojn inter la budĝeto de pluraj vendo-jaroj.

2. Nacilingvan presejon oni facile trovas, bonan kaj malkaran; tia Esperanta presejo estas multe pli malofita. Tial la eldonisto estas ĉiam ligita al la laborkapablo de unu, maksimume de du presejoj.

3. Aŭtoroj kaj tradukantoj esperantistaj ofte malfrue plenumas siajn laborojn; ni konfesas, ke ties kaŭzo povas esti ankaŭ la malpli da honorario, kiu ne permesas, ke niaj kunlaborantoj oferu ĉiun sian tempon al siaj poresperantaj laboroj.

4. Nia agadkampo estas tro vasta, multe pli vasta ol tiu de la naciaj eldonejoj; krome, ni ne havas je nia dispono la librokomerca organizon de la landoj, kiel ili. Seriozaj Esperantaj librovendistoj estas — agrablaj esceptoj. Doganaj malhelpoj, prokrasta alveno de monpostuloj — jen la malbeno de la grandaj dimensioj, en kiuj ni laboras.

5. Ni laboras kun la tuta mondo, kaj en la mondo niatepe okazas neantaŭvideblaj strangaĵoj. Malagrablaj surprizoj, kiaj apenaŭ minacas nacian entreprenon, kreas de tago al tago novan kaj novan malfacilaĵon. Komerci internacie en niaj tagoj estas konstanta amara batalo, en kiu nia entrepreno, kompreneble, ja ne kapitulacas, sed kies konsideron bonvolan ni tamen devas peti de niaj membroj.

Sed, oni povus diri, kial ni ne konsideris antaŭe en niaj programoj tiujn malfacilaĵojn? Nu, ili estis parte neantaŭvideblaj. Parte, ni konfesas, ni eraris: ni tute ne antaŭvidis, ke la pretigo de la Enciklopedio postulos tiom da peno kaj tempo. Ankoraŭ nun ni suferas de tio: niajn prokrastojn estigis plejgrandparte tiu librogo. La prokrasto pro diversaj malfacilaĵoj estus nun tute malgrava, se ne alvenus la kroma malfruo, per kiu la Enciklopedio ŝargis nian programon.

Lastatempe ni faris energiajn fortostreĉojn, por montri, ke L. M. kaj AELA restis solidaj en la mondkaoso kaj ke niaj amikoj povas esti trankvilaj: ili neniam devos penti pro mono al ni pagita.

NUN FINE NI SCIAS, KE LA PLEJPARTO DE NIAJ PASINTJARAJ LIBROJ ESTOS PRETAJ ĜIS LA MEZO DE MAJO.

Ni ne publikigis ĝis nun la planon por 1936, pretan jam de kvin monatoj, ĉar ni ne volis peti de vi novan kotizon antaŭ ol plenumi almenaŭ 80% de la antaŭjara plano. Tio okazos ĝis la mezo de majo, do ni povas de vi peti la novan kotizon, ne ŝajnante postulemaj senrajte.

Ni esperas, ke vi bonvole pardonos al ni la malfruojn, konsiderante, ke ĝin estigis, krom eksteraj kaŭzoj, nia intenco: servi ĝis la plej ekstrema eblo al nia literaturo kaj uzi por tio ĉiun latentan forton de nia movado.

Krome, ni volas rekompenci vin, pacience atendantan membron, pro via toleremo. Ni sendos al vi SENPAGE dum duonjaro la revuon Literatura Mondo, aŭ, se vi jam estas ties abonanto, libron en valoro de 3. sv. fr.

Ni ne rigardas vin esperantisto, kiu oferas, sed kliento, kiun oni devas honeste servi. Tamen, ni ne sentas nin nuraj negocistoj, sed ni kredas, ke ni plenumas ankaŭ mision tre malfacilan. Tial ni turnis nin al vi konfide, esperante ke vi bonvole juĝos en la afero de la ĝisnunaj prokrastoj, kies kaŭzojn ni prezentis al via bonvola konsidero.

Firme kredante, ke via juĝo ne estos malfavora, kaj ke per via kotizpago vi helpos nin plu en nia laboro por la Esperanta kulturo, vin salutas via

AELA.

## NIA PROGRAMO

### KION DONAS AELA EN 1936 AL SIAJ

#### MEMBROJ?

2300 PAGOJN POR SVFR. 15.50 AFRANKITE

KVIN GRAVAJN LIBROJN EN SES DIKAJ

#### VOLUMOJ

1. VALLIENNE: ĈU LI? (ĉ. 400 pg.) estis la unua originala romano en Esperanto.

Ĝia aventureca enhavo, ĝia facila stilo kaj ĝiaj interesaj figuroj faras ĝin, jam de jardekoj nericeveblan, ankaŭ hodiaŭ aktuala.

2. JAPANA ANTOLOGIO. Redaktita de Japana Literatura Esperanto Asocio.

En la kutima formato kaj grandeco (ĉ. 500 grandformataj paĝoj) de niaj Antologioj, ĝi estos unu el la plej grandaj sensacioj.

3. A. SCHRENZEL: ABISENUJO, Kanaano de Afriko. (Trad. J. Weleminsky.)

La plej bona libro, kiu temas pri la nun tiom aktuala lando. Kun multaj ilustraĵoj, en ĉ. 300 grandformataj paĝoj.

4. SINCLAIR LEWIS: Dr. ARROWSMITH. Trad. G. Saville. ĉ. 800 paĝoj, en du volumoj.

La plej grandioza romano de la fame konata verkisto. Pro ties verkado li ricevis la Nobel-premion.

**Ĉi tiu numero aperas tiom malfrue pro la publikigo de la AELA-programo por 1936-a jaro**

**Ĝi nun estas sendata al ĉiu abonanto de Literatura Mondo 1935. kaj al ĉiu membro de AELA kun la donaco pro la pacienca atendo.**

**Aldonata: enpagilo**

**Samtempe estas ekspedata la verko de Axel Munthe: Romano de San Michele.**

5. S. BERGMANN: MERKURELL. (El la sveda M. Carlsson kaj dr. F. Szilágyi.)

La plej bona satira romano de la plej granda moderna romanverkisto de la svedoj (ĉ. 300 paĝa).

Krom tiuj libroj AELA presos laŭeble ankaŭ ekstervicajn librojn, verŝajne ankaŭ tutan serion de popularsciencaj verkoj, kies liston ni publikigos en la proksima numero. Tiuj tamen aperos nur, se la AELA-libroj aliaj ne devos aperi pro ili kun malfruo.

### Frupagoj

PAGANTOJ ANTAŬ LA 10-A DE MAJO RAJTOS ELEKTI SENPAGE EL LA KATALOGO DE LITERATURA MONDO AU EL LA ELDONOTAJ EKSTERVICAJ LIBROJ PREZARAN VALORON DE SVISAJ FRANKOJ 4.— kaj rajtos ricevi la librojn tuj post apero.

### Specialaj deziroj:

La kotizo inkluzivas afrankon.

Por rekomendita sendo de la tuta serio oni devas pagi . . . . . svfr. 2.—  
Por bindo de la tuta serio (tola bindo) oni pagas . . . . . svfr. 4.—  
Por pli peza papero (luksa) broŝurita, ĉe la tuta serio . . . . . svfr. 2.50  
Por pli peza papero kaj ledimita bindo, ĉe la tuta serio . . . . . svfr. 9.—

### Limtempo de aliĝo.

Kotizoj laŭ supra skalo estas akceptataj ĝis la 1-a de septembro. Ĝis la apero de la lasta el la serio oni povos antaŭpagi per svfr 19.—. Post la apero de ĉiuj libroj ili kostos afrankitaj kaj broŝuritaj, sur kutima papero, svfr. 29.—.

### Specialaj favoroj

Ĉiu esperantisto, paginta la kotizon por la serio de 1936. rajtas aĉeti librojn el la eldonejo de Literatura Mondo, kaj el kelkaj aliaj, kun rabato de 20%. Por ĉiu pagita kotizo estas aĉetebla nur unu ekzemplero el tiuj libroj.

La kotizo estas pagebla ankaŭ en partoj, kiuokaze estas aldonendaj svisaj frankoj 2.— por administraj kostoj. La minimuma partopago pagebla estas svfr. 5.—.

Ĉe la aliĝo oni devas sendi la plenan nomon kaj adreson, krome almenaŭ la unuan partopagon. Libroj estos sendataj nur post ricevo de la koncernaĵ pagoj.

La aperon de ĉiu libro AELA anoncas per la Esperanto-Gazetaro.

Ĉiu, paginta almenaŭ parton de la kotizo, ricevas senpage la kvaronjaran gazeton Lingvo-Libro kun la oficialaj informoj.

La libroj ne estas ŝanĝeblaj je pli fruaj libroj.

AELA rezervas al si la rajton, ŝanĝi se necese, al alia nove eldonota libro, UNU libron el la supra serio.

Pagoj devas okazi kiel ĝis nun. Pagilon ni aldonas. Poŝtmandatoj estas akceptataj nur por „P. K. O. Krakow. Polujo, kio Literatura Mondo Nr. 403.148.“

Respondkuponio valoras svfr. 0.30. Kurztabelon laŭ deziro ni sendas.

## RECENZOTAJ LIBROJ

LA ROCHEFOUCAULD: MAKSIMOJ. Tradukis G. Waringhien. Eldonis Felix Alcan, Paris, 108 Bd. du St. Germain. Formato 23×14 cm. 112 paĝa. Prezo 10.— frfr.

M. SYGNARSKI: LECIONOJ DE MONDO-LINGVO ESPERANTO. Eldonis Scienca Esp. Rondo, Bydgoszcz, 22.5×14.5 cm. 108 paĝa.

R. NORDENSTRENG: LA HOMAJ RASOJ DE LA MONDO; Eldonis: Eldona Societo Stockholm, Fack 68. Kun 140 ilustraĵoj. 20×12.5 cm. 212 paĝa. Prezo svedaj kronoj 3.25 broŝ., 4.75 bind. + afranko.

JARLIBRO 1935. Eldonis Universala Esperanto Asocio, Genève, I, Tour de l'Île, Svislando. 16.5×11.5 cm. 80 paĝa.

PETR DEN: KIEL FARIĜI FACILE KREANTO. Tradukis Moraviaj Esperanto Pioniroj, eldonis Moraviaj Esperanto Pioniroj, Olomouc. Riegrova 17. — 19×13.5 cm. 230 paĝa. Nur bindita Kĉ. 26.—.

HIROKAZU KAJI: JAPANUJO HODIAU. Eldonis Jamato, Tokio, Japanujo, 19.5×13.5 cm. 109 paĝa. Prezo: svfr. 1.60 bindita, inkluzive sendkostoj.

DELFI DALMAU: „DIDAKTA“ ILUSTRITA LERNOLIBRO DE ESPERANTO. Eldonis Delfi Dalmau, Barcelona. (Apart. 5081.) 24×17 cm. 24 paĝa. Prezo broŝ. 1.— angla ŝilingo.

LA MULTEKOLORA LIBRO. Rakontoj. Eldonis Heroldo de Esperanto, Köln, Brüsselerstr. 94. 19.5×14 cm. 128 paĝa. Prezo germ. Mk. 1.05 sendkostoj 0.15, broŝ.

RICHARD MEYE: LA LONGA VOJO. Eldonis Heroldo de Esperanto, Köln, Brüsselerstrasse 94. 20×14 cm. 140 paĝa. Prezo ekster Germanujo kaj Svisujo bind. Germ. mk. 2.25, broŝ. 1.50.

MOZAIKO. Eldonis Heroldo de Esperanto, Rotterdam, Voorhaven 43. — 14×10 cm. 32 paĝa. broŝ.

SUB LA SIGNO DE L'ESPERO. Noveletoj kaj rakontoj el la esperantista vivo. Eldonis Heroldo de Esperanto, Rotterdam, Voorhaven 43. 15×11 cm. 64 paĝa, broŝ.

WILHELM WINGEN: KIEL ARANGI KURSOJN KAJ GRUPVESPEROJN; Eldonis Heroldo de Esperanto, Rotterdam, Voorhaven 43. 14×11 cm. 48 paĝa. Broŝ.

UPTON SINCLAIR: PETROLO vol. I. Tradukis: William Bailey. Eldonis: The Esperanto Publishing Co. Ltd. London W. C. 1. 142, High Holborn. 19×12.5 cm. 306 paĝa. Prezo bind. 3/6, afranko —/6.

EL VERDAVALO revuo Nr. 1, 2, 3. Eldonis Verdavalo-Eldonejo, P. O. Box 149, Sandakan B. N. Borneo 22×14.5 cm. po 16 paĝoj. Prezo afrankite 2 respondkuponioj.

INTERNACIONALA ELEKTROTEKNIKA VORTARO; Eldonis Elektroteknika internaciana Komisiono 28, Viktoria street Westminster London S. W. 1. 29.5×21 cm. 64 paĝa. Prezo 1/—.

LA JUNA VIVO. Eldonis La Juna Vivo, West-Graftdijk (N. H.) Nederlando. 23.5×15.5 cm. 196 paĝa.